

LENIN EN SVISLANDO

kaj la rolo, kiun Svislando ludis por la
rusaj komunismaj elmigrintoj, kiuj en 1917
akaparis la politikan povon en Ruslando
Kontribuaĵo pri la 100a datreveno de la rusa revolucio en 1917

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)



Enkonduko

Svislando ĉiam estis lando, kiu volonte akceptis plej diversajn rifuĝintojn kaj ekzilitojn, kiuj serĉis protekton pro religia kaj politika persekutado en sia patrujo. La tradicioj de la ŝtata neŭtraleco kaj politika aziljuro faris Svislandon aparte alloga por multaj eksterlandanoj, kiuj petis kaj ricevis azilon, provizoran aŭ daŭran. Por mencii kelkajn famajn ekzemplojn, en la 16a kaj 17a jarcento Svislando, precipe Ĝenevo, akceptis kelkmil rifuĝintojn (t.n. hugenotojn) el Francio, kiuj forkuris de la religia teroro en sia lando. Post la Franca Revolucio de 1789 ne malmultaj nobeluloj fuĝis al Svislando, en 1848 venis germanaj demokratoj, en 1864 dumil polaj ribeluloj, kaj en 1878 aperis germanaj socialistoj, kiuj eskapis el la persekutoj de Bismarko por ĝui la azilrajton de Svislando.

En la 19a jarcento, kiam la opozicio kontraŭ la carisma reĝimo fortiĝis, ankaŭ multaj politike aktivaj rusoj preferis forlasi Ruslandon aŭ estis devigataj elmigri, ĉar ili apartenis al maldekstraj aŭ revoluciaj cirkloj, kiuj planis forigi la carisman sistemon. Kvankam la rusoj ne amase migris al Svislando, en 1910 ilia nombro atingis tamen 8458 personojn – 3933 estis viroj kaj 4525 virinoj. La plej grandaj grupoj ampleksis 2155 personojn en Zuriko, 2107 in Ĝenevo, 865 en Laŭzano kaj 720 en Berno. Malgraŭ sia relative modesta nombro la rusoj en Svislando atentigis pri si laŭ diversaj manieroj. Unu parto formis sufiĉe grandan grupon de universitataj studentoj, precipe studentinoj: En 1907 en sep universitatoj de Svislando estis registritaj 2343 rusoj, kio signifis 34,2 procentojn de ĉiuj registritaj universitataj studentoj. La plej grandan grupon konsistigis studentinoj de la medicinaj fakultatoj, tiel ke kritikistoj nomis la medicinan fakultaton de la Berna universitato „slava knabina lernejo“. En Zuriko la respondecaj ŝtataj instancoj ricevis la plendon, ke la Zurika universitato havas tro da rusaj studentoj. Sed la rektoro respondis, ke la rusoj ne kaŭzas pli da kostoj, sed, male, ke ili eĉ alportas multe da mono, pagis altajn kotizojn kaj tiel utile kontribuas al la levado de la nivelo de la popola bonfarto, do almenaŭ ĉe la registaro ili ŝajne ĝuis bonan reputacion. Malgraŭ tiaj favoraj konstatoj, la svisa federacia prokuroro publikigis en 1907 raporton, kiu enhavis kritikon pri nesufiĉaj lingvaj kaj sciencaj antaŭkondiĉoj de

rusaj studentoj de la medicina fakultato. En 1914 la Zurika universitato devis konsenti pri la enkonduko de la „*numerus clausus*“ por limigi la nombron de eksterlandaj studentoj. Sed la eksplodo de la Unua Mondmilito solvis tiun problemon kaj la nombro de eksterlandaj studentoj aŭtomate malpliiĝis. Multaj rusoj volis reveturi al Ruslando, sed kelkaj restis en Svislando kaj atingis grandan signifon. Ekzemple Pavel Aksel'rod, kunfondinto de la rusa marksismo, pri kiu sube ni ankoraŭ multe rakontos, fariĝis entreprenisto kaj fondis jogurtan fabrikon.

Dum Zuriko kaj Berno estis la centroj de la rusa studentaro, Ĝenevo fariĝis iusence la ĉefurbo de la rusaj revoluciaj socialistoj, marksistoj kaj komunistoj. *Iskra*, la unua centra organo de la ruslanda socialde-mokratio, estis eldonita en Ĝenevo, kaj pluraj gvidantoj de la rusa revolucio vivis aŭ renkontiĝis en Ĝenevo. Inter la plej famaj rusaj elmigrintoj troviĝis la anarkiisto *Mihail Bakunin* (1814-76), kiu ripete gastis en diversaj lokoj de Svislando, ĝis kiam li forpasis en la nomita jaro en Berno, en kies Bremgarten-tombejo li estis enterigita.¹ Alia fama rusa elmigrinto en Svislando, kiu plej ofte vivis en Ĝenevo, nomiĝis *Aleksandr Herzen* (1812-1870), kiu eĉ akiris la svisan civitanecon de la komunumo Burg (ĉe Murten).²

Kiel kondiĉojn por esti akceptita kiel politika rifuĝinto oni devis respekti la regularon de la svisa azila juro, kiu postulis de la rifuĝintoj, ke ili ne enmiksiĝu en la internajn aferojn de la politiko de Svislando. Krom tio, ili povis fari kion ili volis, kaj ili estis apenaŭ atentataj aŭ observataj de la svisaj instancoj aŭ polico. Kvankam la svisaj aŭtoritatoj ne ignoris la agadon de la rusaj revoluciuloj, ekzistis dosiero de la svisa federacia polico pri Lenin, kiu tamen estas sufiĉe magra. Kaj se la diplomaciaj rusaj reprezentantoj en Svislando plendis ĉe la svisaj instancoj pri konkretaj rusaj civitanoj, la ĉi-lastaj klarigis al ili, ke iliaj problemoj ne koncernas la svisan flankon.

Lenin, laŭ vera nomo Vladimir Il'ĉ Ul'janov, kiu pasigis preskaŭ sep jarojn en Svislando, rezidante precipe en Ĝenevo, Berno kaj Zuriko, kie li atendis kaj preparis la bolŝevisman revolucion, havis ambiguan rilaton al la svisa realeco: Je la unua flanko li tre admiris ĝiajn naturajn belaĵojn, la pejzaĝon, purecon, ordon, la agrablajn hotelojn kaj sekuran juran situacion kun ĝiaj „inteligentaj policistoj“, aliflanke li trovis la etoson en Svislando „terure mediokra“ (aŭ filistra, etburĝa, etmensa aŭ pruda). Nu, Svislando estis civilizo de severa protestantisma aŭ katolika moralo. Kiam Lenin komprenis, ke Svislando ne estas kondukebla al la socialisma revolucio, li estis frustrita kaj senluziigita. Li mokis pri la rusaj revoluciuloj, kiuj venis al Svislando por esti infektitaj de la „etburĝa bacilo“, tiel ke ili ekŝatis la etburĝan vivmanieron, kiun ili komencis adopti. Fakte, Dostoevskij, Tolstoj kaj aliaj rusaj verkistoj venis al similaj konkludoj, kiam ili vizitis Svislandon. Ekzemple *Georgij Pleĥanov* (1850-1928), unu el la patroj de la rusa socialdemokratio-marksismo, mem vivis kiel burĝo en Svislando. V.M. Veliĉkina, edzino de la revoluciulo V.D. Bonĉ-Brueviĉ, trovis Svislandon „la plej bela angulo en Eŭropo“ kaj entuziasme laŭdis la „socian konscion“ de la svisaj civitanoj, kiuj estas „diligentaj laboristoj, kiuj reciproke helpas unu la aliajn, tenas la ordon kaj atingis bonfarton, kiun aliaj nur komencas strebi atingi“. N.A. Semaŝko, la unua komisaro de Sovetunio pri sano, nomis Svislandon „nelezebla politika rifuĝejo“ kaj Ĝenevon „citadelo de la libereco“, kvankam la svisajn malliberejojn, kun kiuj li persone konatiĝis, li trovis teruraj. Pli poste, en 1967, iu ruso citis sian patron, kiu siatempe vivis en Laŭzano kaj opiniis, ke la svisaj aŭtoritatoj malamike rielatis al la rusaj elmigrintoj. Laŭ tiuj rusoj, Svislando ne estis demokratio, sed vera oligarkio, kiu estas ornamita per la mantelo de la politikaj liberecoj kaj respublika regadoformo. La honesteco de la svisoj estis taksita admirinda, sed ankaŭ iom artefarita kaj naiva. Ŝajnas, ke ankaŭ *Aleksandr Solĵenicin* (1918-2008), kiu restadis ioman tempon en Svislando, poste venis al similaj konkludoj. Malgraŭ la principe pozitivaj memoroj, kiujn rusaj elimigrinoj postlasis pri Svislando, post la oktobra revolucio Ruslando ne montris apartan aprezon de Svislando. La diplomatia misiejo de Ruslando, kiu estis gvidata de Jan Berzin, eĉ misuzis la politikajn liberecojn de Svislando, sendante revolucionan propagandaĵon al Francio kaj Italujo, kion la svisaj aŭtoritatoj tute ne ŝatis. La mortigo de sovetia diplomato fare de svisa civitano en 1923 en Laŭzano kaŭzis longan diplomatan krizon, kiu povis esti solvita nur post la dua mondmilito. La praktikado de la politiko en Sovetunio montris, ke ĝi senkompate persekutis politikajn kontraŭulojn, kvankam ĝi proklamis sin sola fidinda rifuĝejo por politikaj rifuĝintoj.³

¹ Vd. <http://www.hls-dhs-dss.ch/textes/d/D28358.php>.

² Vd. <http://www.hls-dhs-dss.ch/textes/d/D28368.php>.

³ Laŭ <http://www.e-periodica.ch/cntmng?pid=smh-002:1976-1977:56::1403>.

UNUA PARTO: LENIN EN ĜENEVO

Unuaj restadoj de Lenin en Svislando


La unuan fojon *Vladimir Il'iĉ Ul'janov*, nomata Lenin,⁴ vizitis Svislandon en majo 1895. La ruslandaj aŭtoritatoj havigis al li pasporton, kiun li petis por povi kuraci sian malsanon de la pulmoj, nomatan pneŭmoniton, en eksterlando.

En Sankt Peterburgo Lenin jam estis sufiĉe bone konata en socialismaj rondoj. Oni sciis, ke lia frato estis pendigita pro partopreno en atenco kontraŭ la caro. Krom tio, en la urbo cirkuladis broŝuro, kiun Lenin verkis sub la pseŭdonimo K. Tulin.

En Svislando Lenin volis informiĝi pri la stato de la socialismo en Okcidento kaj konatiĝi kun rusaj elmigrintoj kiel sinjoroj Pleĥanov kaj Aksel'rod, du korifeoj de la internacia socialisma movado.

Kiam Ul'janov-Lenin atingis Aŭstrion, li devis konstati, ke lia scipovo de la germana lingvo ne sufiĉas por glate interkompreniĝi kun la lokaj homoj. En Svislando okulfrapis lin la bela montara pejzaĝo, tiel ke li skribis leteron al sia patrino, kiu planis ferii en tiu lando, por komuniki kelkajn detalojn pri kutimaj prezoj. Fakte, du jarojn poste lia patrino vojaĝis kun sia filino al Svislando, kie ŝi elektis hotelon en la vilaĝo Spiez por restadi en Berna Oberlando.

En Ĝenevo Lenin renkontis la preskaŭ samaĝan *Aleksandron Potresov*,⁵ kiu en tiu ĉi jaro same vojaĝis de Ruslando al Svislando por viziti Pleĥanov, kiu estis la gvidanto de la grupo „Liberiĝo de la laboro“, kun kiu Lenin volis konatiĝi. Potresov montris sin ne nur impresata pri Lenin kiel „marksisma sektulo“, sed samtempe li estis ankaŭ iom mirigata pri la ekstera bildo de tiu 25-jara „radikala intelektulo“, kiu aspektis kiel malgranda, rapide maljuniĝanta junulo kun velkinta vizaĝo, kalva kranio, maldensa ruĝeta barbo, raŭka voĉo kun prononca difekto kaj kun ŝajne paranoja kaj skizofrenia pensmaniero. Fakte, li povintus esti kutima komercisto el norda Ruslando aŭ, laŭ sia azieca aspekto, kalmika⁶ vendisto de akvomelonoj en bazaro de Astraĥano, kiel Solĥenicin sarkasme rimarkigis en sia libro pri Lenin en Zuriko.



Ul'janov-Lenin en oficialaj fotografiaĵoj de 1887, 1895, 1900, 1914, 1916 (Zuriko), 1920 (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedio, vd. la koncernajn fontindikojn en Vikipedio: https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Lenin, https://fr.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Ilitch_Lénine, https://ru.wikipedia.org/wiki/Ленин,_Владимир_Ильич)

Potresov veturis kun Lenin al Les Ormonts, iom fora montara vilaĝeto en la proksimeco de Les Diablerets en la vaŭdaj Alpoj, kie *Georgij Pleĥanov*⁷ feriiis. Potresov rimarkis, ke Lenin renkontis la 38-jaran ruson, kiu estis konsiderata kiel patriarko de la rusa marksismo, kun granda respekto kaj entuziasme aŭskultis liajn klarigojn, kvazaŭ li estus lia disĉiplo. Ŝajnas, ke ankaŭ Pleĥanov perceptis sian vizitanton kun varma simpatio, ĉar li vidis en li precipe talentatan praktikiston kaj kapablan organizanton. Pri la verkista talento de Lenin, kiu aperis antaŭ li kiel iom senkolora figuro, Pleĥanov tamen dubis, sed li akceptis lin kiel dirite kiel homon de la praktika agado.

⁴ Vladimir Il'iĉ Ul'janov-Lenin (1870-1924), vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Lenin.

⁵ Aleksandr Nikolaeviĉ Potresov (1869-1934). Biografioj pri la unuopaj rusaj revoluciuloj sekvas je la fino de ĉi tiu studo.

⁶ Aludo al la kalmika deveno de unu el la avinoj de Lenin.

⁷ Georgij Valentinoviĉ Pleĥanov (1850-1928).

En Zuriko Lenin renkontis la rusan revoluciulon *Pavel Aksel'rod*,⁸ alian membron de la grupo „Liberiĝo de la laboro“, kiu estis judo, kiu ludos ankoraŭ gravan rolon en la bolŝevisma movado. Kiel Pleĥanov ankaŭ Aksel'rod estis konvinkita, ke Ul'janov-Lenin estas ege taŭga praktika organizanto, do fakte la ĝusta persono por gvidi la laboristan movadon. Komence, la interparolo estis kurta, formala kaj pala, sed kiam Aksel'rod komprenis, ke antaŭ li troviĝas la homo, kiu kaŝiĝis malantaŭ „Tulin“-Ul'janov kaj kiu estis rekomendita de Pleĥanov al li, ĝi fariĝis pli vigla kaj interesa. Tiel, la diskutoj pludaŭris preskaŭ tutan semajnon. Por eviti la suspektoman rigardon de la okuloj de zurikaj policistoj, Lenin kaj Aksel'rod veturis al la kamparo (Jonen-valo ĉe Affoltern am Albis), kie ili migradis en la libera naturo. Ambaŭ viroj interkonsentis pri la grava rolo de la laboristaro kaj de la liberalaj fortoj (sic), kiun ili ludos en la faligo de la carismo en Ruslando, kaj opiniis, ke necesas eldoni pli da marksisma literaturo en eksterlando, traduki ĝin al la rusa lingvo kaj kontrabandi ĝin al Ruslando, kion oni ankaŭ faros.

En Zuriko Lenin konatiĝis ankoraŭ kun alia rusa elmigrinto kaj membro de la grupo „Liberiĝo de la laboro“: S. Grinfest, kiu loĝis en la strato Seilergraben 37, adreso al kiu Lenin petis sendi poŝtaĵojn el Ruslando.

Post tiuj kontaktoj, Lenin vojaĝis al Parizo, sed baldaŭ li revenis al Svislando. La duan parton de sia tiama svislanda restado de tiu sama jaro Lenin pasigis en iu kuracloko apud Zuriko por terapiigi sian stomakon. Lenin ne postlasis la adreson de tiu sanatorio, sed probable temis pri Nidelbad en Rüşchlikon,⁹ kiel la aŭtoroj de la libro „Lenin v Berne i Cjuriĥe“ sukcesis ekscii. Dokumentoj aŭ atestoj pri la vizito de Lenin en tiu kuracloko ne ekzistas, same kiel, laŭ Gautschi, entute ne eblis trovi spurojn pri la unua restado de Ul'janov-Lenin en Svislando en la jaro 1895.¹⁰

Post sia reveno al Ruslando Lenin fondis la „Batalunuiĝon por la liberigo de la laborista klaso“, al kiu aliĝis 17 intelektuloj. Sed antaŭ ol tiu grupo povis aperigi sian unuan gazeton *Raboĉee delo*, la prespreta materialo estis konfiskita (decembro 1895) kaj Lenin kaj kelkaj kunlaborantoj estis arestitaj kaj senditaj al la malliberejo, kie ili devis resti unu jaron. Lenin eĉ estis kondamnita al trijara arestpuno en Siberio, kiun li pasigis en la vilaĝo Ŝuŝenskoe en la Jeniseja gubernio.¹¹ Malgraŭ senĉesa observado, Lenin povis okupiĝi pri verka laboro, kaj tiel en tiu tempo estiĝis lia fama studo pri la evoluo de la kapitalismo en Ruslando.¹² Krom tio, li ellaboris programon por la „Ruslanda Socialdemokratia Laborista Partio“ (RSDLP),¹³ kiu estis fondota en la jaro 1898 en Minsko.¹⁴ Aksel'rod kaj Potresov sendis libron al Ŝuŝenskoe.

Post sia liberiĝo Lenin reserĉis la kontakton kun Potresov kaj *Julius Martov*,¹⁵ kun kiuj li volis fondi laborgrupon. En printempo 1900 Lenin renkontiĝis kun kelkaj samideanoj en Pskovo, kie oni decidis fondi la gazeton *Iskra* (fajrero)¹⁶ kaj la politikan-literaturan revuon *Zarja* (tagiĝo). La triopo ricevis la taskon vojaĝi al Svislando por diskuti la detalojn de la eldonado kun Pleĥanov kaj Aksel'rod. Do, en aŭgusto 1900 Lenin denove veturis al Zuriko, kie li estis nun ege varme bonvenigita de Aksel'rod, ĉe kiu li restadis du tagojn.¹⁷ Lenin jam sentis, ke li estas matura aktivulo kun gvida rolo. Post tio Lenin veturis al Ĝenevo, kie lin atendis Potresov, kun kiu li enhoteliĝis en la vilaĝo Vézenaz. Tie aperis ankaŭ Pleĥanov kaj aliaj, kun kiuj okazis diskuto pri la aktualaj temoj. La interparoloj evidentiĝis malfacilaj kaj malagrablaj, ĉar Pleĥanov kondukis kiel aŭtokrata aristokrato, estante malfidema kaj praviĝema, kio tute ne plaĉis al Lenin, kiu promenis kun li tra la arbaro. En sekva konferenco, kiu okazis en Corsier, Pleĥanov ĉeestis kun malhela mieno kaj kaprica konduto. Li ne volis fariĝi redakciano de *Iskra*, sed nur ĝia libera kunlaboranto. La proponon ricevi du voĉojn en la sespersona redakcia komitato Pleĥanov tuj

⁸ Pavel' Borisoviĉ Aksel'rod (1887-1938). En Zuriko la ruso, kiu havis la svisan civitanecon, loĝis en la strato Müllergasse 33.

⁹ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Rüşchlikon>.

¹⁰ Ĉi tiu informo datas de 1973 (libro Gautschi) kaj ŝajnas, ke la informo ne estis aktualigita.

¹¹ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Schuschenskoje>.

¹² La germanlingvan tekston vd. sub <https://sites.google.com/site/sozialistischeklassiker2punkt0/lenin/1899/wladimir-i-lenin-die-entwicklung-des-kapitalismus-in-russland>; angla- kaj ruslingve vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/The_Development_of_Capitalism_in_Russia.

¹³ Ruslingve Российская Социал-Демократическая Рабочая Партия, en tiu ĉi teksto mallongigita kiel RSDLP.

¹⁴ Pri tiu partio vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sozialdemokratische_Arbeiterpartei_Russlands kaj [https://de.wikipedia.org/wiki/Sozialdemokratische_Arbeiterpartei_Russlands_\(Bolschewiki\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Sozialdemokratische_Arbeiterpartei_Russlands_(Bolschewiki)).

¹⁵ Julius Osipoviĉ Martov-Cederbaum (1873-1923).

¹⁶ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Iskra>.

¹⁷ Ĉi-foje Aksel'rod loĝis en la strato Vogelsangstrasse 9.


akceptis kaj sentis sin konfirmita kiel ĉefredaktoro, kiu gvidos la laboron, tiel ke la aliaj sentis sin konfuzitaj. Dum vespera promenado tra la vilaĝo Potresov esprimis al Lenin siajn konsternon kaj seniluziigon pri la sinteno de Pleĥanov kaj decidis, ke liaj rilatoj kun li ne plu estos personaj, sed pure laboraj. Dum la pli junaj revoluciuloj intencis ĉesigi la konferencon, iuj aliaj ĉeestantoj kiel Ak-sel´rod kaj *Vera Zasuliĉ*¹⁸ klopodis interpacigi la kverelantojn. Estis interkonsentite daŭrigi la interparolojn ĝis kiam skriba kontrakto por reguligi la formalajn rilatojn inter la ses redaktoroj (do Pleĥanov, Potresov, Zasuliĉ, Lenin, Aksel´rod kaj Martov) estos fiksita. Pleĥanov konsentis eldoni la gazeton en Germanujo.

Laŭ klarigo de Krupskaja, la problemo de Pleĥanov estis, ke li estis troa teoriulo kaj ne plu estis reale kaj aktuale informata pri la situacio en Ruslando, rilate al kiu li fremdiĝis, ĉar jam delonge li vivis en eksterlando.



Unua eldono de *Iskra*, decembro 1900 (Germanujo)

(Bildfontoj: [https://de.wikipedia.org/wiki/Iskra_\(Zeitung\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Iskra_(Zeitung)), <https://it.wikipedia.org/wiki/Iskra>)



Grupo ĉirkaŭ la gazeto *Iskra*: V.I. Ul´janov-Lenin, V. I. Zasuliĉ, G.V. Pleĥanov, A.N. Potresov, P.B. Aksel´rod, Ju.O. Cederbaum-Martov, L.N. Bronštejn-Trockij.

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Lenin, https://en.wikipedia.org/wiki/Vera_Zasulich, https://en.wikipedia.org/wiki/Georgi_Plekhanov, https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Potresov, https://en.wikipedia.org/wiki/Pavel_Axelrod, https://en.wikipedia.org/wiki/Julius_Martov, https://en.wikipedia.org/wiki/Leon_Trotsky)

Kiam en 1900 en Ĝenevo okazis iu konferenco de rusaj eksterlandaj socialdemokratiaj grupoj, nome de la grupo „Raboĉaja mysl“ (laborista penso) aperis iu *Apollinarija Jakubova* (nask. en 1869), kiu estis iama amikino de Krupskaja; kelkaj historiistoj konsideris ŝin unua amatino de Lenin, al kiu tiu marksisma virino ŝajne plaĉis, sed ŝi mem ne estis interesata pri Lenin kaj preferis edziniĝi al iu profesoro. Ĝis 1922 Jakubova tamen restis en kontakto kun Lenin kaj korespondis kun li, sed kiel apogantino de la „larĝa demokratio“ en la partio Jakubova kritikis la rigoran centrismon de Lenin kaj pri diversaj temoj reprezentis opiniojn, kiuj estis pli proksimaj al tiuj de la menŝevistoj, do ŝia rilato al Lenin restis komplika.¹⁹

¹⁸ Vera Ivanovna Zasuliĉ (1849-1919).

¹⁹ Vd. Volkogonov, Lenin, Berlin 2017, p. 43-44.

Kiam Lenin forlasis Svislandon komence de septembro 1900 estis klare, ke okazis rompo kun Pleĥanov, kiu estis ĝis nun konsiderata kiel netuŝebla gvidanto de la ruslanda socialdemokratio. Sed Lenin, kiu sentis sin respondeca pri la redaktado kaj eldonado de *Iskra*, mem volis akapari ĝian gvidadon. Tial li migris al Munkeno, kie sub la kaŝnomo „Meyer“ li loĝiĝis ĉe iu Parvus-Helphand,²⁰ nebula komercisto (kiu kutimis tranokti en la zurika lukshotelo Baur au Lac), kiu volis konvinki sian gaston resti en Munkeno. Germanaj socialdemokratoj disponigis presilon kun cirilaj leteroj, do la sidejo de la gazeto dume restis en Munkeno, kie aperis ankaŭ kamaradino Vera Zasuliĉ por kunlabori. La projekton financis iu Aleksandra Kalmykova, edzino de iu senatano, kiu simpatiis kun la redaktoroj de *Iskra*. Tiel, la unua eldono de tiu gazeto povis aperi la 21an de decembro 1900 en Lepsiko. Pliaj eldonoj aperis en Munkeno kaj Stuttgart. Komence de 1902 la redakcio devis translokiĝi al Londono, ĉar la germana polico flaris ilian agadon.

Fine de septembro 1901 Lenin revenis al Zuriko, evidente en akompano de sia edzino *Nadeĵda Krupskaja*,²¹ kiu intertempe povis forlasi sian siberian ekzilejon. Tie li partoprenis en kunsido de la redakciaj de *Iskra* kaj sub la kaŝnomo „William Frey“²² aperis en la „unuiga konferenco“ de la eksterlandaj organizaĵoj de la Ruslanda Socialdemokratia Laborista Partio (RSDLP), kiu okazis la 4-5ajn de oktobro en tiu svisa urbo kaj havis la taskon reunuigi la displitatajn organizaĵojn de rusaj elmigrintoj en eksterlando. En sia elpaŝo Lenin atakis la ekzistantajn organizaĵojn, al kiuj li riproĉis, ke ili estas „oportunistaj“. Sed la konferenco ne sukcesis atingi la reunuiĝon. Male, aperis la malnovaj diferencoj inter la diversaj aktivuloj, tiel ke la revoluciemaj *Iskra*-delegitoj, ankaŭ Pleĥanov, Aksel’rod kaj Zasuliĉ, forlasis la salonon per la blasfema voko „For la sektulojn!“ La konferenco evidentiĝis du diversajn principajn tendencojn de la ideologio kaj politiko de la skismiĝinta movado: Dum la unua direkto baziĝis sur la ekonomia klasbatalo kun reformema-pragmatisma programo, kiu celas demokratian organizan formon en la klasika senco, la alia direkto baziĝis je la politika klasbatalo kun revolucia programo kaj la celo starigi elitecan diktaturon. Pri tiu problemaro Lenin verkis en Londono esencan studon, kiu aperis en 1902 en Stuttgart sub la titolo „Kion fari?“²³ kaj estas konsiderata kiel baza klasikaĵo de la „leninismo“. En tiu verkaĵo, kiu estis nomata ankaŭ „revolucia biblio“, Lenin instruis la ideon, ke la tradiciaj sindikataj movadoj kaj la kleraj teorioj de la moderna scienca socialismo de Marx kaj Engels, kiuj mem apartenis al la burĝa klaso, ne sufiĉas por akapari la politikan povon. Laŭ Lenin necesis la ekzisto de „profesiaj revoluciuloj“, de militece disciplinataj revoluciaj intelektuloj, kiuj ne hezitas perforte akapari la povon en Ruslando, ĉar alimaniere la problemoj ne povus esti solvitaj. En la batalo de la intelektularo kontraŭ la establita ordo la laboristoj estas la naturaj aliancanoj. Por atingi tiujn celojn necesas krei „feran, konspireman, centrigitan“ sekretan organizaĵon, „reton de agentoj“ kun „severa disciplino“, kiu funkcias kvazaŭ kiel ŝtata ordeno de „profesiaj revoluciuloj“. Kiel idealo aŭ modelo servis la „montaranoj“ de la franca revolucio. La demokratiismon Lenin primokis kiel ludilan aferon. Ŝajnas, ke la kolegoj de la *Iskra*-redakcio ne kontraŭstaris tiujn ideojn, kaj eĉ Pleĥanov, kiu atente legis la verkaĵon de Lenin, kiun li konsideris speco de kateĥismo de la revolucia organizaĵo, en principo aprobis ĝin, kvankam la ideoj de Lenin ne koincidis kun la imagoj de la okcidenteŭropaj marksistoj kaj socialdemokratoj, kiuj favoris la demokratian socialismon.

Kiel sekvo de la fiaskinta konferenco la homoj de *Iskra* fondis en oktobro 1901 propran „Eksterlandan Ligon de la Rusa Revolucia Socialdemokratio“, kiu pretendis esti la sola reprezentanto de la rusa revolucia socialdemokratio en eksterlando.

Okaze de sia restado en Zuriko en aŭtuno 1901 Lenin elpaŝis en la studenta biblioteko antaŭ grupo de studenta junularo de la Zurika universitato, kio estas konsiderata kiel unua prelego antaŭ iom

²⁰ Aleksandr L’voviĉ Parvus (Israil Lazareviĉ Gel’fand/Helphand/Helfand, 1867-1924) venis en 1886 aŭ 1887 en Svislandon, kie en 1891 li doktoriĝis en la bazela universitato. En Munkeno li kunlaboris al *Iskra* kaj partoprenis la rusan revolucion de 1905. Dum la milito li estis menciita lige kun la organizado de germana mono por la rusa revolucio.

²¹ Nadeĵda Konstantinovna Krupskaja (1869-1939).

²² Inter 1901 kaj 1903 la kaŝnomo Lenin uziĝis pli kaj pli ofte, kvankam li kutimis utiligi ankaŭ la pseŭdonomon „Petrov“. Ekde la apero de la verko „Kion fari?“ la kaŝnomo Lenin, kies origino ne estas konata, fariĝis la kutima nomo de Ul’janov (sed en la svisaj bibliotekoj li utiligis sian veran nomon).

²³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Was_tun, <https://www.marxists.org/russkij/lenin/1902/ogl6.htm> (rusa teksto), <https://www.marxists.org/archive/lenin/works/1901/witbd> (angla teksto), <https://www.marxists.org/deutsch/archiv/lenin/1902/wastun> (germana teksto).

pli larĝa publiko en eksterlando. Al la studentoj li klarigis la ekonomian situacion kaj politikan vivon en Ruslando kaj respondis multajn demandojn, kiuj estis starigitaj de la ĉeestantoj.



Marija Il'iniĉna Ul'janova (fratino de Lenin) kaj Marija Aleksandrovna Ul'janova-Blank (patrino de Lenin, al kiu Lenin regule skribis leterojn el Svislando), N.K. Krupskaja (2x), E.V. Tistrova (bopatrino de Lenin), A. Jakubova (amikino de N. Krupskaja kaj unua „amatino“ de Lenin).

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://ru.wikipedia.org/wiki/Ульянова,_Мария_Ильинична, https://en.wikipedia.org/wiki/Maria_Alexandrovna_Ulyanova, <https://www.wikidata.org/wiki/Q60183599>, https://en.wikipedia.org/wiki/Apollinariya_Yakubova; alian foton de vd. sub <https://picturehistory.livejournal.com/4320793.html>)

De la 10a ĝis 20a de novembro 1902 Lenin faris vojaĝon tra Svislando, utiligante la okazon informi la rusajn elmigrintojn pri siaj ideoj. Liaj prelegoj okazis en Laŭzano, Ĝenevo Berno kaj Zuriko kaj traktis la programon kaj taktikon de la „etburĝa“ partio de la socialismaj revoluciuloj,²⁴ sed dokumentitajn spurojn tiu restado ne postlasis.²⁵

Lenin kaj *Iskra* en Ĝenevo

Por garanti la sukceson de *Iskra* Londono montriĝis maltaŭga loko, ĉar ĝi estis tro flankaj kaj izolata de la rusa emigracio, kies centroj tamen estis Parizo kaj Ĝenevo. Kvankam oni volis eviti la proksimecon de Pleĥanov, en printempo 1903 oni decidis transloki la redakcion al Ĝenevo. Kvankam Lenin kontraŭstaris tiun ĉi decidon, li lasis sin finfine konvinki kaj mem translokiĝis al Svislando, kie lia restado ĉi-foje fariĝis iom pli longa ol antaŭe. Probable li alvenis en aprilo aŭ majo en Ĝenevo kune kun sia edzino Krupskaja kaj ties patrino *Elizaveta Vasil'evna Tistrova* (1836-1915). Ĉar Lenin suferis je la zosterio,²⁶ li devis kuŝi kelkajn semajnojn en la lito. Eble pro tio la geedza paro oficiale registriĝis en Ĝenevo nur poste, nome la 12an de junio, kiam Lenin kun la indikoj „Oulianoff Voldemar aŭ Wladimir, literaturisto“ anoncis sin ĉe la polico por loĝi ĉe la adreso Chemin du Foyer 10, kiu troviĝis en la Sécheron-kvartalo. La duetaĝa loĝejo estis modeste instalata kaj havis amason da libroj. Kompare kun Pleĥanov, kiu vivis pli lukse,²⁷ Lenin ne volis imponi la homojn kaj akceptis la vizitantojn, parolante kun ili en la kuirejo laŭ tipe rusa maniero sen fanfaroni pri burĝa vivstilo.

Pro la varia karaktero de la homoj, inter la redakcianoj de *Iskra* ne regis tro da harmonio (kiun oni tamen ŝajnis ekster). Al la grupo aldoniĝis nova membro, nome **Leon Trockij**,²⁸ kiu estis kooptita de la redakcio, kvankam Pleĥanov volis eviti tion, sed ŝajnas, ke Vera Zasuliĉ pledis por lia favoro.

Potresov kaj Trockij observis, ke la diskutkulturo kaj la etoso ene de la redakcio draste streĉiĝis pli kaj pli pro tio, ke Lenin tute malŝatis kaj maltoleris opiniojn, kiuj ne koincidis kun la propraj vidpunktoj. La konfliktoj akriĝis kaj la rilatoj inter la redakcianoj malboniĝis. Dum Lenin fervore laboris por la perforta atingo de la revolucio, la aliaj redakcianoj kredis, ke la revolucio venos de si mem kaj admonis havi paciencon, kiun Lenin tute ne havis. Lia sinteno fariĝis pli kaj pli radikala, tiel ke ne nur eksterajn homojn li konsideris malamikoj, sed ankaŭ siajn plej proksimajn kunlaborantojn. Tiel, en

²⁴ Kiel rakontas la aŭtoro de la libro „Lenin v Berne i Ĉjuriche“, p. 133. Pri la socialismaj revoluciuloj vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Socialista_Revolucia_Partio.

²⁵ Kiel Gautschi asertis.

²⁶ Pri la signifo vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Zosterio_\(medicino\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Zosterio_(medicino)).

²⁷ En Ĝenevo Pleĥanov loĝis kun sia familio en la strato Candolle 6.

²⁸ Leon Trockij aŭ Trotsky verdire nomiĝis Lev Davidoviĉ Bronŝtejn (1879-1940).

Ĝenevo la rompo inter Lenin, kiu konsideris sin vera gvidanto de la tuta afero, unuflanke, kaj Pleĥanov, Potresov, Martov kaj Zasuliĉ aliflanke, estis neevitebla. Dum seriozaj kunlaborantoj pli kaj pli distancigis de Lenin, li scipovis arigi ĉirkaŭ si lojalajn lakeojn, kiuj, senlime admirante la Gvidanton, blinde submetigis al li kaj defendis liajn ideojn. El tiu medio de konsentemaj, flatemaj kaj obeemaj kamaradoj Lenin rekrutis ĝuste la „profesiajn revoluciulojn“, pri kiuj li tiel revis. Tiuj lojaluloj, kiuj estis mone ĉantaĝeblaj, ankaŭ ricevis „salajrojn“ el la partia kaso. Lenin pli kaj pli avancis kiel gvida motoro de la gazeto *Iskra*, kiu estis kompostita en la domo ĉe Quai du Cheval Blanc 5 borde de la rivero Arve, kie laboris tri rusoj, kaj presita en iu presejo ĉe la strato Coulouvrenière n-ro 27, kiu apartenis al iu Joseph Blumenfeld. La eldonaĵoj estis produktitaj per fajna papero kaj kontrabanditaj pere de fidindaj „agentoj“ al Ruslando. Edzino Krupskaja funkciis kiel oficiala sekretariino de la redakcio kaj gvidis la ĉiutagan laboron, dum ŝia patri-no prizorgis la dommastrumon. La mesaĝoj estis senditaj per ĉifroj al Ruslando.

En Ĝenevo Lenin okupiĝis ankaŭ pri la preparado de la dua kongreso de la Socialdemokratia Laborista Partio de Ruslando, kiu devis esti okazigita en eksterlando kaj kiun Lenin volis influi laŭ sia volo. Kiam en junio kaj julio 1903 la delegitoj el Ruslando alvenis al Ĝenevo por diskuti la detalojn de la kongreso, ili devis konstati, ke Lenin jam fiksitis ĝiajn gvidliniojn kaj ke li nur ankoraŭ volis konvinki la delegitojn en sia senco.

La preferata kunveno de la rusaj revoluciuloj en Ĝenevo estis la kafejo „Landolt“, kiu troviĝis en la universitata kvartalo. Tie okazis parte ankaŭ la kunsidoj de la redakcianoj de *Iskra*. Legenda fariĝis la dialogo inter Lenin kaj Zasuliĉ, kiu atentigis pri ebla kunlaboro kun la rusaj liberaluloj, kion Lenin volis nepre eviti. Tiu konflikto praktike decidis la sorton de la ruslandaj liberaluloj kiel eventualaj kunroluloj en la bolŝevisma revolucio.

Lenin estas rimarkata kaj observata de la rusaj kaj svisaj aŭtoritatoj

Ne estas surprizo, ke la grupo ĉirkaŭ Lenin ne povis labori sen esti observata de la svisaj (kaj rusaj) ŝtataj aŭtoritatoj. Ekde 1897 svisaj fakuloj (prof. Gretener el Berno kaj Langie el Laŭzano) estis taskitaj regule legi la rusajn presaĵojn, kiuj estis produktitaj en la rusa presejo en Ĝenevo kaj raportoj al la svisa federacia prokuroro pri la enhavo kaj karaktero de tiuj presaĵoj. Nu, la svisaj aŭtoritatoj ŝajne indiferece rilatis al la agado de la rusaj socialistoj, pri kiu ili ne montris grandan intereson, konsiderante ilian agadon privata afero, dum la rusa polica ministerio nerveze reagis kaj atentigis la svisan registaron pri la ekzisto de „cirklo de ruslandaj ŝtatanoj“, kiuj krom studadi okupiĝas ankaŭ pri revolucia propagando, menciante la fakton, ke en Ĝenevo estas eldonita rusa gazeto, kiu disvastigas anarkiismajn ideojn. La svisa federacia prokuroro fakte informiĝis ĉe la ĝeneva polico pri kio temas kaj ricevis la respondon, ke la afero verŝajne koncernas la rusajn kuirejojn, kiuj ekzistis en Ĝenevo kaj kiuj „estas frekventataj de multaj rusoj kaj bulgaroj, kiuj nutras sin malmultekoste“. Estis aldonita la noto, ke en „tiuj ejoj oni certe parolas ankaŭ pri politikaj temoj, sed ke ili ne havas politikan signifon“. Krom tio, la respondo de la ĝenevaj aŭtoritatoj enhavis la atentigon, ke „pri la menciita gazeto oni ja faris esploron, sed malkovris [nenion suspektindan]“. La svisa federacia prokuroro plusendis informon al Sankt-Peterburgo kun la sciigo, ke en Ĝenevo ja ekzistas rusa presejo, kiu faras nenion alian ol presi „socialismajn eldonaĵojn en la rusa lingvo“. Krom *Iskra* aperis en Ĝenevo ankaŭ la gazetoj *Zarja*, *Vperjod* kaj *Proletarij*, sed tio ne estis malpermesata en Svislando kaj eĉ tolerata kiel normala agado en rusaj emigraciaj medioj, tiel longe ke tiuj aktivuloj ne enmiksiĝas en la internajn politikajn aferojn de Svislando. Tamen, la ĝeneva polico observadis la rusan presejon en la strato Cluse 7 en Ĝenevo, kiu estis administrata de iu Akimov. En 1903 la svisaj aŭtoritatoj akiris pli kaj pli kompletan superrigardon pri la agado de la „Ligo de ruslandaj socialdemokratoj“ por kompreni, ke ĝi celas renversi la politikan ordon en Ruslando.

En Ĝenevo la taskon observadi la redakcianojn de *Iskra* havis iu Henri-J. Bint, franca civitano, kiu estis la ĉefo de iu agentejo de la carisma polica ministerio kaj kiu sendis informojn al siaj superuloj en Parizo. Ŝajnas, ke ĉe tiuj informoj temis pri nuraj banalaĵoj, tamen kun denunca karaktero. Bint ricevis ankaŭ la taskon esplori, kiu estas tiu „Nadija“, kiu estis la kaŝnomo de Nadeĵda Krupskaja. En aŭtuno 1903 Bint kaj lia subagenteo Georg Rabinoviĉ estis arestitaj de la ĝeneva polico kaj ilia informdosiero estis konfiskita. El tiu dosiero oni rikoltis la informon, ke la rusa Oĥrano²⁹ observis krom la gvidantoj

²⁹ Nomo de la sekreta servo de carisma Ruslando.

de la rusa presejo ankaŭ diversajn aliajn rusajn ŝtatanojn en Ĝenevo. Bint estis observata, kiel li sekrete malfermis la poŝtkeston de la rusa presejo en Ĝenevo per falsita ŝlosilo kaj remetis la legitajn poŝtaĵojn. La 2an de novembro 1903 Bint kaj Rabinoviĉ estis petitaj de la svisa registaro (!) forlasi la landon pro malpermesata politika spiona agado. En la svisa federacia dokumentaro la nomo Ul'janov estis unuafoje menciita en aŭtuno 1903 plej verŝajne lige kun la Bint-skandalo. La 25an de novembro la direktoro de la ĝeneva polico raportis al la svisa federacia prokuroro pri la ĉeesto de iu „Oulianoff Waldemar“ kaj menciis, ke tiu individuo estas konata en Ruslando pro partopreno en la studentaj tumultoj de 1887 en la universitato de Kazano kaj ke en 1896 li faris revolucionan propagandon en Sankt-Peterburgo, pro kio li estis sendita por tri jaroj al Siberio. Plue estis notite, ke li ricevis rusan pasporton por vojaĝi kaj loĝi en eksterlando, kie sub la nomo Lenin li aktive partoprenas en la revolucia movado. La noto enhavis ankaŭ la sciigon, ke Lenin volis transpreni la presejon de Blumenfeld, sed ke li ne ricevis oficialan permeson. Do, ekde aŭtuno 1903 Lenin estis pli serioze observata, sed la svisaj aŭtoritatoj ne vidis veran kialon por apliki sankciojn kontraŭ li, ĉar lia agado ne estis pritaksata kiel danĝera, krima aŭ direktata kontraŭ la svisaj leĝoj. Povas esti, ke la rusaj instancoj dume iom trankviliĝis post la ricevo de tiuj informoj kaj preferis koncentri sian atenton precipe al la grupo de teroristoj, kiuj faris aŭ celis fari atencojn kontraŭ altaj ŝtataj reprezentantoj en Ruslando mem.

Anstataŭ en Svislando, kies atentemajn aŭtoritatojn oni ne volis maltrankviligi, la dua kongreso de la Socialdemokratia Laborista Partio de Ruslando estis inaŭgurita en Bruselo, Belgio. Partoprenis ĝin 41 delegitoj, kiuj reprezentis 26 diversajn organizaĵojn. Sed ĉar oni sentis sin observata de la belga polico, oni iris al Londono, kie la debatoj estis daŭrigitaj. La ĉefaj traktaĵoj koncernis la centran gvidadon de la partio kaj la adopton de partia programo. La kongreso, kiu akceptis unuvoĉe la konfeson pri la „diktaturo de la proletaro“, kvankam parto de la revoluciuloj principe malaprobis ĝin, rapide elkristaligis du tendencojn de sintenoj, kiuj kondukis al la ekzisto de du frakcioj kaj finfine al la fondo de du diversaj partioj – la bolŝevistoj³⁰ de Lenin kaj la menŝevistoj de Martov, dum la *Iskra*-grupo disfalis. Do, anstataŭ reunu-iĝo, la londona kongreso alportis la grandan skismon. Centraj figuroj de la movado restis Pleĥanov, Lenin, Martov, Potresov kaj Trockij. Sed la bolŝevistoj de Lenin pli kaj pli konsideris la menŝevistojn perfiduloj kaj malamikoj, ĉar ili rifuzis blinde sekvi la kurson de Lenin.

Lenin provas digesti la skismon, organizas distraĵojn, verkegas kaj migradas tra Svislando

Post sia reveno el Londono al Ĝenevo fine de aŭgusto 1903 Lenin devis esti profunde deprimita pro la seniluziigaj rezultoj de la ĵus pasinta partia kongreso, kiu skismigis la movadon. En Ĝenevo li eksciis, ke iamaj subtenantoj estis tiel ĉagrenitaj, ke ili rifuzis plupagi monon por la revolucia agado. En Ĝenevo praktike restis nur malgranda grupo de bolŝevistoj, kiuj rilatis kun Lenin kaj Lenin kun ili. Okazis eĉ kelkaj tre malagrablaj incidentoj, dum kiuj ekzemple la edzino de Bogdanov estis fizike atakita. Hermann Greulich, 'patriarko' de la svisa socialdemokratia partio, kaj August Bebel, gvidanto de la germana socialdemokratio, profunde bedaŭris la skismon en la rusa socialdemokratia partio kaj vane klopodis interpaci la du kverelantajn frakciojn.

Por forgesi ĉiujn tiujn malagrablajn spertojn kaj akiri novajn fortojn Lenin redaktis, kun Pleĥanov, novajn eldonojn de la revuo *Iskra*. Alvenis kelkaj novaj rusoj, kiel Nikolaj Valentinov,³¹ kiu volis kunlabori kun Lenin. Por iom distriĝi, Lenin kaj Krupskaja enkondukis en sia loĝejo en Sécheron t.n. fiksan tagon, en kiu la anoj de la komunumo kunvenis por diboĉi, danci kaj kanti. Lenin, kiu mem scipovis kanti kaj ankaŭ ĝenerale montriĝis kiel temperamenta kaj emocia tipo, aparte ŝatis la kantojn de Siberio. En tiuj vesperoj ĉeestis ankaŭ la frua rusa socialdemokrato kaj revoluciulo *Sergej Gusev*,³² kiu havis elstaran voĉon, per kiu li prezentis ariojn de Ĉajkovskij kaj el la opero Karmen. Lepeŝinskij, posedanto de la restoracio por bolŝevismaj elmigrintoj, rakontis, ke Lenin, kiu estis alparolata de siaj ĉirkaŭantoj per „Il'ič“, organizis tiajn kunvenojn por forpeli la deprimiĝon.

³⁰ Kvankam PIV rekomendas la formojn „bolŝevisto“, „menŝevisto“ ktp., eblus uzi ankaŭ la formojn „bolŝeviko“, „menŝeviko“ surbaze de la radikoj „bolŝevik-“, „menŝevik-“, kiuj estas uzataj de la ĉefaj naciaj lingvoj (rusa, germana k.a.). Mi sugestas, ke PIV permesu ambaŭ versiojn.

³¹ Nikolaj Vladislavoviĉ Valentinov (1879-1964).

³² Sergej Ivanoviĉ Gusev (t.e. Jakov Davidoviĉ Drabkin, 1874-1933).


En tiu tempo okazis en Ĝenevo kongreso de la „Eksterlanda Ligo de la rusa revolucia social-demokratio“. Kiam Lenin volis veturi per biciklo al la kongresejo, lin trafis malagrabra akcidento, dum kiu li preskaŭ perdis unu okulon. Laŭ iu versio Lenin kunpuŝiĝis kun tramvagono. **Vladimir Bonĉ-Brujeviĉ**,³³ alia frua bolŝevisto, en 1903-5 estro de la ekspeda servo de la CK de RSDLP en Ĝenevo kaj fondinto de la partia arkivo, rakontis, ke Lenin falis per sia biciklo sur la relojn de la tramlinio kaj perdis la ekvilibron. Dum la kongreso oni vidis lin kun nigra bindaĵo sur la okulo.

Tiu kongreso, kiu okazis en la lastaj tagoj de oktobro 1903, evidentigis totalan fiaskon por Lenin. En ĝi la menŝevistoj havis la plimulton kaj subtenis la pozicion de Martov. Kontraŭ Lenin oni eĉ submetis proponon kun riproĉo pro maladekvata sinteno. Tia humiligo estis apenaŭ eltenebla por Lenin. La malsukceso de Lenin kaŭzis ankaŭ, ke Pleĥanov publike distanciĝis de li kaj decidis mem daŭrigi la gazeton *Iskra* kun la malnova redakcio, sen Lenin. Lenin faris sian konkludon kaj ekŝiĝis el la partio.

Por pravigi siajn vidpunktojn, Lenin verkis dum vintro 1903/4 ampleksas libron kun la titolo „Unu paŝon antaŭen, du paŝojn malantaŭen“,³⁴ kiu aperis la 19an de majo 1904 en Ĝenevo kaj en kiu li analizis la disvolviĝon de la dua partia kongreso kaj klarigis la opiniajn diferencojn. La titolo celis esprimi, ke kun la instruoj de la revuo *Iskra* la partio faris unu paŝon antaŭen kaj ke la menŝevistoj turnis ĝin je du paŝoj malantaŭen. Lenin emfazis, ke ĉiu partia membro devus aktive kunlabori en la batalo, do esti vera jakobeno, ke la „demokratiismo“ estas danĝera afero, ĉar ĝi kondukas al anarkio, kaj ke la celoj de la „diktaturo de la proletaro“ ne povas esti atingitaj sen perforto. Ĉi tiu libro fariĝis kvazaŭ la evangelio de la leninismo kaj kune kun la broŝuro „Kion fari?“ formis la ĉefan literaturon de la bolŝevisma komunismo koncerne la partian taktikan agadon kaj organizadon.

Dum tiu laboro Lenin multe ŝanĝiĝis fizike. Valentinov, kun kiu li regule promenadis dum paŭzoj, rakontis, ke Lenin magriĝis, malpleniĝis, flaviĝis, ke liaj haroj perdis koloron kaj fariĝis iusence mortaj. Pro la ekscesa kritiko kontraŭ siaj kontraŭuloj, Lenin troviĝis en stato de fanatika seniluziigo kaj ĉagreno, kiu atakis liajn nervojn kaj faris lin malsana. Neniam antaŭe li troviĝis en tia akuta kvazaŭdeliro, kiam li verkis iun libron. Sed kiam la 230-paĝa teksto estis finita en majo 1904 kaj aperis en Ĝenevo, li estis liberigita de la granda premo kaj rekomencis normale vivi.

Lenin ege ŝatis la montaron de Svislando. Kune kun sia edzino li grimpis sur la monton Salevo kaj admiris la nebulan maron, kiu etendiĝis super Ĝenevo. Fine de junio 1904 la paro forlasis la urbon kaj veturis al Laŭzano, kie ili enkondukis fazon de ripozo. De tie ili ekskursis per ŝipo al Montreux, kie ili vizitis la kastelon de Chillon, en kiu la prizono de Bonivard, kiu estis prikantata de Byron, aparte impresis ilin. Krom tio, ili grimpis sur la montopinton Rochers de Naye. Verŝajne li veturis ankaŭ per skioj en la neĝo de la svisa montaro, kiel li aludis en letero de la 18a de decembro 1916 al Inessa Armand.



N. Valentinov, S. Gusev, V. Bonĉ-Brujeviĉ. Verkaĵo de Lenin „Kion fari?“ (1902) Titolpaĝo de la libro „Unu paŝon antaŭen, du paŝojn malantaŭen“ (1904)

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Valentinov, https://en.wikipedia.org/wiki/Sergey_Ivanovich_Gusev,
https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Bonch-Brujevich, https://en.wikipedia.org/wiki/What_Is_to_Be_Done?,
https://en.wikipedia.org/wiki/One_Step_Forward,_Two_Steps_Back)

³³ Vladimir Dmitrievič Bonĉ-Brujeviĉ (1873-1955).

³⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/One_Step_Forward,_Two_Steps_Back.

En la frua mateno de la 3a de julio 1904 la paro Lenin, ekipata per dorsosakoj, startis longan migradon, kiu kondukis ilin tra Aigle en la Rodanan valon. En Bex-les-Bains ili haltis por viziti iun amikinin. Poste ili daŭrigis laŭlonge de la Rodano, grimpis sur la Gemmi-pasejon por atingi Bernan Oberlandon, kie ili interrompis la migradon en la vilaĝo Iseltwald por ripozi unu semajnon, antaŭ ol reiri tra Interlaken kaj la Simmen-valo al Ĝenevo. Poŝtkarto, kiun Lenin sendis al sia patrino al Ruslando, atestas, ke la 7/8ajn de julio li troviĝis en la regiono Kandersteg/Frutigen. Dum tiu migrado Lenin aparte ŝatis manĝi kun la laboristoj, t.e. veturistoj, ŝoforoj kaj unutagaj salajruloj, ĉar li povis esti certa, ke en ilia ĉirkaŭaĵo oni ĉiam ricevis bongustan kaj malmultekostan nutraĵon.

Post la reveno Ĝenevon, la paro Lenin ŝanĝis la loĝejon, trovante novan hejmon en la strato David-Dufour n-ro 3 (laŭ alia fonto temis pri strato Carouge 9) por esti pli proksima al la urbocentro.

Ŝajnas, ke post sia migrado tra la svisaj Alpoj Lenin okazigis en aŭgusto konferencon kun 22 aŭ 24 adeptoj por diskuti la aktualan situacion kaj estontan kurson de la partio. Ĉi tiu konferenco, kiu ne okazis en Ĝenevo mem, sed en Hermence sur franca teritorio en la ĉeesto de Lenin, alvokis la partianojn fermi siajn vicajn kaj labori al tria partia kongreso por fini la aktualan krizon. Post tiu konferenco, kiu evidente estis sukcesa por Lenin, la paro pasigis la tempon dum unu monato en Puidoux apud la Lago de Bret en la vaŭda kanton, kie vivis la familioj de **Aleksandr A. Bogdanov**³⁵ kaj **Mihail S. Ol'minskij**,³⁶ du aliaj gravuloj de la rusa socialdemokratio en eksterlando. Dum la unua jam profiliĝis kiel signifa marksisma verkisto, la dua elstaris kiel redaktoro de la gazeto *Novaja žizn* (nova vivo).

Komence de decembro Lenin entreprenis prelegvojaĝon tra diversaj urboj de Svislando, dum kiu li kolektis monon por la financado de sia nova gazeto. En la sama monato li fariĝis ankaŭ membro de la ĝeneva societo de la legantoj kaj povis uzi ties bibliotekon, kiu troviĝis en la strato Grand'Rue n-ro 11. Dum la membroj de la societo utiligis la legejon nur malofte, Lenin do havis ĝin praktike sola por si mem, tiel ke li povis labori sen esti ĝenata. La rusa biblioteko de Ĝenevo troviĝis en la apud-Arva kvartalo (strato Hugo-de-Senger n-ro 7), kiu estis la centro de la bolŝevismaj elmigrintoj. Ĝian bazon konsistigis la fondaĵo de **Georgij Kuklin**,³⁷ kies posteulo **Vjaĉeslav Karpinskij** estis ankaŭ la arkivisto de RSDLP kaj kunlaborinto de Lenin en la redaktado de *Vperjod* kaj *Proletarij*.³⁸



Centra social-demokratia kaj bolŝevisma gazetaro aperinta en Ĝenevo kaj Parizo ĉirkaŭ 1904-5. (Bildfontoj: <http://evartist.narod.ru/text8/02.htm>, <http://www.agitclub.ru/center/comm/fot1/paper1905big.gif>, <https://www.litfund.ru/auction/42/69>)

Post sia reveno al Ĝenevo, Lenin koncentris ĉiujn fortojn al la fondo de nova centra organo de la bolŝevisma frakcio, kiu devis anstataŭi la gazeton *Iskra*, kiun li intertempe perdis. Tiu nova gazeto ricevis la titolon *Vperjod* (antaŭen). Ĝia oficiala fondo okazis la 12an de decembro 1904, precize en la tago de la ĝeneva festo Eskalado,³⁹ en kiu partoprenis ankaŭ Lenin, kiu marŝis kun sia bolŝevista grupo tra la urbo. La unua numero de *Vperjod* aperis la 4an de januaro 1905 en Ĝenevo kun la proklamo, ke ĝi estu

³⁵ Aleksandr Aleksandroviĉ Bogdanov (t.e. A.A. Malinovskij, 1873-1928).
³⁶ Mihail Stepanoviĉ Ol'minskij (t.e. M.S. Aleksandrov, 1863-1933).
³⁷ Georgij Arkad'evič Kuklin (1880-1907).
³⁸ Vjaĉeslav Alekseeviĉ Karpinskij (1880-1965). En 1960 aperis lia libro: Vladimir Il'ič Lenin vožd'-tovarišč-ĉelovek (vd. <https://www.swissbib.ch/Record/503913693>).
³⁹ Pri ĝia signifo vd. [https://fr.wikipedia.org/wiki/Escalade_\(Genève\)](https://fr.wikipedia.org/wiki/Escalade_(Genève)).

kvazaŭ la malnova *Iskra*, kiun ĝi kontraŭbatalos. La gazeto estis presita en la presejo Imprimerie coopérative, strato Carouge n-ro 97. Kiel respondeca eldonisto funkciis iu Alexis Medved', kiu estris la sekcion de la tipografoj kaj posedis la ĝenevan civitanekon, dum la sidejo de la redakcio troviĝis ĉe la strato Colline n-ro 3. Tri monatojn poste la gazeto ŝanĝis sian nomon al *Proletarij* (proleto). Ĝian administradon prizorgis Bonĉ-Brueviĉ, dum la kompostadon faris iu nekonata sinjoro Vladimirov. Lenin ege ĝojis pri la naskiĝo de la nova periodaĵo kaj proklamis la internajn partiajn kverelojn finitaj. Rigarde al la jaro 1905, kiam maturiĝis la unua rusa revolucio, Lenin estis plena de optimismo kaj konvinko, ke li travivos la revolucion, des pli ke la caristoj malvenkis en la milito kontraŭ Japanio.

La 23an de januaro, kiam Lenin kaj Krupskaja troviĝis survoje al la biblioteko, ili renkontis la paron Lunaĉarskij,⁴⁰ kiu informis ilin pri la sangaj okazaĵoj en Peterburgo, kiuj ŝajne signifis la komencon de la revolucio. Ili daŭrigis al la restoracio de Lepeŝinskij, kie ili renkontis ankoraŭ aliajn bolŝevistojn de la ĝeneva kolonio. Ĉiuj estis plenaj de emocioj kaj komencis kanti la funebran marŝon „Kiel viktimoj vi falis“.

Sed Lenin ne urĝis reiri al Ruslando, ĉar li volis atendi en Ĝenevo por vidi kiel la aferoj plu evoluos, legante regule la lokan gazeton *Tribune de Genève*. Preskaŭ ĉiun vesperon la bolŝevistoj renkontiĝis en la kafejo „Landolt“, kie ili trinkis bieron kaj diskutis la aktualan situacion. Fakte, multaj rusoj forveturis aŭ preparis sin por forvojaĝi.

Kiam en aprilo 1905 en Londono okazis la 3a partia kongreso de la bolŝevistoj, la menŝevistoj bojkotis kaj malagnoskis ĝin kaj organizis sian propran kongreson en Ĝenevo. Tiel, kaj menŝevistoj kaj bolŝevistoj restis separataj inter si, dum la ĉi-lastaj konfirmis la gazeton *Proletarij* sola centra organo de la bolŝevismo, kies monopolan gvidadon ili pretendis.

En printempo (aprilo) Ĝenevon vizitis la rusa popo **Georgij Gapon**,⁴¹ kiu estis unu el la gvidantoj de la manifestacio de la 22a de januaro en Sankt-Peterburgo kaj kiu estis devigita fuĝi el Ruslando, ĉar li timis esti mortigita. Sub lia prezido okazis iu interpartia konferenco, en kiu **Viktor Ĉernov**⁴² reprezentis la partion de la socialismaj revoluciuloj. La konferencanoj ellaboris komunan rezolucion, en kiu ili fiksas la celon de armata ribelo en Ruslando.⁴³ Gapon loĝis ĉe iu Leonidas Ŝiŝko, kiu apartenis al la rusaj socialismaj revoluciuloj, kun kiuj ankaŭ Gapon simpatiis, malgraŭ ŝanceliĝo. Gapon, kiu estis karakterizata kiel iom stranga persono, renkontiĝis kun Lenin en iu ĝeneva kafejo. Lenin priskribis la popon kiel entuziasman, romantikan kaj iom naivan revoluciulon, al kiu tamen mankas la necesa matura revolucia mondkoncepto. La socialismaj revoluciuloj dume utiligis la popularecon de Gapon kaj provis gajni lin kiel adepton de sia partio, sed tiu klopodo estis vana. Kiam Gapon disiĝis de la socialismaj revolucioj kaj retroviĝis en Ruslando, li estis mortigita de socialismaj revoluciuloj, laŭ la ordono de Viktor Ĉernov. Samtempe en Ĝenevo troviĝis la matroso **A.N. Matjuŝenko**,⁴⁴ unu el la gvidaj figuroj de la ribelo sur la kirasŝipo 'Potjomkin'. Al Lenin li detale raportis pri la ribelo de la jaro 1905, kiu kaptis parton de la nigramara floto. Sed anstataŭ kun Lenin, Matjuŝenko preferis amikiĝi kun Gapon.



A.A. Bogdanov, M.S. Ol'minskij, G.A. Gapon, V. Ĉernov kaj M.A. Matjuŝenko (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

⁴⁰ Temas pri Anatolij Vasil' evič Lunaĉarskij, elstara gvidanto de la bolŝevisma movado (1875-1933).

⁴¹ Georgij Apollonoviĉ Gapon (1870-1906).

⁴² Viktor Mihajloviĉ Ĉernov (1873-1952).

⁴³ Pliajn klarigojn pri ĉi tiu konferenco vd. sub https://ru.wikipedia.org/wiki/Женевская_конференция_1905_года.

⁴⁴ Afanasij Nikolaevič Matjuŝenko (1879-1907).

https://es.wikipedia.org/wiki/Aleksánder_Bogdánov, https://ru.wikipedia.org/wiki/Ольминский_Михаил_Степанович,
https://en.wikipedia.org/wiki/Georgy_Gapon, https://en.wikipedia.org/wiki/Viktor_Cheernov,
https://ru.wikipedia.org/wiki/Матюшенко,_Афанасий_Николаевич)

Post la eksplodo de la revolucio de 1905 en Ruslando formiĝis en Svislando transpartia helpkomitato, al kiu apartenis diversaj burĝaj kaj socialdemokratiaj personecoj, por kolekti monon por la viktimoj en Ruslando. La alvoko, kiun ĉi tiu komitato disvastigis, emfazis, ke Svislando ne havas la intencon enmiksiĝi en la internaciajn disputojn, nek en la internajn aferojn de alia lando, sed ke en la senco de la historia misio la svisa popolo sentas sin devigata esprimi sian simpatian por apogi la rajtojn kaj la liberecon de la koncernataj popoloj.

Sed la „helpo“ ne nur limiĝis al kolektado de mono por viktimoj de la revolucio. En vintro 1905/6 la svisa federacia administracio devis okupiĝi pri la problemo de la eksporto de armiloj, post kiam oni konstatis, ke en Svislando estis aĉetitaj armiloj, kiuj estis trovitaj sur droninta ŝipo antaŭ la bordo de Finnlando por esti kontrabanditaj al Ruslando. Tiuj armiloj havis klare identigeblan svisan devenon kaj originis el svisaj armilaj fabrikoj. Post interna esploro, la svisa armea departemento klariĝis, ke oni ne povis konstati, kiu aĉetis tiujn armilojn. Do, la svisaj aŭtoritatoj decidis rezigni pri plua esplorado de la afero kaj opiniis, ke ne necesas ekriklari kun la rusa ambasado, kvankam la carisma polico petis tion.

Dume, en la ĝenevaj bibliotekoj Lenin akiris konojn pri praktikaj demandoj de la revolucia taktiko kaj de la barikada batalo. Plej interesis lin la historia figuro de Cluseret, kiu estis generalo de la Pariza Komunumo de 1871, kies memuarojn li tradukis al la rusa lingvo kaj publikigis ilin en *Vperjod*. Krom tio, en aŭgusto 1905 Lenin aperigis en Ĝenevo broŝuron titolatan „Duobla taktiko de la socialdemokratio en la demokratia revolucio“. En ĝi li traktis la specifajojn de la revolucio en la epoko de la imperiismo, klarigis kial la laboristaro kune kun la kamparanoj devas transpreni la gvidan rolon en ĝi kaj konfirmis la neceson de la organizata, perforta ribelo. En tiu senco Lenin sendis al Ruslando pasian alvokon, fakte konkretan ordonon por batalo, postulante de la revoluciuloj „sovaĝan energion“. Lia verkaĵo enhavis detalan instrukciaron kiel oni devas efektiviĝi la revolucion. Sed la okazaĵoj en Ruslando ne evoluis en la senco de Lenin. Ĉar li timis, ke li izoliĝos en Ĝenevo kaj perdos la influon en la partio, li decidis veturi al Ruslando. Post kvinjara restado en eksterlando Lenin atingis Sankt-Peterburĝon, tra Svedujo kaj Finnlando, la 8an de novembro 1905.

La rusa revolucio de la jaro 1905 estis rekte provokita de la rus-japana milito kaj la „Sanga Dimanĉo“ de la 9/22a de januaro.⁴⁵ La carisma reĝimo riskis kolapsi, sed ĝi ankoraŭ povis teni sin. Por trankviligi la popolon, la caro eldonis la „Oktobran manifeston“⁴⁶ de 1905, kiu antaŭvidis la enkondukon de duĉambra parlamenta sistemo kaj garantiis bazajn civitanajn liberecojn kiel la rajtojn de la libera esprimado de la opinio, de la liberaj kunvenado kaj asociiĝo. Temis pri la unua planteto de la demokratio en la historio de Ruslando. Malgraŭ tiuj cedejoj, la potenco plu restis ĉe la caro, kiu rajtis bloki la laboron de la parlamento (Dumao) kaj eĉ dissolvi ĝin. Tion li ankaŭ faris en junio 1907.⁴⁷

Fakte, Lenin ne estis aktive envolvata en la rusan revolucion de 1905, kompare kun la menŝevistoj, kiuj aktive partoprenis ĝin kaj utiligis la okazon kritiki la bolŝevistojn, ke ili permesis al si senrespondecan aventurisman, kaŭzante superfluan sangoverŝadon. Lenin replikis, ke la revolucion de 1905 li konsideras ĝenerala ekzerco por la amasa revolucio, kiu ankoraŭ sekvos, kaj defendis sian vidpunkton, ke tiu revolucio devos esti efektiva per perfortaj rimedoj, kion la menŝevistoj neis.

Post la likvido de la dua Dumao fare de ĉefministro Stolypin (kiu permesis la pendigon de multaj laboristoj), Lenin kaj lia edzino fuĝis en decembro al Finnlando, de kie ili reveturis per falsitaj dokumentoj tra Stokholmo kaj Berlino al Ĝenevo, kie ili alvenis la 7an de januaro 1908 (t.e. la 25an de decembro 1907 laŭ la malnova kalendaro). Tie ili luis ĉambron en la strato Deux-Ponts n-ro 17 ĉe iu familio Kűpfer. Ilia entuziasmo estis limigita, ĉar „la urbo aspektis morte kaj dezerte“. Lenin „havis la senton, ke li revenis ĉi tien por esti enĉerkiĝita“.

⁴⁵ Pli detale vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Sanga_dimanĉo_\(1905\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Sanga_dimanĉo_(1905)).

⁴⁶ Pli detale vd. https://en.wikipedia.org/wiki/October_Manifesto.

⁴⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Duma#Staatsduma_im_Kaiserreich_Russland.

Post kiam la patrino de Krupskaja sekvis al Ĝenevo en somero, Lenin kaj Krupskaja forlasis la straton Deux-Ponts kaj luis pli grandan loĝejon en la strato Maraîchers n-ro 61, kiu situis en la laborista kvartalo Plainpalais. En aŭtuno aperis ankaŭ *Marija Il'iniĉna Ul'janova*, la fratino de Lenin,⁴⁸ kiu volis studi en Ĝenevo. Ŝi ricevis apartan loĝejon en la sama domo kaj kutimis pasigi la tempon de la manĝoj kun la paro Lenin.

La politika celo de lia nova restado en Ĝenevo estis revivigi la gazeton *Proletarij*, kion Lenin fakte faris, retrovinte la malnovan kompostilon kaj la kompostiston Vladimirov mem. En la redaktado kunlaboris krom A. Bogdanov ankaŭ *Iosif Dubrovinskij*⁴⁹ kaj *Grigorij Aleksinskij*,⁵⁰ du revoluciuloj-bolŝevistoj, kiuj forlasis Ruslandon en 1907. Aleksinskij estis elektita al la Dua Dumao en 1907. Numero 21 de *Proletarij* aperis la 26an de februaro 1908. En ĝi aperis analizoj pri la evoluo de la rusa revolucio. Anstataŭ Aleksis Medved', kiu forpasis, kiel nova respondeca eldonisto funkciis la ĝeneva socialdemokrato Emile Nicolet. Krom la menciitaj kamaradoj en Ĝenevo aperis ankaŭ aliaj signifaj funkciuloj de la rusa socialdemokratia, marksisma kaj komunisma movado, ekzemple *Grigorij Zinov'ev*⁵¹ kaj *Lev Kamenev*,⁵² du centraj figuroj de la sovetia periodo, kaj iliaj familioj.⁵³ Ŝajnas, ke ili ne sentis sin tro bone en Svislando, ĉar la adaptiĝo al tiuj fremdaj kulturaj cirkonstancoj estis malfacila afero. Ankaŭ Lenin mem perdis la paciencon daŭrigi la vivon kiel elmigrinto en tiu „damna urbo“ aŭ „mizera nesto“, kiel li skribis en letero al sia fratino. Multan tempon li pasigis en bibliotekoj, vizitis kun la edzino teatron, kinejon aŭ promenadis borde de la lago, ĉar vespere la paro enuis en la mallarĝa kaj malvarma loĝejo. La realeco por Lenin ŝajnis esti „griza kaj malklara“, kaj li konsolis sin per la imago, ke la fiasko de la revolucio de 1905 estis nur provizora. Malgraŭ tiu psike iom elĉerpita stato, Lenin, kiu intertempe atingis la 50an jaraĝon, celis eviti deprimiĝon, malkuraĝon aŭ apation; male, li kultivis optimismon kaj „freŝajn akvofontojn“. Do, simple necesis plulaboradi.



Aleksandr Bogdanov, Grigorij Zinov'ev, Lev Kamenev, ties edzino Ol'ga Davidovna Bronŝtejn, Nikolaj Buĥarin kaj Anatolij Lunaĉarskij

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Bogdanov, https://es.wikipedia.org/wiki/Grigori_Zinoviev, https://es.wikipedia.org/wiki/Lev_Kamenev, https://en.wikipedia.org/wiki/Olga_Kameneva, https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Bukharin, https://de.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Wassiljewitsch_Lunatscharski)

La venonta libro, kiun Lenin verkis en Ĝenevo, havis la titolon „Materiismo kaj empiriokritikismo“.⁵⁴ En ĝi la aŭtoro okupiĝis pri la teorioj de la filozofoj Ernst Mach kaj Richard Avenarius (Habermann),⁵⁵ kiu instruis filozofion en la zurika universitato kaj kies instruojn oni nomis *maĥismo*. Ankaŭ inter socialistoj de Ruslando la modiĝinta ideologio, kiu klopodis trovi sintezon kun la marksismo, disvastiĝis, kion Lenin konsideris tre maltrankviliga tendenco. Jam en 1904 Lenin elpaŝis kontraŭ ĝi, ĉar li celis

⁴⁸ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Мария_Ильинична_Ульянова.

⁴⁹ Iosif Fjodoroviĉ Dubrovinskij (1877-1913).

⁵⁰ Grigorij Alekseviĉ Aleksinskij (1879-1967).

⁵¹ Grigorij Evseeviĉ Zinov'ev (t.e. Radomysl'ski-Apfelbaum, 1883-1936).

⁵² Lev Borisoviĉ Kamenev (1883-1936).

⁵³ Lia unua edzino Ol'ga Davidovna Kameneva (1883-1941), kun kiu Kamenev konatiĝis en Parizo, estis la fratino de Lev Trockij. Ankaŭ ŝi studis en Berno.

⁵⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Materialismus_und_Empiriokritizismus, <https://eo.wikipedia.org/wiki/Empiriokritikismo>, http://www.trend.infopartisan.net/trd0212/Lenin_MaterialismusEmpiriokritizismus.pdf (germana teksto), http://ciml.250x.com/archive/lenin/on_lenin/german/adoratskij_25jahre_lenin_empiriokritizismus.pdf, http://leibnizsozietaet.de/wp-content/uploads/2012/10/02_wittich.pdf (germanlingvaj ekzeĝoj).

⁵⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Mach kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Avenarius.

eviti, ke la marksisma materiismo repaciĝu kun la t.n. ideismo.⁵⁶ Per tio Lenin ankaŭ intencis kontraŭbatali ĉiujn „reviziismajn“ tendencojn ĉe A.A. Bogdanov kaj A. Lunaĉarskij, kiuj riskis laŭ li malpurigi kaj subfosi la veran historian materiismon⁵⁷ de Marx kaj Engels. Do, Bogdanov, Lunaĉarskij kaj Gor'kij devis esti briditaj kaj protektitaj de tiaj ideologiaj tentoj kaj devojiĝoj (sed, kiel konate, ili tamen faris kion ili volis). En somero 1908 Lenin veturis al Londono por serĉi kaj trovi priteman materialon, kiu ne estis havebla en la ĝenevaj bibliotekoj, kaj ŝajnas, ke li revenis kontenta al Ĝenevo. Sed ĉar Lenin havis personajn antaŭjuĝojn kontraŭ la maĥistoj, liaj konkludoj enhavis tordojn kaj misinterpretojn, pro kio la verkaĵo, kiu aperis samjare en Moskvo, ne signifis pli ol polemikan denuncon, vanan panikon de altgrade paranoja partia ĉefideologo, kiu ne pretis toleri ideologiajn influojn ĉe siaj kamaradoj, kies pozicioj ne kongruis kun la pura marksismo. Fakte, sub la severa ideologia kontrolo de Lenin almenaŭ la maĥismaj tendencoj rapide elvaporigis inter la bolŝevistoj kaj kaŭzis, ke en Sovetunio la „empiriokritikismo“ estis konsiderata kaj rifuzata kiel „filozofio de la reakcia burĝismo“. Ĉi-koncernaj libroj iĝis malpermesataj kaj ĝiaj aŭtoroj estis persekutataj. Eĉ en la postaj stalinismaj farsprocezoj kontraŭ Buĥarin, Kamenev, Rykov kaj aliaj la maĥismo ludis kuriozan rolon, ĉar oni riproĉis al ili simpation kun ĝi.

Por kunigi diversajn devojulojn (kiel la „otcovistojn“, „ulmatistojn“, adeptojn de la „bogostroitel'stvo“ kaj la anojn de la Capri-lernejo) estis fondita, en decembro 1909, la grupo „Vperjod“, laŭ iniciato de A.A. Bogdanov kaj G.A. Aleksinskij. Al tiu ĉi grupo, kiu formale ekzistis kiel literatura cirklo kadre de RSDLP, apartenis ankaŭ Maksim Gor'kij, A.V. Lunaĉarskij, D.Z. Ma-nuil'skij, M.G. Ĉakaja⁵⁸ kaj aliaj. Inter 1910 kaj 1911 la grupo eldonis en Ĝenevo neregulan eldonaĵon kun sama nomo, de kiu aperis 16 numeroj. Ĉar tiu grupo kritike rilatis al Lenin, lia sinteno al ĝiaj membroj estis tre streĉita.⁵⁹

Revene al 1908: La 18an de marto de ĉi tiu jaro en la „Salono Handwerck“ en Ĝenevo okazis kunveno memore al la 25a datreveno de la morto de Karl Marx, kiu samtempe estis omaĝo pri la Pariza Komunumo de 1871. Lenin klarigis al siaj sescent ĉefe rusaj aŭskultantoj la kaŭzojn de la fiasko de la Pariza Komunumo: Anstataŭ konkrete agi, t.e. entrepreni la „eksproprietigon“ de la kapitalistoj, la proletaro revis pri justeco, kiu iam efektiviĝos. La dua eraro estis laŭ Lenin, ke la proletaro ne tuj neniigis siajn malamikojn kaj anstataŭ tio klopodis morale influu ilin. Anstataŭ renversi la versajlan registaron, la pro-letaro donis al ĝi tempon por rekolekti fortojn, kio estis decida taktika eraro, kiu malhelpis la venkon. Lenin admonis la proletaron neniam plu ripeti tiajn fatalajn erarojn kaj avertis, ke la klasbatalo de la proletaro povas transformiĝi al armata batalo kaj eĉ al „civitana milito“ kontraŭ la burĝoj kaj kapitalistoj. En tiu batalo la proletaro neeviteble venkos la malamikojn, kiuj evdentiĝos pli malfortaj. La svisaj aŭtoritatoj observis la kunvenon, sed konstatis, ke ĝi enhavis nenion danĝeran, krom falsitaj pasportoj, kiuj estis produktitaj en Bazelo kaj Ĝenevo.

Kiel dirite: La ĝeneva grupo de bolŝevistoj estis malgranda – kaj malriĉa. Por financi sian agadon kaj eldoni siajn gazetojn Lenin estis devigata serĉi financajn rimedojn ĉie kie malfermiĝis promesplenaj fontoj. En 1908 la bolŝevistoj povis akiri konsiderindan heredaĵon flanke de iu N.P. Schmidt, kiu estis la riĉa filo de iu mebla fabrikisto en Moskvo, kiu subtenis la ribelulojn de 1905. Tiu 23-jara homo estis arestita kaj sendita al la prizono, kie li faris suicidon, post kiam li promesis donaci sian monon al RSDLP. La heredaĵo, kiu konsistis el sufiĉe konsiderinda sumo de 280'000 rubloj, estis kontestata, pro kio ĝi ne povis esti tuj elpagita al la heredanto, sed malgraŭ tio la bolŝevistoj trovis vojon por akiri parton de la mono pere de ruza truko.

Por akiri monon, la partio ne hezitis lanĉi t.n. „eksproprietigojn“, kiuj estis kontestataj inter la partianoj, ĉar ili efektiviĝis pere de armataj atakoj de bankoj kun la celo prirabi surstratajn montransportojn. Malgraŭ ilia altgrade krima karaktero, Lenin ne kontraŭis, eĉ permesis ilin, dum Aksel'rod, Bogdanov, Lunaĉarskij, Gor'kij kaj Aleksinskij strikte distanciĝis de tiu maniero efektiviĝi la partian politikon por akiri monon. La plej sensacia kazo estis la „eksproprietigo“ de Tifliso de la 26a de junio 1907, en kiu partoprenis ankaŭ Iosif Dĵugaŝvili-Stalin kaj kies celo estis prirabi vagonon kun granda monsumo, kiu veturis de la poŝtofiĉejo al iu filio de la regna banko. La teroristoj, kiuj atakis la

⁵⁶ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ideismo>.

⁵⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Historischer_Materialismus.

⁵⁸ Miĥail Grigor'evic Ĉakaja (Tskhakaya, 1865-1950).

⁵⁹ Vd: <https://en.wikipedia.org/wiki/Vpered>.

transporton per mangrenadoj, mortigis kvardekon da homoj kaj rikoltis kvaronmilionon da rubloj,⁶⁰ de kiuj iu parto eĉ atingis Ĝenevon. Komence de 1908 tio estis rimarkita de la svisa federacia prokuroro, kiu sciigis tion al la svisa ministerio de la justico kaj polico. Lige kun tiu evento en Ĝenevo estis arestitaj 13 personoj, inter ili la menciita Karpinskij, kiu kune kun alia arestito, *Nikolaj Semaŝko*,⁶¹ kiu estis nevo de Pleĥanov kaj poste fariĝis grava sovetia funkciulo, devis resti en la malliberejo. Ĉar al ambaŭ elmigrintoj oni ne povis pruvi, ke ili partoprenis en la „eksproprietigo“ de Tifliso, ili devis esti liberigitaj, pri kio cetere zorgis A. Lachenal, kiu estis konata ĝeneva advokato kaj liberalisma politikisto (eĉ iama svisa registarano), kiu estis petita de Lenin interveni favore al la arestitoj. Kvankam la rusa ambasado postulis transdoni tiujn du sinjorojn, la svisaj aŭtoritatoj rifuzis tiun peton kaj lasis la rusojn en libereco. Sed la rabita mono, kiu konsistis el 500-rublaĵ bankbiletoj, ne povis esti utiligata. Ĉiu banko en Ruslando konis la seriajn numerojn de tiuj bankbiletoj, pro kio ili ne povis esti ŝanĝitaj. Krom tio, en diversaj urboj de Eŭropo estis trovitaj 500-rublaĵ bankbiletoj el la ‘rikolto’ de Tifliso, kio nature kaŭzis la atenton de la polico kaj justico. La bolŝevistoj de Ĝenevo rezignis ŝanĝi tiajn bankbiletojn kaj decidis bruligi ilin (kio okazis en 1910 en Parizo).



I. Dubrovinskij, G. Aleksinskij, V.A. Karpinskij⁶² kaj N.A. Semaŝko, M.G. Ĉakaja, G.Ja. Sokol'nikov (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

<https://ru.wikipedia.org/wiki/Дубровинский>, [Иосиф Фёдорович](https://ru.wikipedia.org/wiki/Иосиф_Фёдорович), <https://ru.wikipedia.org/wiki/Алексинский>, [Григорий Алексеевич](https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Semashko_(medicine)), [https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail Tshhakaya](https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Tshhakaya), [https://en.wikipedia.org/wiki/Grigori Sokolnikov](https://en.wikipedia.org/wiki/Grigori_Sokolnikov))

Kiel Krupskaja raportis, en Svislando Lenin studis la karakteron de la „burĝa demokratia respubliko“, la „rolon, kiun la laboristoj ludas en tiu respubliko“ kaj la „influon de la diversaj partioj“. Lenin venis ĉi-rilate al negativaj konkludoj. En siaj memuaroj, ĉapitro pri Ĝenevo 1908, ŝi notis, ke Lenin „pasie malŝatis kaj abomenis la burĝan kulturon kaj la etburĝismon“. Krupskaja, kiu mokis pri la „svisaj pruduloj“, verŝajne mem adoptis tiun sintenon. Siajn kritikantojn Lenin nomis „etburĝa malpuraĵo“, pri kiu li esperis, ke la partio forpurigas ĝin. Sed ne ĉio estis malbona en la svisa respubliko. En Ĝenevo Krupskaja komencis lerni la francan lingvon por povi partopreni en la laboro de la lokaj socialdemokratoj kaj tiucele ĉeestis kursojn en la universitato. Dum la lernado ŝi estis impresita de la „kapablo de la svisoj labori intense, objektivaj kaj serioze“, kiun ŝi evidente celis imiti. Sed okupiĝante pri pedagogio, ŝi vere seniluziigis pri la praktikoj en svisaj lernejoj kaj skribis pri la lerneja edukado en siaj memuaroj jenan citindan komenton: „En Ĝenevo mi studas ankaŭ la lernejan sistemon. La unuan fojon mi komprenis, kion fakte la burĝa ‘popollernejo’ signifas. Mi vidis, kiel la infanoj de la laboristoj en belaj, helaj konstruaĵoj kun grandaj fenestroj estas edukitaj al obeemaj sklavoĵoj. Mi observis, kiel la instruistoj en la sama klaso batas kaj mistraktas la infanojn de la malriĉuloj, dum aliflanke ili ne tuŝas la infanojn de la riĉuloj, kaj kiel ili subpremas la memstaran pensadon de la infanoj. Mi konstatis, ke la tuta lerneja laboro estas ne pli ol morta lernegado kaj ke al la infanoj oni konstante trude instruas kiel oni devas respekti la potencon, la riĉecon. Neniam mi imagis, ke io tia povas okazi en demokratia lando.“ La fatala konkludo de Lenin kaj Krupskaja estis, ke „la demokratia respubliko estas sendube fajna armilo, kies celo estas subpremi la laboristajn amasojn“.

De Ĝenevo Lenin finfine vojaĝis al Italujo, kie li vizitis la verkiston Maksim Gor'kij en Capri. Tie li renkontis ankaŭ aliajn rusajn revoluciulojn kiel Bogdanov, Lunaĉarskij, Bazarov. Sed Lenin ne

⁶⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Überfall_auf_die_Bank_von_Tiflis.

⁶¹ Nikolaj Aleksandroviĉ Semaŝko (1874-1949).

⁶² La bildo aperas sur diversaj retpaĝoj (sen klara indiko de la fonto), ekzemple sur http://www.warheroes.ru/hero/hero.asp?Hero_id=16022 kaj <http://bse.sci-lib.com/article059456.html>, sed ĝi estis verŝajne pruntita de la Granda Sovetenciklopedio.

tro emis diskuti kun ili. Li preferis ekskursi tra Napolo kaj Pompejo, veturi sur la monton Vesuvo kaj trinki la lokan vinon, kiun li ege ŝatis. Kelkajn tagojn poste li reveturs al Svislando.

En la plej lasta dimanĉo de aŭgusto Lenin migris kun kelkaj ĝenevaj socialistoj en la arbareton de Crevin piede de la monto Salevo por omaĝi la grandan jud-germanan socialiston Ferdinand Lassalle, kiu forpasis la 31an de aŭgusto 1864, pro duelo, kiu tragike finiĝis por li.

En decembro Lenin kaj Krupskaja forlasis Ĝenevon kaj eklogis en Parizo, ĉar la „etmensa“ etoso inter rusaj elmigrintoj tedis ilin kaj ili opiniis, ke en la ĉefurbo de Francio oni estos malpli observata de la polico. Sed ili ne povis scii, ke Ljadov kaj Ĵitomirskij, kiuj konsilis kaj konvinkis ilin translokiĝi al Parizo, estis agentoj de la carisma polico, tiel ke poste Lenin bedaŭris sian decidon.

Antaŭ la eksplodo de la unua mondmilito Lenin vizitis Svislandon ankoraŭ du fojojn. En septembro 1911 li partoprenis iun kunsidon de la Internacia Socialisma Buroo en Zuriko kaj prelegis en bolŝevismaj rondoj de Zuriko, Berno kaj Ĝenevo, kie li elpaŝis pri la temo „Stolypin kaj la revolucio“. Dum tiu vojaĝo Lenin vizitis Lucernon, de kie li sendis poŝtkarton al sia patrino, kaj grimpis sur la monton Pilato (ĉe plej bona vetero).

En 1912 aŭ 1913 Lenin translokiĝis kun sia „Bolŝevisma centro en eksterlando“⁶³ al Krakovo-Poronin en Pollando, kiu estis parto de Aŭstrujo-Hungarujo.

En junio 1913 Lenin vojaĝis kun sia edzino al Berno, kie ŝi volis esti operaciita de la fama kuracisto kaj nobelpremiito profesoro Theodor Kocher je la Basedova malsano,⁶⁴ je kiu Krupskaja suferis. Ĉar Lenin devis atendi kaj ne estis tuj akceptita de la profesoro, kiu estis profesie tre okupata homo, li plendis pri li kaj nomis lin kaprica. Sed finfine la operacio okazis sukcese. Dum Krupskaja kuŝis tri semajnojn en la malsanulejo, Lenin faris prelegojn en Zuriko, Laŭzano kaj Ĝenevo pri la „situacio en la partio“ kaj en Berno partoprenis kunsidon de SDLPR-organizaĵoj. La tiama estro de la zurika bolŝevisma grupo de RSDLP estis iu **A.A. Bekzadjan**.⁶⁵ Li organizis la prelegon de Lenin de la 9a de julio 1913 en Zuriko pri la nacia demando. Komence de aŭgusto la paro revojaĝis al Krakovo.⁶⁶

Kiam la unua mondmilito eksplodis, centoj da rusaj socialdemokratoj pretis batali ĉe la okcidenta fronto. Kiam Lenin eksciis, ke la germanaj socialdemokratoj voĉdonis en la parlamento por la militaj kreditoj, li deklaris sin komunisto kaj definitive forlasis la socialdemokration. Sed ankaŭ Martov rifuzis la unuan mondmiliton, kiun li konsideris „imperiisma“.

Konklude pri la ĝeneva periodo de Lenin:

Pri la preferinda loĝloko en la emigracio, Lenin skribis la 9an de aprilo 1914 el Krakovo al sia patrino, komparante la vivon en Parizo kaj Ĝenevo: „Ofte ni pensis pri Ĝenevo, kie oni povis labori pli bone, kie la biblioteko estas instalita pli komforte kaj la vivo malpli nervoza kaj konfuzita. De ĉiuj lokoj de mia migrado mi preferus Londonon aŭ Ĝenevon, se ambaŭ ne situus tiel fore kaj flanke. Ĝenevo estas aparte agrabla pro la ĝenerala kultura nivelo kaj la eksterordinara komforteco de la ĉiutaga vivo.“

Maurice Pianzola, svisa komunisto,⁶⁷ kiu verkis libreton pri Lenin en Svislando,⁶⁸ skribis pri ĉi tiu epizodo: „En Ĝenevo la diskutoj ne estis facilaj. Komence, la membroj de la grupo ‚Liberiĝo de la laboro‘, izolitaj en sia ekzilejo, bonvenigis la alvenon de la juna viro, kiu estis plene inspirata de la vivo de la rusa laborista movado, kiel freŝan aeron. Sed kelkaj liaj opinioj tamen mirigis ilin pro sia aŭdaca radikaleco. Lenin diris al ili, ke la libera burĝismo ne transprenos la gvidan rolon en la venonta revolucio

⁶³ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Большевистский_центр.

⁶⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Morbus_Basedow.

⁶⁵ Aleksandr Artjom'evič (Arutjunoviĉ) Bekzadjan (1879-1938, vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Bekzadyan). En Zuriko li loĝis en la strato Bolleystrasse 40, kiu situas apud la universitata hospitalo.

⁶⁶ Iom poste en la sama monato okazis la 9a Universala Kongreso de Esperanto en Berno, sed Lenin tiam ne troviĝis en la urbo.

⁶⁷ Vd. https://fr.wikipedia.org/wiki/Maurice_Pianzola.

⁶⁸ La franca originalo de lia teksto aperis en 1952 en Ĝenevo, ĝia germana traduko en (orienta) Berlino en 1956. Ĉar mi ne komparis ĝin kun la franca originalo, mi ne scias, ĉu ĝi identas kun la germana versio. Vd. <https://www.swissbib.ch/Record/262639726>. La antaŭparolon verkis https://fr.wikipedia.org/wiki/Andr%C3%A9_Bonnard. La karakterizo, kiun tiu aŭtoro postlasis pri la restado de Lenin en Svislando, fariĝis iom tro rozkolora kaj banala. Kiel kompletigo al la libro de Willi Gautschi ĝi estas tamen utila kaj leginda.

kaj ke la laborista klaso devus alianciĝi kun la malriĉaj kamparanoj por faligi la caron. Pleĥanov protestis. Tiuj unuaj opiniaj diverĝoj estis la komenco de dudekjaraj furiozaj bataloj“.

Laŭ Volkogonov, la diferencoj inter Lenin kaj Martov ne havis unuavice politikan sed moralan karakteron. Martov konstatis, ke Lenin kiel homo komplete ŝanĝiĝis dum la pasado de la jaroj, de komence sufiĉe pacema kaj agrabla al pli kaj pli memfida, aroganta kaj agresema persono. Dum Martov celis humanisman, demokratian evoluon en Ruslando, Lenin strebis al radikala, perforta politika solvo. Tiu radikala solvo de Lenin, kiu konsideris la moralon superflua burĝa heredaĵo, antaŭvidis ĉiujn rimedojn, ankaŭ kontraŭleĝajn kaj krimajn, por atingi la celojn. La partio de Lenin devis fariĝi fera, disciplinata organizaĵo, en kiu la demokratio kaj la moralo estos elŝaltitaj. Dum Martov opiniis, ke la enkonduko de la socialismo en Ruslandon estas sensenca utopio, ĉar la socialismo signifis por li liberecon de la individuo, Lenin fajfis pri ĉio tio, same kiel lin en principo tute ne interesis la diskutoj pri paco kaj milito. Lin sole interesis nur revolucio, en kiu la bolŝevistoj akaparos la povon. Malgraŭ ĉia kritiko kontraŭ Lenin, Martov estis principe sama ortodoksa marksisto kun la diferenco, ke li kredis je la humanisma revolucio sen perforto, dum Lenin propagandis la teroron kiel politikan rimedon, kion Martov neniel povis akcepti.⁶⁹

Tiel, la fundamento de la bolŝevismaj teorio kaj movado de Lenin trovis sian komencan evoluon grandparte en Svislando; eblas diri, ke la bolŝevismo naskiĝis en Ĝenevo.

DUA PARTO: LENIN EN BERNO

Lenin en Svislando inter 1914 kaj 1917

En Krakovo Lenin estis taksita kiel malamika eksterlandano, sekve li estis arestita kaj sendita al prizono en Nowy Targ. La aŭstroj ec volis pendigi lin kiel eksterlandan spionon. Laŭ peto de Krupskaja, du socialdemokrataj membroj de la aŭstra imperia konsilio intervenis ĉe la aŭstraj aŭtoritatoj kaj povis atingi lian liberiĝon kaj permeson forlasi la landon.

Kiam la 5an de septembro 1914 Lenin kaj liaj edzino kaj bopatrino alvenis ĉe la svisa limo en Buchs/SG, li havis problemojn por eniri la landon, ĉar Lenin vojaĝis sen pasporto, kiun li devis lasi en Krakovo. Svislando postulis kaŭcion por Lenin, kiun li mem ne povis pagi kaj kiu devis esti trovita tra *Nikolaj Buĥarin*,⁷⁰ kiu troviĝis en Svislando kaj kontaktis la gvidanton de la svisa socialdemokratia movado, Herman Greulich,⁷¹ kiu estis petita helpi (kion li evidente faris). Gravan rolon ludis ankaŭ Robert Grimm,⁷² alia signifa aktivulo de la svisa laborista movado (pri kiu ni sube ankoraŭ parolos), kiu pretis transpreni financan garantion por Lenin.

Post mallonga halto en Zuriko, Lenin daŭrigis al Berno, kie la grupo de vojaĝantoj estis akceptita ĉe la stacidomo de d-ro *Grigorij (Georg) L. Ŝklovskij*, ĉefa kontaktpersono de Lenin en tiu urbo.⁷³ Lenin ne estis certa, ĉu ĉi-foje li rezidu en Berno aŭ en Ĝenevo, kiun li jam bone konis. Post kelkaj informiĝoj pri la aktuala situacio en Ĝenevo li decidis resti en Berno, kie li volis pasigi la militajn jarojn. La decidon eble influis la proksimeco de la malsanulejo, kie Krupskaja estis operaciita. Kvankam Svislando estis konata pro ties liberalisma aziljuro, Lenin tamen alfrontis malagrablajn burokratajn obstaklojn, ĉar kiel senpasportulo li ne povis pruvi sian identecon kaj do ricevis nur provizoran restadpermeson, kiu egalas al tolerado de eksterlandano sen dokumentoj, por kio li krome devis pagi

⁶⁹ Volkogonov, D.: Lenin (germana eldono, Berlino 2017, p. 85-90).

⁷⁰ Nikolaj Ivanoviĉ Buĥarin (1888-1938).

⁷¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Herman_Greulich.

⁷² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Robert_Grimm.

⁷³ Grigorij L. Ŝklovskij (1875-1937), d-ro, kemikisto (foton vd. ĉe Gautschi, p. 112/XIV).

kaŭciojn, kiuj temis pri kelkcent frankoj. La leĝo postulis sumon de 1160 svisaj frankoj kiel deponaĵo, sed tio dependis de la materia situacio de la koncerna persono. Ĉar Lenin ne havis monon aŭ ne volis pagi tian kaŭcion, li do troviĝis en embaraso. Je lia dispono estis iu Karl Zraggen, advokato, kiu reprezentis la interesojn de Lenin en Berno. Okazis diversaj kunsidoj, eĉ kun la direktoro de la berna polico, Tschumi (prononcu: Ĉumi), kaj kun granda konsilisto Carl Vital Moor, dum kiuj Lenin konfesis sian nepagipovon. Povas esti, ke Moor mem deponis la kaŭcion de cent frankoj, tiel ke la afero dume estis solvita. Ŝajnas, ke aldona kaŭcio kiel garantio por Lenin estis pagita de Robert Grimm. Do, la restadpermeso de Lenin en Berno validis ĝis la 1a de januaro 1916. En kazo de intenco renovigi la restadpermeson, li devis pagi novan sumon de ducent frankoj kaj krom tio submeti al la aŭtoritatoj validajn personajn dokumentojn. Meze de januaro 1916 Lenin skribis peton por longigi la restadpermeson kaj menciis, ke li ne kapablas pagi kaŭcion. Ĉar pri Lenin kaj liaj parencoj ne ekzistis plendo pri negativa konduto, la berna polico longigis ilian restadon ĝis la 25a januaro 1917 sen postuli kaŭcion. Kvankam Krupskaja mokis pri la „etburĝa“ vivstilo de la bernanoj, la decido de la bernaj aŭtoritatoj povis esti konsiderata kiel grandanima bonvolo, kaj Lenin mem certe scipovis estimi tiun komplezon.

Bernon Lenin jam konis. La unuan fojon li prelegis en ĉi-urbo en aŭtuno 1902 pri la programo kaj taktiko de la „etburĝa“ partio de la socialismaj revoluciuloj. Tiam en Berno vivis la rusa elmigrintino kaj malnova revoluciulino *Ljubov' Aksel'rod*,⁷⁴ kiu kunlaboris kun Pleĥanov. Ĉi tiu sciencistino pri literaturo kaj filozofio, kiu doktoriĝis en la Berna universitato pri L.N. Tolstoj, loĝis en la strato Brunnmattstrasse n-ro 30, kvartalo Mattenhof,⁷⁵ kie ŝi estis kontaktita de Lenin post ties alveno per trajno en Berno.

La duan fojon Berno estis vizitita de Lenin por prelegi fine de majo aŭ komence de junio 1903. La prelegon, kiu ĉi-foje temis pri la agrikultura demando, organizis denove Ljubov' Akselrod kadre de kursaro celita por la rusaj elmigrintoj de Berno. Invitita prelegi en tiu programo estis ankaŭ Pleĥanov, kiu traktis demandojn de la arto. Ankaŭ en ĉi tiu okazo Lenin renkontiĝis en la loĝejo de Ljubov' kun aliaj bernaj samideanoj. La venontaj vizitoj de Lenin al Berno okazis en vintro 1904, kun prelego pri la interna situacio de la partio, kun aparta konsidero de la rolo de la menŝevistoj, kaj en printempo 1908 kun elpaŝo antaŭ rusaj studentoj pri la ekonomia kaj politika evoluo de Ruslando, en aŭtuno 1911 pri Stolypin kaj la revolucio, kaj en somero 1913 pri la nacia demando kaj la socialdemokratio. La ĉefan enhavon de liaj prelegoj de 1914 kaj poste formis temojn de la milito kaj paco.⁷⁶

Dum la 17 pasigitaj monatoj en Berno Lenin ŝanĝis la loĝejon kvar fojojn, laŭ jenaj adresoj: La unuan loĝejon Lenin havis en la strato Donnerbühlweg n-ro 11a (nun 33) ĉe iu familio Ammeter. En la malfrua aŭtuno 1914 Lenin translokiĝis al domo en la strato Distelweg n-ro 11, kie oni luis du meblatajn ĉambrojn de iu sinjorino Roth-Züsli. En la proksimeco loĝis ankaŭ *Inessa Armand*,⁷⁷ Grigorij Zinov'ev kaj ties familio (t.e. edzino Zlatka Lilina⁷⁸ kaj filo Stjopka) kaj aliaj „bernaj“ bolŝevistoj (kiel M.S. Kedrov kaj V.M. Kasparov).⁷⁹ La sekvanta adreso estis strato Waldheimstrasse n-ro 66 (nun Blumensteinstrasse n-ro 17), kie Lenin subluis la loĝejon de iu familio von Känel. Kiel plej lasta adreso estas konata strato Seidenweg n-ro 4a (nun 8), kie Lenin luis la loĝejon de iu sinjorino Schneider-Morgen-thaler en la tria etaĝo. Ĉiuj tiuj stratoj troviĝas en la Länggass-kvartalo, en la ĉirkaŭjo de la universitato, tiel ke ĝi iusence povis esti nomata la bolŝevisma kvartalo de Berno,⁸⁰ kie laŭ noto de la Grimm-bio-grafo Adolf McCarthy la rusoj restis inter si. De bernanoj la lokaj rusoj estis rimarkataj kiel bruaj, malagrablaj ho-moj, kiuj sovaĝe vagadis tra la stratoj, diskutegis en restoracioj kaj en la tago de la unua majo svingis flagojn, pledante por la revolucio.

⁷⁴ Ljubov' (Ester Ljuba) Isaakovna Aksel'rod (1868-1946).

⁷⁵ En ĉi tiu kvartalo loĝas ankaŭ la aŭtoro de ĉi tiu studo.

⁷⁶ Vd. „Lenin v Berne i Cjuriche“, p. 136-7.

⁷⁷ Inessa Fjodorovna Elisabeth Armand-Pécheux d'Herbenville (1874?-1920). Al Berno, kie ŝi volis studi en la universitato, loĝante ĉe iu s-ino Sahli en la strato Drosselweg 23, ankaŭ Armand alvenis sen pasporto, tiel ke por registriĝi ŝi devis pagi kaŭcion, kion ŝi ne faris, pro kio post kunsidoj kun Zraggen kaj Moor ŝi estis liberigita de la pago, same kiel en la kazo de Lenin mem.

⁷⁸ Zlata Ionovna Lilina (pseud. Zina Levina, 1882-1929), dua edzino de G.E. Zinov'ev. Krom la menciitaj personoj, en tiu virina konferenco partoprenis ankaŭ s-inoj Ravvič kaj Elena Rozmirovič (la duonfratino de Evgenija Boŝ).

⁷⁹ Zinov'ev loĝis unue en strato Freiestrasse 1, poste en Neufeldstrasse 27. Kiel kemiisto li laboris en la laboratorio de G. Ŝklovskij. V.M. Kasparov loĝis en la strato Waldheimstrasse 84.

⁸⁰ Vd. <http://www.bernerzeitung.ch/region/bern/Wie-Lenin-im-Berner-Exil-den-gewaltsamen-Umsturz-plante/story/31773874>.

La 20an de marto 1915 en Berno forpasis la patrino de Krupskaja, Elisaveta Vasil'evna, kiu estis kremaciita kaj entombigita en la Bremgarten-tombejo.⁸¹ Ne eblis reheimigi ŝian kadavron al Ruslando. Ĉar la entombigo de la urno okazis sen religia ritualo, Lenin ekhavis problemon kun s-ino Roth, kiu luigis la loĝejon. Ĉar la dommastrino preferis havi luantojn, kiuj kredas je dio, ŝi subite petis la paron Lenin for-lasi la loĝejon.⁸² En aŭtuno 1915 Lenin spertis novan perturbon kun sia luiganto, kiu rimarkis, ke Lenin utiligas elektran lumon dum la tago, tial ke la Lenin-oj estis petitaj foriri, ĉar la uzado de elektra lumo dumtage ne estis permesata.⁸³ La loĝejon en Seidenweg 4a Lenin ege laŭdis, ĉar tie li havis bonan ĉambron kun elektra lumo kaj banejo kontraŭ (nur) tridek frankoj (kvankam Pianzola notis, ke tie elektra lumo mankis). „En Svislando ĉio estas plena de filistreco“,⁸⁴ Krupskaja skribis en siaj memuaroj en la ĉapitro pri Berno, kiun ŝi perceptis unuavice kiel administran kaj universitatan centron. Ŝi preskaŭ svenis, kiam ŝi konsciis pri tio, ke „ni estas kaptitaj en tiu etburĝa demokratia kaĝo, dum en Ruslando la revolucia batalo kreskas, la vivo pulsas“.

Sed malgraŭ ĉiuj 'etmensaj' spertoj kaj impresoj kaj la „dormema“ etoso en Berno, Lenin vivis „tute bone, agrable kaj pace“. Precipe li apreziis la bibliotekojn kaj la universitatajn klerulojn, kiuj abundis en Berno. Pri la 'iom tro demokratia' vivstilo de la svisoj la gastoj el Ruslando miris, post kiam ili povis observi, ke eĉ la edzinoj de altaj ŝtataj funkciuloj mem viŝas tapiŝojn sur la balkono, kio strange impresis ilin. Al la rusoj precipe plaĉis la ĉirkaŭaĵo de Berno kaj ties pejzaĝo. Por ĝui la naturon Lenin ekskursis sur la monton Gurten aŭ iris al la Malgranda Teraso de Berno, kie oni povis admiri la unikan panoramon de la svisa montaro de Berna Oberlando. Li ankaŭ promenadis ĉirkaŭ Berno aŭ kun Inessa aŭ Krupskaja, kaj vizitis la teatron, precipe kiam rusaj gastatoroj venis al Berno.

La dummilitaj jaroj estis ekonomie malfacila tempo. Ankaŭ la materia stato de la Lenin-oj verŝajne ne estis aparte bona dum la tempo de la emigracio. La honorarioj por mem eldonitaj verkaĵoj estis malregulaj, magraj kaj nesufiĉaj. Rekompencajon li ricevis okaze de prelegoj, kaj Krupskaja perlaboris iom da mono pere de privataj lecionoj aŭ plenumo de malgrandaj sekretariaj taskoj. La patrino de Krupskaja postlasis restsumon de dumil rubloj el heredaĵo, kiu helpis financi la vivon en eksterlando, sed pro la drasta falo de la kurso tiu mono perdis grandan parton de sia origina valoro.⁸⁵ Do, oni devis esti tre ŝparema, kiel Krupskaja lamentis en siaj memuaroj.

La kritikema sovetia historiisto Dmitrij Volkogonov (1928-95), kiu verkis gravan biografion pri Lenin, en kiu li okupiĝis pri la rigoraj tabuoj, kiuj validis en la manipulata kaj falsata oficiala sovetia historiografio pri Lenin, dubis, ke Lenin estis mizerulo aŭ malriĉulo. Oni ne forgesu, ke Lenin devenis de sufiĉe riĉa familio, kiu havigis al li monon en kazo de neceso por povi vivi en eksterlando en normalaj kondiĉoj, tiel ke Lenin ne estis devigata perlabori salajron. Krom tio, la partio disponigis al li sufiĉe da monrimedoj el diversaj fontoj (kiel fifamaj rabaj „eksproprietigoj“ organizitaj de Stalin, diversaj ne malgrandaj heredaĵoj de riĉaj partiaj simpatiantoj, mono el la komercado de Parvus kaj aliaj kun Ruslando, kiu parte troviĝis en zurikaj bankoj, germana mono por la subteno de la rusa revolucio,

⁸¹ En tiu tombejo troviĝas ankaŭ la rusa anarkiisto Miĥail Bakunin, kiu forpasis en Berno en 1876.

⁸² Rakontite de Krupskaja en la bernaj memuaroj de 1914/15.

⁸³ Same.

⁸⁴ La nocio de la „Spiesser“ (germanlingve) cetere estis utiligata de Karl Marx, kiu uzis ĝin unuavice kiel pejorativon rilate al la etburĝa germana socio. Filistreco fariĝis sinonimo por karakterizi la germanan etburĝan socion, kiu estas kontenta pri si mem kaj ne deziras (revoluciajn) ŝanĝojn (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Spiessbürger#Marxistische_Verwendung). Dum Krause (GDR-aŭtoro) tradukis „Spiesser“ per „filistro“, PIV difinis la nocion en iom alia senco (vd. <http://vortaro.net/#filistreco>). Oni ne interniksu la nocion filistro kun „filiŝtoj“ („Philister“ laŭ germana traduko). Krupskaja (kaj Lenin) uzis la rusan vorton „meŝĉanstvo“ kaj por „Spiessertum“ kaj por „Kleinbürgertum“, kiuj do estis sinonimoj (kelkaj ekzemploj en la ĝeneva kaj berna kunteksto: После Питера все тосковали в этой маленькой тихой мещанской заводи – Женеве. Конечно, в большом количестве это мещанство надоедало. В Швейцарии повсюду царило ярко выраженное мещанство. Ильича, который ненавидел до глубины души всякое мещанство, (...) Ильич еще в 1894 г. в своей книжке «Что такое «друзья народа» и как они воюют против социал-демократов?» писал о буржуазной культуре, о мещанстве, которое он глубоко ненавидел и презирал.). Komprenbla Krupskaja uzis ankaŭ la esprimon мелкобуржуазный дух.

⁸⁵ Siatempo, 2000 rubloj egalas al 6000 svisaj frankoj. En aparta ĉapitro Gautschi traktis la demandon de la financado de la rusa revolucio kaj de la restado de Lenin en eksterlando per germana mono. Fakte, la germana ambasadoro en Berno, Gisbert Freiherr von Romberg, estis ligita kun tiu ĉi aktiveco, uzante diversajn perantojn, kiuj havis kontakton kun li, kaj provizante ilin per mono. Inter tiuj kontaktuloj la estona naciisto Aleksander Kesküla, kiu studis politikon kaj ekonomion i.a. en Berno kaj Zuriko, ludis elstaran rolon (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Aleksander_Kesküla). Lia samlandano Arthur Rudolf Siefeldt estis menciita kiel lia kunlaboranto. En germanaj armeaj aktoj la nomo de Lenin aperis jam en marto 1915, tiel ke la rolo de Lenin kiel elmigrinto estis konata al la germanoj.

financaj helpoj de Maksim Gorĉkij, k.a.). Sekve oni devas veni al la konkludo, ke Lenin neniam vivis en mizero (kompare kun veraj rusaj laboristoj) kaj ĉiam ricevis la necesan monon. Tion cetere konfirmis ankaŭ Krupskaja en siaj memuaroj.⁸⁶ Supozeble temis pri multaj milionoj da rubloj, markoj, frankoj, kronoj, kiuj estis rekte aŭ malrekte je la dispono de Lenin.



F. Samojlov, G. Safarov kaj Ljubov' Aksel'rod. En 1876 en Berno forpasis Miĥail Bakunin, kie konservĝis lia tombo.⁸⁷
 (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
https://ru.wikipedia.org/wiki/Самойлов,_Фёдор_Никитич, https://en.wikipedia.org/wiki/Georgy_Safarov,
https://en.wikipedia.org/wiki/Lyubov_Axelrod, https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Bakunin)

Alvoko al la „milito de la civitanoj“ en Ruslando

La malgranda grupo de rusaj bolŝevistoj, do sep ĝis dek personoj, kiuj troviĝis en Berno, entuziasme bonvenigis Leninon en la svisa ĉefurbo, kie en septembro komenciĝis gravaj diskutoj pri la situacio de la movado kaj la irenda vojo. La interkonsultiĝoj okazis precipe en la privata loĝejo de Georgij Ŝklovskij en la strato Falkenweg n-ro 9, kie ĉeestis ankaŭ **Fjodor Samojlov**, kiu estis deputito de la Dumao⁸⁸ kaj restadis en Svislando por kuraci sian sanon,⁸⁹ **Georgij Safarov**, rusa revolucia elmigrinto vivanta en Francio kaj antaŭe sekretario de la zurika sekcio de bolŝevistoj,⁹⁰ kaj iu nekonata rusoj kun la nomo Moĥov. Tie Lenin rakontis pri siaj tezoj pri „la taskoj de la revolucia socialdemokratio en la eŭropa milito“, kiujn li ellaboris en Aŭstrujo kaj portis al Svislando. Ĉar probable oni promenis ankaŭ en la proksima Bremgarten-arbaro, kie oni povis paroli inkognite kaj konspire, naskiĝis en la literaturo la legendo pri la berna „arbara konferenco“, dum kiu Lenin prezentis siajn tezojn.⁹¹

La tezoj, kiujn Lenin prezentis al siaj kamaradoj en Berno, priskribis en sep punktoj liajn opiniojn pri la „imperiisma-dinastia“ karaktero de la milito kaj donis gvidliniojn por la bolŝevisma taktiko rilate al la militgvidantaj registaroj kaj koncerne la socialismajn partiojn kaj ties gvidantojn, kiuj laŭ li trompis la spiriton de la Ila Internacio, pro kio ĝi disfalis kaj estas refondota. Plej grave: La tezoj de Lenin enhavis *klaran alvokon al la milito de la civitanoj, kiuj levu la armilojn kontraŭ la propraj registaroj, ne nur por fini la militon, sed por utiligi la okazon efektivi la socian revolucion. Tiu batalo estu gvidota kontraŭ la carisma monarkio kaj la grandrusa, panslavisma ŝovinismo kun la celo liberigi la subprematajn popolojn de Ruslando, krei demokratian respublikon, konfiski la bienojn de la farmistoj kaj realigi la okhoran labortagon*. Ĉi tiu programo, kiu estis aprobita de la berna bolŝevisma grupo, formis la bazon de la ideoj, kiujn Lenin propagandos laŭ plej diversaj versioj dum la venontaj monatoj kaj jaroj.

La bernaj tezoj de Lenin estis eldonitaj kiel rezolucio de la „Grupo de socialdemokratoj, membroj de RSDLP“ kaj kontrabanditaj al Ruslando. Samojlov, kiu revojaĝis al Ruslando, kunportis kaj disvastigis ĝin inter la membroj de la Centra Komitato kaj de la propra frakcio en la Dumao. Post

⁸⁶ Vd. Volkogonov, D.: Lenin. Utopie und Terror. Berlin 2017, p. 49-57.

⁸⁷ Vd. <http://www.journal-b.ch/de/082013/alltag/1601/Der-Anarchist-auf-dem-Bremgartenfriedhof.htm> kaj https://ru.wikipedia.org/wiki/Бремгартенское_кладбище.

⁸⁸ Al la bolŝevisma frakcio en la IVa Dumao apartenis 5 deputitoj: G.I. Petrovskij, M.K. Muranov, A.E. Badaev, N.R. Ŝagov kaj F.N. Samojlov. La 17an de novembro 1914 ili estis arestitaj. La 10an de februaro 1915 kontraŭ ili komenciĝis jura proceso, dum kiu oni kondamnis ilin al ekzilo en Siberio. En Berno okazis protesta manifestacio.

⁸⁹ Fjodor Nikitiĉ Samojlov (1882-1952).

⁹⁰ Georgij Ivanoviĉ Safarov (1891-1942).

⁹¹ Kiu laŭ Krupskaja okazis „en la tago de la alveno“ de la Lenin-oj „el Galicio kun Ŝklovskij, Safarov, Samojlov, Gberman kaj aliaj.

kiam Lenin ricevis pozitivajn signalojn el Ruslando, li transformis la tezon al manifesto sub la titolo „La milito kaj la rusa socialdemokratio“.⁹² Ĝi ŝovis la respondecon por la milito al la burĝaj kapitalismaj registaroj kaj partioj, precipe germana, brita kaj franca, kiuj agis en alianco kun la ruslanda carismo, kiu estis nomata plej reakcia kaj plej barbara monarkio de Eŭropo; ĝi kritikis la socialdemokratajn partiojn de Eŭropo, kiuj ne kontraŭstaris la militpolitikon de la ŝovinismaj fortoj, sed, male, apogis la militkreditojn kaj do perfidis kaj lezis la aferon de la socialismo; ĝi alvokis la laboristan klason faligi la carismon, propagandis la transformon de la „imperiisma milito al „civitana milito“ kaj postulis efektiviigi la „socialisman revolucion“. La manifesto estis subskribita de la CK de RSDLP.

La manifesto estis publikigita en la gazeto *Social-Demokrat*, la centra organo de RSDLP, kiu tiucele estis revivigita kaj presita en Ĝenevo en eldonkvanto de 2000 ekzempleroj, kiuj estis senprokraste senditaj al Ruslando. Kvankam oni dissendis al la svisa socialdemokrata gazetaro germanlingvan tradukon de la berna manifesto, ĝi estis ignorata de la redaktoroj, tiel ke la manifesto trovis praktike ne niun atenton en Svislando. En Romandio resumon de la manifesto publikigis en la franca lingvo la maldekstra gazeto *La Sentinelle*, kiu aperis en La Chaux-de-Fonds, kie ekzistis forta laborista movado. Ankaŭ en Berno, kie oni trovis cirilajn literojn ĉe la presejo Benteli, kiu situis en la kvartalo Bümpliz (strato Bümplizstrasse 101), estis produktitaj diversaj ruslingvaj presaĵoj. La partio utiligis ĝiajn servojn inter oktobro 1915 kaj junio 1916 kaj parte komence de 1917, presante inter alie kelkajn eldonojn de *Social-demokrat* (n-roj 47-55, 57, 58), *Kommunist* (nur 1 eldono) kaj *Zbornik Social-demokrata* (oktobro-decembro 1916).⁹³ Ĉar konstante mankis mono, tiuj periodaĵoj aperis malofte kaj malregule, sed almenaŭ kelkaj eldonoj povis esti kontrabande senditaj al Ruslando.⁹⁴

Komence de la milito la revolucia movado de Ruslando dissplitiĝis laŭ „internaciisma“ kaj „patriotisma“ branĉoj. Dum Pleĥanov kaj Potresov apogis la „patriotisman militon“, Martov, kiu eldonis propran gazeton *Golos*, Aksel'rod kaj Trockij apogis la „internaciisman“ opcion kaj per tio realproksimiĝis al la pozicio de Lenin, dum Pleĥanov kaj Potresov estis misfamigitaj de Lenin kiel „oportunistoj“ kaj „ŝovinistoj“. Pri Trockij Lenin blasfemis kiel „karieristo kaj frakciigisto“. Per sia propra programo Lenin senlace klopodis unuigi la diversajn frakciojn por gvidi komunan batalon.

Kiam Lenin eksciis, ke lia malnova rivalo Pleĥanov elpaŝos per publika parolado la 11an de oktobro en la popoldomo de Laŭzano, li decidis veturi tien por repliki lin. Kvankam li kondamnis la „germanan imperiismon“, Pleĥanov klarigis, ke oni devas apogi la militpolitikon de la demokratiaj ŝtatoj Francio kaj Grandbritio kaj alvokis la rusajn elmigrintojn libervole aliĝi al la batalo. Ĉi tiu vidpunkto estis konsiderata de la bolŝevistoj kiel hereza kaj „ŝovinisma“. Dum la diskuto anoncis sin nur Lenin por kontraŭdiri la eldirojn de Pleĥanov kaj defendi sian pozicion. Pleĥanov respondis laŭ sprita maniero, tiel ke la ĉeestantoj, ĉefe menŝevistoj, donis al li tondran aplaŭdon, kio faris la impreson, ke Pleĥanov gajnis la disputon.

Tri tagojn poste Lenin mem elpaŝis en la sama laŭzana salono pri la temo „proletaro kaj milito“. Antaŭ plena salono Lenin klarigis al la publiko sian pozicion, baziĝante sur la berna manifesto, laŭdante la strategion de la gazeto de Martov, kiu rekte kritikis la propran registaron, kaj konkludante, ke „estus utopio pensi, ke la proletaro atingas siajn celojn per pacaj rimedoj“. Variaĵojn de la sama referaĵo Lenin prezentis ankaŭ en Berno, Ĝenevo, Montreux (Bauby aŭ Clarens) kaj Zuriko. La 15an de oktobro li elpaŝis en Ĝenevo kun prelego pri „la eŭropa milito kaj la socialismo“.

La 27an de oktobro Lenin prelegis ankaŭ en la rondo de rusaj elmigrintoj ĉe la laborista-sindikata asocio „Eintracht“ (harmonio) en Zuriko⁹⁵ pri „la milito kaj la socialdemokratio“. Depost la

⁹² La tekston en la rusa lingvo vd. sub <http://revarchiv.narod.ru/vladimilitch/lenin26/war.html>, kaj la tekston en la germana lingvon vd. sub <https://sites.google.com/site/sozialistischeklassiker2punkt0/lenin/lenin-1914/wladimir-i-lenin-der-krieg-und-die-russische-sozialdemokratie>.

⁹³ Pli detale vd. „Lenin v Berne i Cjuriche“, p. 112-22.

⁹⁴⁹⁴ Alia presejo, kiu produktis diversajn eldonaĵojn de Lenin Trockij, Buĥarin k.a., estis instalita en 1918 en Belp apud Berno (vd. <https://www.derbund.ch/bern/region/fritz-jordi-lenins-hausdrucker/story/23992587?track>).

⁹⁵ Vd. <https://www.nzz.ch/zueroch/wo-lenin-den-umsturz-plante-1.18645662>. Nun Neumarkt-teatro.

militeksplodo en Zuriko paroladis diversaj socialistoj kiel Martynov,⁹⁶ Radek,⁹⁷ Aleksinskij, Kosovskij⁹⁸ kaj Trockij. Ĉi-lastaj postulis senkondiĉan pacon „sen aneksoj kaj kontribuoj“, pro kio lia elpaŝo havis pli da efiko ol la manifesto, kiun Lenin disvastigis el Berno. Sed en Zuriko Lenin, kiu tiukaze direktis furiozan polemikon kontraŭ Kautsky,⁹⁹ kiu estis konsiderata kiel plej eminenta germana socialdemokrato, kontestis la pacismajn vidpunktojn de Trockij kaj ripetis sian ideon pri la milito de la civitanoj. Krom tio, Lenin postulis, ke Ruslando estu „amputita“ je Ukrainio kaj la baltaj landoj, ĉar li ne toleris, ke Ruslando pli longe subpremu fremdajn popolojn. Kiel Marx kaj Engels instruis, popolo, kiu subpremas aliajn popolojn, estas malkapabla mem emancipiĝi. Dum la soveta tempo tiaj embarasaj citaĵoj estis nature strikte evitataj.

En Berno Lenin volis nodi kontaktojn kun diversaj gravaj svisaj socialismaj politikistoj. Unu el ili estis **Robert Grimm**, kiu estis menciita jam supre lige kun la helpo ĉe la envojaĝo de Lenin ĉe la landlimo en Buchs. En 1908 Grimm edziĝis al iu ruslanda judino, kun kiu li havis komunan infanon kaj kiu en iu tempo helpis lian eldonistan kaj ĵurnalistan laboron.¹⁰⁰ Inter 1911 kaj 1919 Grimm estis membro de la nacia konsilantaro de Svislando (por la zurika kantono), do de la svisa parlamento, kaj pro tio ofte troviĝis en Berno, kiam Lenin loĝis en la svisa ĉefurbo. En 1909 la filo de laboristo, kiu laŭ profesio mem estis libropresisto, fariĝis ĉefredaktoro de la socialdemokratia gazeto *Berner Tagwacht*. Kelkajn tagojn post sia alveno en Berno Lenin vizitis la redakcion de tiu gazeto, kie li estis akceptita de Grimm, kun kiu li diskutis aktualajn demandojn de la milito, de la laborista movado kaj la nacian demandon. Kiam Lenin prezentis al Grimm siajn tezojn, kiujn li maturigis kaj publikigis en Berno, Grimm evidente reagis sen granda entuziasmo pri la ideoj de la rusa revoluciulo, kiun li renkontis, ĉar liaj taktikaj teorioj pri armata ribelo kontraŭ la registaroj kaj la „civitana milito“ kontraŭ la kapitalismaj ekspluatantoj ne estis akcepteblaj por la svisa demokrato kaj pacisto Grimm, eĉ se li estis maldekstrulo. Kvankam Grimm mem revis pri sociaj reformoj en Svislando, li estis kontraŭ la taktiko de puĉado kaj barikadaj bataloj, ĉar la tempoj, dum kiuj tiaj strategioj kaj praktikoj estis aplikataj, pasis laŭ lia opinio. La imagoj de Grimm pri la revolucio ne estis ligataj kun perforta ribelo kontraŭ la registaro kaj kun renverso de la tuta politika, ekonomia kaj socia sistemo, kiel Lenin celis. Do, la gvida maldekstrulo de Svislando rigardis al Lenin, kiun ankaŭ la Socialisma Internacio konsideris strangulo kaj sektulo, kun skeptiko, kaj li ankaŭ ne intencis aperiĝi liajn tezojn en sia gazeto *Tagwacht*. Pro tio Lenin estis probable seniluziigita pri Grimm, kvankam li prijuĝis lin sendube „kapabla, energia kaj ne stulta“ homo, sed lia problemoj estis laŭ li, ke li „ne interesiĝas pri bazaj teoriaj demandoj“ kaj „dronas en la marĉo de la ĉiutaga laboro de sia etmensa lando“. Post iu prelego de Grimm, kiun Lenin aŭskultis en la Breitenfeld-kvartalo, Lenin lamentis pri la revolucia senpaseco aŭ pasiveco de la eŭropanoj kaj rememorigis al Grimm la vortojn de Herzen¹⁰¹ pri la pigra Eŭropo.

Malgraŭ lia rifuzo de la lenina doktrino pri perforto kaj la „civitana milito“, Grimm tamen restis impresata pri kelkaj principaj tezoj de Lenin, kiuj kongruis kun liaj personaj konvinkoj. Ene de la socialdemokratia Grimm apartenis al la marksisma centro inter la radikala kaj reformisma tendaroj. Finfine tiaj ideoj estis esprimitaj ankaŭ en la bazela rezolucio de 1912 kaj ne povis esti tute ignorataj aŭ forviŝitaj. Kiam Grimm submetis al iu konferenco de svisaj kaj italaj socialdemokratoj, kiu okazis en septembro en Lugano, Tiĉino, sian rezolucion, eblis rimarki ian similecon kun la kernaj leninaj ideoj en la teksto, kvankam ĝi estis alimaniere formulita, kaj sen menciis la nomon de Lenin en la konferenca protokolo. En la parlamento la sinteno de Grimm respreguliĝis per pledo kontraŭ pli alta budĝeto por kovri militajn kostojn kaj por realigo de socialisma alternativo. En novembro 1918 Grimm engaĝiĝis kiel motoro de la „ĝenerala striko“ en Svislando, kiu estis elstara cezura evento en la historio de la svisa laborista movado, kiu staris sub la impreso de la internacia socialismo kaj dum kiu Grimm alfrontis la

⁹⁶ Aleksandr Martynov (t.e. Aleksandr Samojloviĉ Pikker, 1865-1935).

⁹⁷ Karl (Bergardoviĉ) Radek (t.e. Karol Sobelsohn, 1885-1939).

⁹⁸ Verŝajne temas pri V.I. Kosovskij (Kossowski), vd. <https://www.marxists.org/deutsch/archiv/huhn/1973/trotzki/1-revolution.htm>, piednoto 32.

⁹⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Kautsky.

¹⁰⁰ Temas pri Rosa Reichesberg (vd. <http://www.hls-dhs-dss.ch/textes/d/D9310.php>).

¹⁰¹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Aleksander_Herzen.

firman kontraŭstaradon de reakciaj dekstraj burĝaj fortoj, kiuj ne hezitis simpatii kun la itala faŝismo kaj de kiuj li estis misfamigita kiel „danĝera bolŝevisto“, kiu celas efektiviĝi revolucion en Svislando.¹⁰²

Malgraŭ tiuj ideoj, politikaj kaj taktikaj diferencoj, Grimm kaj Lenin ne evitis unu la alian, sed male renkontiĝis ankoraŭ plurajn fojojn dum la milita tempo en Svislando, precipe dum la konferencoj de Zimmerwald kaj Kiental, pri kiuj temos pli sube.



Eldono de *Berner Tagwacht* de la 18a de septembro 1915 kun informo pri la konferenco de Zimmerwald¹⁰³; redaktoroj Carl Vital Moor (1895-1906) kaj Robert Grimm (1909-18).

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

http://www.zimmerwald1915.ch/Sites/carl_moor.html (sen indiko de la bildfonto), https://es.wikipedia.org/wiki/Robert_Grimm. La bildo de Berner Tagwacht aperas sur diversaj retpaĝoj kiel bund.ch kaj srf.ch)

La provoj de Lenin ekrikti kun la ĉefaj gvidantoj de la socialdemokratio de Romandio, Charles Naine kaj Paul Graber, restis malsukcesaj. Kiam li sendis sian reprezentantinon Inessa Armand, kiu loĝis en Baugy-sur-Clarens,¹⁰⁴ por ke ŝi aranĝu kunvenojn kun ili, ili estis neatingeblaj. Estas evidente, ke la svisaj socialdemokratoj klopodis eviti kontaktojn kun rusaj revoluciuloj de la tipo de Lenin, ĉar ili ne estis interesataj pri iliaj radikalaj kaj maldemokratiaj utopioj. Krupskaja mokis pri tiuj sinjoroj, ke ili preferas iri fiŝkaptadi kaj pendigi lavitajn tukojn ol trakti organizajn demandojn de la maldekstra politiko.

Krom ellabori la menciitajn teoriojn, Lenin interalie okupiĝis ankaŭ pri la demando de la „Unuiĝintaj Ŝtatoj de la mondo“ kaj fine de 1914 skribis jenon:

„La venonta politika slogano de la eŭropa socialdemokratio devas esti la fondo de respublikaj Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo (...)“

kaj

„La Unuiĝintaj Ŝtatoj de la mondo (do ne de Eŭropo) estas tiu ŝtata formo de la unuiĝo de la libereco de la nacioj, kiun ni ligas kun la socialismo – tiel longe, ke la plena venko de la komunismo ne kondukis al la definitiva malapero de ĉiu ŝtato, ankaŭ demokratia. Kiel memstara slogano la solvo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de la mondo estus apenaŭ ĝusta, ĉar unue ĝi koincidas kun la socialismo kaj due ĝi povus krei malĝustan komprenon pri la maleblo de la venko de la socialismo en unusola lando kaj krei falsan komprenon pri la rilatoj de tia lando al la ceteraj.“

¹⁰² Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Landesstreik>. Pri tiu ĉi striko en Svislando longe cirkulis la opinio, ke Ruslando financis ĝin, kio plej verŝajne estis absurda fabelo, ĉar en la arkivoj oni trovis neniun indikon pri tio. Novan interesan svisan dokumentan filmon (februaro 2018) vd. sub <https://www.srf.ch/play/tv/dok/video/generalstreik-1918---die-schweiz-am-rande-eines-buergerkrieges?id=6fd86571-6403-48c5-b32d-96616eff524c&station=69e8ac16-4327-4af4-b873-fd5cd6e895a7>.

¹⁰³ Informojn pri *Berner Tagwacht* vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Berner_Tagwacht. La redakto situas en la strato Kapellenstrasse 6, kvartalo Monbijou, Berno (bildo pruntita de <https://www.derbund.ch/bern/region/fritz-jordi-lenins-hausdrucker/story/23992587?track>). Tie troviĝis ankaŭ la presejo de la marksisma gazeto *Vorbote*, en kiu Lenin publikigis artikolojn, sed ĝi eldoniĝis nur dufoje.

¹⁰⁴ Kie loĝis ankaŭ Nikolaj Buĥarin, Nikolaj Krylenko kaj Elena Rozmiroviĉ (la duonfratino de Evgenija Boŝ), kiuj planis eldoni la gazeton *Svezda* (stelo), kaj la rusa verkisto N.A. Rubakin, kiu posedis grandegan bibliotekon (vd. https://fr.wikipedia.org/wiki/Nikolaï_Roubakine). Pli da detaloj pri la unuopaj restadoj kaj preleĝoj de Lenin en Laŭzano vd. la libron ‚Lenin v Berne i Cjuriche‘, p. 141-56.

La 23an de februaro 1915 Lenin partoprenis en protesta manifestacio, kiu estis organizita de la socialdemokratoj kaj de la sindikatoj en Berno. La teksto de lia parolado aperis en *Berner Tagwacht*. Post tiu elpaŝo li estis konata en la tuta lando.

Bernaj konferencoj

Dum la tempo de la restado de Lenin en Berno okazis tri internaciaj konferencoj, kiuj malgraŭ siaj malgrandeco kaj ekstera nekonateco havis certan signifon por la socialdemokratio kaj la bolŝevismo (kiu evoluis laŭ propra gusto de Lenin kiel radikala kaj reviziita marksismo). Fine de februaro 1915 kunvenis en la restoracio 'Schweizerbund', strato Länggassstrasse 44, kiu servis kiel kunveno de la „kontraŭ-imperiismaj“ fortoj, delegitoj de la eksterlandaj bolŝevismaj grupoj de RSDLP. Dank' al la memuaroj de kelkaj ĉeestantoj oni scias, ke en tiu ĉi konferenco partoprenis 19 personoj precipe el Svislando kaj Francio. La solaj rusoj de ekstere, kiuj aperis en la konferenco, estis **Georgij Pjatakov**¹⁰⁵ kaj ties posta edzino **Jevgenija Boŝ**,¹⁰⁶ kiuj fuĝis el la siberia mallibereco tra Japanio kaj Usono al Svislando, sed ili ne posedis mandaton por voĉdoni. La prezidanto de la konferenco estis Ŝklovskij, sekretario estis iu Kornblum, kiu estis profesia kolego de Ŝklovskij kaj simpatianto de Lenin, kiu prelegis pri „la milito kaj la taskoj de la partio“. Diversaj rezolucioj estis dediĉitaj al demandoj de la milito, defendo de la patrujo, taskoj de la revolucia socialdemokratio, pacismo, malvenko de la carisma monarkio kaj disfalo de la Dua kaj restarigo de la Tria Internacio, temoj, kiuj ludos gravan rolon ankaŭ en estontaj konferencoj por subteni la argumentaron de la leninaj bolŝevistoj.



G. Pjatakov, J. Boŝ, Z. Lilina, A. Balabanova, C. Zetkin, I. Armand
(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
https://de.wikipedia.org/wiki/Georgi_Leonidowitsch_Pjatakow, https://en.wikipedia.org/wiki/Yevgenia_Bosch,
https://fr.wikipedia.org/wiki/Zlata_Lilina, https://de.m.wikipedia.org/wiki/Datei:Angelika_Balabanova.jpg,
https://de.wikipedia.org/wiki/Clara_Zetkin, https://de.wikipedia.org/wiki/Inessa_Armand)

La dua konferenco de marto 1915, kiu okazis en la berna Popoldomo,¹⁰⁷ kiu servis kiel kongresejo de la svisa socialdemokratio, estis dediĉita al la virina movado kaj kunvokita de la germana komunistino **Clara Zetkin**,¹⁰⁸ kiu estis en rilatoj kun Robert Grimm, kiu arkivis la aktojn de la konferenco. Ŝia ideo organizi tian konferencon aperis pro tio, ĉar la viroj, kiuj devis militdefori, ne rajtis forlasi siajn landojn. Tiel, ĉirkaŭ tridek reprezentantoj el Britio, Germanio, Francio, Nederlando, Italio, Pollando, Ruslando kaj Svislando kunvenis tie sub la prezido de Zetkin por interkonsultiĝi pri la solidareco por la paco. La adoptita manifesto direktis sin al la viroj, kiujn oni alvokis batali por la paco en la senco de la socialismo. Nature, kiel viro Lenin ne ĉeestis la konferencon mem, en kiu partoprenis kvin bolŝevistinoj, i.a. Krupskaja, Ines Armand kaj Zlata Lilina, la edzino de Zinov'v kaj sektetariino de la berna grupo de RSDLP. Sed por kontroli kaj influu la konferencon en sia senco Lenin sidis en la restoracio de la Popoldomo kaj stiris siajn reprezentantinojn de tie, kiuj konstante konsultis lin, kiel marionetojn. En sia memuaro la menŝevistino **Angelica Balabanova** (Balabanoff)¹⁰⁹ plendis, ke la konduto de Lenin estis ridinda, ĉar antaŭ ĉiu voĉdono la kunsido estis interrompita, por ke la bolŝevistinoj povu demandi lin pri lia opinio.

¹⁰⁵ Georgij Leonidoviĉ Pjatakov (1890-1937).

¹⁰⁶ Jevgenija Bogdanovna Boŝ (1879-1925).

¹⁰⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Volkshaus_Bern, nun Hotel Bern (Zeughausgasse 9).

¹⁰⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Clara_Zetkin.

¹⁰⁹ Angelica Isaakovna Balabanova (1878-1965, vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Angelica_Balabanova_kaj_http://www.woz.ch/1536/hundert-jahre-zimmerwald/ueberall-lagen-papierfetzen-herum). Antaŭ ol aliĝi al la socialisma

Sian rolon kiel flustra „konsilanto“ Lenin ripetis dum la tria konferenco, kiu estis organizita en aprilo por la junularo kaj gvidita de *Willi Münzenberg*, germano, kiu estis membro de la centra estraro de la socialisma junulara organizaĵo de Svislando, gvidanto de la Internacia Junulara Sekretariato en Berno kaj redaktoro de la revuo *Die freie Jugend*. La konferenco, kiu unuigis 14 delegitojn el diversaj eŭropaj landoj, celis esti manifestacio kontraŭ la milito kaj kapitalismo. La bolŝevistoj, t.e. Safarov kaj Armand, kiuj kondukis obstine jam en la komenco de la aranĝo, estis denove stiritaj de Lenin, kiu sidis en la sama restoracio, kiel marionetoj.¹¹⁰ Maurice Pianzola parolis pri „amikaj konsiloj“, kiujn Lenin laŭdire donis al ili. La ĉefan referaĵon prezentis Robert Grimm persone, kies rezolucion la rusaj delegitoj, kiun ili trovis tro pacisma, kontraŭbatalis kaj anstataŭ tio submetis propran version, kiu kongruis kun la leninaj tezoj. Sed la rezolucipropono de la bolŝevistoj ricevis nur tri voĉojn, dum Münzenberg, kiu estis elektita kiel internacia sekretario kaj poste fariĝos arda adepto de Lenin,¹¹¹ kaj Willy Trostel, la reprezentantoj de la svisaj socialismaj junularaj organizaĵoj, voĉdonis kun la plimulto. Malgauh tio, la bolŝevisma rezolucio estis akceptita de la protokolo, por ekstere demonistri la impreson de unueco inter la frakcioj. En la konferenco cetere partoprenis ankaŭ Fritz Platten, kiu baldaŭ ludos gravan rolon en la vivo de Lenin.¹¹²



Ŝtata Arkivo en Berno, Urba kaj Universitata Biblioteko den Berno, popoldomo en Berno (fotoj Vikipedio)
(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
https://de.wikipedia.org/wiki/Schweizerisches_Bundesarchiv, https://de.wikipedia.org/wiki/Universitätsbibliothek_Bern,
https://de.wikipedia.org/wiki/Volkshaus_Bern)

Bernaj bibliotekoj

Dum Lenin abunde legis la verkaĵojn de Marx kaj Engels, precipe la partojn pri la revolucio, li legis ankaŭ la verkojn de Aristotelo, Hegel kaj Feuerbach, kiujn li trovis en la bernaj bibliotekoj, precipe en la Svisa Nacia Biblioteko, kiu troviĝis en la nuna konstruaĵo de la Ŝtata Arkivo (Archivstrasse 24), kaj en la Urba kaj Universitata Biblioteko (Kesslergasse/Münstergasse). En la nacia biblioteko li kolektis materialon por verki eseojn kaj tezarojn pri la nacia demando kaj (historio de la) filozofio, precipe materiisma dialektiko. Ankaŭ Krupskaja vizitis kaj utiligis tiujn bibliotekojn. En Berno ŝi verkis la tekston pri „Popola klerigo kaj la demokratio“ (kiu aperis en Petrogrado en 1917). Siajn manuskriptojn Lenin sendis al Maksim Gor'kij aŭ rekte al Ruslando por proponi ilin al iuj eldonejoj. Dum rusaj libroj kaj gazetoj estis malfacile akireblaj, en la bernaj bibliotekoj Lenin prunteprenis aŭ abonis diversajn gazetojn,¹¹³ kiujn li povis kompreni dank' al siaj sufiĉe bonaj fremdlingvaj konoj. Dank' al la bone funkcia interbiblioteka pruntoservo li mendis ankaŭ librojn el bibliotekoj de Zuriko, Ĝenevo kaj Neŭŝatelo. Apartan atenton de Lenin vekis krom libroj de la aŭtoro Victor Hugo („Châtiments“) la verko „Pri la milito“ de la prusa generalo Carl von Clausewitz,¹¹⁴ kiu estas konsiderata kiel ĉefa verko pri demandoj de la milito. Lenin prunteprenis la unuan eldonon de 1832/34, kiu troviĝis en la Urba kaj Universitata Biblioteko. Ĉe Clausewitz, kiu ŝajne konis kaj ĝuste klarigis la leĝojn kaj regulojn de la milito, Lenin

movado, Balabanova venis al Svislando por helpi al italaj elmigrintoj kaj protekti ilin de ekspluatado kaj humuligo fare de kapitalistoj.

¹¹⁰ Ĉar Krupskaja ne rakontis tiun klaĉon en siaj memuaroj, Gautschi baziĝis sur aliaj fontoj, i.a. la memuaroj de Balabanova.

¹¹¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Willi_Münzenberg.

¹¹² Pri Platten vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Fritz_Platten.

¹¹³ Kiel la verkinto de la libro „Lenin v Berne i Cjuriĉe“ skribis, Lenin legis la maldekstrajn gazetojn *Neue Zeit* kaj *Vorwärts* (Germanujo), *Berner Tagwacht* kaj *Sentinelle* (Svislando), *Arbeiterzeitung* (Aŭstrio), *Humanité* (Francio), *Avanti* (Italio). Probable li legis ankaŭ aliajn gazetojn.

¹¹⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Carl_von_Clausewitz.

lernis, ke la milito estas politiko, kiu anstataŭ per skribilo estas farita per glavo, ke la politiko naskis la militon kaj ke nur en tio troviĝas ĝia valoro.¹¹⁵ Lenin faris abundajn marĝenajn komentojn, kiuj aperis en 1930 en la rusa lingvo kadre de la Lenin-verkaro kaj en 1957 estis eldonitaj en la germana lingvo de iu eldonejo en orienta Berlino (GDR).¹¹⁶ La ĉefa verko de Clausewitz do sendube influis la pensadon de Lenin (kiu cetere neniam estis soldato) pri la esenco de la milito, sed en kiu grado la instruoj de la prusa militeoriisto influis lian konkretan revolucian agadon, estas malfacile diri.

Lenin en Sörenberg

Kiam en printempo 1915 la Basedov-malsano de Nadeĵda Krupskaja reakriĝis, kion evidente kaŭzis aŭ influis la morto de ŝia patrino, la kuracistoj rekomendis al ŝi iri en la montaron, kion ŝi kaj Lenin ankaŭ faris. Lenin trovis reklamon pri malmultekosta pensio, kaj tiel, komence de junio 1915 la paro Lenin-Krupskaja veturis de Berno – al Sörenberg, alpa vilaĝo sur 1165 metroj super la maro en la lucerna kanton, kie oni enloĝiĝis en la hotelo Marienthal, kiu estis gvidata de iuj fratinoj Vogel. Krupskaja skribis, ke en Sörenberg ili vivis tre bone. Lenin dediĉis sian tempon al verkado,¹¹⁷ ripozado kaj migrado tra la montaro (Rothorn kaj Schratzenfluh, kion Lenin tradukis per „kondamnitaj paŝoj“). Li plukis alpajn rozojn, kolektis berojn kaj fungojn. „Ni leviĝis en la frua mateno kaj ĝis la tagmanĝo, kiu okazas en Svislando je la 12a horo, ni unuope laboris en niaj anguloj. En tiuj horoj Inès ofte ludis pianon, tiel ke kun tiu muziko oni povis labori aparte bone.“ Posttagmeze ili migradis en la montaro. Al Sörenberg, kiu havis malgrandan poŝtoŝtation, Lenin venigis diversajn librojn el bernaj kaj zurikaj bibliotekoj kaj miris, ke tiuj bibliotekoj disponigas ilin tiel facile kaj senpage kaj ke la svisa poŝto tiel glate kaj rapide funkcias. Oficialaj dokumentoj pri la restado de Lenin en Sörenberg ne povis esti trovitaj, kaj la gastlibro de la hotelo perdiĝis. Anstataŭ tio naskiĝis diversaj kuriozaj mitoj kaj legendoj.¹¹⁸ Laŭ dubindaj asertoj de atestantoj Lenin vizitis la apudan preĝejon kaj diskutis kun la loka pastro, veturis per biciklo al Schüpflheim por porti sendaĵojn al la poŝtoŝtation kaj viziti la dentiston. Krom tio oni rakontis, ke li banis sin nuda en la rivero Emme, de kie li estis forpelita de iu loka politikisto. En Sörenberg Lenin korespondis kun diversaj rusaj elmigrintoj kaj invitis ilin viziti lin en sia plaĉa feriejo. Iuj (kiel Inessa Armand, Evgenija Boŝ kaj Pjatakov kaj eble ankaŭ Zinov’ev, kiu feris en Hertenstein apud Lucerno) fakte ankaŭ aperis tie por diskuti aktualajn temojn. Lenin klopodis konvinki kelkajn samideanojn (ekzemple Alexandra Kollontaj, kiu estis petita disvastigi la verkaĵojn de Lenin en Usono, kien ŝi estis veturonta) veni al la baldaŭ okazonta konferenco en Zimmerwald kaj samtempe provis eviti, ke la frakcio de Trockij-Martov reprezentiĝu kiel memstara grupo. Komence de septembro Lenin interrompis la restadon en Sörenberg por partopreni tiun konferencon (vd. sube), dum lia edzino restis en la vilaĝo (daŭrigo sur p. 31).



Hotelo Marienthal en Sörenberg. (Fonto: <http://www.fluehli.ch/geschichte.html>, aŭtoro nekonata)

¹¹⁵ Laŭ Soljenicyn, Lenin in Zürich, p. 75.

¹¹⁶ Vd. <https://www.swissbib.ch/Record/278660029>.

¹¹⁷ I.a. „La kolapso de la Ila Internacio“, „Socialismo kaj milito“, „La pacdemando“, „Pri la milito“ (alvoko), „Imperiismo kaj socialismo en Italio“ k.a. (vd. <https://sites.google.com/site/sozialistischecklassiker2punkt0/lenin/lenin-1915>, germanlingvaj tekstoj).

¹¹⁸ Vd. <https://sites.google.com/site/sozialistischecklassiker2punkt0/nadeschda-krupskaja/nadeschda-krupskaja-erinnerungen-an-lenin/die-kriegsjahre> (germanlingve), <https://leninism.su/memory/1399-vospominaniya-o-lenine-chast-ii.html> (ruslingve).

La konferenco de Zimmerwald

Post la konferenco en Lugano en septembro 1914, kiu kunvenigis nur socialistojn el milit-neŭtralaj ŝtatoj, aperis nun la ideo okazigi konferencon de militkritikaj kaj opoziciaj socialismaj minoritatoj el la landoj, kiuj troviĝis en la milito. Tia ideo estis unuafoje menciita de la menŝevisto Lev Martov en printempo 1915. Kaj ĝi trovis viglan aprobon de Robert Grimm, al kiu Martov sendis leteron kun tia propono. Fakte, en tiu periodo jam okazis iuj konferencoj de kontraŭmilito orientataj socialismaj fortoj, sed necesis prepari novan kun konkreta enhavo. Al Aksel'rod Grimm skribis, ke li mem jam havis tian ideon. Pri tiu ĉi temo Grimm korespondis ankaŭ kun Rosa Luxemburg kaj Karl Liebknecht, la famaj germanaj socialistoj; ĉi-lastaj eĉ estis, kiel Ledebour, membro de la germana parlamento. Post kiam Grimm sondis pri la ideo en Berlino kaj Parizo, li traktis la projekton dum kunsido de la estraro de la Svisa Socialdemokratia Partio en majo 1915. Sed la propono estis rifuzita, ĉar la plimulto ne volis „konspiri kun eksterlandaj opoziciaj grupoj“ kaj preferis apogi la „kastelan pacpolitikon“.¹¹⁹ Do, Grimm daŭrigis okupiĝi pri la projekto laŭ propra iniciato, des pli ke li ricevis apogon de francaj, britaj kaj italaj socialistoj. Post pluraj prokrastoj, la 11an de julio en Berno povis okazi prepara konferenco. Ne estas klare, ĉu Grimm volis malinviti Leninon, kiu mem estis skeptika pri la senco de tia konferenco, ĉar li atendis malmulton de ĝi. Sed la partopreno en la konferenco estis libervola kaj la konsisto hazarda. Lenin tamen decidis partopreni ĝin, kaze ke oni invitas lin, kaj procedi laŭ la sama maniero kiel en antaŭaj tiaj konferencoj, prezentante propran rezoluciproponon kun la celo, ke ĝi estu almenaŭ registrita de la protokolo, se ĝi ne estos akceptita de la konferenco mem. En la menciita prepara konferenco partoprenis Morgari kaj Balabanova el Italujo, Warski kaj Walezki el Pollando, Aksel'rod kaj Zinov'ev el Ruslando. Sub la prezido de Grimm la ĉeestantoj interkonsentis pri la plua procedo kaj fiksis daton por dua preparakunsido, la 8an de aŭgusto. Sed post du prokrastoj tia dua preparakonferenco estis nuligita kaj la dato ŝovita ĝis la 5a de septembro. En tiu tempo Grimm dissendis la invitilojn por la ĉefa konferenco, kiu devis okazi en la berna Popoldomo. La 4an de septembro Lenin ankoraŭ kunvokis siajn kamaradojn al privata kunsido, dum kiu devis esti ellaboritaj la proponoj por propraj rezolucioj kaj manifesto, La 'frakcio' de la leninistoj-internaciistoj konsistis el Zinov'ev, Radek, Höglund, Nerman (Skandinavio), Borchardt (Germanujo), Platten (Svislando) kaj Winter-Berzins (Latvio).

Do, la 5an de septembro 1915, matene je la 10a horo, la kamaradoj kunvenis kadre de la unua „Internacia Socialisma Konferenco“ en la berna Popoldomo. Post mallonga salutparolado Grimm ordonis al ili kolektiĝi sur la placo Eigerplatz, kie ili estis transportitaj, evidente sen esti rimarkitaj de la berna polico kaj deklaritaj-kamuflitaj kiel ornitologoj, per ĉevalĉaroj al la vilaĝo Zimmerwald, kie la konferenco devis okazi, kiel kombino de surprizo kaj sekreto.¹²⁰ Kiel konferencujo estis elektita la hotel-pensiono Beau-Séjour, kie la partoprenantoj ankaŭ loĝis kaj manĝis.¹²¹

Je la kvara horo posttagmeze la konferenco estis inaŭgurita de Grimm, kiu prezidis ĝin, kune kun la italo Lazzari kaj la rumano Rakowski. En la konferenco partoprenis oficialaj delegacioj de socialismaj partioj el Bulgario, Holando, Italio, Latvio, Pollando, Norvegio, Svedio, Rumanio kaj Ruslando. Ĉar la angloj ne ricevis pasportojn por forlasi la landon, ili ne povis vojaĝi al Svislando. Kiel observantoj aperis ankaŭ delegitoj el Francio, Germanujo kaj Svislando (Grimm, Moor, Naine, Platten). La germana delegacio estis la plej multnombra. Ruslandon reprezentis kvar frakcioj: Lenin kaj Zinov'ev (bolŝevikoj), Aksel'rod kaj Martov (menŝevistoj), Mark Natanson-Bobrov kaj Viktor Ĉernov (socialismaj revo-luciuloj) kaj Trockij (propra grupo). Radek (Parabellum) partoprenis kiel polo, Winter-Berzins kiel latvo. Laŭ la oficiala listo partoprenis 38 homoj, t.e. 37 plus iu Lemanski el Ruslando, kiu alvenis kun unutaga malfruo kaj asertis, ke li reprezentas la judan socialisman organizaĵon „Bund“ por informiĝi pri

¹¹⁹ Pri la signifo vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Burgfriedenspolitik>.


¹²⁰ Laŭ Vasil Kolarov, la bulgara partoprenanto en la konferenco, Lenin kaj la rusoj ne estis videblaj en la busoj, kiuj veturis al Zimmerwald, kie Lenin aperis kiel svisa turisto kun dorsosako. Laŭ li kaj la memuaroj de Krupskaja, Lenin kaj la rusoj veturis kelkajn (du) tagojn pli frue al Zimmerwald por gvidi preparajn diskutojn. Aliflanke aperis dubo, ĉu tiu versio povas esti vera, ĉar la partoprenantoj de la konferenco de Zimmerwald eksciis nur kelkajn horojn antaŭ la veturo en la berna Popoldomo, ke la konferenco okazos en tiu loko. Sed povas esti, ke Lenin sciis tion pli frue ol la aliaj.

¹²¹ La hotelo Beau-Séjour konsistis el kvar konstruaĵoj: Stock, Villa, Schlössli kaj la restoracio, kiuj estis posedataj de Anton Eberle. En 1971 la pensiono Schenk estis malkonstruita, dum la ceteraj partoj de la iama hotelo Beau-Séjour kaj de la iama kuirejo estis konservataj, sed estis utiligataj por aliaj celoj. La konferencaj diskutoj okazis en la „vilao“, kie troviĝis la hotela manĝejo. Dum Lenin kaj Zinov'ev loĝis en ĉambro n-ro 7, Trockij loĝis kun Platten ĉe la poŝtisto Robert Blatter. La partoprenantoj devis mem pagi la restadon.

la konferenco.¹²² Clara Zetkin kaj Rosa Luxemburg ne povis partopreni, ĉar ili sidis en la malliberejo, kaj Karl Liebknecht devis militdeĵori. Liebknecht sendis leteron al Berno, kiu estis laŭlegita de Grimm kaj entuziasme bonvenigita de la bolŝevistoj, ĉar la fama germana socialisto ŝajnis apogi la sloganojn de Lenin.



(Bildo: Kolekto Daniel Guggisberg)



Hotelo Beau-Séjour kun apuda pensiono (Schenk), kie okazis la konferenco de Zimmerwald (litografajo kaj ŝtalgravuraĵo)¹²³

Laŭ Grimm, la konferenco de Zimmerwald ne celis fondi novan socialisman Internacion, sed nur doni impulsojn al la malnova Internacio, enkonduki novan paciniciaton, alvoki la proletaron al komuna pacaktiveco kaj rekonscii la laboristaron pri ĝia historia misio. Certe, Lenin celis utiligi la konferencon por siaj celoj kaj kontribuis tra sia grupo per siaj malnovaj ideoj, kiuj celis fondi novan Internacion kaj forigi la kapitalisman sociordon per la rimedo de la „civitana milito“ por efektivigi la proletan mondrevolucion. Al la konferencanoj estis distribuita broŝuro verkita de Lenin kaj Zinov’ev, kiu estis presita de la berna eldonejo Benteli en la germana kaj rusa lingvoj. Ĝi entenis la tutan esencan materialon, kiun Lenin ĝis nun verkis kaj eldonis pri la temo. En la konferenco ĉiuj aliaj longe kaj detale parolis, sed Lenin elpaŝis nur kelkfoje per mallonga parolado. Dum la oficiala biografio skribis, ke Lenin „tre aktive partoprenis en la laboroj de la konferenco“, Balabanova tute ne menciis liajn kontribuojn. Platten notis, ke Lenin estis tre atentema aŭskultanto. Tamen, la grupo de Lenin troviĝis en minoritata pozicio kaj liaj bolŝevistoj reprezentis nur unu spektron inter multaj aliaj ene de la socialisma movado. La rezolucio, kiun Lenin kompilis dum la konferenco kaj kiu resumis la celojn kaj taskojn de la socialismo el bolŝevisma vidpunkto (do renverso de la kapitalismaj registaroj, uzurpo de la povo pere de la revolucio, rifuzo de la militaj kreditoj, retiriĝo de la socialistoj el la landaj registaroj, malkaŝado

¹²² La liston de la partoprenantoj kun ligoj al iliaj biografiaj notoj vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Zimmerwalder_Konferenz kaj <http://www.zimmerwald1915.ch/Sites/teilnehmerinnen.html>.

¹²³ Pliajn bildojn vd. sub <https://de.wikipedia.org/wiki/Zimmerwald> kaj https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/d/d5/Postkarte_Hotel_und_Pension_Beau_Sejour_Zimmerwald_1904_Fotos.jpg.

de la kapitalisma kaj kontraŭsocia karaktero de la milito en la parlamentoj kaj gazetaro, ktp.) ne trovis ĝeneralan aprobon. Grimm, Ledebour kaj Merrheim konsideris tiujn celojn sensecaj, ĉar laŭ ili revolucioj ne okazas pro tio, ke ili estas proklamitaj de kelkaj unuopuloj laŭ ilia gusto. La rezolucipropono estis prezentita de Radek kaj subskribita, krom de la bolŝevistoj, de la delegitoj el Pollando-Litovujo, Latvujo, de Borchardt kaj de la sviso Fritz Platten. Dum la konferenco elkristaliĝis tri variaj proponoj por la verkota manifesto, kiuj estis ellaboritaj de Ledebour, Trockij kaj Lenin kaj kiuj kontraŭdiris unu la alian. Komisiono, al kiu apartenis Grimm, Trockij kaj Lenin, ricevis la taskon ellabori komunan manifeston. La definitivajn tekstojn verkis Grimm kaj Trockij. Kiam en la kvara tago la manifesto estis prezentita al la partoprenantoj, Lenin estis petita konsenti pri ĝi, ĉar la opiniaj diverĝoj ne devis esti principaj, sed koncerni nur la demandojn de la taktiko de la batalo. Finfine, la manifesto estis akceptita de ĉiuj konferencanoj, malgraŭ la obstina kontraŭstaro flanke de Lenin, kiu per sia sektema radikaleco evidente ĝenis la 'harmonion' de la ĉeestantaj socialistoj, kiuj volis savi la mondan pacon kaj tute ne celis konformi al la apartaj personaj gustoj kaj opinioj de Lenin, kies ideojn apogis nur liaj bolŝevistoj. Finfine Lenin pretis tamen konsenti pri ĝi kun la kondiĉo, ke oni aldonu la materialon de la minoritato al la protokolo.¹²⁴ La aldona deklaraĵo, en kiu Lenin ripetis siajn malnovajn postulojn pri „civitana milito“ anstataŭ internacia milito de la kapitalistoj, estis subskribita nur de ses personoj, inkluzive de Lenin mem. Kiam en fina akto ĉiuj partoprenantoj leviĝis por aprobi specialan rezolucion, kiu esprimis sin kontraŭ la „kastela paco“, alvokis la internacian laboristaron rekonsciiĝi pri la klasbatalo de la proletaro kaj atentigis pri la rajtoj de minoritataj popoloj (kiel poloj, belgoj, armenoj kaj judoj), eksplodis entuziasmaj reagoj kaj la ĉeestantoj kantis la Internacion. Estis fondita Internacia Socialisma Komisiono, kies sekretario troviĝis en Berno kaj kies celo estis publikigi la rezultojn de la konferenco. Tiun ĉi komisionon konsistigis Grimm, Morgari, Naine kaj Balabanova, kiuj ricevis la taskon prepari la sekvan konferencon (kiu okazos en Kiental, vd. sube). Kvankam la konferenco de Zimmerwald en si mem do ne tro okazis en la senco de la bolŝevistoj, por Lenin ĝi tamen ne estis vana. Male, ĝi helpis al lia grupo de la „Maldekstruloj de Zimmerwald“, kiu estis reprezentata i.a. de Fritz Platten, Fritz Nobs, Willi Münzenberg, Jan Bersin, Karl Radek, Grigorij Zinov'ev kaj Vladimir Ul'janov-Lenin“, ricevi pli vastan atenton en la socialdemokratia movado. La signifo, karismo, aŭreolo de Lenin kreskis kun ĉiu nova konferenco de tiu movado pli kaj pli. Kiu ne ĉeestis la konferencojn de la Zimmerwald-movado, kiuj estis pritaksitaj kiel mejloŝtonaj eventoj de la kontraŭmilita movado, tiu maltrafis la trajnon. La grandaj naciaj socialismaj partioj, kiuj estis unuigitaj en la Internacia Oficejo en Hago kaj kiuj ne partoprenis en la konferenco, polemikis kontraŭ ĝi, per diversaj manieroj kaj rimedoj klopodis diskrediti ĝin kaj rifuzis esti reprezentataj de la Internacia Socialisma Komisiono.

Kiel dirite, Robert Grimm, la ĉeforganizanto de la konferenco, kies meritoj estis forte laŭditaj de la konferencaj partoprenantoj, ruze aranĝis ĉion por konservi la konspiran kaj sekretan karakteron de la konferenco, kiu estis kamuflita kiel ornitologia kongreso. Post kiam en iu franca gazeto aperis informo, ke en Berno okazis „sekreta kongreso“ de la internacia socialisma movado, *Berner Tagwacht* kontestis la verecon de tiu ĉi informo. Fakte, ĝi pravis, ĉar la konferenco ne okazis en Berno, sed en Zimmerwald. Nur dek tagojn post la fino de la konferenco (la 8an de septembro) oficiala raporto estis publikigita.

La konferenco, kiu laŭ Pavel Aksel'rod cetere estis nur „privata internacia kunveno“ kaj pri kiu la polico kaj la svisaj aŭtoritatoj eksciis nur el la gazetaro, havis malagrablan juran sekvon. La federacia prokuroraro esprimis sian surprizon kaj negativan sintenon, ke la berna polico informis ĝin nur en la 16 aŭ 17a de septembro per magra komuniko, ke en Zimmerwald okazis iu internacia konferenco. Ĝi skribis al la direktoro de la berna polico, ke ĝi estas mirigita, ke rigarde al la nuntempaj politikaj cirkonstancoj oni ne informis la aŭtoritatojn pri tiu konferenco, kaj kritikis la posedanton de la koncerna hotelo, ke li eĉ ne havigis al ili plenan liston de la partoprenantoj, kiuj estis liaj gastoj, kio kontraŭdiras la oficialajn regulojn. Tschumi [Ĉumi], la direktoro de la berna polico, konsentis pri la reago de la prokuroraro kaj ordonis, ke la afero estu jure esplorata. La esploron devis fari la polica komandisto, kolonelo Adolf Jost. Li raportis, ke la polico rimarkis nur la 7an de septembro, ke en Zimmerwald okazas iu „sekreta internacia packonferenco“, kiun li cetere konsideris sensignifa. En tiu tago iu distrikta ĝendarmo el Belp, kiu ricevis plendon el Zimmerwald pro aŭdita bruoj en la hotelo, kiu evidente ĝenis la vilaĝanojn, vizitis la vilaĝon kaj eksciis pri la konferenco. Krom tio, li konstatis, ke dimanĉe en la restoracio oni dancis

¹²⁴ Tekstojn kaj nomojn de la subskribintoj de la manifesto vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zimmerwalder_Manifest.

kaj diboĉis sen oficiala permeso kaj ke ankaŭ kelkaj konferencanoj partoprenis la distran vesperon. La ĝendarmo denunciis la hotelestron Anton Eberle, kiu devis pagi, kune kun la estro de la apuda restoracio „Löwen“ (leono), punon pro nepermesita kromgastronomiado kaj nelaŭorda registrado de la gastoj ĉe la koncerna polica organo, kiu okupiĝas pri fremduloj, pro kio la polica juĝisto de Belpo kondamnis ilin pagi 15.20 frankojn.

Multe pli nerveze ol la svisaj politikaj instancoj reagis la oficialaj reprezentantoj de Germanio en Svislando. La germana ambasadoro raportis al Berlino, ke dum la konferenco akran politikan tonon aplikis rusoj, poloj kaj latvoj, kiuj postulis batalon per revoluciaj rimedoj kaj ke la germanaj partoprenintoj anoncis la plifortigon de la kontraŭmilita propagando. De kie ili sciis tion?

Kiam la loĝantoj de Zimmerwald konsciis, ke en ilia vilaĝo okazis tia mistera konferenco, ili ŝokiĝis kaj konsterniĝis, komencis honti kaj negative rilati al ĝi dum la venontaj jaroj kaj jardekoj, kvankam ilia vilaĝo fariĝis mondfama loko (anstataŭ turisma feriejo), kiu eniris kiel mito kaj legendo en la historion de la internacia socialisma kaj komunisma movado.¹²⁵



Partoprenantoj el la Ruslanda Imperio en la konferenco de Zimmerwald/Kiental: Pesaĥ Liebmann Herŝ, Mark Natanson kaj Viktor Ĉernov; Adolf Warski, M. Broński kaj W. Stein-Krajewski (W. Dombrowsky) el Kongresa Pollando. Dekstre: Vasil Kolarov (1877-1950), konfondinto kaj ĝenerala sekretario de la Bulgara Komunisma Partio, ĉefministro kaj prezidanto de la komunisma Bulgario post 1944.

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://en.wikipedia.org/wiki/Liebmann_Hersch, https://en.wikipedia.org/wiki/Mark_Natanson,
https://de.wikipedia.org/wiki/Wiktor_Michailowitsch_Tschernow, https://en.wikipedia.org/wiki/Adolf_Warski,
https://ru.wikipedia.org/wiki/Бронский,_Мечислав_Генрихович, https://commons.wikimedia.org/wiki/File:W._Stein-Krajewski.jpg, https://en.wikipedia.org/wiki/Vasil_Kolarov)

De Zimmerwald Lenin revenis al Sörenberg tute ekscitita kaj „sufiĉe nervoza“ (laŭ Krupskaja), ĉiukaze ege laca kaj elĉerpita. Por retrovi sian ekvilibron, Krupskaja memoris, ke li grimpis sur la monton Brienzer Rothorn, kie li dormis dum tuta horo en la neĝo por rekolekti fortojn. Komence de oktobro Lenin kaj Krupskaja, kiu kredis sian sanon kuracita, reveturis al Berno. La vetero en Sörenberg vintriĝis kaj la hotelo fermiĝis.¹²⁶ En Berno la paro ekloĝis en la domo en la strato Seidenweg n-ro 4a.

En aŭtuno 1915 Lenin vizitis ankaŭ Bazelon por prelegi pri la „milita situacio kaj la estonteco de Rus-lando“. La prelego okazis en la kafejo „Johanniterheim“ en la strato St.-Johann-Vorstadt 38, kie kun-venis ĉefe laboristoj, studentoj kaj rusaj elmigrintoj. Por sia prelego Lenin ricevis honorarion de dek frankoj. Diskuto ne okazis post la prelego. Post tio Lenin vizitis la artmuzeon por admiri la unikan

¹²⁵ En Zimmerwald apenaŭ konserviĝis spuroj pri la konferenco. Celante forgesi la historion, kiu okazis en 1915, la komunumo strikte evitis publikan 'bruon' pri la evento, verŝajne por eviti pilgrimadon de komunistoj, kaj malpermesis starigi monumentojn kaj produkti memoraĵojn. En 1965 surloke okazis prelega sesio pri la temo kun kontraŭ-komunisma karaktero. La propono en la berna Granda Konsilio konservi la „Lenin-domon“ en Zimmerwald trafis kontraŭstaron kaj fiaskis. En la administrejo de la komunumo troviĝas du klasiloj kun materialo pri la temo kun konservitaj poŝtaĵoj el la orienta bloko (kiam antaŭ kelkaj jaroj mi vizitiis la lokon, mi povis konsulti tiun materialon). (Vd. <http://www.bernerzeitung.ch/region/bern/Wiedas-Dorf-des-Treffens-der-Revolutionaere-gedenken-will/story/29440391> kaj <https://www.srf.ch/news/regional/bern-freiburg-wallis/zimmerwalds-kampf-ums-vergessen>). La centjariĝo de la konferenco en 2015 tamen kaŭzis vastan publikan atenton; okazis speciala ekspozicio en la regiona muzeo en Schwarzenburg, prelegoj en la Berna universitato kaj oficiala memorkunveno de la komunumo Wald (vd. http://www.bernerlandbote.ch/aktuell/politikgesellschaft/artikelseite-politikgesellschaft/?tx_ttnews%5Btt_news%5D=76134&cHash=a787f0110f6e5092989871646fbb533b kaj <http://www.zimmerwald1915.ch>).

¹²⁶ Vd. <https://fr.wikipedia.org/wiki/Sörenberg>. Bildojn de la iama kaj posta aspektoj de la hotelo Mariental vd. sub <https://oldthing.de/AK-Soerenberg-Blick-zum-Hotel-Mariental-0017685945> kaj de la aktuala aspekto vd. sub <http://www.langenegger-architekten.ch/de/galerie-gewerbebauten>.

ekspozicion de famaj pentraĵoj. En Bazelo okazis en 1912 la Dua Internacia Socialista Kongreso, nomita ankaŭ packongreso de la Ila Internacio, en kiu partoprenis ankaŭ 36 delegitoj el Ruslando.¹²⁷

TRIA PARTO: LENIN EN ZURIKO

Lenin translokiĝas al Zuriko en februaro 1916

Fine de januaro 1916 Lenin skribis al sia konato *Moses (Moisej/Mot'kov) Ĥaritonov*,¹²⁸ kiu tiam administris la zurikan sekcion de la bolŝevistoj, ke li volas iri kun sia edzino por du aŭ tri semajnoj al Zuriko por konsulti ties bibliotekojn por verki novajn artikolojn. Evidente li havis financajn problemojn, kiujn li provis solvi per prelegoj, kaj li starigis al Ĥaritonov diversajn demandojn pri eblecoj perlabori monon per prelegado kaj ŝpari monon per luado de malmultekosta loĝejo kaj moderprezaj manĝoj. Ŝajnas, ke Berno, kiu estis nomata de Krupskaja „etburĝa demokratia prizono“, komencis tedi lin. Krom tio aperis problemoj kun la luigantino, kaj la serĉado de nova loĝejo restis sen rezulto. Krome, la restadpermeso por Berno finiĝis. En Zuriko agadis Fritz Platten, Willi Münzenberger kaj Ernst Nobs, redaktoro de la zurika partia gazeto *Volksrecht*, tri gravaj partiaj funkciuloj kaj fidindaj kamaradoj. Laŭ Krupskaja en Zuriko ekzistis pli maldekstre orientita revolucia junularo kaj la etoso estis pritaksita de Lenin malpli etburĝa aŭ filistrecita ol en Berno. Do, la plej granda urbo de Svislando devis aperi antaŭ la Leninoj kiel pli multpromesa ol Berno, kie kie la proksimeco al la politika kaj diplomacia mondo estis ĝeno por rusa elmigrinto kiel Lenin, kiu volis resti anonima kaj labori sekrete kaj konspire. Ĉar la petitaj respondoj de Ĥaritonov estis kontentigaj, li konsentis iri al Zuriko jam en la komenco de februaro. Sed lia translokiĝo prokrastiĝis, ĉar la 8an de februaro Lenin ankoraŭ partoprenis en granda kunveno de la social-demokratoj en la Popoldomo de Berno aldone al okazinta kunsido de la Internacia Socialisma Komisiono, dum kiu Lenin parolis kontraŭ la milito kaj pri la praveco de la Zimmerwald-manifesto. Do, la translokiĝo de Lenin al Zuriko okazis probable la 10an aŭ 11an de februaro.

Nature, ankaŭ en Zuriko la restado de Lenin, kiu daŭre estis sen identigaj dokumentoj, estis ligata kun similaj burokraciaj problemoj kiel en Berno: necesis ricevi oficialan permeson de la polico kaj pagi kaŭcion. En sia letero al la polico li skribis, ke li intencas labori en la bibliotekoj „por skribi libron“, kiun li jam ko-mencis sub la titolo „La imperiismo kiel plej alta stadio de la kapitalismo“,¹²⁹ esperante trovi taŭgan materialon en la Centra Biblioteko kaj en la Biblioteko por Socia(la) Literaturo. La pagon de la kaŭcio de 3000 frankoj transprenis Fritz Platten kaj urba konsilisto Otto Lang. Lenin atendis repagon de la berna kaŭcio, sed ne estas klare, ĉu li fakte ricevis ĝin. En Zuriko Lenin estis registrita ĉe la polico kiel „advokato kaj verkisto“, kaj li devis subskribi konfirmon, ke li ne estas dizertulo, sed politika elmigrinto. Tiucele li devis plurfoje viziti la urbodomon por reguligi sian statuson en Zuriko.

Kiam Ĥaritonov proponis al la paro Lenin restadi en sia loĝejo kiel lia gasto, Lenin rifuzis la proponon kun la klarigo, ke li ne volas ĝeni lian familion, kaj serĉis alternativon. Tiel, Lenin trafis al ĉambro, kiun Ĥaritonov peris al li kaj kiu situis en la strato Geigergasse n-ro 7 ĉe iu sinorino Prelog, kie

¹²⁷ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Internationaler_Sozialistenkongress_\(1912\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Internationaler_Sozialistenkongress_(1912)). En la partia kongreso de 1912, kiu okazis en Prago, la 'milito' inter ambaŭ frakcioj jam tiel maturiĝis, ke la bolŝevistoj decidis eksigi la menŝevistojn kaj restarigis propran partion, kiu portis la mallongigojn RSDLP (B) por diferencigi de RSDLP (M), titolo, kiun komencis porti la frakcio de la menŝevistoj. En la Dumao ili formis dume komunan frakcion, ĝis kiam en 1913 la skismo fariĝis kompleta.

¹²⁸ Moisej Markoviĉ Ĥaritonov (1887-1948) venis en 1912 al Zuriko. Li estis la edzo de Raisa Ostrovskaja. En Zuriko li loĝis en la strato Scheuchzerstrasse 112.

¹²⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Der_Imperialismus_als_höchstes_Stadium_des_Kapitalismus kaj <https://www.marxists.org/deutsch/archiv/lenin/1917/imp> au http://www.mlwerke.de/le/le22/le22_189.htm (germanlingva teksto).

la etoso eĉ iom plaĉis al Lenin. Sed la fakto, ke tie cirkuladis dubindaj homoj, igis lin forlasi la ejon kaj trovi alian domon. Ekde la 16a de februaro la zurika adreso de Lenin kaj Krupskaja estis do strato Spiegelgasse n-ro 14 (spegula strateto),¹³⁰ kie la paro restos ĝis la forveturo de Svislando en aprilo 1917. En la dua etaĝo lueblis libera ĉambro, kiu apartenis al la ŝuisto Titus Kammerer, kiu ne estis revolucie, sed tamen demokratie orientita metiisto, kiu abomenis la militon. Malgraŭ tio, ke la ĉambro estis mallarĝa kaj malhela kaj ĝenata de la odoraĉo de apuda kolbasa fabriko, Lenin trovis ĝin alloga, kvankam Krupskaja, kiu daŭre malsanetis kaj fartis iom malbone en tiaj kondiĉoj, opiniis, ke por la sama prezo (28 frankoj monate) oni povintus trovi pli bonan loĝejon. Sed Lenin sentis sin bone en la ĉirkaŭaĵo de diversaj pro-letoj kun itala, germana kaj aŭstra deveno. En la teretaĝo de la domo ekzistis restoracio (nomita 'ĉe la puto' aŭ fontano de Jakobo) kaj en la proksimeco troviĝis la laborista kafejo 'Eintracht', kiun Lenin kutimis viziti, kaj multnombraj aliaj restoracioj, kie oni povis moderpreze manĝi kaj renkonti la deziratajn homojn. Kammerer produktis solidajn vintrajn ŝuojn por Lenin, kiujn li donacis al li, kaj de sinjorino Kammerer Krupskaja lernis kiel oni ŝpareme, laŭ tempo kaj mono, kuiras bonajn manĝojn. En sia ĉambro la Lenin-oj trinkis teon, manĝis ĉokoladon kaj legis gazetojn kaj leterojn, kiujn ili amase ricevis. Ĉar la financaj rimedoj estis limigataj, la vivo devis esti modesta. Ankaŭ Krupskaja, kiu okupiĝis pri pedagogiaj teorioj, serĉis iun pagitan taskon kaj komencis kunlabori kun la oficejo de la kaso aŭ asekuro por rusaj elmigrintoj, kiu estis gvidata de *Feliks Jakovlevič Kon*, kiu konatiĝis kun Krupskaja en la siberia ekzilo, por materie helpi al rusaj elmigrintoj, precipe tiaj, kiuj malsaniĝis je la tuberkulozo.¹³¹ Por eskapi el la urba mallarĝeco, la Lenin-oj grimpis sur la Zurikan Monton, kie ili trovis trankvilan lokon sur herbejo por legi. Ankaŭ la zurika lago trovis ilian plaĉon. La 25-26ajn de februaro Lenin reveturis al Berno, kie li prelegis pri la „du Internacioj“.

La konsultindaj bibliotekoj de Zuriko estis rapide atingeblaj de Spiegelgasse, kiu situas en la malnova urbo. La Centra Biblioteko, kiu tiel nomiĝis de 1914, konsistis el la Urba Biblioteko, kiu troviĝis en la Akva Preĝejo,¹³² kaj la Kantona Biblioteko, kiu havis sian legejon en la Ĥorejo de la Preĝejo de la Predikistoj.¹³³ La fakto, ke tiuj bibliotekoj situis en iamaj preĝejoj, certe amuzis lin. En 1916 ambaŭ bibliotekoj administre kuniĝis, kio estis procezo, kiu finiĝis la 30an de aprilo 1917. En marto Lenin akiris ankaŭ la karton por utiligi la Bibliotekon por Socia(la) Literaturo,¹³⁴ kiu troviĝis en la strato Seilergraben n-ro 31. En tiuj bibliotekoj Lenin pasigis multajn horojn, matene kaj posttagmeze. Povas esti, ke li utiligis ankaŭ aliajn zurikajn bibliotekojn kaj legejojn, ekzemple tiun de la Muzea Societo (Limmatquai 62), de la Seminario pri socipolitikaj sciencoj de la Zurika universitato (en Grossmünster), la legejon de la klubo de la rusaj politikaj elmigrintoj (Spitalgasse)¹³⁵ kaj la rusan bibliotekon en la Culmann-strato. Lenin skribis al sia patrino, ke „la zurikaj estas multe pli bonaj ol la bernaj bibliotekoj“.¹³⁶ Ankaŭ la Internacia Klubo 'Eintracht' (Neumarkt 5-6)¹³⁷ havis proprajn bibliotekon kaj legejon, kie Lenin trovis multajn gazetojn. La maldekstra itala gazeto *Avanti!* publikigis en januaro 1924 jenan noton pri la vizitoj de Lenin en la Biblioteko por Socia(la) Literaturo: „Ĉiumatene li venis ĉi tien kaj sidis sur sia loko, sen atenti aŭ kontakti la ĉeestantajn homojn. Tagmeze li eliris al la strato, kie atendis lin iu modeste vestita virino,¹³⁸ kaj post la tagmanĝo li retroviĝis sur sia loko, inter libroj, klinante la kapon al siaj manuskriptoj.“ En Zuriko Lenin legis proksimume 150 librojn kaj sennombrajn artikolojn. Li studis la ekonomion de Eŭropo kaj Usono kaj konsultis la statistikojn de la svisaj sindikataj sekretarioj, kaj li

¹³⁰ La malnova domo estis malkonstruita en 1971 kaj anstataŭigita per nova konstruaĵo. Pri la strato vd.

[https://de.wikipedia.org/wiki/Spiegelgasse_\(Zürich\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Spiegelgasse_(Zürich)).

¹³¹ Feliks Jakovlevič Kon (Felix Kohn, 1864-1941).

¹³² Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Wasserkirche>.

¹³³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Predigerkirche_Zürich.

¹³⁴ Temas pri la antaŭa instalaĵo de la hodiaŭa Svisa Socia(la) Arkivo. (Vd.

https://de.wikipedia.org/wiki/Schweizerisches_Sozialarchiv kaj <https://www.sozialarchiv.ch/2016/03/16/vor-100-jahren-lenin-im-sozialarchiv/>)

¹³⁵ Ŝajnas, ke tie cirkulis precipe poloj kaj latvoj kun socialisma revoluciula kaj menŝevisma tendencoj, pro kio Lenin malofte vizitis ĝin, kiel estas notite en la libro 'Lenin v Berne i Ĉjuriche' (p. 286).

¹³⁶ La aŭtoroj de la libro 'Lenin v Berne i Ĉjuriche' rimarkigis (p. 238), ke la ruslandaj (t.e. sovetiaj) bibliotekoj adoptis la spertojn de Lenin, kiujn li akiris en Svislando, kaj fanfaronis, ke tial la Lenin-Biblioteko en Moskvo estas „la plej bona en la mondo laŭ fondaĵoj, katalogoj kaj progresemaj formoj de la laboro“.

¹³⁷ Pri ĉi tiu loko kaj ĝia signifo por la socialdemokratia, komunisma kaj sindikata movadoj, vd.

https://de.wikipedia.org/wiki/Eintracht_Zürich. Ĉe Neumarkt loĝis ankaŭ Willi Münzenberg.

¹³⁸ Temis pri Krupskaja.

verkis pri la aŭtonomiaj rajtoj de la nacioj – ĉi tiu teksto aperis en n-ro 2 de *Vorbote*, la organo de la Zimmerwald-maldekstruloj.

Sed la ekzistado de Lenin kiel revoluciulo de la internacia laboristaro en Zuriko ankaŭ estis karakterizata de tragika malcerteco pri la demando kio sekvos; oni ne povis scii, kiam la revolucio eksplodos, kaj Lenin timis, ke li ne plu travivos ĝin. Li komprenis, ke la svisaj popolamasoj ne lasos sin provoki al revolucio, ĉar ili ne estis revoluciemaj. Ŝajnis, ke la tuta laboro de Lenin fariĝis komplete vana kaj senseca, sed lia energio ne elvaporigis. Dum Krupskaja vidis lin izolita, Robert Grimm observis, ke Lenin multe agadis. Ĉar Lenin evitis vekti publikan atenton, li renkontiĝis kun la homoj kvazaŭ konspire ĉefe kadre de malgrandaj privataj cirkloj de rusaj elimigrintoj kaj maldekstraj socialdemokratoj, al kiuj li prelegis pri siaj ideoj kaj konvinkoj, ekzemple en la restoracioj 'Stüssihof' (Marktgasse 23), 'Nigra Aglo' (Stüssihof 13) kaj 'Cigneto' (Predigerplatz 34), kie kunvenis la legendeca „kegloklu-bo“.¹³⁹ Ankaŭ la hotel-restoracio 'Tilio' (Universitätsstrasse 91) estis preferata loko de Lenin kaj de la zurikaj bolŝevistoj. Kutime tiaj kunvenoj estis vizitataj de ne pli ol de kelkdek interesuloj. Krom tio, iuj renkontiĝoj kun la socialisma junularo okazis en la restoracio 'Eckstein' (Kreuzplatz) en Hottingen kaj en la Oficejo de la socialisma junulara Internacio, kiu tiam situis en la strato Werdstrasse n-ro 40 kaj kie laboris Willi Münzenberg, kun kiu li renkontiĝis en la restoracio 'Astoria' (Nüscherstrasse 17) por privata diskuto.



Domo en Spiegelgasse 14 en Zuriko kaj memortabulo; laikaj Akva Preĝejo kaj Preĝejo de la Predikistoj, kie troviĝis la ĉefaj bibliotekoj, kiujn Lenin utiligis en Zuriko (fotoj el Vikipedio kaj Vikimedia).



Zurika Popoldomo, konstruaĵo de la iama centro 'Eintracht' (nuntempe Neumarkt-teatro) kaj ĉefa stacidomo de Zuriko (fotoj el Vikipedio) (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Krupskaja raportis, ke Lenin kaj ŝi en principo „vivis iom ekster la rusa kolonio“. La elmigrintoj tedis lin, kaj lia edzino notis, ke Lenin „absolute ne okupiĝis pri la aferoj de la elimigrintoj“. La ĉefaj regulaj vizitantoj de la Lenin-oj estis Ĥaritonov kaj lia edzino plus Elena Usieviĉ, la filino de Kon¹⁴⁰; vizitojn ili ricevis ankaŭ de Inessa Armand, kiu vivis en Romandio, kaj de Angelica Balabanova el Italio, krom tio li multe korespondis kun diversaj rusaj revoluciuloj kaj do ne suferis mankon de rilatoj. Liaj klopodoj por pli proksime rilati kun lokaj zurikanoj, precipe maldekstruloj, do socialistoj, laboristoj kaj sindikatis-

¹³⁹ Temis pri konspira nomo. En tiu ĉi kazo kegli signifis, laŭ Soljenicyn, faligi la burĝajn registaranojn.

¹⁴⁰ Elena Feliksovna Usieviĉ (1893-1968).

toj, tamen ne estis tre sukcesaj, ĉar ankaŭ ili trovis liajn ideojn strangaj, tro radikalaj kaj nerealismaj, preferante la konvenciajn socialdemokratojn. Kiel membro de la Socialdemokratia Partio de la urbo Zuriko oni, do same Lenin, aŭtomate fariĝis ankaŭ membro de la tutsvisa partio. Li regule partoprenis la partiajn kunsidojn, kiuj okazis en la Popoldomo (Helvetiaplatz), oficiala laborloko de Fritz Platten, kie li ankaŭ elpaŝis per politikaj paroladoj, en kiuj li ekzemple atakis la Provizoran Registaron de Ruslando; sed li ne kutimis enmiksiĝi en la diskutojn, preferante resti nur atentema aŭskultanto kun la celo informiĝi pri la problemoj de la lokaj laboristoj, kiujn li sendube serioze konsideris en siaj teoriaj kaj politikaj verkaĵoj.

Pri la svissaj socialdemokratoj Lenin havis ĉiukaze ne tro favoran opinion, precipe rilate al tiuj, kiuj havis oficialan registaran funkcion. Ekzemple pri la urba konsilio de Zuriko li notis: „La registaro de Zuriko konsistas el naŭ membroj, de kiuj kvar estas socialdemokratoj: Erismann, Pflüger, Vogel-sanger kaj Klöti. Erismann kaj kompanio tute ne estas dizertuloj, kiuj transiris al la tendaro de la malamiko, sed ili simple estas pacaj filistroj, oportunistoj, kiuj al kutimiĝis al la etmensa parlamenta rutino kaj estas ŝarĝitaj per konstituciaj-demokratiaj iluzioj.“¹⁴¹ Al la „oportunistoj“ Lenin riproĉis, ke iliaj vortoj ne kongruas kun iliaj agoj kaj ke per tio ili helpas al la burĝoj kaj perfidas la aferon de la proletaro.

Dua Zimmerwald-konferenco en Kiental

Lenin estis malkontenta pri la maniero kiel Grimm raportis pri la konferenco de Zimmerwald en la gazeto *Berner Tagwacht*. Ŝajnas, ke la ĉefredaktoro, kiu organizis ĉi-eventon, ignoris la „Maldekstrulojn de Zimmerwald“ kaj precipe la verkaĵon „Socialismo kaj milito“, kiun Lenin distribuis al la partoprenantoj. Li estis tiel ĉagrenita pri Grimm, ke li nomis lin ruzulo kaj kanajlo kaj dubis pri lia lojaleco. Dum novaj diskutoj de aktivuloj de la Internacia Socialisma Komisiono okazintaj de la 5a ĝis 9a de februaro 1916 en Berno oni decidis okazigi duan internacian konferencon, kies dato estu la 24-30aj de aprilo. La 8an de februaro okazis en la berna Popoldomo publika manifestacio, en kiu elpaŝis la sviso Grimm, la italo Modigliani kaj la ruso Lenin. Ĉi tiu parolado estas konsiderata kiel unua publika elpaŝo de Lenin en Svislando. Dum tiu parolado Lenin antaŭdiris, ke post la eŭropa milito sekvos la proleta revolucio kontraŭ la kapitalismo. Sed apud la laŭta retoriko de Grimm kaj Modigliani la parolado de Lenin vekis malfortan impreson.

Ankaŭ ĉi-foje Grimm organizis la tutan aferon; li anoncis, por trompi la publikon, ke la konferenco okazos en Nederlando, kaj dissendis invitilojn al la aliĝintaj anoj de la Zimmerwald-movado. Lenin multe dubis, ĉu havas sencon por li partopreni en tiu nova konferenco, des pli ke li ne havis oficialan mandaton. Krome, li eksciis, ke oni intencas inviti la „centristojn“ Kautsky kaj Haase, kiuj certe uzurpus la konferencon por siaj celoj. Fakte, en Kiental ne plu temis pri hazardaj partoprenantoj, sed la delegitoj estis invititaj, nur se ili agnoskis la principojn de la unua konferenco de Zimmerwald. Ankaŭ la tagordo de Kiental havis pli konkretan strukturon.

Do, la dua Internacia Socialisma Konferenco estis inaŭgurita vespere, la 24an de aprilo, en la berna Popoldomo kun la ĉeesto de 37 partoprenanto (laŭ la oficiala protokolo estis 43 aŭ 44 personoj), inter kiuj troviĝis kelkaj, kies identeco estis malfacile determinebla. 12 delegitoj apartenis al la „Zimmerwald-maldekstro“, la bolŝevisma delegacio konsistis el Lenin, Zinov'ev kaj Inessa Armand (kiu registriĝis kiel „Petrov“). Laŭ ordono de Grimm la partoprenantoj devis kolektiĝi matene, la 25an de aprilo, en la berna stacidomo, kie ili ricevis biletojn por veturi per la Lötschberg-trajno ĝis la haltejo Reichenbach en Berna Oberlando. De tie ĉaroj transportis la homojn al Kiental,¹⁴² malgranda vilaĝo en la montaro, kie la delegitoj estis loĝigitaj en la hotelo 'Bären' (urso), en kies manĝsalono la konferenco devis okazi.¹⁴³ Grimm volis eviti spionojn kaj ĵurnalistojn. Kiel en Zimmerwald, ankaŭ la vilaĝanoj de Kiental restis sen scio pri la karaktero kaj celo de tiu kunveno, kiu estis kamufleta kiel turisma evento. La listo de la partoprenantoj havis 45 nomojn kaj la delegitoj, inter ili troviĝis deputitoj de pluraj landaj parlamentoj, venis el Germanio, Francio, Italio, Ruslando, Pollando, Serbio, Svislando kaj Portugalio. Kelkaj eksterlandanoj ne ricevis svisan vizon aŭ estis alimaniere malhelpitaj vojaĝi. Ankaŭ Greulich kaj

¹⁴¹ Vd. <https://www.nzz.ch/zuerich/wo-lenin-in-zuerich-spuren-hinterlassen-hat-lenin-und-die-friedlichen-spiesser-ld.146969>.

¹⁴² En la literaturo oni povas trovi ankaŭ la pli malnovan formon Kienthal.

¹⁴³ Lenin tranoktis en la ĉambro n-ro 22. Vd. ankaŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Kiental_BE.

Kautsky ne venis. Grimm prezidis la konferencon, dum Ernst Nobs kaj Angelica Balabanoff protokoligis ĝin.

Laŭ la protokolo, la ĉefaj traktaĵoj koncernis temojn kiel „batalo por fini la militon“, „rifuzo de la militkreditoj“, „pozicio de la proletaro rilate la paco“, „agado kaj propagando“. „rolo de la Internacia Oficejo en Hago“ k.s. La diskutoj en Kiental inter la partoprenantoj, kiuj sciis kion ili volas, estis do pli celtrafaj kaj eĉ multe pli vervaj kaj akraj ol en Zimmerwald; okazis gravaj disputoj inter diversaj grupoj kaj individuoj, kiuj minacis unu la aliajn, ke ili forlasos la salonon kaj la konferencon, se oni (ne) konsentos aŭ (ne) akceptos tion kaj jenon. La bolŝevistoj volis atingi la starigon de la IIIa Internacio, kiu devis anstataŭi la IIan Internacion, kiu fiaskis politike, ĉar ĝi forlasis la klasbatalon, aliĝis al la „kastela paco“ kaj apogis la pormilitan politikon de siaj membroj. Aksel’rod ne volis kredi, ke la Ila Internacio estas morta, kvankam li konstatis gravan krizon de la socialismo, kiu faris kompromisojn kun la burĝoj kaj kapitalistoj. Ankaŭ la sviso Paul Graber estis kontraŭ la fondo de nova Internacio. Fakte, intertempe la internacia situacio akriĝis: En Francio, Ruslando kaj Usono okazis strikoj de fabriklaboristoj, en Germanio okazis manifestacioj por apogi la pacagadon de Karl Liebknecht kaj Ernst Thälmann. Okaze de la unua de majo la svisaj amasoj protestis kontraŭ la plikostiĝo de la vivo kaj la sekvoj de la milita mobilizado. Radek laŭtleĝis alvokon al sturmo kontraŭ la kapitalismo kiel sola pacprogramo de la socialdemokratio, sed Martov kritikis la fanfaronadon de Lenin, kies anoncitaj laboristaj batalionoj nenie estis videblaj. La scenoj estis parte tumultaj, kiam dek naŭ delegitoj, inter ili Radek, Lenin kaj pluraj svisoj, kontraŭstaris la sintenon de la francoj, kiuj konsentis pri militaj kreditoj, ĉar tio ne kongruas kun la ideoj de la socialismo. Kiel kutime, Lenin mem malofte kaj nur kurte intervenis en la debatojn, okfoje laŭ la protokolo, ĉar li preferis lasi paroli siajn kunbatalantojn. Finfine venkis nek la proponoj de la bolŝevistoj, nek tiuj de la menŝevistoj. Kiel bazo por la rezolucioj kaj manifesto servis la kontribuadoj de la Internacia Socialisma Komisiono, do de Grimm kaj liaj kunlaborantoj. La cirkonstanco, ke Grimm estis kompromisema kaj celis konsideri ĉiujn reprezentatajn tendencojn kaj poziciojn, kaŭzis, ke la rezolucioj kaj manifesto de la konferenco de Kiental fariĝis iom pli radikalaj kaj politike pli maldekstraj ol tiuj de Zimmerwald. La manifesto de Kiental, kiu portis la titolon „Al la popoloj, kiujn oni detruas kaj mortigas“, menciis la sloganon pri abolo de la kapitalisma posedo, sed ne entenis la postulon pri armata batalo. Por ekstere ŝajnigi unuecon kaj harmonion, la „Maldekstruloj de Zimmerwald“ submetis sin al la volo de la majoritato, kiel ili faris tion jam pli frue pro taktikaj kialoj. Post la konferenco de Kiental okazis nova kunsido de la Internacia Socialisma Komisiono en Berno, dum kiu la ĉeestantoj, entute 17, definitivigis la teks-tojn de la manifesto kaj rezolucioj. Lenin jam ne plu partoprenis ĝin, ĉar dume li revenis al Zuriko, kaj komence de junio li vizitis la bolŝevismajn sekciojn de Genevo kaj Laŭzano por prelegi pri la konferenco de Kiental, pri kiu li opiniis, ke ekzistas malmulto interesa por raporti pri ĝi.

Laŭ Angelica Balabanova, la konferenco de Kiental donis la la „movado de Zimmerwald“, al kiu apartenis trideko da socialismaj partioj kaj minoritataj grupoj, gravan, konkretan antaŭenpuŝon kaj esence kontribuis al la starigo de la IIIa Internacio.¹⁴⁴ La itala komunistino emfazis en siaj memuaroj, ke pli kaj pli da proletoj kaj revoluciuloj vidis en la Zimmerwald-movado la savon de la laborista klaso, la vojon al la paco kaj socialismo. Grimm klarigis en sia raporto (de 1917), ke la principoj de Zimmerwald kaj Kiental trovis subitan honoron, kiam evidentiĝis, ke la militantaj registaroj troviĝis en la sakstrato. La formulo „paco sen aneksoj kaj kompensoj surbaze de la memdecida rajto de la nacioj“ subite fariĝis aktuala slogano de la militantaj registaroj. Sed ĉar diversaj landoj insistis pri aneksoj kaj estis honoritaj per teritoriaj kompensoj, ĉi tiu formulo restis nura teorio kaj la praktiko finiĝis kiel farso, ĉar malgraŭ pacalvokoj la milito estis dume daŭrigita.

¹⁴⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tria_Internacio.



Kiental, hotelo Bären (fotoj el Vikipedio)

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio: https://de.wikipedia.org/wiki/Kiental_BE)

Ankaŭ en la kazo de la konferenco de Kiental la svisaj aŭtoritatoj malmulte interesiĝis pri kio temis en tiu fora alpa vilaĝo, kaj la esploristoj povis trovi neniujn esencajn dokumentojn en la svisaj arkivoj. Aliflanke, la germanaj aŭtoritatoj denove montris viglan scivolemon kaj sentis sin taskitaj kolekti informojn, kion la germana ambasadoro en Berno, barono Gisbert von Romberg,¹⁴⁵ ankaŭ faris por plusendi ilin al la germana kanceliero, kiu tiam nomiĝis Theobald von Bethmann-Hollweg (1909-17), en Berlino.

La sekva kaj finfine senefika packonferenco de la IIa Internacio okazis en Stokholmo (junio),¹⁴⁶ kien la ISK translokiĝis.

Lenin en Flums/SG

Ĉar la sanstato de Krupskaja denove malboniĝis kaj ankaŭ Lenin mem bezonis novan ripozon, la paro decidis fari ferion. Ili veturis al orienta Svisando, kie ili rezervis ĉambron en la hotelo 'Tschudiwiese' (prononcu: Ĉudivize) en Flumserberg, troviĝanta inter Zuriko kaj Grizono en la kantono Sankt Gallen sur 1200 metroj super la maro kun belega panoramo al la montaro Churfirsten (prononcu: Ĥurfirsten).¹⁴⁷ En ĉi tiu loko ili alvenis la 21an de julio 1916 kaj restis ĝis la mezo de septembro. La pensiono 'Tschudiwiese' estis modesta kaj malmultekosta ripozejo kun kuraca karaktero, kiu apartenis al la familio de Martin Wildhaber. La prezo estis po 2,5 frankoj por persono kaj tago. De la stacidomo de Flums la domo estis atingebla per duhora piedirado. Strato tien ne ekzistis kaj la poŝtaĵoj devis esti transportitaj per azeno. Kiel Krupskaja raportis, en la hotelo oni praktikis strangajn kutimojn kaj ofertis kuracoterapion per laktaj produktoj, ĉar ĉiuj dietaj manĝaĵoj konsistis el lakto: matene oni trinkis kafon sen sukero kaj manĝis panon kun fromaĝo, tagmeze oni servis laktosupon kaj alian manĝaĵon el kazeo kaj lakto; je la kvara horo posttagmeze la gastoj denove ricevis kafon kun lakto kaj vespere oni manĝis denove iun laktaĵon. En la unuaj tagoj la Lenin-oj apenaŭ eltenis tiun manĝkulturon, sed ili fariĝis pli kontentaj, kiam oni aldonis al la manĝaĵoj diversajn berojn. La ĉambro estis tre pura kaj havis elektran lumon, sed ĝi estis apenaŭ meblata. Pri la ordo en la ĉambro la gastoj devis mem zorgi, same pri la purigado de la ŝuoj, kion Lenin faris ĉiumatene en apuda remizo, kie kolektiĝis ĉiuj ŝu-purigistoj en amuza etoso. En la hotelo ne ekzistis riĉaj burĝoj nek aliaj rusoj kaj Lenin ne ricevis vizitojn de konatoj. Anstataŭ tio Lenin, kiu ne laboris, preferis migradi en la montaro kaj en siaj meditadoj pensis kaj parolis al Krupskaja pri la pozitivaj kaj negativaj flankoj de la svisa demokratio, temo, kiu tre interesis lin. Sed mirigite li konstatis, ke neniu gasto interesiĝas pri politiko, kaj eĉ la soldato, kiu tie ĉeestis por kuraci

¹⁴⁵ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Gisbert_von_Romberg_\(Diplomat\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Gisbert_von_Romberg_(Diplomat)).

¹⁴⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Stockholmer_Friedenskonferenz_von_1917-

¹⁴⁷ Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Flumserberg>.

siajn pulmojn, restis ĉi-rilate tute pasiva kaj indiferenta, kiam Lenin volis diskuti kun li pri la milito.¹⁴⁸ Vespere la gastoj kutimis distriĝi per muziko ĝis la noktomezo.

Dum la restado de Lenin en Flums forpasis, la 25an de julio, lia patrino, kiun li vidis lastfoje en majo 1910 en Stokholmo. La 14an aŭ 15an de septembro Lenin troviĝis en Zuriko, kie li povis ricevi sian ĉambron ĉe Kammerer, kiu intertempe estis okupata de alia luanto. Ĉar la feriado en la montaro estis multekosta, li malfacile trovis la monon por pagi la ĉambron en Zuriko. Lenin bezonis freŝan monon, kaj tiucele li skribis al sia fratino, por ke ŝi petu liajn eldonistojn, ke ili honorariu liajn verkaĵojn. En januaro 1917 Lenin ricevis el Ruslando 500 frankojn kaj en februaro 800 frankojn kaj miris pri tiuj sumoj, tiel ke li petis sian fratinton klarigi la devenon de tiu mono.



Hotelo Tschudiwiese, Flumserberg/SG, bildo de 1915.¹⁴⁹

(Fonto: <http://scope.staatsarchiv.sg.ch/detail.aspx?ID=342215> <http://www.staatsarchiv.sg.ch/gn/kontaktformular.html>. Kun la afabla permeso de: Staatsarchiv St.Gallen, W 238/05.06-18, Verlag: W. Hiltmann, St.Gallen, 5.12.2017)

En novembro 1916 Lenin partoprenis en la sinsekva kongreso de la svisa socialdemokratia partio, kiu okazis en la konferencejo de la centro Kaufleuten en Zuriko (Pelikanstrasse 18). Ĝin partoprenis 352 delegitoj, kiuj reprezentis 20'682 membrojn. Ĉeestis eĉ tiaj korifeoj kiel Karl Liebknecht, Rosa Luxemburg kaj Franz Mering kaj la ekzilitaj deputitoj de la IVa Dumao. Sed Lenin estis seniluziigita pri ĝia evoluo, ĉar la ĉeestantoj ne montris apartan entuziasmon pri liaj revoluciaj ideoj. Krom tio montriĝis, ke la kurso de Grimm daŭre ĝuis la plej fortan popularecon inter la svisaj kamaradoj. Lenin devis konstati kun amaro, ke sub lia gvido la svisa socialdemokratio elektis la linion de la „centristoj“ Kautsky-Haase kaj ke ĝi plej verŝajne neniam fariĝos vere revolucia partio. La ĉagreno de Lenin direktiĝis do pli kaj pli kontraŭ Grimm persone, kiun li nomis jen kanajlo, jen perfidulo, ĉar li alianciĝis kun la dekstruloj kaj la svisaj naciistoj. Eĉ pri Nobs kaj Platten Lenin dubis, ke ili estas kiel veraj maldekstruloj, ĉar ili ne kapablis inciti la amasojn al revolucia sinteno. Pri la konsekvencoj, kiuj laŭ li devis sekvi el la zurika kongreso, li verkis apartan artikolon, kiu poste estis publikigita sub la titolo „La taskoj de la maldekstraj radikaluloj en la Socialdemokratia Partio de Svislando“. En ĝi li alvokis la maldekstrajn anojn de la Zimmerwald-movado entrepreni konkretajn agojn, malkaŝi la „burĝan trompadon de la popolo pere de frazaĵoj pri demokratio kaj landa defendo“ kaj senmaskigi la „veran karakteron de la registaro, kiu hipokritas ĉe la imperiisma burĝaro kaj la armea kliko“. Li postulis lanĉi la revolucionan batalon por forigi la burĝan regadon, starigi la socialisman ordon kaj transpreni la politikan potencon, ĉar ne por la demokratio, sed nur por la interesoj de la imperiisma burĝaro la svisaj laboristoj kaj

¹⁴⁸ Ĉi tie Krupskaja aldonis interkrampe la rimarkon, ke „kiel konate Svislando ne posedas konstantan armeon, sed nur milican trupon“.

¹⁴⁹ Bildojn de la domo el postaj jaroj vd. sub <http://www.postcard-of-my-life.ch/index.php/sortiert-nach-themenbereich/sichtbezogene-karten/gebäude/hotels/flumserberg-kurhaus-tschudiwiese-gel-1936.html> kaj <http://www.ansichtskarten-center.de/flums-395266/flums-gebrauchsspuren-kurhaus-tschudiwiese-huettenstempel>. Nuntempa aspekto: <http://www.arbor.ch/index.php/praesenz-arbor/tagungshaus>. Aktualan bildon de la renovigita domo vd. en Google maps sub Tagungshaus Tschudiwiese.

kampanoj perdis sian vivon en tia milito. Ktp. La malamego de Lenin kontraŭ la burĝaro, militistoj, oportunistoj, riĉuloj, plene burĝonis en tiu alvoko, kiu legeblas kiel ĝenerala invito por la posta revolucio en Ruslando.¹⁵⁰ Lia malpacienco pri la svisaj kamaradoj kreskis kaj lia kolero kontraŭ Grimm tiel akriĝis, ke li eĉ provis skismigi la Svisan Socialdemokratian Partion, utiligante por tiu celo la kameraĵojn de la Zimmerwald-maldekstro, sed lia plano fiaskis. Komence de marto 1917 Lenin ŝajne rezignaciis, kiam li rimarkis, ke liaj radikalaj kamaradoj Nobs kaj Platten forkuris al la flanko de Grimm kaj ke la Zimmerwald-frakcio disfalis. Seniluziigita pri la svisaj socialistoj, kies politikajn specifecojn li verŝajne ne povis tute ensorbi aŭ asimili, ĉar ruso restis ruso, li skribis al Ĥaritonov: „La svisoj ne volas lerni kiel oni devas organizi revolucionan partion“, kaj en sia propra resumo pri la eventoj li notis: „Summa summarum: La Zimmerwaldismo estas solene enterigita en la marĉo de la gvidantoj de la svisa partio“. La grandaj internaciismaj planoj de la bolŝevisma gvidanto skismigi la svisan partion kaj lanĉi la revolucion en Svislando mizere fiaskis pro la intuicia rezistemo de la svisoj, kiuj ne permesis tian skismon nek estis interesataj pri la socialisma revolucio en la propra lando por forigi la „burĝan kapitalisman“ registaron laŭ la imago de Lenin. Kvankam la revoluciaj ideoj de Lenin daŭre ŝvebis en la ideologio de la svisa socialdemokratio, ĝiaj sekvaj decidoj kaj agoj ne dependis de la doktrino de Lenin, sed estis influataj ĉefe de la panika strebado konservadi la propran ekzistadon kaj de la intuicia pacismo, kiu baziĝis sur la impresoj de la militaj jaroj.

Lenin en La Chaux-de-Fonds

La plej lasta vojaĝo, kiun Lenin entreprenis por viziti iun laboristan klubon en Svislando antaŭ ol forlasi la landon, kondukis lin al La Chaux-de-Fonds, grava laborista urbo en la neŭŝatela Ĵuraso en Romandio, kelkajn kilometrojn apud la limo kun Francio kaj fama pro ĝia horloĝa fabrikado. La 18an de marto Lenin estis invitita por prelegi pri la sorto de la Pariza Komunumo de la jaro 1871, la unua revolucia-socialisma registaro laŭ la modelo de la „diktaturo de la proletaro“, kiu daŭris nur ĝis la 28a de majo 1871.¹⁵¹ Kvankam li bone konis ĉi tiun temon, pri kiu li prelegis en pluraj okazoj jam en Ĝenevo kaj Parizo, li aparte bone prepariĝis, utiligante libron de la rusa anarkiisto Bakunin, kiu verkis pri la sama temo kaj siatempe havis multajn adeptojn en la Ĵuraso. La (germanlingva) prelego de Lenin okazis en la Laborista Klubo en la strato Premier mars n-ro 15, kiu situis en la plej malnova parto de la urbo. La titolo de lia prelego (kies teksto ne konserviĝis) estis „Ĉu la rusa revolucio iros laŭ la vojo de la Pariza Komunumo?“. Lenin celis klarigi al la aŭskultantoj la erarojn, kiuj kaŭzis la fiaskon de la Pariza Komunumo, kaj ne rekomendis ripeti ilin okaze de nova provo. En la franca lingvo elpaŝis Ernst Paul Graber, la gvidanto de la socialdemokratia partio de Romandio.¹⁵² Post la prelego Lenin renkontiĝis kun la grupo de lokaj bolŝevistoj, kiu estis gvidata de *Aleksandr (Ŝaja Zelikov) Abramoviĉ (Ĉetuev)*, kun kiu Lenin konatiĝis en Berno. En Ruslando Abramoviĉ estis persekutata de la justico kaj kondamnita al ekzilo en Siberio pro revolucia agado inter soldatoj, sed li sukcesis fuĝi al Svislando, kie Lenin konsilis al li iri al La Chaux-de-Fonds, kie eblis pli facile trovi laborlokon en iu horloĝfabriko.¹⁵³ Kvankam Lenin mem evidente estis kontenta pri tiu vojaĝo, pri kiu raportis ankaŭ la romanda socialisma gazeto *La Sentinelle*,¹⁵⁴ la ĉeestinto Jankel David Bikin pli kritike komentis en artikolo aperinta en *Proletar-skaja revolucija* (1930) la prelegon de Lenin, kiu faris al la svisaj partoprenantoj iom tedan, malinteresan kaj tro teorian impreson.¹⁵⁵

¹⁵⁰ La germanlingvan tekston vd. sub <http://www.max-stirner-archiv-leipzig.de/dokumente/LW23.pdf>, p.135-47.

¹⁵¹ Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Pariza_Komunumo_\(1871\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Pariza_Komunumo_(1871)).

¹⁵² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ernest-Paul_Graber.

¹⁵³ Aleksandr Emel'janoviĉ Abramoviĉ (Ĉetuev, 1888-1971).

¹⁵⁴ Laŭ „Lenin v Berne i Cjuriche“, p. 278-84.

¹⁵⁵ Vd. Gautschi, p. 246.



M. Ĥaritonov, F. Kon, E. Usieviĉ, A.A. Bekzadjan, A. Abramoviĉ, Karl Radek-Sobelsohn

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://ru.wikipedia.org/wiki/Харитонов,_Моисей_Маркович, https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Feliks_Kon_1920.png (alian foton v. sub <https://www.geni.com/people/Felix-Kon/6000000070407972059>), https://ru.wikipedia.org/wiki/Усиевич,_Елена_Феликсовна, https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Bekzadyan, [http://wiki.tsu.ru/wiki/index.php/Абрамович_\(Четув\)](http://wiki.tsu.ru/wiki/index.php/Абрамович_(Четув)), [Александр_Емельянович](https://ru.wikipedia.org/wiki/Радек,_Карл_Бернгардович), https://ru.wikipedia.org/wiki/Радек,_Карл_Бернгардович)

Lenin preparas sian revojaĝon de Svislando al Ruslando

Estis Mieczysław Broński, la pola socialdemokrato, kiu alportis al Vladimir Lenin kaj Nadeĵda Krupskaja en Zuriko la sensacian novaĵon, ke en februaro (marto) en Ruslando eksplodis la revolucio. Efektive, la 2an (15an) de marto 1917, la monda gazetaro raportis, ke la caro permesis al la Dumao formi novan Provizoran Registaron. En tiu ĉi sama tago caro Nikolao IIa abdikis favore al sia pli juna frato, grandprinco Mikaelo, kiu mem rezignis la venontan tagon pri la plej alta povo, kiun li transdonis al la Provizora Registaro.¹⁵⁶ La novaĵo pri la revolucio kaj la abdiko de la caro venis por la mondo tute neatendite. Eĉ la svisa ambasado en Peterburgo en januaro kaj februaro ankoraŭ raportis al Berno, ke iu revolucio estas malverŝajna kaj ke oni ne povas observi gravan ŝanĝiĝon de la situacio ĉe la dinastio. Nur en la mezo de marto la tie dungita svisa diplomato raportis pri tumultoj kaj manifestacioj de laboristoj kaj studentoj, kiuj okazis la 8an tagon de la monato sur la stratoj de la ĉefurbo. Miĵukov rakontis al la svisa ambasadoro, kiu vizitis lin, ke li estis mem surprizita pro la rapida kolapso de la carismo.


Altgrade ekscitata, Lenin kuris tra la urbo por trovi freŝajn eldonojn de la gazetoj *Zürcher Post* kaj *Neue Zürcher Zeitung*, en kiuj aperis nur magraj telegramaj informoj pri la okazaĵoj en Ruslando. Kvankam Lenin flaris la historian eventon jam de longe, li ne povis kredi siajn okulojn kaj en la unua momento pensis, ke eble temas pri mensogo de la germana propagando. Lenin tuj forgesis ĉiujn okupiĝojn pri svisaj temoj kaj volis senprokraste realigi siajn teoriojn en la praktiko. Tio signifis, ke li devis reveturi al Ruslando kiel eble plej baldaŭ. Sed kiel? Fakte, la rusaj elmigrintoj en Skandinavio jam komencis revojaĝi al Ruslando, dum Lenin daŭre sidis en „tiu kondamnata Svislando”, kiu por li signifas nuran imperiisman ŝtaton, kiu dependas de aliaj imperiismaj ŝtatoj. Li bedaŭris, ke li ne forveturis jam en 1915. Ĝian neŭtralecon li pritaksis pura hipokritaĵo, al kiu la proletaro ne povas fidi, ĉar ĝi estus la ĉefa viktimo de la milito gvidata de burĝoj kaj kapitalistoj, kiuj celas defendi sian potencon. Li timis, ke Svislando povus esti tirita en la militon, kiu povus esti finita nur per la „eks-proprietigo” de la burĝoj kaj la venko de la socialismo. Post kiam la 17an de marto la Provizora Registaro proklamis amnestion por ĉiuj politikaj kaj religiaj persekutatoj de Ruslando, Lenin ne plu estis haltigebla. Li ne volis maltrafi la revolucion, kiu finfine realiĝis en sia patrujo. Sed la amnestio ne validis por la radikalaj internaciistoj (t.e. Leninaj bolŝevistoj) de Zimmerwald, kiuj troviĝis sur iu nigra listo kaj ne povis forlasi Brition kaj Francion. Elmigrintoj kiel Pleĥanov (kiuj estis misfamigitaj de la bolŝevistoj kiel „oportunistoj” kaj ŝovinistoj”), povis profiti la amnestion kaj tuj revojaĝis al Ruslando antaŭ Lenin, eĉ en akompano de militŝipo, kiu protektis ilin, dum Trockij kaj kelkaj kamaradoj, kiuj volis veturi per norvega ŝipo al Ruslando, estis arestitaj de la britoj en Halifakso, Kanado. Ŝajnas, ke la britoj kredis kaj esperis, ke la „palaca revolucio” de februaro/marto estos ĉio, kion oni povis atendi de Ruslando. Do, Lenin komencis elpensi diversajn scenarojn de revojaĝo al Ruslando, ĉar ankaŭ la Germana Regno estis blokita por la

¹⁵⁶ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Provisorische_Regierung_\(Russland\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Provisorische_Regierung_(Russland)) kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Alexandrowitsch_Romanow.

traveturo.¹⁵⁷ Ĉu tamen veturi tra Francio kaj Anglio kun peruko sur la kapo (sed li timis, ke li estos kaptita kaj arestita), ĉu per la falsita pasporto de muta sveda civitano, aŭ ĉu oni flugu per aviadilo rekte al Ruslando? Ĉu eblus ricevi la helpon de kontrabandisto por sekrete veturi tra la Germana Regno kaj Skandinavio? Tra laŭzanaj samideanoj li intencis kontakti la rusan ambasadon en Svislando por ekscii kiel oni povus akiri vizon por reveturi al Ruslando. Sed ĉiuj tiuj opcioj montriĝis nerealismaj, ĉar ili estis tro riskaj kaj malcertaj. La 19an de marto naskiĝis la ideo sekrete veturi tra Germanujo per speciala trajnvagono kun la oficiala permeso de la germanaj regantoj. Fakte, la germanoj estis interesataj sendi rusajn revoluciulojn al Ruslando, pri kiuj oni esperis, ke ili forigos la tiean registaron, kiu decidis daŭrigi la militon, kaj faros pacon kun la Germana Regno, kiu povus malŝarĝi sian armeon ĉe la orienta fronto por havi pli da rimedoj por venki en Okcidento. Ĉefgeneralulo Ludendorff persone konsideris la rusan revolucion avantaĝo por la germanaj militplanoj, kaj la germana imperiestro Vilhelmo IIa kaj la kanceliero Bethmann-Hollweg vidis la aferojn simile.

Kio do okazis poste? Lenin daŭrigis verki kaj skribis en marto kaj aprilo siajn kvin famajn „Leterojn el la malproksimeco”, kiujn li sendis al Ruslando tra Skandinavio kaj kiuj komencis esti publikigitaj en la gazeto *Pravda*, kiu aperadis post la februara revolucio. En la unua letero la aŭtoro analizis la komencan fazon de la revolucio, ĝiajn rimedojn kaj eblecojn kaj postulis la armigon de la proletaro por enkonduki la duan fazon, kiu devis konsisti el la transpreno de la povo fare de la sovetoj. En la dua letero li polemikis kontraŭ la Provizora Registaro, kiu laŭ li meritis nenian apogon. En la tria letero li postulis la starigon de proleta popolmilito, kiu konsistu el 750'000 anoj. La kvara letero traktis la temon de la paco, kiu estis atingebla laŭ li nur post la venko de la proletaro. Kaj la kvina letero, kiu celis klarigi la taskojn de la revolucia proleta ŝtatordo, restis konservata nur en fragmentoj kaj esence enhavis resumon de la temoj de la kvar antaŭaj leteroj.

Intertempe okazis viglaj sekretaj kontaktoj inter diversaj rusaj elmigrintoj en Okcidento, precipe Aleksandr Helphand-Parvus, kiu konsilis la germanan registaron pri la aferoj de la rusa revolucio, Jakob Fürstenberg-Hanecki, fakulo pri sekretaj kaj konspiraj aferoj, Georg Sklarz, Bronski kaj aliaj perantoj, kaj germanaj registaraj reprezentantoj, ĉefe la germanaj ambasadoroj en Kopenhago kaj Berno estis enplektitaj. Ili devis trakti la teknikajn demandojn de la transportado de grupo kun Lenin de Svislando tra Germanio kaj Svedio. Sed Lenin ne volis veturi sola nur kun sia edzino, Radek, la familio Zinov'ev kaj kelkaj aliaj proksimuloj, sed li insistis pri kolektiva reveturo de tuta grupo de rusaj elmigrintoj el Svislando sendepende de la politika aparteneco – do temis pri kelkcent personoj. Kvankam la motivoj de la germanoj en tiu historio restis sufiĉe enigmaj kaj nebulaj,¹⁵⁸ indas pli detale priskribi la cirkonstancojn, kiuj estas konsiderindaj lige kun la preparado de la vojaĝo de la rusaj elmigrintoj el Svislando al Ruslando.¹⁵⁹



Personoj iel ligataj kun la organizado de la revojaĝo de Lenin tra Germanujo al Ruslando: J. Fürstenberg-Hanecki, A. Helphand-Parvus, R. Grimm, A. Hoffmann, F. Platten, W. Münzenberg, A. Dulles
(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
https://de.wikipedia.org/wiki/Jakub_Ganezki, https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Parvus, https://en.wikipedia.org/wiki/Robert_Grimm,
[https://de.wikipedia.org/wiki/Arthur_Hoffmann_\(Politiker\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Arthur_Hoffmann_(Politiker)), http://www.zimmerwald1915.ch/Sites/fritz_platten.html,
https://de.wikipedia.org/wiki/Willi_Münzenberg, https://en.wikipedia.org/wiki/Allen_Dulles)

¹⁵⁷ Fritz Platten notis en sia libro, ke Lenin rakontis al li pri tio nur en 1919/20, ĉar en la medio de la rusaj elmigrintoj en Zuriko aŭdeblis nur onidiroj. Foto kun Lenin kaj Platten (1919) vd. sub <https://www.limmattalerzeitung.ch/limmattal/region-limmattal/1917-kehrte-lenin-nach-russland-zurueck-behilflich-war-ihm-ein-mann-mit-familie-in-dietikon-131210221>.

¹⁵⁸ Dum la sovetia historiografio prisilentis tiujn tiklajn demandojn, Gautschi dediĉis al ili tutan legindan ĉapitron.

¹⁵⁹ Laŭ Gautschi, p. 256-66, kun konsidero de la koncerna ĉapitro de la libro ‚Lenin v Berne i Cjuriche’ kie mankas kelkaj gravaj detaloj menciitaj de Gautschi, ekzemple la priskribo de la malantaŭkulisita helpa rolo de Parvus, Hanecki, Sklarz k.a. (kiun Soljenicin despli larĝe kaj ĝue vastiĝis en sia romano ‚Lenin en Zuriko’.

Kiam la novaĵo pri la rusa revolucio konfirmiĝis, la 19an de marto en Berno kunvenis reprezentantoj de la rusaj ja polaj socialismaj frakcioj, kiuj apartenis al la Zimmerwald-movado, por diskuti pri la eblecoj reveturi al Ruslando. En tiu kunsido Martov esprimis la ideon ricevi la permeson de la germanoj por vojaĝi tra Germanujo. Kiel rekompensa servo oni intencis proponi al la germanoj, ke ili ricevu certan kvanton da militkaptitoj el Ruslando. En tio speciala delegacio de rusaj elmigrintoj (nome bolŝevisto Zinov'ev, menŝevisto Martov kaj socialisma revoluciulo Bobrov-Natanson) petis Robert Grimm sondi ĉe la germanaj aŭtoritatoj pri la propono de Martov. Post kiam Grimm akceptis la 'mandaton' de la rusaj elmigrintoj, li komencis sondi en du direktoj. Li kontaktis kaj la germanan ambasadoron Gisbert von Romberg¹⁶⁰ kaj la svisan ministron pri internaj aferoj, Arthur Hoffmann,¹⁶¹ al kiu Grimm submetis la proponon de la rusaj elmigrintoj kaj petis diplomatan apogon. Sekve okazis, ke ministro Hoffmann ligiĝis kun ambasadoro von Romberg pri la afero. Kelkajn tagojn poste Romberg sciigis al Hoffmann, ke li povas mesaĝi al Grimm, ke la germanoj en principo ne kontraŭas la vojaĝon de la nomitaj rusoj tra la Germana Regno. Pro kialoj de la neŭtraleco la svisa ministro rifuzis agi oficiale en la nomo de sia ŝtato, sed konsentis agi kiel privatulo.¹⁶² Ŝajnas, ke inter Romberg kaj Hoffmann ekzistis personaj rilatoj de la fido, tiel ke ili interŝanĝis konfidencajn informojn, kio estis nekutima kaj iom tikla afero. Pro tiuj personaj rilatoj ni scias, ke Grimm, kiu tiucele vizitis la germanan ambasadejon plurfoje, Hoffmann kaj Romberg apogis la ideon de la reheimigo de la rusaj elmigrintoj kaj revoluciuloj, kiuj rezidis en Svislando, kongrue kun la intereso de la germana politiko.

Kiel tegmenta organizaĵo por rusaj elmigrintoj en Svislando formiĝis la „Centra Komisiono por la reveturo de rusaj politikaj rifuĝintoj rezidantaj en Svislando”, kiu troviĝis en Zuriko (Klusstrasse 30) kaj reprezentis dek diversajn partiojn kaj frakciojn, ankaŭ la interesojn de Lenin, havante 564 membrojn. Ĝia prezidanto estis la menŝevisma ĵurnalisto Semjon Semkowski-Bronŝtejn,¹⁶³ la sekretario nomiĝis Sergej Bagoĉkij.¹⁶⁴

Kiel konkurenca organizaĵo de tiu „Centra Komisiono” ekzistis la „Asocio de rusaj social-patriotoj”, al kiu 166 rifuĝintoj estis aligitaj. La unue menciita „Centra Komisiono” skribis leteron al la Provizora Registaro en Petrogrado kaj proponis al justicministro Kerenskij subskribi interkonsenton inter la Ruslanda kaj Germana Regnoj por oficiale ebligi la revenon de rusaj elmigrintoj, interŝanĝe kun germanaj civilaj internigitaj en Ruslando. Grimm devis veturi al Petrogrado por klarigi la proponon al la anoj de la Provizora Registaro, sed ial li ne veturis. Al ĉefministro L'vov tiu ideo tute ne plaĉis. Ankaŭ Miljukov ne estis interesata kaj rifuzis la proponon. La Provizora Registaro ne kontraŭis, ke la elmigrintoj reveturu al Ruslando tra Britio kaj Francio, sed ne konsentis pri ilia veturo tra la Germana Regno.

Post kiam Grimm ricevis la certigon de la germanoj, ke la rusaj elmigrintoj povos traveturi Germanujon, li informis ilin en la 30a de marto en Berno kaj klarigis al ili, ke de nun ĉio dependas de Kerenskij kaj ke lia laboro ĉi-rilate dume finiĝis. En tiu situacio la plimulto de la membroj, kiuj estis aligitaj al la „Centra Komisiono por la reheimigo de rusaj politikaj rifuĝintoj rezidantaj en Svislando” hezitis utiligi la oferton de la germanoj, ĉar la nebolŝevismaj partioj rifuzis la ideon veturi tra malamika lando sen la oficiala aprobo de la Provizora Registaro. Dum ili do decidis pacience pluatendadi konfirmon el Petrogrado (kiel la ĉefurbo nun nomiĝis), la bolŝevistoj ĉirkaŭ Lenin ne volis enkalkuli prokraston kaj laŭ propra decido anoncis al la germanoj, ke ili konsentas akcepti ilian oferton. Lenin sciigis al Grimm, ke ili intencas senprokraste organizi sian forvojaĝon sen la ceteraj rifuĝintoj, kiuj preferis atendi la permeson de Kerenskij. Grimm, kiu principe estis je la dispozo al ĉiuj rusaj elmigrintoj, kiuj apartenis al la Zimmerwald-movado, tamen ne estis preta esti utiligata de la bolŝevistoj kiel „ĉefa atestanto” por tiu celo; li distanciĝis de Lenin kaj rifuzis pliajn kontaktojn kun la germanoj. Tiun

¹⁶⁰ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Gisbert_von_Romberg_\(Diplomat\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Gisbert_von_Romberg_(Diplomat)).

¹⁶¹ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Arthur_Hoffmann_\(Politiker\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Arthur_Hoffmann_(Politiker)). Hoffmann estis membro de la Liberaldemokratia Partio!

¹⁶² Lia motivo helpi verŝajne estis ligata kun lia ideo apogi apartan pactraktaton inter Germanujo kaj Ruslando ĉe la orienta fronto, kio okazis en kunlaboro kun Robert Grimm kaj senkonsidere al la svisa neŭtraleco kun la klarigo, ke li volas helpi al la rusaj elmigrintoj revojaĝi al Ruslando, kio finiĝis en skandalo kaj en lia demisio en junio 1917 (vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Grimm-Hoffmann-Affäre>).

¹⁶³ Semkovskij, kiu en tiu tempo nomis sin „d-ro Braunstein“, estis kunlaboranto de direktoro Walz, eldonisto de la zurika gazeto *Tages-Anzeiger* kaj estro de la Svisa Gazetara Telegrafa Agentejo. Ankaŭ Walz komunikis al la germana ambasado, ke Semkovskij informiĝis ĉe li, ĉu eblus veturigi la rusajn elmigrintojn tra Germanujo.

¹⁶⁴ Sergej Justinoviĉ Bagoĉkij (1879-1953).

mesaĝon li sendis al Zuriko kaj samtempe menciis, ke li pretas serĉi alian peranton. Nature, Lenin estis ege ĉagrenata kaj kolera pri la sinteno de Grimm, kun kiu la rilatoj jam estis sufiĉe malbonaj.

Kiam Münzenberg rifuzis la proponon de Lenin, ke li okupiĝu pri la afero, kun la argumento, ke li estas germana civitano, la mandato transiris al Fritz Platten, la 3an de aprilo. La koncerna kunsido kun Lenin, Platten, Radek kaj Münzenberg okazis en la estrara ĉambro de la klubo 'Eintracht'. Lenin informis pri la aktuala stato de la situacio kun la riproĉo al Grimm, ke li intence celis prokrasti kaj saboti la forvojaĝon de la rusoj el Svislando favore al la menŝevistoj kaj socialismaj revoluciuloj. Kiam Lenin submetis la proponon al Platten, ĉu li pretus funkcii kiel partnero kaj akompananto dum la vojaĝo tra la Germana Regno, li petis, ke li povu pripensi la proponon, ĉar li timis konsekvencojn por sia profesia kariero. Sed li konsentis kaj akceptis la mandaton. Oni do fiksas renkontiĝon kun Grimm en la berna Popoldomo, kien Lenin veturis kun la edzino, Radek kaj la Zinov'ev-oj kaj kiu okazis la 3an de aprilo. Dum tiu kunveno Grimm diris, ke li konsideras la enmiksiĝon de Platten nedezirinda, ĉar li estas malbona diplomato, kiu povus perturbi la intertraktojn kun la germanoj. Lenin reagis malbone kaj anoncis, ke oni sendos ĝuste Platten al la germana ambasadejo por diskuti kun von Romberg la formalajojn de la vojaĝo. Lenin pasigis la nokton en la Popoldomo por redakti ilin kun Platten, kiu fakte estis akceptita de von Romberg la venontan tagon. La kondiĉoj por la vojaĝo, kiuj estis ellaboritaj de Lenin (kiu ja estis juristo) kaj submetitaj de Platten al von Romberg, havis jenan enhavon: Platten transprenu la personan respondecon por la vojaĝo de la rusaj elmigrintoj dum ilia veturo tra la Germana Regno, nur personoj aprobitaj de Platten rajtu eniri la trajnvagonon, kiu dum la vojaĝo restu fermita, la pasaĝeroj ne rajtu forlasi la vagonon, germanaj limkontrolistoj ne rajtu kontroli la pasaĝerojn ĉe la landlimoj de Germanujo, la politika pozicio de la vojaĝantoj ludu neniun rolon, Platten aĉetu la biletojn por la vojaĝantoj laŭ normala tarifo, la vojaĝo okazu sen interrompo, la vagono ĝuu la statuson de la eksterteritorieco. Lenin postulis, ke la nomoj de la vojaĝantoj ne estu konigitaj. Von Romberg ne kontraŭis la interkonsenton, sed li atentigis, ke ne estas diplomatia kutimo, se civitano de fremda ŝtato diktas al oficiala reprezentanto de alia ŝtato la kondiĉojn de la vojaĝo tra ĝia teritorio. Platten havis komprenon por tiu vidpunkto, sed respondis, ke la vojaĝo ne povus okazi, se unu el tiuj kondiĉoj mankus en la interkonsento.

Ankaŭ la germanoj estis interesataj, ke la „speciala operaco” rapide efektiviĝu. Ankorau en la sama tago Romberg telegrafis al Berlino por informi la ministerion de la eksteraj aferoj pri la interkonsento kun Platten kaj petis ĝin urĝe doni la permeson, ĉar oni timis, ke la senpaciencaj kaj malfidemaj rusoj povus denove ŝanĝi la planon kaj la germanoj ne deziris daŭrigi la diskuton. La 5an de aprilo la germana ambasado fakte ricevis pozitivan konfirmon de la milita generalaro¹⁶⁵ el Berlino, kaj du tagojn poste sekvis la sama konfirmo de la ministerio de la eksteraj aferoj. La germanoj volis aldoni la kondiĉon, ke la permeso por la vojaĝo estis formale donita de la Germanaj Sindikatoj kaj ke iu ĝia funkciulo akompanu la vojaĝantojn. Sed Platten strikte rifuzis tiun kondiĉon. La tuta afero estis ruze aranĝita, kvankam el la vidpunkto de la Provizora Registaro temis pri ŝtatperfido, kiu povas esti jure persekutata de tiu registaro, ĉar la Ruslanda kaj Germana Regnoj troviĝis en milita stato. Platten, kiu de 1917 estis ankaŭ membro de la svisa parlamento, ricevis eksterlandan pasporton kaj estis liberigita de siaj partiaj devoj por tri semajnoj. La vojaĝon kun la rusaj elmigrintoj li deklaris privata. Ankaŭ la aŭstroj kaj svedoj konsentis pri la vojaĝo, malgraŭ duboj de imperiestro Karlo.

En Zuriko Lenin vizitis la urban policon por anonci sian decidon, postulante la redonon de la kaŭcio en alteco de 100 frankoj, kiun li pagis ĉe la alveno. Post subtraho de impostaĵo de 11.30 frankoj li ricevis la restsumon. La aŭtoroj de la libro ‚Lenin v Berne i Cjuriche’ postlasis la anekdoton, ke Lenin havigis la ŝparlibron de la zurika kantona banko, sur kiu restis 5 frankoj kaj 5 centimoj de origine 100 frankoj post subtraho de la menciita impostaĵo kaj de la lupago por la loĝejo, al sinjorino Ĥaritonova kun la peto pagi la membrokotizon de Lenin kaj lia edzino favore al la bolŝevista sekcio de Zuriko por la monato aprilo. Sed Ĥaritonova ne redonis la ŝparlibron al la banko, sed konservis ĝin; tiel, ĉi tiun relikvon iam poste ricevis la Instituto pri marksismo-leninismo en Moskvo.

¹⁶⁵ Erich Ludendorff, la ĉefa homo en tiu generalaro, notis en siaj memuaroj de la 30aj jaroj, ke li sciis nenion pri Lenin kaj ŝovis la respondecon por tiu interkonsento al la germana registaro, precipe al kanceliero Bethmann-Hollweg. Platten skribis, ke Ludendorff eĉ ne menciis la nomon de Lenin en siaj memuaroj, pri kiu li verŝajne eĉ ne imagis, ke li povus akapari la povon en Ruslando.

Kaj li liberigis la ĉambron ĉe Kammerer en la strato Spiegelgasse 14.¹⁶⁶ La literaturo postlasis jenan anekdoton pri la konversacio inter Kammerer kaj Lenin: Dum la adiaŭado Kammerer deziris al Lenin ĉion bonan kaj esperis, ke en Ruslando li ne havos tiel multe da laboro kiel en Zuriko, al kio Lenin respondis, ke en Ruslando li probable havos eĉ pli multe da laboro. Kammerer esprimis la esperon, ke en Petrogrado Lenin baldaŭ povos trovi taŭgan ĉambron por loĝi, ĉar li legis, ke la loĝeja problemo en Ruslando estas grandega. Lenin certigis lin, ke en Ruslando li nepre trovos ĉambron, sed li forte dubis, ke ĝi estos tiel trankvila kiel en Zuriko. La libroj estis ekspeditaj al Ĝenevo kun la peto al la tieaj bolŝevistoj (Karpinskij) plusendi ilin al Ruslando tra Stokholmo. Konstante veturante inter Zuriko kaj Berno, Lenin okupiĝis pri la invitado kaj selektado de vojaĝemaj elmigrintoj por la transporto. La menŝevistoj, socialismaj revoluciuloj kaj la grupo de „Vperjod” ĉirkaŭ Lunaĉarskij rifuzis kunveturi en tia aventura vojaĝo. Lenin estis ĉagrenata pri la menŝevistoj, kiujn li nomis „kanajloj unuagradaj”. Ankaŭ Platten esperis, ke almenaŭ la gvidanto de la socialismaj revoluciuloj aliĝos al la vojaĝgrupo, ĉar komuna apero de la du ĉefaj gvidantoj en Petrogrado farus pli fortan impreson, kiel li opiniis. De la ruslanda konsulo li petis pasportojn, kiu eldonis provizorajn legitimilojn. La mono el la disponebla fonduso sufiĉis por financi la vojaĝon de 10-12 personoj. Dank’ al grandanima prunto de 3000 frankoj flanke de la Socialdemokratia Partio de Svislando favore al la helpkomitato por rusaj elmigrintoj, por kiu Fritz Platten kaj Otto Lang transprenis la respondecon, povis esti aranĝita, de Platten, provizo de nutraĵoj por dek tagoj. La vojaĝantoj insistis mem pagi la vojaĝkostojn por eviti la impreson, ke la germanoj pagis la transporton, kaj ili volis veturi en la dua aŭ tria klaso, ĉar pli luksa kategorio estis tro multekosta. De kie la pasaĝeroj ricevis la monon ne estas klare, sed iuj ‘sponsoroj’ verŝajne povis esti trovitaj. Probable Lenin pruntedonis iom da mono al siaj proksimuloj, kun kiuj li finkalkulis poste en Ruslando. 300 svedajn kronojn li ricevis de la rusa konsulo en Haparanda kaj 472 rublojn li mem aldonis. Eble fluis ankaŭ germana mono, sed kiel jam menciite, tiu historio estas plena de spekulativoj kaj sen pruvo. Ankaŭ la aserto aŭ supozo, ke Lenin estis germana agento, neniam povis esti pruvita kaj plej verŝajne estas nura malica imputo, kiu servis al liaj malamikoj por misfamigi lin.¹⁶⁷

Kiel tago de la forvojaĝo estis fiksita la 4a de aprilo, sed ial okazis prokrastoj. La germanoj fiksitis la daton de la forveturo je la 9a de aprilo kaj postulis, ke la vojaĝantoj en ĉi tiu tago atingu la germanan limpunkton ĉe Gottmadingen. Lenin ankoraŭ dissendis telegramojn al la bolŝevismaj sekcioj en diversaj svisaj urboj kaj admonis la kamaradojn aperi en Zuriko en tiu tago. La 5an de aprilo Lenin veturis kun la edzino al Berno por subskribi la protokolon pri la formalajoj de la forveturo, kiun Platten intertempe preparis. Krupskaja proponis al Lenin veturi sen ŝi al Ruslando, por ke ŝi povu fini la mastrumajn aferojn en Zuriko, sed Lenin insistis, ke ŝi veturu kun li. Lenin, kiu estis ege interesata pri la jura sekurigo de sia vojaĝo, okupiĝis ankaŭ pri la politika sekurigo de la entrepreno, kiu tamen ne estis sen risko (ĉar Lenin timis perfidon survoje). Tiucele li kontaktis diversajn famajn „internaciistojn”, pacifistojn kaj maldekstrulojn kiel Henri Guilbeaux,¹⁶⁸ Romain Rolland¹⁶⁹ kaj Charles Naine,¹⁷⁰ kiuj devus doni la koncernan garantion. Kvankam tiuj socialistoj ja principe apogis la revolucion en Ruslando, la peto de Lenin pri la politika garantio ne interesis ilin. Rolland, kiu ne malkaŝis sian malbonan opinion pri Lenin, eĉ konsideris lin sabotulo kaj skismulo de la internacia laborista movado. Finfine, la petitan deklaron subskribis iuj „internaciistoj” el Francio, Germanio, Pollando, Svislando, Svedio kaj Norvegio. En la nokto de la 6a al la 7a Lenin renkontiĝis en Berno kun grupo de vojaĝemuloj por subskribi la menciitan protokolon. Post komuna vespermanĝo en la Popoldomo oni, t.e. Lenin, Zinov’ev, Radek, Armand kaj kelkaj aliaj (Guilbeaux, Lorient kaj Paul Levi) retiriĝis en la loĝejon de Radek.

Post ĉiuj tiuj preparoj la fina renkontiĝo de la vojaĝanta grupo estis fiksita por la 9a de aprilo – en la mateno de ĉi tiu tago, la Lenin-oj veturis de Berno al Zuriko – en la restoracio ‘Zähringerhof’ en Zuriko, vidalvide de la Centra Biblioteko. Dum tiu kunveno estis laŭtleĝita la fama „Adiaŭa Letero de Lenin al la svisa laboristaro”. Temas pri konkluda konsideraro, kiun Lenin direktis kun danko al la svisaj

¹⁶⁶ La aŭtoroj de la libro ‚Lenin v Berne i Cjuriche’ notis, ke komence de aprilo la paro Kammerer forlasis la loĝejon en la strato Spiegelgasse kaj translokiĝis al la strato Culmann-Strasse 10, kie ili disponigis ĉambron al la Lenin-oj por la plej lastaj tagoj de ilia restado en Zuriko. Sed verŝajne la paro, precipe Lenin mem, jam ne plu ofte utiligis tiun loĝejon.

¹⁶⁷ Nu, iusence Lenin povas esti konsiderata kiel malrekta agento de la germanoj, kiuj sendis lin tra Germanujo al Ruslando, por ke li forigu la provizoran registaron. (rim. aK)

¹⁶⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Henri_Guilbeaux.

¹⁶⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Romain_Rolland.

¹⁷⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Charles_Naine.

labo-ristoj pro la „kameradeca sinteno” rilate al la rusaj elmigrintoj kaj kun alvoko al la internacia laborista klaso, ke ĝi forigu la burĝajn monarkiojn kaj komencu la socialisman revolucion, kaj kun resumo de la ĉefaj politikaj ideoj de la bolŝevisma gvidanto. La rusan revolucion Lenin pritaksis kiel eventon kun mondhistoria signifo, kiu finos la imperiisman militon de la kapitalistoj kaj enkondukos longe atenditajn sociajn reformojn kiel la konfiskon de la grandterena posedo de la bienfarmistoj. Kvankam la rusa revolucio povus esti la komenco de la socialisma mondrevolucio, Lenin opiniis, ke tamen estos malverŝajne, ke en Ruslando la socialisma revolucio rapide venkos, ĉar Ruslando estas postrestinta agrikultura lando kun malforta proletaro, kiu mem ne kapablos konduki la socialisman revolucion al la fino. Se lia partio venkus en Ruslando, ĝi proponus interpaciĝi kun ĉiuj militantaj landoj, liberigi ĉiujn popolojn de la grandrusa koloniismo kaj rezigni pri la aneksado de aliaj landoj. Krome, Lenin renovigis sian faman postulon transformi la „imperiisman” militon al „civitana milito” kontraŭ la burĝa kaj kapitalisma klaso. La teksto entenis ankaŭ fortan polemikon kontraŭ la Provizora Registaro, al kiu li riproĉis, ke ĝi planis la restarigon de la monarkio. „Centrismaj” politikistoj kiel Martov, Aksel’rod, Kautsky kaj Robert Grimm estis kondamnitaj kiel „oportunistoj kaj socialpatriotoj”, dum por Lenin nur la grupo de 10-15 maldekstruloj de Zimmerwald havis iun valoron, ĉar nur ili komprenis la esencon de la socialisma internaciismo. Lenin emfazis, ke sin mem li ne konsideras pacifisto, sed des pli kontraŭulo de la imperiisma milito. La letero, kiu estis verkita en la rusa lingvo, estis tradukita al la germana, franca kaj itala lingvoj kaj publikigita en la maja numero de la periodaĵo *Jugend-Internationale*, kiu estis eldonita de Willi Münzenberg.¹⁷¹

Allen Dulles (1893-1969), tiama 24-jaraĝa oficisto en la usona ambasado en Berno, kiel posta ĉefo de CIA volonte rakontadis al siaj agentoj-kolegoj la anekdoton, ke en la paska dimanĉo de la 8a de aprilo 1917, iu ruso kun la nomo Ul’janov-Lenin telefonis al la ambasado por ekscii, ĉu la aliancanoj rajtigas lin veturi tra Eŭropo al Ruslando. Ĉar Dulles tiam estis ĵus planinta sian libertempon por renkontiĝi kun juna damo, kun kiu li volis ludi tenison, li respondis al la ruso, ke li retelefonu lunde. Anstataŭ fari tion, Lenin decidis vojaĝi sen la beno de la usonanoj (kiuj en la 5a de aprilo cetere proklamis la militon al la Germana Regno).¹⁷²

La ekzakta dato de la forveturo ekde la zurika stacidomo estis komunikita la antaŭan tagon publike en la kluboj de la rusaj elimigrintoj en Zuriko. En la restoracio ‘Zähringerhof’ oni ankaŭ kunmetis la liston de la kunvojaĝantoj, kiuj devis subskribi la kondiĉaron por la vojaĝo, pri kiu Platten interkonsentis kun la germanoj, kaj konfirmi, ke ili konscias pri la riskoj, kiuj povus trafi ilin post la alveno en Ruslando, ĉar la Provizora Registaro povus trakti tiujn homojn kiel ŝtatajn perfidulojn kaj aresti ilin. Temis ekzakte pri tridek rusoj plus Radek, kiu estis aŭstra civitano kaj aperis sur la listo probable kiel „Nikolai Boitzow“, plus la sviso Fritz Platten, kune do 32 (aŭ eĉ 33) personoj, inter ili 19 bolŝevistoj: Krupskaja (menciita kiel „sinjorino Lenin“), Inessa (Inès) Armand, Georgi Safarov kun edzino, Moisej Ĥaritonov, Grigorij Usieviĉ, Elena Kon, familio Zinov’ev (kiu subskribis kiel Radomysl’skij) kun la kvarjara filo Stefan kaj Sarra Raviĉ (la unua edzino de Zinov’ev el ĝenevaj jaroj¹⁷³). Krom tio, devis kunvojaĝi Fania Grebel’skaja, Anna Konstantinoviĉ, Il’ja kaj Marija Miringof, Abram Skovno, Nadeĵda Sljusareva, B. El’ĉaninov, Girŝ (Hirsch) Brilliant (t.e. Grigorij Sokol’nikov¹⁷⁴), David Rozenblum, Aleksandr Abramoviĉ, Semjon Ŝejneson, Miĥail Ĉakaja, Miĥail Goberman,¹⁷⁵ Johann Linde, Bunja Pogovskaja, David Suliaŝvili kaj Meer Ajzen-chud (aŭ Ajzenbund),.¹⁷⁶ Dum tiu proceduro okazis jena

¹⁷¹ La tekston vd. sub http://www.kommunisten.ch/index.php?article_id=954. En Svislando tiu letero kaŭzis neniun apartan eĥon kaj ne estis publikigita en la socialdemokratia gazetaro. Male, en iu romanda sindikata gazeto la laborista gvidanto Achille GrosPierre mokis pri ĝi kiel „pastreca dokumento“, kies aŭtoro estas naiva produktisto de frazaĵoj, kiu ne estis konata dum sia svisa restado.

¹⁷² Laŭ Merridale, C.: Lenins Zug. 2013. P. 171, verŝajne laŭ: Grose, P.: Gentleman spy. The life of Allan Dulles. Boston 1994. Vd. ankaŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Allen_Welsh_Dulles (la koncerna mencio mankas en la rusa versio).

¹⁷³ Sarra Naumovna Raviĉ (1879-1957).

¹⁷⁴ Grigorij Jakovleviĉ Sokol’nikov (Hirsch Brilliant, 1888-1939).

¹⁷⁵ Nask. en 1891, apartenis al la laŭzana sekcio de la bolŝevistoj.

¹⁷⁶ La nomaron vd. sub https://ru.wikipedia.org/wiki/Пломбированный_вагон. Fakte, la vagono de Lenin ne estis plombizita, kiel oni povas legi en la legendoplena historiografio, sed, kiel menciite en ĉi tiu studo, Platten interkonsentis kun la germanoj pri eksterteritoria statuso de la vagono, kiun la pasaĝeroj ne rajtas forlasi. La legendo pri la plombizita vagono aperis, post kiam Platten menciis en sia vojaĝraporto de 1924, ke tri pordoj de la vagono estis plombizitaj kaj ke la kvara estis lasita malfermita, ĉar la akompanantaj germanaj oficiroj, kiuj sidis en aparta kupeo sen rajto kontakti la rusojn, kaj Platten tamen rajtis forlasi la vagonon. La versio de la „plombizita vagono“ estis transprenita ne nur de la sovetia komunisma partio, sed ankaŭ eniris la ĝeneralan historiografion. Tamen, post sia reveno de la vojaĝo Platten rakontis, ke la versio de la plombizita

incidento: Inter la ĉeestantoj, kiuj volis kunve-turi, troviĝis iu Oskar Blum, latva socialdemokrato, kiu estis menŝevisto kaj suspektata de la bolŝevistoj, ĉu prave aŭ ne, kiel agento de la carisma sekreta servo. Lenin kaj Zinov'ev klarigis al li, ke li ne estas dezirata, sed la rifuzito insistis, ke li povu kunveturi. Kiam okazis voĉdono, li esprimis sin por kaj 14 kontraŭ li, do li estis eksigita de la kunveturanta grupo. Je la dua horo kaj duono la grupo forlasis la restoracion 'Zähringerhof'. La ruso Abraham Ĥaraŝ (tiam aŭ posta kunlaboranto de NZZ kaj aŭtoro de malgranda Lenin-biografio¹⁷⁷) observis la homojn alveni en la stacidomon (ŝajnas, ke la administracio de la zurika stacidomo estis informita pri la vojaĝo de tiu grupo) kun kusenoj kaj kovriloj kaj vidis kiel Lenin, kiu estis vestita kiel malriĉulo, portante la krudajn ŝuojn, ricevitajn de Kammerer, donas instrukciojn.

Ĉar estis lundo post Pasko, do festotago, la stacidomo estis preskaŭ malplena de homoj, precipe mankis turistoj. En tiu grandega stacidomo la grupo de rusoj do estis apenaŭ rimarkita. Sur la perono staris Otto Lang, socialdemokrata ano de la urba konsilio de Zuriko, por adiaŭi la grupon. Ŝajnas, ke ankaŭ Anatolij Lunaĉarskij ĉeestis por soleni. La vagono, tria klaso, troviĝis en la mezo de la rapidtrajno. Kvankam rifuzita de la grupo, Oskar Blum aperis kaj provis sidiĝi en la rezervita vagono, sed Lenin kaptis kaj eljetis lin el la trajno, tiel ke li retroviĝis sur la perono kaj foriris, kiel rakontas la legendo. Germana agento, kiu devis diskrete akompani la grupon ĝis la germana limo, observis la scenojn por kontroli ĉu ĉio evoluas laŭorde. En sia raporto li notis, ke centoj da rusoj kolektiĝis sur la perono kaj direktis diversajn laŭtajn emociojn, kriojn kaj vortojn por kaj kontraŭ la forvojaĝontaj homoj. Multaj estis ĉagrenataj, ke la homoj de Lenin ne respektis la principojn de la „Centra Komisiono”. La trajno, kiu devis forveturi je la tria horo kaj dek minutoj, startis kun kelkminuta malfruiĝo. Kiam ĝi ekveturis, la vojaĝantoj kantis la Internacion. Ekster la medio de la elmigrintoj la forveturo de Lenin kaj lia grupo kaŭzis neniun sensacion, tiel ke la svisa publiko eĉ ne rimarkis la eventon. Nur la maldekstra gazeto *Volksrecht* raportis, la 16an de aprilo, pri la revojaĝo de rusaj elmigrintoj, kaj en la postaj telegramoj el Kopenhago kaj Stokholmo la nomo de Lenin eĉ ne estis menciita.

En la stacidomo de Schaffhausen la rusaj pasaĝeroj devis forlasi la vagonon, ĉar la svisaj doganistoj deziris kontroli la eksportotajn varojn, kiujn la pasaĝeroj kunportis. Ĉar kelkaj manĝaĵoj (kiel ĉokolado, sukero) estis troaj kaj ne rajtis esti eksportitaj dum la milito, ili estis konfiskitaj, sed la posedantoj havis la rajton sendi ilin al parencoj aŭ konatoj en Svislando. La varoj estis „plombizitaj” aŭ sigelitaj en aparta vagono kaj senditaj ĝis la limo en Thayngen, kie okazis la formala dogana kontrolado de la vojaĝantoj far la svisaj oficistoj. La kontrolistoj limigis sian inspektadon al la aprobo de la „plombizita” aŭ sigelita varvagono, sed la pasportoj ne estis kontrolitaj kaj la nomoj de la rusoj ne estis registritaj, kiel Lenin kaj Platten postulis. Kvankam la svisa registaro oficiale sciis nenion pri la forveturo de Lenin kaj lia grupo, Platten rakontis, ke ambasadoro Romberg klarigis al li, ke ministro Hoffmann ordonis al la svisaj limkontrolistoj, ke ili „ne faru problemojn al tiuj rusoj”, sed por tiu ordono ne ekzistas oficiala skriba konfirmo. En Gottmadingen la trajno estis akceptita de germana oficiro. La rusoj estis kondukataj al la atendejo de la tria klaso, kie ili restadis silente kaj sentis sin dume internigitaj. Sed baldaŭ okazis, sen ajna kontrolo, ĉar ili ĝuis diplomatian imunecon, ilia enigo en germanan vagonon, kiu havis po unu kupeon dua- kaj triaklasan. La germanoj montris sin komplezemaj kaj provizis la vojaĝantojn per sufiĉe da nutraĵoj.

La trajno forlasis la stacidomon de Singen je la kvina horo kaj dek minutoj. Tra Stuttgart, Frankfurt, Halle, Berlino, Sassnitz, Trelleborg, Malmö kaj veturis ĝis Stokholmo, kie Lenin interrompis la vojaĝon kaj estis akceptita de svedaj socialdemokratoj (kaj kie li aĉetis novajn ŝuojn).¹⁷⁸ Poste Lenin kaj lia grupo daŭrigis veturi norden ĝis kiam oni atingis la urbon Haparanda, de kie oni devis veturi per sledoj trans la rivero al Tornio sur finna teritorio, kiu tiam estis parto de Ruslando. La britoj, kiuj helpis al la Provizora Registaro kontroli kaj observi la sved-finnan limon, havis la planon haltigi la trajnon de

vagono kaj malheligitaj fenestroj estas fabelo. Ĥaritonov kaj Radek konfirmis, ke „plombizita” signifis, ke la rusoj ne rajtis forlasi la vagonon, kaj ke en la vagono oni devis strikte respekti la eksterteritoriecon (kiu estis markita per streko farita per blanka kreto sur la planko kvazaŭ kiel limo, kiun, escepte de Platten, nek la rusoj nek la germanoj rajtis transiri). Ekde Stuttgart la germana sindikatestro Jansson sidis en iu vagono de la trajno, kiu cetere veturis laŭ kutima horaro. Kiam li volis rilati kun Lenin en sia vagono, la rusoj rifuzis ajnan kontakton kun eksterlandanoj.

¹⁷⁷ Vd. <https://www.swissbib.ch/Record/262639106>.

¹⁷⁸ Mapon de la itinero vd. sub <http://www.smithsonianmag.com/travel/vladimir-lenin-return-journey-russia-changed-world-forever-180962127>.

Lenin en Svedujo, sed ili rezignis pri ĝi kaj, male, helpis al la grupo trapasi la limon en Tornio.¹⁷⁹ Ŝajnas, ke iuj oficiroj eĉ akompanis la „leninan vagonon” en Finnlando. Tra la stacidomo de Beloostrov (Valkeasaari), kiu tiam estis la limpunkto de Rusio, la trajno atingis sen problemoj kaj incidentoj la 3an (16an) de aprilo je la 23a horo kaj 10 minutoj la Finnan stacidomon de Petrogrado, kie li estis entuziasme bonvenigita de siaj adeptoj.¹⁸⁰ Tamen, Fritz Platten ne povis veturi ĝis Petrogrado, ĉar li estis haltigita de reprezentantoj de la Provizora Registaro ĉe la sved-finna (rusa) limo, deklarita kiel nedezirata eksterlandano¹⁸¹ kaj resendita al Svislando, kie li vizitis la germanan ambasadoron en Berno, al kiu li „dankis en la nomo de la rusoj por la komplezo” kaj por raporti, ke „la vojaĝo pasis sukcese”. El Ruslando Lenin mem konfirmis al siaj partiaj amikoj en Zuriko per telegramo, ke „ĉio funkciis mirakle”, en alta tono laŭdante la germanojn, kiuj estis centprocente fidindaj.

Post mallonga tempo sekvis dua transporto de rusaj elmigrintoj el Svislando tra Germanujo kaj Svedujo, kiu estis akompanata de la sviso Hans Vogel kaj kiu esence konsistis el menŝevistoj. Ekde Stokholmo la trajnon akompanis Robert Grimm ĝis Petrogrado, kie li volis diskuti traktaton pri paco inter rusoj kaj germanoj, sed li estis malkovrita de la Provizora Registaro kaj petita forlasi Ruslandon.

Konkludo

La restadoj de Vladimir Il’iĉ Ul’janov, aliase Lenin, en Svislando, kiuj entute daŭris ses jarojn kaj duonon, montras kelkajn interesajn trajtojn. Tiun tempon la rusa elmigrinto plenigis kun fervora teoria leg- kaj skriblaboro, kun oftaj rilatoj kun aliaj rusaj elmigrintoj, kun multaj vojaĝoj kaj migradoj en Svislando kaj kun studado kaj praktika spertado de la vivo en tiu lando. Laŭ tiu maniero, Lenin sufiĉe bone konatiĝis kun la lando de la helvetoj, kiun li aprezis kaj admiris kiel ekonomie altevoluintan kaj kulture altnivelan civilizon, malgraŭ la „filistraj”, „etburĝaj” kaj „etmensaj” trajtoj de ĝiaj enloĝantoj, kiujn li kaj Krupskaja abomenis. Lenin malamegis la burĝojn, la kapitalistojn. Kvankam Lenin longe vivis en okcidenta Eŭropo, li neniam sukcesis fariĝi vera eŭropano, kiel trafe rimarkigis Solĵenicin en sia libro ‚Lenin en Zuriko’. Kvankam Lenin rekonis kaj respektis la svisan demokration kaj ĝian solvon de la nacia demando, en la profundo de sia koro li ne povis akcepti tiun svisan manieron politike, ekonomie kaj socie ekzisti kaj funkcii, ĉar laŭ li la lando, kiu vivis ĉefe de la turismo, „nutriĝis de la paneroj de la kapitalismaj grandŝtatoj”, kiuj ĉirkaŭas ĝin, kiel Krupskaja rimarkigis. La rusaj elmigrintoj neniam sentis sin bone integritaj en Svislando, kiu estis perceptita de ili kiel civilize kaj kulture komplete fremda kaj stranga mondo. Lenin kaj lia edzino Nadeĵda Krupskaja ne formis escepton. Pri demokratio ili havis alian komprenon ol la svisoj. Ili estas konvinkitaj, ke nur la socialismo kaj la „dikta-turo de la proletaro” povos efektiviĝi la veran demokration por la popolo. Sed malgraŭ tio, ili sentis sin bone kaj sekure en Svislando, ĉar ili estis devigitaj vivi tie pro la milito.

Kiel Paŭlo Aksel’rod notis, li ne konis duan homon en la mondo, kiu estas kvazaŭ dum 24 horoj de la tago okupata pri siaj fiksa ideo kaj vivcelo, la socialisma revolucio, tiel ke li konis neniun alian penson ol tiun pri la proleta revolucio. En Svislando Lenin vivis diskrete, senpretende kaj modeste, kvazaŭ kaŝe, sekrete kaj konspire. Liaj personaj kontaktoj limigis sin al la rilatoj kun rusaj elmigrintoj, poste pli kaj pli ankaŭ kun svisaj socialdemokratoj kaj eksterlandaj socialistoj. Dum la tempo de la Unua Mondmilito, en Svislando, kie aperis liaj plej gravaj teoriaj verkaĵoj, kiuj cementis la fundamenton de la bolŝevismo, Lenin pli kaj pli radikaliĝis politike ka ideologie. Li eĉ celis skismigi la svisan social-demokration kaj influi parton de la svisa popolo, precipe la junularon kaj kelkajn politikistojn, per siaj radikalaj ideoj. En Svislando firmiĝis ankaŭ la skismo ene de la rusa socialdemokratio laŭ bolŝevistoj,

¹⁷⁹ La cirkonstancoj ĉe la sved-finna ne estas tute klaraj, ĉar tie okazis strangaj incidentoj. Lenin kaj lia grupo estis retenitaj de la tieaj britaj limkontrolistoj (en Haparanda?) dum multaj horoj kaj detale kontrolataj kaj esplorataj antaŭ ol ili povis daŭrigi la vojaĝon. Platten raportis, ke la grupo estis „plej kore akceptita de la tieaj soldatoj (en Tornio?), kiuj entuziasme rakontis pri la revoluciaj eventoj“ en Ruslando“. Ŝajnas, ke la Provizora Registaro konsentis, ke Lenin kaj lia grupo povis pluveturi. Sed Fritz Platten, kiu volis akompani la vojaĝantojn ĝis Petrogrado, mem estis haltigita de britaj limkontrolistoj kaj deklarita kiel nedezirata eksterlandano; dum tri tagoj li atendis la permeson de la Provizora Registaro por povi daŭrigi la vojaĝon, sed li ne ricevis ĝin, tiel ke li reveturis tra Stokholmo al Svislando.

¹⁸⁰ En 1988 estis produktita la televida filmo „La trajno“ de la reĝisoro Damiano Damiani (vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Der_Zug_\(1988\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Der_Zug_(1988)), <https://www.youtube.com/watch?v=qBndgW0dYqQ> (parto I) kaj <https://www.youtube.com/watch?v=BJYOHGEQLfc> (parto II).

¹⁸¹ Laŭ Krupskaja ankaŭ Radek estis rifuzita ĉe la rusa limo, sed laŭ ŝi la Provizora Registaro ne „kuraĝis“ rifuzi la bolŝevistojn.

menŝevistoj kaj socialismaj revoluciuloj. La du ĉi-lastajn frakciojn Lenin konsideris pli kaj pli kiel malamikojn, riskante detrui iamajn bonajn rilatojn kun elstaraj reprezentantoj de la ruslanda maldekstra movado kiel Pleĥanov, Aksel'rod, Buĥarin, Lunaĉarskij, Trockij, Gor'kij, Potresov k.a., kiuj havis aliajn opiniojn ol Lenin kaj kuraĝis kritiki lin kiel tro radikalan sektulon. Ĝuste tiuj homoj havis poste grandajn problemojn kun Stalin, kiu agis laŭ brutala kaj fatala maniero kontraŭ ĉiuj kritikistoj de Lenin. Lenin komencis malŝati ĉiujn siajn kontraŭulojn kaj preferis arigi ĉirkaŭ si lojalajn kapjesantojn, kiuj subtenis ĉiun ideon kaj faron de Lenin, kiun ili senlime adoris. Multaj de tiuj homoj estis en Sovetunio dankataj per la havigo de gravaj partiaj funkcioj kaj ŝtataj oficoj. Paranojo miksiĝis kun skizofrenio (kiuj karakterizos la politikon de la tuta postrevolucia tempo en Sovetunio). Sed Robert Grimm, la kuraĝa gvidanto de la svisa socialdemokratio, kiu eĉ helpis al Lenin dum sia restado en Svislando, defendis la honoron de sia movado, rifuzante bolŝevismajn metodojn kaj ne permesante skismon kaj detruon de sia partio. Ĉar Grimm ne sekvis la politikan-ideologian vojon de Lenin, li estis pli kaj pli misfamigita de li kiel perfidulo de la klasbatalo kaj socialisma afero, simile kiel Kautsky en Germanujo, kiu fariĝis pure ideologia malamiko. Finfine, la bolŝevisma grupo ĉirkaŭ Lenin reprezentis minoritaton ene de la ruslanda kaj internacia socialdemokratio, dum la menŝevistoj kaj socialismaj revolucioj de Ruslando kaj la socialdemokratoj (t.e. nekomunistoj) de Svislando ĝuis multe pli fortan ĝeneralan apogon kaj de la propra adeptaro kaj de la unuopaj landaj popoloj. Pro tio la kritikantoj kaj eksteraj observantoj de Lenin opiniis, ke la bolŝevistoj prezentas neniun veran danĝeron, ludos nur marĝenan rolon, do havos malgrandan signifon, kaj ke iliaj ideoj kaj faroj povas esti neglektataj kaj ignorataj. Lenin estis konata nur ene de sia medio, dum en Svislando „neniu konis lin“, kiel unu el liaj kontraŭuloj (Achille Gros-pierre) moke konstatis. Certe, dum la milito la etoso ĉe la socialdemokratia laboristaro de Svislando radikaliĝis, sed tio estis klarigebla unuavice per la sociaj tensioj, kiuj akriĝis lige kun la ekonomiaj malfacilaĵoj. Kaj certe, la maldekstruloj de Zimmerwald ĉirkaŭ Lenin provis kaj sukcesis profiti de tiu situacio.

Sed multe pli esenca kaj signifa ol ĉiuj tiuj videblaj okazaĵoj de la interna evoluo de Svislando, kiujn Lenin apenaŭ povis grave influi, estis la fakto, ke la gastiganta lando ebligis al li ankaŭ dum la mondmilito labori sur la teritorio de neŭtrala ŝtato en la servo de la socialisma revolucio de la internacia proletaro, esprimi radikalajn ideojn, alvoki al renverso de la burĝa, kapitalisma ordo kaj al lanĉo de „civitana milito“, kvankam li samtempe celis, ke Ruslando atingu pacon kun la militantaj landoj. La signifon de tiuj teorioj, planoj, faroj kaj aktivecoj tiam evidente neniuj povis aŭ kapablis ĝuste pritaksi, ĉar kiel dirite, Lenin estis internacie nekonata aktivulo kaj en sia propra partia medio konsiderata kiel neserioza, neglektinda sektulo. Neniu celis aŭ deziris socialisman revolucion laŭ la imago de la bolŝevistoj. La strebado de Lenin kaj de la bolŝevistoj transpreni la povon en Ruslando estis komplete sub-taksata kaj konsiderata kiel revo de kelkaj kafejaj konspirantoj, kiuj laboras laŭ privata kalkulo, kva-zaŭ kiel plezuro por pasigi la enuigan tempon en la senperspektiva ekzilo. Do, lia prepara laboro, kiun Lenin plenumis en Svislando, por atingi tiun celon, ne povas esti sufiĉe alte taksata. Tial ne estas troigite diri, ke la ideo kaj teoria eksplodaĵo, kiu estis utiligita en la oktobra revolucio, estis grandparte fabrikita en Svislando kaj distribuita de ĉi tie fare de la kunlaborantoj de Lenin. Oni miras kiel eblis, ke tio restis nerimarkata de la svisaj publiko kaj politiko. Neniu rimarkis aŭ volis kompreni, ke malantaŭ la afabla personeco de Lenin kaŝiĝas tia danĝera revoluciulo, kiu tiel grave kaj esence ŝanĝos la mondon post kelkaj jaroj, kelkaj monatoj. Pri la rolo kaj signifo de Lenin la larĝa publiko eksciis kaj ekinteresiĝis nur post la efektivigita bolŝevisma puĉo kontraŭ la Provizora Registaro de Kerenskij en oktobro (novembro) 1917 kaj pli detale informiĝis nur en decembro, kiam la revuo *Schweizer Illustrierte Zeitung* publikigis artikolon pri Lenin (bildon de la titolpage de la koncerna eldono vd. ĉi-sube).

Kiel montrite en tiu ĉi studo, la svisa politiko, justico kaj polico ne multe interesiĝis pri la politikaj okupoj de la rusaj elmigrintoj, kiujn ili gastigis, kondiĉe ke ili ne enmiksiĝu en la internajn aferojn de Svislando, sed ili des pli interesiĝis pri tio, ke ili pagis la impostojn, kaŭciojn, turismajn kotizojn en hoteloj, ke ili respektas la publikan ordon en la lokoj, kie ili kunsidas kaj festas, aŭ ke ili ne eksportu pli da ĉokolado kaj sukero ol permesite de la leĝo (dum la milito). La valida azilpraktiko estis eĉ dum la milito ekstreme liberala kaj tolerema kaj do povis esti ruze (mis)uzata de tiaj elmigrintoj kiel Lenin, kiu estis absolute senskrupula homo, kvankam li ja strikte respektis la pedantajn formalajn regulojn de la burokratio. La svisaj aŭtoritatoj ne malhelpis la rusajn elmigrintojn plani ilian revolucion en Ruslando, ĉar tio ne estis ilia problemo. Tio povis okazi ankaŭ pro tio, ke oni sciis tro malmulte pri Lenin kaj lia 'bolŝevisma sekto', kiu perfekte scipovis konduki, labori kaj agi sub la kondiĉoj de severaj

konspireco kaj sekreteco. Lenin neniam konsideris Svislandon grava faktoro de la monda revolucio, ĉar li konstatis, ke la svisa popolo, eĉ la socialistoj mem, ne posedas revolucieman konscion kaj preferas konservi sian amatan burĝan, kapitalisman politikan, ekonomian kaj socian sistemon. Do, li rezignis pri la ideo, ke Svislando povus fariĝi la centro de la monda socialisma revolucio.


Kvankam okaze de la morto de Lenin la 21an de januaro 1924 kelkaj internacie konataj intelektuloj kiel Henri Barbusse, Bernhard Show, Thomas Mann, Romain Rolland kaj aliaj omaĝis pri Lenin kiel unu el la plej grandiozaj kaj gravaj figuroj de la homaro, la svisa gazetaro tamen reagis iom pli sobre. Ekzemple la berna gazeto *Bund*, organo de la liberaldemokratia partio de Svislando, konstatis ĉe Lenin „mankon de moraleco” kaj prognozis, ke „ĉio kion Lenin kreis, povus denove malaperi kiel fatamorgano en la dezerto”.¹⁸² Tiu fatamorgano, kiu daŭris 47 jarojn, fakte malaperis en Ruslando nur en 1991, kiam la sovetia ŝtato kolapsis, post kiam la socialismo krevis kaj estis abolita en ĉiuj landoj, en kiujn ĝi estis perforte enkondukita post la dua mondmilito. En tiuj landoj la komunismo, kiu efektiviĝis precipe en sia leninisma kaj stalinisma versioj, estis komplete diskreditita kaj en ĉiuj rilatoj postlasis gravan damaĝon en la politika kulturo de tiuj landoj por longa tempo.

Cetere, Gautschi, kiu verkis tiel bonan kaj interesan libron pri *Lenin kiel elmigrinto en Svislando*, ne starigis la demandon pri la eventuala politika, jura aŭ morala respondeco, ne parolante pri eventuala kunkulpo de Svislando, rigarde al la senekzemplaj gigantaj krimoj, kiuj post 1917 estis plenumitaj en Ruslando en la nomo de Lenin kaj liaj bolŝevistoj, kiuj maturigis sian utopion en Svislando por perforte altrudi ĝin al la popoloj de Ruslando kaj Sovetunio. Same kiel Germanujo kaj aliaj okcidentaj landoj, la svisa registaro apogis la ideon ĉesigi la militon ĉe la orienta fronto kaj esperis, ke la rusaj revoluciuloj akcelos tiun procezon. Oficiale, Svislando ne volis esti enmiksita en tiun aferon kaj havis nenion komunan kun la plano de la rusaj revoluciuloj kaj germanoj. La sukcesa revojaĝo de Lenin al Ruslando estis la sukceso de la germana politiko. Sed Lenin ne povis ŝanĝi la sorton de Germanujo en la unua mondmilito, tiel longe ke la Provizora Registaro havis la povon en Ruslando. Kaj la venko de la bolŝevistoj en la rusa revolucio longdaŭre ne povis esti en la intereso de la okcidentaj landoj, kiuj troviĝis en simila dilemo, ĉar ili devis ‘elteni’ la komunismon en Sovetunio, kiu ŝanĝis la politikan konstelacion de la tuta mondo por longa tempo. Tiel, anstataŭ projekto de la paco reage al la milito, la socialismo fariĝis kruela sistemo de subpremado, persekutado, ekspluatado, mortigo kaj kruda grandstila lezado de la homaj rajtoj kun la rezulto de minimume 100 milionoj da mortviktimoj tutmonde.¹⁸³

Sed tiu tragika historio pasis kaj ĉiukaze ne estas riparebla. Anstataŭ honeste kaj objekte trakti sian historian pasintecon, en Ruslando oni reskribas la historiografion laŭ la gusto de naciistoj por glori pasintajn dubindajn heroaĵojn kaj grandparte neglektas la jaron 1917 en ties centa datreveno. Ankaŭ la historiistoj kaj ĵurnalistoj en la Okcidento devas esti singardaj, ke ili ne produktas, pere de ekspozicioj, artikoloj, prelegoj, libroj kaj publikaj aranĝoj (kiel teatraĵoj kaj imitita trajnveturo), falsan romantikon kaj naivan nostalgion pri la historio pri Lenin, kiu forlasis Svislandon antaŭ cent jaroj por efektiviĝi sian revolucion en Ruslando. Pri Lenin multaj ne scias, ĉu konsideri lin amaskrimulo aŭ komunisma kvazaŭ-sanktulo. La Leninkulto komenciĝis esence nur post lia morto en januaro 1924, kiam la sovetia propagando altigis la ĉefheroon de la revolucio kiel netuŝeblan ikonon de la internacia komunisma movado kaj kreinto de nova civilizo, kiu rompis la validajn valorojn de la pasinteco kun la celo krei pli bonan sistemon por la homaro, konstruante la socialismon kaj la komunismon, kiuj devis esti superaj al la burĝa kapitalismo, kiun la komunistoj konsideris malbono en si mem. La milionoj da mortintoj en la Civitana Milito kaj poste dum la persekutadoj sub Stalin ludis neniun rolon, ĉar en Sovetunio ili formis striktan tabuon.

¹⁸² Vd. *Der Bund* de la 23a de januaro 1924.

¹⁸³ Laŭ la kalkulo de la ‘Nigra libro de la Komunismo’ de Stéphane Courtois (1997), vd. https://en.wikipedia.org/wiki/The_Black_Book_of_Communism.



Titolpaĝo de *Schweizer Illustrierte Zeitung* de la 15a de decembro 1917, libroj de Platten (1924), Gautschi (1975) kaj Soljenicin (1977) kaj novaj libroj pri la konferencoj de Zimmerwald/Kiental kaj la revojaĝo de Lenin al Ruslando el brita perspektivo.

Epilogo

Kio okazis en Ruslando post la reveno de Lenin?

La historio de Lenin ne estus komplete rakontita, se oni forgesus priskribi, kio okazis en Ruslando post lia alveno en Petrogrado.

La revojaĝo de Lenin kaj ties grupo tra la Germana Regno kaj Svedio estis konsiderata de la ceteraj rusaj elmigrintoj en eksterlando kiel granda sukceso. Multaj aliaj rusaj elmigrintoj petis la samon de la germanoj, perdinte la timon reveturi al Ruslando, des pli ke ankaŭ Francio kaj Britio malfermis la limojn por ili. Tiel, centoj da rusoj revojaĝis al Ruslando laŭ la sama maniero kaj samaj kondiĉoj kiel Lenin kaj Platten ellaboris ilin kun la germanoj.

La trajno de Lenin alvenis en Petrogrado la 3an (16an) de aprilo je la 23a horo kaj 10 minutoj. Lenin timis esti arestita, sed tiu timo estis vana. Intertempe, la carismo estis forbalaita kaj ekinŝtaliĝis duobla regado de la Provizora Registaro kaj Petrograda Soveto.¹⁸⁴ Do, kiun ekzaktan politikan konstelacion li renkontis surloke:

La 26an de februaro (11a de marto) la caro suspendis la laboron de la IVa Ŝtata Dumao. Ĝia laboro estis anstataŭigita per la starigo de Provizora Komitato de la Ŝtata Dumao, kiu estis prezidata de M.V. Rodzjanko, prezidinto de la IVa Dumao. Tiu Komitato ricevis la taskon restarigi la ordon en la ŝtato. Sed la Komitato ne disponis pri la necesa potenco, ĉar la ribelemaj soldatoj de la Petrograda Garnizono (ĉ. 170 mil homoj) emis apogi la „Petrogradan Soveton de laboristaj kaj soldataj deputitoj”, kies unua kunveno spontane okazis la 27an de februaro (12an de marto). La efektivan influon en la sovetoj tiam havis la socialismaj revoluciuloj kaj la menŝevistoj. En tiu ĉi tago P.N. Miljukov, la gvidanto de la Kadeta partio kaj prezidanto de la Buroo de la Progresema Bloko, konvinkis la prezidanton de la Provizora Komitato de la Dumao, Rodzjanko, plenumi la provizoran formalan ŝtatan potencon kaj anonci la formadon de nova registaro. Post hezito Rodzjanko konsentis fari tion. Sekve, oni vokis princon Georgij E. L'vov veni el Moskvo al Petrogrado.¹⁸⁵ Li aperis la 1an (14an) de marto, kaj en la Komitato komenciĝis la preparoj por formi novan registaron. Kvankam la caro ankoraŭ regis, li jam ne plu estis konsiderata en tiu projekto. La 1an (14an) de marto kaj en noktaj kunsidoj al la venonta tago, en la kunveno de la Provizora Komitato de la Dumao, en kiu partoprenis la Centra Komitato de la Konstituci-demokratia partio, la Buroo de la Progresema Bloko kaj delegacioj de la Ekzekutiva Komitato de la Petrograda Soveto de laboristaj kaj soldataj deputitoj, oni interkonsentis pri la konsisto de la unua registara kabineto, kiu estis prezentita la venontan tagon. Tiu registaro devis anonci la okazigon de balotoj al la Konstitucianta Asembleo, kiuj devis okazi la 17a de septembro, sed kiuj poste estis prokrastitaj al la 12a de novembro. Al la **unua konsisto de la Provizora Registaro, kiu estis proklamita la 2an (15an) de marto, apartenis 11 ministroj, de kiuj kvin estis kadetoj, po unu estis socialisma revoluciulo (Kerenskij) kaj „oktobristo”, du estis senpartiaj, inter ili princo L'vov**

¹⁸⁴ VD, [https://en.wikipedia.org/wiki/Dual_power_\(Russian_Revolution\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Dual_power_(Russian_Revolution)).

¹⁸⁵ Pri princo L'vov vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Georgy_Lvov.

mem. Princo Georgij L'vov fariĝis ĉefministro kaj ministro pri internaj aferoj, Pavel' Miĵukov ministro pri eksteraj aferoj kaj Aleksandr Kerenskij ministro pri justico. La Petrograda Soveto, kies estro cetere nomiĝis Nikolos Ĉheidze, malpermesis al siaj membroj aliĝi al tiu registaro (do ankaŭ Kerenskij en principo ne rajtis aparteni al ĝi) kaj insistis pri tio, ke ĝi povu kontroli ĝian laboron.

La logiko de la eventoj kaŭzis, ke en tiu 2a (15a) de marto imperiestro Nikolao IIa abdikis de la trono kaj transdonis sian heredaĵon al la 38-jara grandprinco **Miĥail Aleksandroviĉ**, kiu estis lia pli juna frato. Sed jam la venontan tagon Miĥail anoncis al la popolo de Ruslando, ke la potenco unue transiru al la Provizora Registaro kaj ke li estos preta akcepti la tronheredon nur, se la popolo de Ruslando dezirus tion en postaj sekretaj balotoj al la Konstitucianta Asembleo (kiuj, kiel konate, devis okazi en septembro sed estis prokrastitaj al novembro).

La Provizora Registaro adoptis la modelon de la okcidenttipa parlamentismo, konservante la strukturon de la carisma konsilio de ministroj kaj strebante establi Ruslandon kiel dekstre-burĝan liberalisman kaj kapitalisman ŝtaton en alianco kun Britio kaj Francio. La dekstra flanko de la politikaj partioj estis subtenata de adeptoj de la konstitucia monarkio, al kiuj apartenis generaloj, konservativaj oficiroj, la radikaldekstremaj Nigraj Centuloj, la kadetoj, la t.n. oktobristoj (al kiu apartenis Rodzjanko). Flanke de la ekonomio la nova registaro estis apogata de la grandkapitalistoj kaj gravaj burĝaj sociaj organizaĵoj. La Provizora Registaro do celis konservi en principo la monarkiisman ŝtaton kaj ankaŭ ne ŝanĝis la malnovan ŝtatan aparaton, kvankam la sovetoj, sindikatoj kaj aliaj maldekstraj organizaĵoj postulis la demokratiigon de la ŝtato. Sian programon la Provizora Registaro publikigis la 3an (16an) kaj 6an (19an) de marto; ĝi antaŭvidis la daŭrigon de la milito „ĝis la fina venko” kaj la lojalan plenumon de la kontraktaj interkonsentoj kun la okcidentaj aliancanoj. En la interna politiko estis anoncitaj amnestio por ĉiuj politikaj malliberuloj, la enkonduko de serio de politikaj reformoj kaj la reorganizado de la polico kaj ŝtata administracio. La tuta laboro devis konduki al la preparado de la kunvokado de la Konstitucianta Asembleo. La 9an (22an de marto la Provizora Registaro estis agnoskita de la registaroj de Usono, post du tagoj ankaŭ de Grandbritio kaj Francio. Tiu politika solvo ŝajnis kontentigi tiujn potencojn. La Provizora Registaro estis en principo ankaŭ apogata de la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj, kiuj konsentis, ke ĝi estu kontrolata de la Petrograda Soveto de laboristaj kaj soldataj deputitoj, kvankam ĝi ne havis legitiman superan povon. La bolŝevistoj, kiuj celis radikalan kontraŭ-kapitalisman renverson, bojkotis ĝin. La ideo kaj espero de la maldekstruloj estis, ke ĉi tiu provizora regado-formo fine konduku al Soveta Respubliko.¹⁸⁶

Post la starigo de la Provizora Registaro kaj la abdiko de la caro la Ruslanda Imperio travivis senprecedencan centrifugan disfaladon: Pollando, la Baltaj provincoj kaj Finnlando forlasis la imperion kaj komencis konstitui sin kiel proprajn ŝtatojn. Ankaŭ en Ukrainio kaj Kaŭkazo okazis klopodoj por nacia kaj ŝtata sendependiĝo. La oficiala loĝzono de la judoj estis abolita. La bolŝevistoj subtenis kadre de sia „nacia politiko” la strebadojn de tiuj aŭtonomiaj movadoj.



Ĉefroluloj de la rusa revolucio en 1917: L'vov, Kerenskij, Miĵukov, Rodzjanko, Ĉheidze, Ĉernov, Cereteli (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio: https://de.wikipedia.org/wiki/Georgi_Jewgenjewitsch_Lwow, https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Fjodorowitsch_Kerenski, https://de.wikipedia.org/wiki/Pawel_Nikolajewitsch_Miljukow, https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Rodzianko, https://de.wikipedia.org/wiki/Nikolos_Tscheidse, https://de.wikipedia.org/wiki/Wiktor_Michailowitsch_Tschernow, https://de.wikipedia.org/wiki/Irakli_Zereteli)

¹⁸⁶ ([https://en.wikipedia.org/wiki/Soviet_republic_\(system_of_government\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Soviet_republic_(system_of_government))).

Unua krizo en aprilo kaj ĝia solvo per la unua koalicia Provizora Registaro

La problemo de la milito kaj paco estis unu el la plej urĝaj problemoj, kiun la ruslanda socio alfrontis post la forigo de la carismo. La 15an (28an) de marto la ĵurnalo *Novajaĵoj de la Soveto de Petrogrado de la laboristaj kaj soldataj deputitoj* eldonis manifeston de la Soveto de Petrogrado „al la popoloj de la mondo“, en kiu estis prezentita la politiko de la Soveto rilate la aferojn de la milito kaj paco. Tiuj principoj estis formulitaj malprecize en formo de alvoko kaj pro tio ili ne provokis larĝan diskuton ĉe la popolamasoj kaj havis neniun sekvon por la partioj reprezentataj en la Soveto, tiel ke la alvoko estis interpretebla de ili laŭ propra gusto kaj bontrovo.

Fine de marto, inter la Plenuma Komitato de la Petrograda Soveto kaj la Provizora Registaro estiĝis konflikto lige kun kelkaj kontraŭdiroj en tiu Manifesto koncerne la militon kaj la eldirojn de Miĵukov, ministro pri eksteraj aferoj de Ruslando (kiuj pro sia komplikeco restu ĉi tie netraktitaj). Ŝovante la respondecon por la milito al la antaŭa carisma registaro, la nova registaro promesis korekti la faritajn erarojn. La konflikto finiĝis per la publikigo de kompromise vortumita oficiala deklaro de la Provizora Registaro rilate la celojn de la milito en la 27a de marto (aprilo 9). La dokumento estis eldonita por trankviligi la amasojn kaj por kontentigi la aliancanojn. En la teksto aperis inter alie la vortoj pri mem-determinado de la popoloj, ke oni agos sen konfisko de ilia posedaĵo, sen anekso de fremda teritorio kaj sen kompensoj. La samon predikis Lenin kaj la bolŝevistoj. Sed tiaj deklaroj ne utilis nek helpis nek solvis la aktualan krizon, sed, male, kondukis al nova krizo en la venonta monato.

Intertempe alvenis, kiel menciite, Lenin la 3an (16an) de aprilo en Petrogrado. Grupo de bolŝevistoj, inter alie Aleksandra Kollontaj, kaj amaseto da scivolemuloj atendis lin ĉe la Finna Stacidomo por digne akcepti lin. Poste li veturis en la palacon de Matilda Kŝejinskaja, baletdancistino kaj iama konkubino de caro Nikolao IIa, kiu estis konfiskita kaj okupita de la bolŝevistoj por ekservi kiel ilia ĉefkomandejo. Ankoraŭ en la sama nokto Lenin elpaŝis sur la balkono per parolado, kun forta kritiko kontraŭ la Provizora Registaro, al kiu Lenin ne fidis kaj volis aliĝi. Liaj vortoj kaj frazoj sonis tiel radikale kaj fantazie, ke neniuj volis kredi ilin, tiel ke li restis izolata eĉ inter la propra adeptaro. Post longa foresto de Ruslando, kies realaĵojn li ne plu konis en la praktiko, li ŝajnis esti realecfremda profeto, sed li ne rezignis pri siaj eksplodaj ideoj, kiujn li rigore defendadis dum la kunsidoj de la venontaj tagoj. Laŭ Lenin nepre necesis renversi la Provizoran Registaron, ĉar se oni ne faros tion la kapitalistoj, burĝoj, post-caristoj kaj aliancanoj de la britoj kaj francoj daŭrigos militi kontraŭ Germanio. Ĉi tiuj ideoj kulminiĝis en lia fama „*aprila tezar*“, en kiu Lenin resumis sian politikan programon laŭ jenaj sloganoj: *La tuta potenco al la sovetoj, ĉesigo de la milito, konfiskado de la terposedantoj, kontrolado de la industrio fare de la laboristoj, ŝtatigo de la bankoj, starigo de soveta respubliko, forigo de la Provizora Registaro, fondo de revolucia Internacio, propagando kaj kleriga agado inter la amasoj kaj frontsoldatoj kaj akirado de la bolŝevisma plimulto en la konsilioj (sovetoj)*. Lenin klopodis trudi tiun programon, kiun Pleĥanov rifuzis kiel „aventurecan febran fantaziaĵon“ kaj pri kiu registarano Miĵukov mokis, ke ĝi signifas la finon de Lenin kaj de la bolŝevistoj, al sia partio, celante unuigi laboristojn kaj malriĉajn kamparanojn. Fakte, ankaŭ en la Petrograda Soveto de laboristoj kaj soldatoj neniuj subtenis aŭ aprobis la tezojn de Lenin, tiel ke dume li restis tute izolata. Dum la VIIa Tutruslanda konferenco de RSDLP(b) en aprilo la „*aprila tezar*“ de Lenin estis tamen adoptita kiel bazo por la partia politiko, sed ankaŭ tie ĝi alfrontis skeptikon kaj kontraŭstaron flanke de la liberaluloj kaj menŝevistoj.

Kiam V.M. Ĉernov revenis el eksterlando al Ruslando, li sciigis la publikon, ke en Eŭropo ekzistas la opinio, ke la Provizora Registaro kaj la sovetoj ne trovis interkonsenton rilate la demandon pri paco kaj milito kaj ke la deklaraĵo, en kiu oni konfirmis la rezignon pri imperiisma politiko; ne estis rimarkita en Eŭropo. Do, la Soveto proponis al la registaro, ke ĝi sendu al siaj aliancanoj noton por konfirmi siajn intencojn rilate la militcelojn. Sed intertempe la amasoj en Petrogrado ankaŭ komencis malfidi la Soveton koncerne ĝian kunlaboron kun la registaro. La publiko postulis pli deciditan revolucionan politikon, precipe la transiron de la potenco al la Soveto, kaj sur la kampo de la ekstera politiko ĝi postulis finon de la milito kaj la publikigon de la sekretaj interkonsentoj. La 18an de aprilo (1an de majo) la Provizora Registaro efektive sendis al la registaroj de Britio kaj Francio noton koncerne la deklaron pri de la registaraj celoj de la milito. Estis konfirmite, ke la Provizora Registaro intencas daŭrigi la militon ĝis la fina venko kaj plenumi la interkonsentojn de la carisma registaro. Krom tio, estis dementitaj onidiroj, ke Ruslando intencas diskuti kun Germanio pri speciala pactraktato. La noto de Miĵukov, kiu estis ricevita de la Soveto, komplete surprizis kaj mirigis ĝin, ĉar la enhavo de la teksto

venis por ĝi neatendite. Por la maldekstruloj la noto de Miljukov signifis grandan skandalon, fakte baton kontraŭ la dorso de la Soveto kaj provokis la rompon inter ambaŭ instancoj. La tuta kolero nun direktiĝis kontraŭ Miljukov. La plimultaj membroj de la Plenuma Komitato de la Soveto, kiuj elpaŝis pri tiu ĉi temo, postulis de la registaro publikan distanciĝon de tiu noto kaj eksigon de la ministroj Miljukov kaj Guĉkov. La registaro alfrontis kritikon ne nur de la bolŝevistoj kaj reprezentantoj de aliaj maldekstraj partioj en la Plenuma Komitato, sed ankaŭ de ĝiaj fidelaj subtenantoj. Estis faritaj sugestoj al la sovetoj por eksigi tiun registaron kaj mem alpreni la potencon. Tamen, dume neniu definitiva decido estis farita. Laŭ Ĉheidze, la registaro ja pretis demisii. Nature, pri la afero estis raportite en la gazetaro, kio eĉ pli instigis la laboristojn manifestacii, striki kaj postuli la demision de Miljukov, same la soldatoj en la kazernoj reagis en tiu senco. Tre emocia fariĝis la situacio antaŭ la Mariinskij-palaco, la sidejo de la Provizora Registaro, kie la soldatoj de la rezerva bataliono de la Finnlanda regimento ĉirkaŭis la konstruaĵon kaj postulis la eksigon de Miljukov. Ankaŭ la kadetoj postulis la demision de Miljukov. Oni prezentis rubandojn kun sloganoj, kiuj postulis la faligon de la Provizora Registaro. Sed la registaro evitis arestadon, kiu fakte minacis ĝin. La ĉefkomandisto de la Petrograda garnizono, generalo **L.G. Kornilov**, sukcesis igi la soldatojn reiri en la kazernon. Tio okazis la 20an de aprilo. Dume eksplodis la „aprila krizo” kaj la situacio en Petrogrado radikaliĝis. La 20/21ajn de aprilo (3/4ajn de majo) okazis amasaj kontraŭregistaraj manifestacioj, tiel ke kaj la Provizora Registaro kaj la Petrograda Soveto estis devigataj konkrete reagi. Aliflanke, kolektiĝis sennombraj apogantoj de la Provizora Registaro apud la eniro al ĝia rezidejo. Sed ĉefministro L’vov rifuzis la kritikon, ke lia registaro ne plenumas siajn devoj. Poste elpaŝis pluraj ministroj, kiuj pentris malhelan bildon pri la ekonomia stato de la lando. Tio impresis la anojn de la Plenuma Komitato de la Soveto, kiuj timis, ke la registaro efektive demisios kaj ke la Soveto devos transpreni la povon. La kadetoj parolis pri anarkio, kion la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj konsideris provoka, ĉar tia vorto povus signifi veran „civitanan militon“. Siavice, la Petrograda Urba Konferenco de la RSDLP(b), kiu okazis en ĉi tiuj tagoj, decidis alvoki la laboristojn kaj soldatojn fari pacajn demonstraciojn, kaj parto de la bolŝevistoj eĉ konsideris necese profiti la situacion por renversi la Provizoran Registaron.

En Petrogrado novajn protestojn iniciatis la laboristoj de la Vyborga urbokvartalo, kiuj decidis organizi tutlandan manifestacion por subteni la Soveton. Sed iuj reprezentantoj de la Plenuma Komitato iris tien por eviti tion. Sed ne eblis malhelpi la laboristojn manifestacii ankaŭ en aliaj urbopartoj. El ĉiuj partoj de la urbo la amasoj paŝadis sur la Nevskij-prospekton. Tio kondukis al perfortaj kunpuŝiĝoj inter manifestaciantoj sur la strato kaj kaŭzis kelkajn mortviktimojn. Ŝajnas, ke la batalema generalo Kornilov jam pretis sendi trupojn el iu kazerno, sed la oficiroj rifuzis obei lian ordonon, kaj ankaŭ Ĉheidze malpermesis al Kornilov sendi soldatojn en la urbocentron. La manifestacioj, kiuj estis organizitaj de la bolŝevistoj, okazis en la venontaj tagoj krom en Petrogrado ankaŭ en Moskvo, Ivanovo-Voznesensk kaj Tver’, sed ili ne ricevis la subtenon de la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj. La Petrograda Soveto eldonis rezolucion kaj malpermesis pliajn manifestaciojn en la urbo. La manifestaciantoj obeis kaj evitis pluan sangoverŝadon. Intertempe, en la gazetaro aperis la sciigo, ke la Provizora Registaro longe diskutis la menciitan noton al la aliancanoj kaj ke la registaranoj unuanime konsentis pri ĝi, krome estis dirite, ke la tezo pri la decidita venko super la malamikoj signifis nur la principe atingindajn militcelojn, kiuj estis proklamitaj en la deklaro de la 27a de marto.

Post tiu ŝtormo la situacio dume iom trankviliĝis, kaj inter L’vov/Kerenskij kaj la Plenuma Komitato de la Petrograda Soveto komenciĝis interparoloj ankaŭ kun la Moskva Soveto pri la retransformado de la Provizora Registaro kaj ĝia kompletigo per socialdemokratiaj ministroj kaj reprezentantoj de la Petrograda Soveto. Martov telegrafis el Zuriko la informon, ke liaj menŝevistoj neas ĉian partoprenon en tia koalicio. La 29an de aprilo (12an de majo) demisiis la milit-ministro Guĉkov kaj tri tagojn poste sekvis lin Miljukov mem. Tio estis la rezulto de la aprila krizo kaj la atingo de la laboristoj kaj soldatoj, kiuj apogis la Petrogradan Soveton. Kerenskij, kiu prezentis al la Plenuma Komitato la realecon pri la ekonomia kaj financa statoj de la lando, opiniis, ke nur nova koalicia registaro povus savi la ŝtaton. En tio li estis apogita de Cereteli. Flanke de la partioj esprimis sin por la formado de koalicio la frakcioj de la menŝevistoj, socialismaj revoluciuloj, popolaj socialistoj kaj trudovikoj, dum la bolŝevistoj kaj la menŝevistoj-internaciistoj estis kontraŭ. Finfine 44 membroj de la Plenuma Komitato voĉdonis por, 19 kontraŭ kaj 2 sindetenis. Oni elektis delegacion por la interparoloj kun la Provizora Registaro, al kiu apartenis reprezentantoj de la menŝevistoj, socialismaj revoluciuloj, popolaj socialistoj, trudovikoj kaj bolŝevistoj (Lev Kamanev, por informiĝi). Por ke la socialistoj eniru en la

koalicion, ŝlosilan rolon ludis I.G. Cereteli, la neoficiala gvidanto de la Plenuma Komitato de la Petrograda Soveto. La elekto de la novaj ministroj estis formalajo, kiu estis plenumita de la delegitoj de la Petrograda Soveto, kiu konsistis el pli ol du mil membroj. Nur ĉirkaŭ cent membroj voĉdonis kontraŭ la proponitaj kandidatoj, tiel ke **la 5an (18an) de majo la nova, unua koalicia Provizora Registaro povis estis prezentita al la publiko kun princo L'vov kiel ĉefministro, kvin kadetoj, tri menŝevistoj, du socialismaj revoluciuloj, po unu popola socialisto, oktobristo kaj centrismo kaj du senpartianoj, do entute 15 homoj.**¹⁸⁷ Iusence, la duobla aŭ paralela regado finiĝis, ĉar al la registaro apartenis nun homoj de ambaŭ politikaj tendaroj. Do, la demokratio en principo ne evoluis malbone en Ruslando. Sed la ekonomia situacio de la lando daŭre estis malbona, pro kio la homoj restis malkontentaj, la carismo estis nur duonmorta, la kapitalismo ne abolita, la burĝa karaktero de la registaro konservita, la demando de la posedo de la tero ne solvita, la milito kun Germanio daŭrigita, kaj malantaŭ la kulisoj Lenin celkonscie strebis laŭ konspira maniero al la akaparo de la povo.



Majestaj centroj de la rusa revolucio: Mariinskij-palaco, Smol'nyi-instituto, Taŭrida Palaco, Vintra Palaco (fotoj: Vikipedio) (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio: <https://de.wikipedia.org/wiki/Mariinski-Palast>, https://en.wikipedia.org/wiki/File:RUS-2016-SPB-Smolny_Institute_02.jpg, https://de.wikipedia.org/wiki/Taurisches_Palais, <https://it.wikipedia.org/wiki/Ermitage>)

Junia krizo

Sub tiaj cirkonstancoj la t.n. „junia krizo” jam anonciĝis. De la 3a ĝis 24 de junio (16a de junio ĝis 7a de julio) okazis la Unua Tutruslanda Kongreso de deputitoj de la laboristaj kaj soldataj sovetoj, kiu estis dominata de socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj, kiuj apogis la Provizoran Registaron kaj rifuzis la postulon de la bolŝevistoj fini la militon kaj transdoni la potencon al la sovetoj. Tiuj politikaj ludoj fortigis la ĉagrenon de la popolamasoj. Okazis laboristaj strikoj en 29 petrogradaj fabrikoj, kvankam la kongreso malpermesis kontraŭregistarajn manifestaciojn kaj kulpigis la bolŝevistojn, ke ili celas „militan konspiron”. Lenin deklaris, ke lia partio pretas transpreni la povon, sed tiu oferto trovis malmultan aplaŭdon, ĉar de 1090 delegitoj nur 105 estis bolŝevistoj. Kvankam la Kongreso decidis aranĝi por la 18a de junio (1a de julio) ĝeneralan manifestacion sur la Marsa kampo por subteni la Provizoran Registaron, okazis la malo de la intenco, ĉar la duonmiliono da manifestaciantoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ bolŝevistoj, montris sloganojn favore al la sovetoj kaj postulis „panon, pacon, liberecon”. Sub tiaj sloganoj okazis samaj manifestacioj en Moskvo kaj diversaj aliaj urboj de Ruslando. Lenin konkludis, ke la krizo estas perfekta.

La 18an de junio (1a de julio) la armeo de Ruslando komencis „strategian ofensivon” ĉe la sudokcidenta fronto. Per tio Kerenskij esperis savi la rusan revolucion, sed li krude mistaksis la realaĵojn. Jam post du tagoj la ofensivo estis interrompita kaj haltigita, ĉar la soldatoj rifuzis batali, des pli ke la kontraŭatako de la aŭstra armeo ne maltrafis sian efikon kaj kaŭzis al la rusa armoo signifajn perdojn. La renovigo de la armeaj aktivecoj kondukis al novaj amasaj kontraŭregistaraj manifestacioj en Petrogrado, kaj al la t.n. „junia krizo”.

La junian krizon komplikis ankaŭ la incidento, ke la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj estis eksigitaj el la Tutruslanda Centra Plenuma Komitato (VCIK), kiu estis fondita dum la Unua Tutruslanda Kongreso de la deputitoj de laboristaj kaj soldataj sovetoj (kaj prezidata de la menŝevisto N. Ĉheidze). Ĝi devis fariĝi la plej supera leĝdona, ordona kaj kontrolanta organo de la soveta ŝtato.¹⁸⁸ La eksigo de la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj el tiu ĉi instanco pro la akuzo esti organizinta kontraŭrevolucion kaj partopreninta en kontraŭsovetaj agadoj kaŭzis, ke Martov, kiu intertempe revenis al Petrogrado, perdis la influon kaj povon. Martov akre blasfemis kontraŭ la bolŝevistoj kaj maldekstraj

¹⁸⁷ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Апрельский_кризис.

¹⁸⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Allrussisches_Zentrales_Exekutivkomitee.

socialismaj revoluciuloj, kiujn li nomis diktatoroj, bonapartuloj kaj uzurpantoj kaj kolere forlasis la salonon.¹⁸⁹

Ĉi tiu „junia krizo” baldaŭ kondukis al la eĉ pli grava „julia krizo”, kiu havis la sekvajn ĉefajn momentojn kaj trajtojn.

Julia krizo

La 3an (16an) de la julio okazis amaskunveno, ĉe kiu iu anarkiisto faris iun paroladon. La 1a mitrala regimento sendis siajn delegitojn al Kronŝtadt, kies soldatoj estis alvokitaj armiĝi kaj marŝi kontraŭ Petrogradon. Samtempe, la estro de la kontraŭspiona servo de la Petrograda milita distrikto, B.V. Nikitin, ricevis informon, ke la bolŝevistoj intencas entrepreni armatan ribelon en la sekva tago, iros al la Taŭrida Palaco, forpelos parton de la deputitoj, kiuj subtenas la Provizoran Registaron, anoncos, ke la supera povo estos transdonita al la sovetoj kaj formos novan registaron. Antaŭ noktomezo, kiam iuj manifestaciantoj pasis ĉe Gostinnyj Dvor, eksplodis grenado kaj komenciĝis paŝado kaj kontraŭpaŝado, kio kaŭzis mortintojn kaj vunditojn. Je la noktomezo, iuj manifestantoj plenigis la stratojn ĉirkaŭ la Taŭrida Palaco. Dum la bolŝevistoj kunvenis por interkonsiliĝi, Lenin troviĝis en Finnlando (Neuvola) kaj nenion sciis pri tiu intencata ribelo de la Kronŝtadtaj matrosoj, kiuj subtenis la bolŝevistojn. Matene, la 4an de julio la matrosoj de Kronŝtadt kolektiĝis kaj estis ekveturontoj per ŝipoj, kiuj moviĝis de la insulo al Petrogrado. Alveninte tie, la matrosoj marŝis al la Peterburga flanko por atingi la bolŝevistan ĉefkomandojn, la palacon de la imperiestra ĉefdancistino kaj cara eksamatino Matil´da Kŝesinskaja.¹⁹⁰ De la balkono oratoris Sverdlov, Lunaĉarskij kaj Lenin (kiu revenis en tiu ĉi tago de Neuvola al Petrogrado¹⁹¹).

Sverdlov alvokis la amasojn postuli la forigon de la „kapitalismaj ministroj” el la registaro kaj transdoni la potencon al la sovetoj. La armata manifestacio okazis sur la Troickij-ponto, la Sadovaja-strato, la Nevskij-prospekto kaj Litejnij-prospekto, kaj moviĝis al la Taŭrida Palaco, kiam en la angulo de la Litejnij-prospekto kaj la Pantelejmonov-strato la marista taĉmento estis atakita de fajro de mitraloj el la fenestroj de unu el la domoj – tri Kronŝtadtaj matrosoj estis mortigitaj, pli ol dek vunditaj. Ankaŭ la matrosoj komencis hazardpafi en ĉiujn direktojn. Sekve al tiu tuta tumulto okazis marodado kaj rabado de vendejoj kaj loĝejoj. La polico ne kapablis kontroli la ordon en la urbo, kion eĉ la ministro pri internaj aferoj devis konfesi.

La matrosoj, gvidataj de F.F. Raskol´nikov, atingis la Taŭridan Palacon, kies antaŭplaco iom post iom plenigis de multmiloj da soldatoj de sep regimentoj de la Petrograda garnizono, de Kronŝtadtaj matrosoj, laboristoj de la Pulkovo-fabriko kaj de la Vyborga flanko. La Tutruslanda Centra Plenumkomitato vokis la Volhinian regimenton por defendi la Taŭridan Palacon antaŭ la supozata atako de la bolŝevistoj. En la nokto al la 5a de julio la VCIK proklamis la militan staton, kio aŭtomate enkondukis la ĉasadon de la bolŝevistoj. La manifestaciantoj sendis kvin delegitojn al la VCIK, por postuli de ĝi la senprokrastan transprenon la potencon, ĉar la Provizora Registaro praktike kolapsis. La gvidantoj de la menŝevistoj kaj socialismaj revoluciuloj promesis kunvoki post 2 semajnoj novan Tutruslandan Sovetkongreson, se ne estos alia solvo por transdoni la potencon al ĝi. La diskutoj inter la bolŝevistoj kaj la VCIK, kiu troviĝis en la manoj de la menŝevistoj kaj socialismaj revoluciuloj, cetere estis gvidataj de Stalin, kiu havis la reputacion de „modera” bolŝevisto. Tio signifis, ke Stalin ne estis metita sur la liston de bolŝevistoj, kiuj estis arestotaj, kvankam li apartenis al la CK RSDLP(b). Krom tio, kiel interesa detalo, la diskutoj kun la estro de la Plenumkomitato de la Petrograda Soveto, N.S. Ĉheidze, estis faciligitaj, ĉar li estis kartvelo, kiel Stalin. Grupo de homoj eniris la Taŭridan palacon por aresti la justicministron P.N. Pereversev (menŝevisto), sed anstataŭ li oni arestis la ministron pri agrikulturo, V.M. Ĉernov (socialisma revoluciulo). Membroj de la VCIK klopodis raciigi la matrosojn, kiuj ĉirkaŭis Ĉernovon, sed ili ricevis nur krudajn ofendojn de ili. Dank´ al interveno de Trockij, kiu elpaŝis per parolado antaŭ la amaso, Ĉernov estis liberigita, kaj la amaso malkontente disiĝis. Kiam P.A.

¹⁸⁹ Laŭ Volkogonov, Lenin, p. 89. En 1919-20 Martov denove membris en la VCIK, kiam ĝi jam havis la realan potencon kiel plej supera leĝdona, ordona kaj kontrolanta organo de la soveta ŝtato.

¹⁹⁰ Vd. https://fr.wikipedia.org/wiki/Hôtel_particulier_de_la_Kschessinska kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Matilda_Felixowna_Kschessinskaja.

¹⁹¹ Vd. http://istmat.info/files/uploads/29881/lenin_finn.pdf, p. 101.

Polovcov, la komandisto de la trupoj de la milita distrikto, eksciis pri la arestado de Ĉernov, li decidis aktive interveni kiel savanto de la Petrograda Soveto. Li ordonis al la komandisto de la taĉmento de la ĉevala artilerio, Rehbinder, moviĝi kun sia trupo kaj kelkcent kozakoj de la Unua Donregimento al la proksimeco de la Taŭrida palaco kaj malfermi la fajron kontraŭ la amason, kiu tie kolektiĝis. Sed Rehbinder mem estis kontraŭpafata de du flankoj fare de iuj krimuloj. Rehbinder pafis retroen kaj trafis diversajn lokojn. Dum ok civiluloj, ses kozakoj kaj kvar ĉevalaj artilerianoj pereis, la resto panike diskuradis. Pereis ankaŭ ĉevaloj kaj vundiĝis multaj homoj. En tiun militon enmiksiĝis ankaŭ bolŝevismigitaj soldatoj de la Unua Rezerva Regimento, kiuj kontraŭstaris la kozakojn. Tamen, la panikon ne kaŭzis la artileria pafado, sed la pafado, kiu okazis en la amaso kontraŭ la Taŭrida Palaco. En la mateno de la 5a de julio la matrosoj returniĝis al Kronŝtadt kaj Stalin daŭrigis siajn interparolojn kun la reprezentantoj de la VCIK, kiu laŭ lia opinio tute neglektis siajn devojn. Samtempe, trupoj de la Georga kavalerio kaj junkeroj komencis arestadi bolŝevismajn batalantojn. La resto de la disbatitaj bolŝevistoj aperis antaŭ la Kŝesinskaja-palaco kaj okupis la nordan finon de la Troickij-ponto, dum la ponto mem estis akaparita de registaraj trupoj. La Petropaŭla fortikaĵo estis okupata de parto de Kronŝtadtaj matrosoj kaj anarkiistoj (kiuj, cetere, ankaŭ ludis iun rolon en tiu revolucio). Kontraŭ ili estis starigita taĉmento de la Petrograda milita distrikto sub la komando de la revolucia kapitano A.I. Kuz'min. La junkeroj konkeris la redakcion kaj presejon de la gazeto *Pravda*, kiun Lenin forlasis kelkajn minutojn antaŭ ilia alveno. La junkeroj traserĉadis la konstruaĵon kaj forĵetis la freŝe presitajn gazetojn en la riveron Mojka. La gazeto daŭrigis sian laboron sub la titolo *Listok pravdy* (folio de la vero).

La 6an de julio la taĉmento de Kuz'min preparis la sturmadon de la Kŝesinskaja-palaco, sed la bolŝevistoj, kiuj estis okupataj pri la evakuado de la partia arkivo, decidis ne defendi ĝin. Sep bolŝevistoj estis arestitaj, inter kiuj troviĝis la gardisto de Lenin, Vasil'ev. Intertempe, Stalin atingis la kapitulacion de la Kronŝtadtaj matrosoj en la fortikaĵo, kiuj konsentis reiri al siaj kazernoj. La 6an de julio ankaŭ la trupoj komencis reveni de la fronto al la ĉefurbo, kune kun Kerenskij, kiu troviĝis tie kaj kiu vidis sin nova Gvidanto de Ruslando. Survoje al Petrogrado la vagono de Kerenskij estis parte detruita pro la eksplodita bombo.

La 7an de julio demisiis la justic-ministro Pereversev, kaj iom poste forlasis la Provizoran Registaron ĉefministro L'vov mem. La revo de L'vov kaj liaj samideanoj inkluzive de Kerenskij transformi Ruslandon „al la plej libera lando de la mondo” dume krevis. Sekve al tiu ĉi registara krizo estis formita, **la 10an (23an) de julio, dua koalicia registaro, kiu estis gvidata de Kerenskij kaj konsistis ĉefe el socialismaj revoluciuloj, menŝevistoj kaj radikalaj demokratoj. La nova registaro translokiĝis de la Marijnŝkij-palaco al la Vintra Palaco.** Kerenskij fariĝis nova ĉefministro kun la praktika potenco de diktatoro de Ruslando. La celo de Kerenskij estis eviti la disfalon de Ruslando kaj armean intervenon de eksterlandaj potencoj, ĉar tia danĝero reale ekzistis.

Kerenskij, kiu mem estis maldekstrulo, sed gvidis la dekstran politikan eliton, klopodis diskrediti la bolŝevistojn kiel pagitajn agentojn de la Germana Regno kaj malpermesis ilian partion, kies puĉprovo fiaskis, tiel ke la bolŝevistoj estis devigitaj retiriĝi. En la sekvo ili estis devigataj agi kontraŭleĝe. En tiu situacio la bolŝevistoj vidis solan eblecon transpreni la povon pere de armata ribelo. Dum ilia partia konferenco, kiu okazis fine de julio, oni prenis decidojn en tiu senco por prepari ĝin.

Ne nur la Provizora Registaro riproĉis al la bolŝevistoj, ke ili havas kontaktojn kun la germana spionado, sed ankaŭ la usonanoj estis konvinkitaj, ke Lenin ricevis monon de Germanio. Fakte, jam la 6an de julio la Provizora Registaro starigis specialan komisionon por esplori la ribelon. Kiel konkretajn kulpantojn kaj respondeculojn oni suspektis Lenin, Lunaĉarskij, Zinov'ev, Kollontaj, Kozlovskij, Sumentson, Semaŝko, Parvus, Ganeckij, Raskol'nikov kaj Roŝal, sed ankaŭ Kamenev kaj Trockij mem, kiu montris solidarecon kun la bolŝevistoj. El la vidpunto de la Provizora Registaro tiuj homoj devis esti arestitaj kune kun la gvidantoj de la matrosoj de Kronŝtadt, kie la soveto akaparis la povon. Fakte, entute 800 bolŝevistoj estis arestitaj, la loĝejo de la fratino de Lenin, kie vivis ankaŭ Krupskaja, estis vizitata kaj traserĉita de la polico. Lenin ŝanĝis dume kvin diversajn konspirajn loĝejojn. La 9an de julio junkeroj disbatis la bolŝevistajn komandejojn en la Litejnyj- kaj Petrograda urbaj distriktoj. Aleksandra Kollontaj estis arestita la 13an de julio en Tornio ĉe la sved-finna limo. Tiu ondo de arestoj estis tikla fazo por Lenin, kiu certe devis timi la plej malbonan sorton por si mem en kazo de arestado: Proceson kontraŭ li aŭ pro iniciatado de ribelo kun multaj viktimoj aŭ, eĉ pli verŝajne, pro spionado kun Germanio. Tio povintus signifi la definitivan finon de la bolŝevismo, kaj tio devis esti nepre evitata. Kune kun Zinov'ev

Lenin fuĝis al Razliv en la Petrograda gubernio, kie li kaŝiĝis en la palaco de la laboristo N.A. Emel'janov.¹⁹² La ordonon aresti Leninon subskribos Andrej Vyŝinskij, la fifama stalinisma ĉefprokuroro de USSR, kiu en 1917 estis menŝevisto! Oficiro estis sendita al Terjoki (Zelenogorsk) kun la espero povi aresti lin tie. En la gazetaro cirkuladis diversaj onidiroj, ke Lenin estis arestita aŭ fuĝis al Kronŝtadt aŭ al eksterlando, al Svedio aŭ Germanio. Dum Lenin estis en Finnlando, kelkaj neorganizataj grupoj el la proletaro sturmis la Taŭridan Palacon kaj postulis la eksigon de la Provizora Registaro kaj la transprenon de la povo fare de la sovetoj. Post sia fuĝo Lenin petis Lev Kamenev eldoni la verkaĵon „Ŝtato kaj revolucio” en kazo de sia morto. La 26-an de julio, la VIa Kongreso de RSDLP(b) aprobis la decidon, ke Lenin ne estu prezentita al tribunalo. La 7an de septembro la arestitaj bolŝevistoj estis liberigitaj de la Provizora Registaro.

Post la juliaj eventoj la publika opinio en Ruslando moviĝis dekstren kaj entenis la rifuzon de la sovetoj kaj de la socialistoj entute, inkluzive la moderajn socialismajn revoluciojn kaj menŝevistojn. Sed la Provizora Registaro, kiu dume regadis jam sep monatojn kaj povis repuŝi la bolŝevistojn, ne sukcesis plibonigi la ekonomian situacion de la lando. La rublo perdis sian valoron kaj la provizado de Petrogrado per varoj malboniĝis. En tiu situacio la publika opinio radikaliĝis laŭ la alternativoj, ke iuj deziris iun fortan dekstran potencon, dum aliaj preferis la bolŝevistojn. La dekstran tendencon favoris la solena funebra entombigo de 16 donkozakoj, kiuj pereis dum la juliaj kunpuŝiĝoj. La 18an de julio reatendite reviviĝis la Provizora Komitato de la Ŝtata Dumao, kiu ludis ŝlosilan rolon dum la Februara revolucio, sed kiu dume disvolvis neniujn iniciatojn. En ĝi dekstremaj monarkiismaj deputitoj akre atakis la bolŝevistojn kaj ĝenerale ĉiujn socialistojn kaj la sistemon de sovetoj. Do, por gajni apogon, la bolŝevistoj estis devigitaj aranĝi sian agadon laŭleĝe. La oficiala organo de la VCIK kvazaŭ kulpigis la manifestaciantojn, ke ili kaŭzis per siaj tumultoj tiom multajn viktimojn, tiel ke la revolucio ricevis teruran baton. Estis malpermesitaj la bolŝevismaj gazeto *Pravda* kaj *Soldatskaja pravda*. *Pravda* ricevis la novan nomon *Raboĉij i soldat*. Parto de la mitrala regimento estis transformita aŭ sendita al la fronto, la regimenta komitato estis arestita, kaj parto de la soldatoj dizertis. La Ruĝa Gvardio estis preskaŭ tute likvidita. Ĉar parto de la bolŝevismigita Petrograda Garnizona deklaris sian lojalecon al la Provizora Registaro, ĝi restis armita. La Petrograda Soveto ignoris la riproĉon de Lenin pri ŝtata perfido, dum la VCIK nomis la bolŝevistojn „erarigitaj sed honestaj batalantoj”.

Malgraŭ tiuj atakoj kontraŭ la bolŝevistoj, Lenin, kiun iuj konsideris fantaziulo kaj frenezulo – oni parolis pri la baldaŭa entombigo de la bolŝevisma partio – en la monatoj post sia reveno al Ruslando povis trovi sufiĉe da energio por konvinki kaj mobilizi siajn partianojn kaj apogantojn kaj gajni pli kaj pli da subteno en difinitaj tavoloj de la popolo, precipe ĉe laboristoj kaj frontsoldatoj, kvankam la konsilioj (sovetoj) evoluis tute sendepende de la bolŝevistoj. De kompare malgranda movado de 23'600 membroj en februaro 1917 la nombro de bolŝevistoj kreskis al 80'000 ĝis la fino de aprilo. Sed la revoluciaj laboristoj tute ne interesiĝis pri la teorioj de Zimmerwald, sed postulis konkretajn ŝanĝojn de sia ĉiutaga vivo, kiu iĝis pli kaj pli malfacila. La socialistoj kvereladis inter si pri la konsekvencoj, kiuj estis tirendaj el la februara revolucio, pri la sinteno rilate al la Provizora Registaro kaj pri la rolo, kiun la laboristoj ludu en tiu situacio.

Ekzistis kelkcent laboristaj kaj soldataj konsilioj, kiuj formis novan politikan klason. La plej demokratia konsilio estis tiu de la Kronŝtadtaj matrosoj, kiuj formis anarkiisman-revolucian tavolon, kiu emis apogi la bolŝevistojn (kaj kiuj en julio konkrete ekagis). Komuna konsilio, kiu reprezentis tutan Ruslandon, ne ekzistis, sed la Petrograda Soveto provizore plenumis tiun ĉi funkcion. Do, elkristaliĝis du konkurencaj fortoj, kiuj luktis por la politika povo: La Petrograda Soveto de laboristaj kaj soldataj deputitoj kaj la Provizora Registaro, kiu iusence dependis de la Petrograda Soveto, de kiu ĝi estis kreita kaj kontrolata. Iuj parolis pri „duobla regado” en Ruslando. Tiu antagonismo principe ankaŭ ne ŝanĝiĝis post la instalado de la koalicia registaro.

La historiistoj – kaj rusaj kaj okcidentaj – diversmaniere interpretis la juliajn eventojn en Ruslando. Dum unu parto estis konvinkita, ke la bolŝevistoj celis ŝtatan renverson (kun la helpo de la popolamaso kaj soldatoj de difinitaj regimentoj) kun la celo forigi la Provizoran Registaron, aliaj opiniis, ke en la kazo de la julia ribelo temis „nur” aŭ pri ĝenerala testo de la bolŝevistoj akapari la povon aŭ pri la intenco transdoni ĝin al la sovetoj. Kiel ajn, la ribelo de la bolŝevistoj mizere fiaskis, sed ilia partio

¹⁹² Vd. В. И. Ленин в Разливе в 1917 году en [Wikipedia](#).

ne estis disbatita.¹⁹³ Laŭ la atesto de Suĥanov, menŝevisma kronikisto de la rusa revolucio, la celo de la bolŝevistoj dum la julia ribelo estis la starigo de bolŝevisma sovetregistaro sub la gvido de la triopo Lenin-Trockij-Lunaĉarskij, sed poste kaj Trockij kaj Lunaĉarskij neis tiun teorion. La 26an de julio (8an de aŭgusto) komenciĝis en Petrogrado kun duona permeso la VIa kongreso de RSDLP, kiu daŭris ĝis la 3a (18a) de aŭgusto.

Lavr Kornilov kaj la aŭgusta krizo

En tiu tempo, generalo *Lavr Kornilov* (1870-1918),¹⁹⁴ alia grava rolulo de la rusa revolucio, kiu post la februara revolucio komandis la Petrogradan Armean Distrikton kaj arestis la caran familion en marto 1917 en Carskoe Selo, gajnis pli kaj pli da influo, favorante ofensivon en okcidento. Sed ĝi fiaskis kaj la soldatoj perdis la emon militi kontraŭ la germanoj kaj aŭstroj. La 5an de julio la rusaj trupoj estis devigitaj retiriĝi, kun 60'000 anoj malpli, ĉar tiom da soldatoj perdis sian vivon en la bataloj en Galicio. Multaj taĉmentoj rifuzis la ordonon plu militi. En Ruslando strikis duonmiliono da laboristoj kaj dek mil Kronŝtadtaj matrosoj. Malgraŭ la laceco de la soldatoj, Kornilov, la komandisto de la rusaj trupoj, volis daŭrigi la militon.

Sekve al la julia ribelo Kornilov ricevis la taskon koncentri trupojn ĉirkaŭ la ĉefurbo.

Por ordigi la politikan vivon en Ruslando devis esti starigita la Konstitucia Asembleo. Sed ĝia kunvokado estis ĉiam denove prokrastita. Por solvi la krizon en aŭgusto en Moskvo estis aranĝita la „Granda Ŝtatkonferenco”, kiu estis elpensita de Kerenskij kiel forumo por kunigi ĉiujn esencajn politikajn fortojn de Ruslando. Ĝi konsistis el 2500 anoj, inter ili 488 iamaj membroj de la Dumao, 129 reprezentantoj de kamparanaj konsilioj, 100 reprezentantoj de laboristaj kaj soldataj konsilioj, 176 sindikatanoj kaj aliaj. La radikalaj maldekstruloj bojkotis la konferencon kaj klopodis perturbi ĝin per strikoj kaj manifestacioj. Sed la moskva Asembleo okazis kaj praktike fariĝis podio por la dekstruloj kaj precipe por generalo Kornilov mem, kiu prezentis ege radikalan programon kaj fanfaronis kiel savanto de Ruslando. Kvankam ĝi estis granda sukceso kaj merito de Kerenskij, la konferenco finfine ne povis solvi la aktualan krizon, kiu pli kaj pli akriĝis.¹⁹⁵ Ĉar Kornilov, kiu estis radikala kontraŭulo de la maldekstruloj kaj sovetoj, fariĝis tro granda risko, la 27an de aŭgusto (9an de septembro) Kerenskij decidis liberigi lin de liaj funkcioj, sed la obstina generalo rifuzis la ordonon kaj alvokis la popolon de Petrogrado apogi lin en la lukto kontraŭ la sovetoj. Sed la atendoj de Kornilov estis vanaj kaj ne ricevis la petitan apogon. Kerenskij venis al la konkludo, ĉu prave aŭ ne, ke Kornilov planas puĉon kontraŭ la Provizora Registaro, kaj do faris kurtan proceson kun li, tiel ke la skandalema generalo estis forigita de siaj pozicioj kaj poste ankaŭ arestita.



Bizara figuro de la rusa revolucio, kiu tragike fiaskis: Lavr Kornilov
(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
https://en.wikipedia.org/wiki/Lavr_Kornilov, https://ru.wikipedia.org/wiki/Корнилов,_Лавр_Георгиевич)

Ne nur en vastaj tavoloj de la ruslanda popolo Kerenskij, Kornilov kaj la Provizora Registaro perdis pli kaj pli da kredito, sed la popolo eĉ timis, ke ili povus restarigi la iaman carisman regadon, kio tamen

¹⁹³ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Июльские_дни. Kun elementoj el la ĉi-koncerna ĉapitro ĉe Volkogonov, Lenin, p. 122-133.

¹⁹⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Lavr_Georgijewitsch_Kornilow.

¹⁹⁵ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Государственное_совещание_в_Москве.

estis nepre evitenda. Finfine ekzistis ankoraŭ grandprinco Mikaelo, kiu nur provizore abdikis kaj atendis sian momenton por cariĝi. Ankaŭ Lenin konkludis, ke la dekstraj fortoj elĉerpiĝis kaj la maldekstra revolucio povos ricevi novan ŝancon efektivigi. La 31an de aŭgusto Kamanev anoncis la finon de la alianco kun la dekstruloj kaj postulis la proklamon de demokratia respubliko, sed la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj rifuzis la koncernan rezolucion. En septembro ili ankaŭ faris la eraron kaj retiriĝis de la ekzekutiva komitato en la Petrograda Soveto, kiu nun estis kontrolata de la bolŝevistoj. Trockij vidis la menŝevistojn esti ĵetitaj en la „rubafujon de la historio“.

La 1an (14an) de septembro Kerenskij kreis **Direktorion** konsistantan el kvin ministroj – Kerenskij, Tereŝenko, Verĥovskij, Verderevskij kaj Nikitin – kiu ricevis specialajn kompetencojn por restarigi la ordon. Sub la influo de la sovetoj la Direktorio proklamis Ruslandon respubliko.

La posedantaj klasoj fariĝis eĉ pli konservativaj, parto de la popolamasoj radikaliĝis, dum la pli moderaj socialistaj grupoj, kiuj daŭre apogis la Provizoran Registaron, opiniis, ke la revolucio daŭras jam tro longe sen esti kondukita al iu bona fino. Oni emis ĉesigi la revolucion, kiu evidente troviĝis en dilemo. Sed la laboristoj kaj soldatoj ne pensis pri fino. La soldatoj dizertis, la kampanoj bruligis la bienojn, la laboristoj strikis, sed la fabrikistoj, farmistoj kaj oficiroj ne deziris demokratiajn reformojn.

En septembro okazis Tutruslanda Demokratia Konferenco, kunvokita de la Centra Ekzekutiva Komitato de la Sovetoj de laboristaj kaj soldataj deputitoj, kiel konkurenco al la Moskva Ŝtata Konferenco de Kerenskij kaj Kornilov en aŭgusto. Tiu konferenco, al kiu estis invititaj nur maldekstraj partioj kaj organizaĵoj, elektis konstantan Provizoran Respublikan Soveton, do kvazaŭ provizoran parlamenton.

La 25an de septembro (8a de oktobro) estis formita la tria koalicio de la Provizora Registaro kun Kerenskij kiel ĉefministro kaj 13 aliaj ministroj kaj tri aldonaj registaraj funkciuloj. Al tiu koalicio do apartenis 4 kadetoj, 2 socialismaj revoluciuloj, 3 menŝevistoj, 1 trudoviko, 1 „nekonatulo” kaj 2 militaj fakuloj.

La Provizora Registaro ŝanceliĝis inter duonvaloraj reformoj kaj senteblo subpremado de la agado de la laboristaj sovetoj. Radikalaj gazetoj estis malpermesitaj, la mortpuno kontraŭ revoluciaj propagandistoj aplikita, la ruĝaj gvardianoj devis esti senarmigitaj kaj la kozakoj devis restarigi la ordon en la provinco. Samtempe la Provizora Registaro pli kaj pli agoniis kaj kaŭzis politikan vakuon en Ruslando, tiel ke la ŝtato komencis ĉesi reale funkcii.

Oktobra finkalkulado

La intenco de Lenin kaj Trockij, kiu intertempe aliĝis oficiale al la bolŝevistoj, estis fortigi la Petrogradan Soveton kaj submeti ĝin al la volo de la bolŝevistoj. En tiu situacio utilis la sinteno de parto de la popolamasoj, kiuj vidis la atingojn de la februara revolucio en danĝero kaj komencis denove atenti la postulojn de la maldekstruloj. Sed Lenin estis grandparte nekonata en Ruslando, la bolŝevistoj estis nur minimume reprezentataj en la diversaj politikaj gremioj, kaj la revolucia amasmovado evoluis sendepende de la bolŝevistoj. Kvankam tiu procezo okazis sufiĉe videble en la senco de Lenin, oni ne povis diri, ke la bolŝevistoj gvidis la revolucie orientitajn amasojn. La homoj en Ruslando ne apogis unuavice politikajn partiojn, sed provis puŝi siajn proprajn interesojn. Ne gravis politikaj partioj en si mem, sed programoj, kiuj rilatis al esencaj aktualaj temoj kiel terposedo, bonfarto, paco k.s. Kiu hodiaŭ apogis la menŝevistojn, tiu morgaŭ povis apogi la bolŝevistojn, kaj inverse. Partioj kaj institucioj, konsilioj aŭ parlamentoj, kiuj devis servi al la popolo, ne havis tradicion en Ruslando, al kiu mankis la demokratia sperto. Post jarcentojn longa carisma regado, tiuj novaj politikaj strukturoj signifis nur ion abstraktan por la malkleraj amasoj. Ankaŭ Lenin ne havis iun alian celon ol sekvi siajn interesojn: akapari la ŝtatan povon kaj aboli la kapitalismon kaj likvidi la burĝan klason en Ruslando Lenin ne havis. Por li la revolucio estus perfidita, se la bolŝevistoj ne akaparos la povon.

La 3an (16an) de oktobro kunvenis la CK de la bolŝevisma partio RSDLP(b). La rezolucio de la 27a de septembro (10a de oktobro), kiu sankciis principe la „tagon de la ribelo”, estis akceptita de 22 ĉeestantoj kun du kontraŭaj voĉoj. Oni ankaŭ interkonsentis pri tio, ke la „armata ribelo” okazu antaŭ la venonta Kongreso de la sovetoj en oktobro por konfirmi la sukcese efektivigitan revolucion kaj la finon de la „duobla regado” dum tiu kongreso. Lenin tute ne emis atendi ĝis la kunvokado de la Konstitucianta

Asembleo, ĉar li timis, ke en tiu organo kaj en la posta reorganizado de la ŝtato la bolŝevistoj ludos malgrandan rolon kaj povus esti forpuŝitaj de la aliaj partioj. El Finnlando Lenin urĝigis la bolŝevistojn per emociaj leteroj al baldaŭa ribelo, sed la CK-membroj estis ŝokitaj pri la ekstrema radikaleco de sia partia gvidanto, tiel ke Kamenev kaj Zinov'ev devis admoni lin, ke ekzistas la risko, ke la julia fiasko povus ripetiĝi, kaj proponis rezigni pri armata ribelo. La plimulto de la CK apogis la ideon de Trockij koincidigi la ribelon kun la kunvokado de la 2a Tutruslanda Sovetkongreso, t.e. proklami la ribelon en ĝia kadro, do kvazaŭ tute demokratie kaj oficiale.

La 7an (20an) de oktobro Lenin translokiĝis de Vyborg al Petrogrado. Samtage, la justicministro (kiu estis la menŝevisto P.N. Maljantoviĉ¹⁹⁶) ordonis la arestadon de Lenin, kiu kaŝiĝis en sekreta(j) loĝejo(j) de la urbo. Post tio la bolŝevistoj alvokis al novaj manifestacioj en Petrogrado por tiri la ŝanceliĝantajn homojn al sia flanko. En diversaj okazoj elpaŝis Kamenev kaj Trockij, farante diversajn promesojn al la homoj. Kelkaj rolantoj kiel la 4a Donkozaka regimento kaj la personaro de la militŝipo „Aŭroro”, kiu troviĝis por riparado en la haveno, transiris al la bolŝevistoj. La ŝipo, kiu devis forlasi la havenon por kontroli la funkciadon de la motoroj, historie famiĝis pro tio, ke ĝi lanĉis la inaŭguran pafadon por anonci la revolucion, t.e. kiam la bolŝevistoj akaparis la povon.

En sekvaj kunsidoj de la bolŝevisma partio la decido pri la ribelo estis konfirmita de la plimulto de la kamaradoj. Al tiu kerna grupo de Lenin apartenis Zinov'ev, Kamenev, Trockij, Stalin, Sverdlov, Urickij, Dzerĝinski, Kollontaj, Dubnov, Sokol'nikov kaj Lomov (Oppokov). Laŭ la opinio de la bolŝevistoj, la alternativo estis ilia perforta likvido, do necesis konkrete agi. Lenin konkludis, ke por eviti tiun scenaron necesis forpuĉi la Provizoran Registaron. La evoluo montriĝis kuraĝiga por la planoj de la bolŝevistoj, kiun la tempo ŝajnis favori. En la moskva urba parlamento la bolŝevistoj jam havis 33% de la mandatoj, dum la menŝevistoj devis kontentiĝi pri 4%. La bolŝevistoj ŝajnigis sin partio, kiu reprezentas la interesojn de la amasoj, kiuj estis malkontentaj ekzemple pro la manko de varoj, kiuj estis tre multekostaj, dum la salajroj kaj rentoj aŭ pensioj estis malgrandaj.

Dume, Trockij fariĝis nova estro de la Soveto. Post la arestado de Kornilov Kerenskij malfermis la petrogradan arsenalon por la Soveto, por ke la urbo povu esti defendita. Sed la bolŝevistoj konsideris Kerenskij oportunisto, kiu maltrafis la reorientigon en pli radikala maldekstra direkto en la senco de la bolŝevistoj kaj kiu nur ĝenis kaj blokis iliajn planojn. Se Kerenskij estus adaptinta sian politikon al pli radikala maldekstra kurso, li eble estus povinta doni al la historio alian turniĝon. Sed Kerenskij, kiu fariĝis tragika figuro, ne volis kaj ne povis fariĝi bolŝevisto. Anstataŭ li, Lenin prenis la iniciaton por enkonduki radikalan ŝanĝon.



Lenin kaŝita kiel finna kamparano, Lenin in Petrogrado

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Lenin, <https://www.gazeta.ru/science/photo/lenin.shtml>)

¹⁹⁶ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Малынтович_Павел_Николаевич.



Kunsido de la Konsilio de la Popolkomisaroj en marto 1918 kun Lenin
 (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
<https://de.wikipedia.org/wiki/Oktoberevolution>)

La 18an (31an) en la loĝejo de la laboristo D.I. Pavlov en la domo de la arkitekto B.E. Furmann en la Serdobol'skaja-strato n-ro 35 Lenin renkontiĝis kun la gvidantoj de la milita organizaĵo de la CK de RSDLP(b) N.I. Podvojskij, V.A. Antonov-Ovseenko kaj V.I. Nevskij por diskuti la preparadon de la armata ribelo en Petrogrado. En tiu loĝejo troviĝis la Ruslanda Oficejo de la CK de RSDLP.¹⁹⁷

Matene de la 24a la komandejo de la Milita Distrikto starigis gardistojn ĉe la Vintra Palaco, elŝaltis la komunikadon kun la Smol'nyj-instituto, fermis la presejon de du bolŝevismaj gazetoj (*Soldat* kaj *Raboĉij put'*), disigis ambaŭ pontopartojn super la rivero Nevo kaj malpermesis al la trupoj forlasi la kazernojn sen ordono. Kiam la trupoj ricevis la ordonon de la registaro okupi la plej gravajn strategiajn punktojn en la urbo, ili rifuzis ĝin. Tiun ĉi tiklan situacion eluzis la Petrograda Soveto, pli konkrete ĝia Armea-Revolucia Komitato (MRK).¹⁹⁸ Ĉi tiu komitato estis fondita la 12an de oktobro de la Petrograda Soveto laŭ peto de Trockij fone de la germana ofensivo en Latvio kaj Estonio, kie estis okupitaj la urbo Riga kaj la estonaj insuloj, por defendi la ĉefurbon kontraŭ germana atako. Cetere, Kerenskij planis evakuadi la urbon Petrogrado, kio kaŭzis proteston ĉe la socialistoj, kiuj riproĉis al li, ke li pretas kapitulaci kaj transdoni Petrogradon al la germanoj. Ekstere la komitato agis kiel komisiita organo de la Soveto, sed interne ĝi sekvis la instrukciojn de Lenin, eĉ se Trockij estis unu el ĝiaj gvidantoj. La minoritato de la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj de la Petrograda Soveto protestis kontraŭ la starigo de tiu organo, kiu establiĝis paralele al la Petrograda Milita Distrikto, karakterizante ĝin kiel organon de la „duobla milita regado”. Kiel formala prezidanto de la MRK estis elektita la maldekstra socialisma revoluciulo P.E. Lazimir, sed tiu servis nur kiel pajlohom, ĉar la veran potencon en la MRK havis Trockij, Podvojskij kaj Antonov-Ovseenko. La MRK dekretis nuligi la decidojn de la Provizora Registaro kaj de la Petrograda Milita Distrikto mobilizi trupojn de la Petrograda Urba Garnizono kaj disdonis 5000 pafilojn al la Ruĝa Gvardio, la armata trupo de la MRK.¹⁹⁹

En kunveno de la bolŝevisma CK, konsistanta el Kamenev, Sverdlov, Dzerĵniskij, Bubnov, Miljutin, Trockij, Joffe, Urickij, Lomov, Nogin kaj Berzin estis preparolataj la paŝoj, kiuj estis entreprenitaj de la Provizora Registaro. La bolŝevismaj gazetoj reaperis, pri *Pravda* Stalin persone okupiĝis. En artikolo de la sama tago en la gazeto *Raboĉij put'* Stalin ankoraŭ povis alvoki al renverso de la Provizora Registaro, kiun li nomis „memelektita” (samozvanoe), dirante, ke en tiu registaro troviĝas „malamikoj de la popolo”. Kamenev konstatis, ke la likvido de *Pravda* signifas rompon de la interkonsento kun la socialismaj revoluciuloj kaj menŝevistoj.

¹⁹⁷ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Сердобольская_улица.

¹⁹⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Allrussisches_Zentrales_Exekutivkomitee.

¹⁹⁹ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Red_Guards_\(Russia\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Red_Guards_(Russia)).

Kerenskij, kiu vidis sian registaron inter la martelo de Kornilov (kiu daŭre restis potenciala danĝero por puĉo) kaj la amboso de la bolŝevistoj, elpaŝis en la t.n. „Antaŭparlamento“, provante ricevi subtenon por sia flanko. La moderaj socialistoj kaj menŝevistoj faris lastan provon por savi la situacion. En la „Antaŭparlamento“, en kiu oni diskutis kaj voĉdonis pri la senpotencigo de ĉiuj bienfarmistoj kaj kapitalistoj, estis akceptita rezolucio, kiu alvokis la Provizoran Registaron senprokraste transdoni la teron al la kamparanaj komitatoj, komenci interparolojn pri la paco kaj respekti la rajtojn de la popoloj de Ruslando. La „Antaŭparlamento“ rifuzis havigi al Kerenskij eksterordinarajn kompetencojn por subpremi la bolŝevisman ribelon. Kvankam la premo al la Provizora Registaro kreskis, tiu parlamento evidente ne plu kapablis reguligi tiujn demandojn, nek solvi la ekonomian krizon aŭ subpremi la bolŝevisman danĝeron kaj komplete perdis siajn politikan kaj moralan aŭtoritaton.²⁰⁰

La MRK eldonis alvokon, laŭ kiu oni deklaris, ke la elpaŝo de la bolŝevistoj signifas „defendon de la demokratio antaŭ la kontraŭrevolucio“. Lenin disvastigis la version, ke la „registaro ŝanceliĝas“. La fortoj de la MRK okupis la Nikolaev-stacidomon, la Petrogradan elektrofabrikon, la Ŝtatan Bankon kaj ekkontrolis la Centran Telegrafejon kaj la Petrogradan Telefonagentejon. Kontraŭstaro apenaŭ okazis. El Helsinko ekveturis militŝipoj kun revoluciaj matrosoj kaj aliaj taĉmentoj, kelkaj ŝipoj alproksimiĝis ankaŭ el Kronŝtadt.

La 24an vespere post la sesa horo Lenin forlasis la konspiran loĝejon n-ro 41 de Margarita Fofanova en la Serdobol'skaja-strato n-ro 1, kiu troviĝis aliflanke de la rivero Nevo. Kun ŝanĝita ekstera aspekto (sen barbo, kun malnova mantelo kaj ĉapo, la vango kovrita per poŝtuko) kaj en akompano de la finna komunisto Eino Rahja²⁰¹ li pasis la Sampsonievskij-prospekton, per tramo veturis ĝis la Botkinskaja-strato kaj transiris la Litejnyj-ponton, eniris la Ŝpalernaja-straton, kie li estis dufoje haltigita de ĉevala patrolo de junkeroj, sed nerimarkita de ili, kaj finfine atingis la Smol'nyj-palaco en la Leont'evskaja-strato n-ro 2, kie rezidis nun ankaŭ la buroo de la bolŝevistoj.

La nokto en Peterburgo pasis trankvile, la loĝantoj dormis kviete. Matene, la 25an de oktobro (7an de novembro – tiu ĉi ĉefa tago de la „revolucio“ cetere koincidis kun la naskiĝtago de Trockij), je la deka horo la MRK publikigis la alvokon „*al la civitanoj de Ruslando*“, en kiu ĝi informis la publikon, ke „*la Provizora Registaro elĉerpiĝis kaj ke la ŝtata povo transiris al la Petrograda Soveto de laboristaj kaj soldatoj deputitoj*“. La MRK, kiu starigis sin pinte de la Petrogradaj proletaro kaj garnizono“, promesis zorgi pri la postuloj, por kiuj „la popolo batalis: demokratia paco, ŝanĝo de la posedo de la tero, laborista kontrolo super la produktado, formado de sovetregistaro“. La Provizora Registaro, kiu perdis la kontrolon kaj sian potencon, evidente ne plu kapablis eviti la renverson. Kerenskij vokis kozakajn trupojn por helpi, ĉar oni atendis la baldaŭnan sturmon de la Vintra Palaco fare de la bolŝevistoj.²⁰² Kvankam la kozakoj en principo rifuzis helpi, ducento da ili de la 14a regimento tamen aperis ĉe la Vintra Palaco, plus trupo de la kurioza „Virina Mortbataliono“, por gardi aŭ defendi ĝin. Kerenskij forveturis el la urbo kaj postlasis sian senhelpan registaron en la Vintra Palaco al ĝia sorto.²⁰³

Je la 11a horo la pontoj estis denove kunigitaj laŭ la ordono de la bolŝevistoj kaj ekkontrolataj de ili. La Izmajlovskij-gvardiregimento, kiu en julio estis vokita por subpremi la bolŝevisman ribelon, nun transiris al la bolŝevistoj kaj okupis la Baltan stacidomon. Kiel plej lasta regimento de la revolucio

²⁰⁰ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Второй_Всероссийский_съезд_Советов_рабочих_и_солдатских_депутатов, https://de.wikipedia.org/wiki/Oktoberevolution#2._Allrussischer_Sowjetkongress .

²⁰¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Eino_Rahja.

²⁰² Tiu sturmo, kiel ĝin en idealigita formo rakontis Sergej Ējzenŝtejn en sia filmo „Oktobro. Dek tagoj, kiuj tremigis la mondon“ por pravigi kaj propagandi la oktobran revolucion, ne okazis. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Oktober_\(Film\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Oktober_(Film))).

²⁰³ Laŭ Volkogonov, Lenin, p. 117-22, Kerenskij estis tute maljuste traktata de Lenin kaj de la posta sovetia historiografio, kiu donis al li la ĉefan kulpon pri la krizo de Ruslando en 1917. Certe, Kerenskij kaj lia registaro faris gravajn erarojn. Sed la sovetia historiografio ne kapablis objektivite trakti la eventojn, kaj figuroj kiel Kerenskij, kiujn Lenin konsideris „stultuloj“ kaj malamikoj, kun kiuj li ne volis fari kompromisojn, ankaŭ ne povis ricevi objektivan traktadon, same kiel la menŝevistoj kaj aliaj kritikistoj de la bolŝevismo. Tiel la historio estis totale falsita kaj manipulita de la bolŝevistoj, kun fatalaj sekvoj por la instruado de la historio en Sovetunio. Ĝis nun multaj rusoj kaj ekssovetianoj kredas kaj fidas je la versio, kiun oficialigis la sovetia historiografio, pro kio aperis la absurda situacio, ke racia diskuto kun rusoj ofte estas ege malfacila. Sub Putin la historio estis reskribita laŭ aliaj tendencoj kaj prioritatoj de manipulado kaj falsado, pro kio en Ruslando okazis totala konfuzo rilate la historiografion. Laŭ iu enketo de la Levada-Centro de aprilo 2017, 44% de rusoj diris, ke „ni devas scii pli multe pri tiu tempo, por ke la eraroj de la pasinteco ne ripetiĝu“, 34% respondis, ke „ni devas moviĝi antaŭen kaj ne remaĉi tion, kio okazis en 1917“; 20% opiniis, ke „lerni el la pasinteco ne damaĝas, sed por la nuntempo tio ne utilas“ kaj 3% ne havis konkretan pritakson. (Vd. <http://www.laender-analysen.de/russland>, n-ro 343, p. 9).

La historion el propra vidpunkto Kerenskij rakontis en siaj memuaroj, kiuj aperis en diversaj lingvoj.

ŝanceliĝis la Petrograda Garnizono de la Petropaŭla fortikaĵo de, tiel ke Antonov-Ovseenko minacis ĝin per sturmado.

Tagmeze, la bolŝevistoj blokis la Mariinskij-palacon, en kiu la „Antaŭparlamento“ havis sian kunvenon. Trockij elpaŝis en la Smol'nyj-instituto en la kunsido de la Petrograda Soveto, en kiu li anoncis, ke la „potenco de la Provizora Registaro estas morta“, ke oni jam arestis kelkajn ministrojn kaj baldaŭ arestos ankaŭ la ceterajn. La delegitoj konfirmis ĝin per tondra aplaŭdo. Post Trockij tie aperis Lenin, kiu solene proklamis, ke la „revolucio de la laboristoj kaj kamparanoj, pri kies neceso la bolŝevistoj ĉiam parolis, plenumiĝis“.²⁰⁴

Malgraŭ ĉio, la tago de la proklamo de la revolucio, kiu signifis renverson de la valida registaro kaj uzurpon de la povo fare de la homoj de Lenin, pasis en Petrogrado trankvile – neniuj tumulto, neniuj popola ribelo, neniuj surstrataj bataloj, neniuj protestoj aŭ manifestacioj, neniuj kontraŭatako de registaraj trupoj, fakte sen pafado, kvankam en la kazo de nova ribelo de la bolŝevistoj oni atendis similajn militajn perturbojn kiel en julio, eĉ pli grandajn.

Vespere, je la 22h40, en la Smol'nyj-palaco komenciĝis la 2a Tutruslanda Sovetkongreso. En ĝi partoprenis 649 delegitoj, inter ili 390 bolŝevistoj, 160 socialrevoluciuloj, 72 menŝevistoj kaj 27 aliaj. La bolŝevistoj havis nun 60 procentojn de la mandatoj. Krom tio, ili disponis pri sufiĉe solida popola bazo: Komence de oktobro la bolŝevista partio registris 350 mil membrojn. Martov alvokis al senperforta formado de nova registaro. Mstislavskij (socialisma revoluciulo) kaj Lunaĉarskij (bolŝevisto) apogis tiun proponon. En tiu momento la historia kompromiso inter la diversaj partioj ankoraŭ ŝajnis esti ebla. Ankaŭ la menŝevistoj kaj dekstraj socialismaj revoluciuloj postulis demokratian procedon. Oni laŭtlegis deklaron, en kiu la armata ribelo de la bolŝevistoj estis kondamnita kaj baldaŭaj intertraktoj kun la Provizora Registaro estis postulitaj. Sed en tiu decida historia momento la demokratia parto de la rusa socialdemokratio faris gravegan eraron kaj proteste forlasis la kunvenon, lasante la aferojn decidi al la radikalaj maldekstruloj. Intertempe okazis nova pafatako kontraŭ la Vintra Palaco el la direkto de la Petropaŭla fortikaĵo de. Neniuj estis mortigita aŭ vundita. La junkeroj estis malarmigitaj, kaj iu sovaĝa bando de ribeluloj, kiuj eĉ ne rilatis al la bolŝevistoj, penetris la Vintran Palacon kaj marodadis ĝin. Je la 2a horo kaj 10 minutoj de la 26a de oktobro (8a de novembro) grupo de Ruĝaj Gvardianoj (armata milico de la bolŝevistoj) sub la gvido de Vladimir Antonov-Ovseenko, Grigorij Ĉudnovskij kaj Nikolaj Podvojskij²⁰⁵ aperis en la Vintra Palaco kaj arestis la kunsidantajn ministrojn (poste ili tamen estis liberigitaj). La kongresanoj ankoraŭ kunsidis ĝis la fruaj horoj de ĉi tiu tago. Antonov-Ovseenko kaj Lunaĉarskij konfirmis al la „laboristoj, soldatoj kaj kamparanoj“, ke la sovetoj transprenis la politikan povon en Ruslando. Lenin, kiu sidis en iu ĉambro de la Smol'nyj-palaco por ripozi de la streĉa periodo, lasante aliajn fari la praktikan laboron, montris sin ege kontenta, ĉar lia plano finfine efektiviĝis kaj plenumiĝis. Poste li aperis en la salono kaj estis entuziasme bonvenigita de la kongresanoj.

Laŭ takso de historiistoj, en la rusa oktobra (novembra) revolucio partoprenis ĉ. 25-30'000 homoj, kio kongruis kun ĉ. 5% de la laboristaro kaj soldataro de Petrogrado.



Kelkaj centraj roluloj de la rusa revolucio flanke de la bolŝevistoj: Lenin, Trockij, Stalin, Sverdlov, Antonov-Ovseenko, Dzerĵinskij, Nogin, Lunaĉarskij, V.P. Miljutin

(Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:

https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Lenin, https://de.wikipedia.org/wiki/Leo_Trotsky, https://it.wikipedia.org/wiki/Iosif_Stalin, https://en.wikipedia.org/wiki/Yakov_Sverdlov, https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Alexandrowitsch_Antonow-Owsejenko, https://en.wikipedia.org/wiki/Felix_Dzerzhinsky, https://ru.wikipedia.org/wiki/Ногин,_Виктор_Павлович, https://de.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Wassiljewitsch_Lunatscharski, https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Pawlowitsch_Miljutin)

²⁰⁴ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Русская_революция, https://ru.wikipedia.org/wiki/Штурм_Зимнего_дворца

²⁰⁵ https://de.wikipedia.org/wiki/Wladimir_Alexandrowitsch_Antonow-Owsejenko, https://de.wikipedia.org/wiki/Grigori_Issaakowitsch_Tschudnowski, https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Podvoisky.

La 27an de oktobro (9an de novembro) estis publikigita dekreto pri la starigo de „konsilio de popolkomisaroj”, kiu estis akceptita dum la 2a Sovetkongreso, kun jena persona konsisto kaj disdivido de respondecoj:

Lenin – prezidanto
Rykov – internaj aferoj
Miĵutin, V.P. – agrikulturo
Ŝljapnikov – laboro
Antonov-Ovseenko, Krylenko, Dybenko – armeo kaj ŝiparo
Nogin – komerco kaj industrio
Lunaĉarskij – klerigo
Skvorcov – financoj
Trockiĵ – eksteraj aferoj
Oppokov (Lomov) – justico
Teodoroviĉ – nutraĵoj
Avilov (Glebov) – poŝto kaj telegrafado
Stalin – naciaj (etnaj) demandoj

La unuaj dekretoj de la nova sovetregistaro koncernis la posedon de la tero kaj la pacon. La soveta registaro baldaŭ agnoskis la ŝtatan sendependecon de Finnlando, Pollando, Estonio, Latvio, Litovio, Ukrainio, Armenio, Turkmenio, Kazahio, Taĝikio, Uzbekio kaj de sennombraj regionoj en Siberio kaj en la Malproksima Oriento.

Sed la amasoj en Ruslando restis skeptikaj kaj pasivaj kaj ne vere aliĝis al la bolŝevisma revolucio, kiu devis enkonduki kaj altrudi sian politikan programon per neimageblaj perforto kaj brutaleco en Ruslando. La bolŝevistoj mem ne sciis, ĉu ilia potenco havos longan daŭron aŭ estos baldaŭ forviŝita de eksteraj intervenantoj. Fakte, baldaŭ komenciĝis kruela interna milito, kiu daŭris ĝis 1922.²⁰⁶ La ekzakta cifero de viktimoj de tiu konflikto ne estas konata – eble temas pri kelkdek mil, eble kelkcent mil mortintoj, aliaj fontoj parolas pri milionoj. Sed ankaŭ tiun batalon Lenin kaj liaj bolŝevistoj gajnis. Je la fino de tiu jaro estis fondita Unio de Sovetiaj Socialismaj Respublikoj (USSR, Sovetunio). Lenin, kontraŭ kiu en 1918 estis farita atenco, kiu grave lezis lian sanon, forpasis la 21an de januaro 1924 en Gor'kij apud Moskvo. La nova forta homo de Sovetunio fariĝis Stalin, kiu perfektigis la totalisman sovetan diktaturon, senekzemplan en la historio de la homaro, kun nova giganta nombro de viktimoj kaj pereintoj.

En 1921 la socialismaj revoluciuloj publikigis jenan karakterizon pri la stato de Ruslando: „Anstataŭ krei pacon, ili [t.e. la bolŝevistoj] kondukis la landon al trijara Enlanda milito, en kiu pereis 13 milionoj da homoj ĉe la fronto, pro tifo kaj teroro aŭ estis pelitaj en la emigracion.”²⁰⁷ En Ruslando furoras la malsato. La kamparanoj ne plu semas, ĉar ili scias, ke oni forprenos ilian rikolton. La industrio estas detruita. Ruslando estas izolita de la cetera mondo. Preskaŭ ĉiuj ŝtatoj distanciĝis de ni. Oni starigis la diktaturon de unu sola partio. La Ĉeka (sekreta polico de la bolŝevistoj) fariĝis ŝtato en la ŝtato. La Konstitucianta Asembleo estis dissolvita.²⁰⁸ La ŝtata potenco gvidas militon kontraŭ la propra popolo.” Fakte, en Ruslando ne efektiviĝis la „diktaturo de la proletaro”, sed la diktaturo super la proletaro. La bolŝevismo ne estis socialisma, sed signifis sintezon de socia jakobenismo, radikala marksismo kaj rusa blankismo.²⁰⁹

Laŭ la brita politologo Richard Sakwa la oktobra revolucio estis ampleksa procezo kaj konsistis esence el 6 diversaj revolucioj: La amasa socia revolucio, demokratia revolucio, revolucio de la ruslanda inteligenteco kontraŭ la elito, nacia revolucio de la malgrandaj popoloj de la Ruslanda Imperio, marksisma revolucio kaj la bolŝevisma revolucio, en kiu Lenin uzurpis la agendon de la aliaj socialismaj grupoj kaj tiel povis starigi la celatan diktaturon.²¹⁰

²⁰⁶ Tiu batalo estas sufiĉe bone priskribita de M. Aust: Die russische Revolution, 156-201.

²⁰⁷ Pli da informojn vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Russian_Civil_War. Fakte ne temis pri civila aŭ civitana milito, sed pri milito inter diversaj armeoj, pro kio oni povas preferi la nocion „enlanda milito“.


²⁰⁸ Ĝi ekzistis de la 5a/18a de januaro, 16a horo, ĝis la 6a/19a de januaro 1918, 5a horo matene, por 13 horoj, antaŭ ol esti likvidita de la bolŝevisma registaro. (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Russische_konstituierende_Versammlung.)

²⁰⁹ Volkogonov, Lenin, p. 69-71.

²¹⁰ Vd. Sakwa, R.: Russian Politics and Society. 4a eld., Routledge, Abingdon, Oxon 2008, p. 4.

Do, el longdaŭre, persiste kaj kun neimagebla (mal)pacienca preparita konspira puĉo²¹¹ de Lenin kaj lia malgranda grupo de bolŝevistoj kontraŭ la reganta registaro kun la celo uzurpi la povon en Ruslando, pri kiu oni ne sciis, ĉu ĝi sukcesos, poste fariĝis en la sovetia historiografio la „Granda Oktobra Socialisma Revolucio”, kies mitologio estis senkritike flegata ĝis la 1980aj jaroj, kiam la soveta komunismo komencis krizi kaj perdi sian kredindecon. Evidentiĝis, ke ĉio estis giganta trompo kaj mensogo, idea utopio, falsa aŭ fuŝa eksperimento, fabela tragedio kaj unika katastrofo en la historio de la homaro kun la celo venki la kapitalismon kaj la burĝan sociordon por enkonduki la marksismon-leninismen en Ruslandon kaj la ceteran mondon.

En maldekstrulaj medioj la komunisma rusa revolucio estas daŭre glorata kiel signifa evento de la socia progreso, de la liberiĝo de la homaro de subpremado kaj sklavigado, kiel hela horo kaj sunleviĝo en la historio de la homaro, finfine kiel revolucio de la popolo kaj por la popolo, por la homo kaj ties emancipiĝo kaj evoluo en libereco. La socialistoj kaj komunistoj kredas, ke la socialismo nepre venkos en fora estonto kaj ke ĉiuj nacioj finos sian historian evoluon en ĝi. Precipe en nemalmultaj landoj de la Tria Mondo la revolucio de Lenin trovis grandajn allogon kaj fascinan, kun katastrofaj sekvoj. En Ĉinio, Vjetnamio kaj Kubo tiu „revolucio” daŭras ĝis nun, kun fatalaj sekvoj por la civilsocio kaj la homaj rajtoj, kiuj estas lezetaj en granda dimensio.



Lenin kaj Bonĉ-Brueviĉ (1918), Lenin kaj Stalin (1922), Lenin en la 1a de majo 1919, Lenin en la rulseĝo (1923)
 (Reuzado laŭ Krea Komuna Licenco de Vikimedia, vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio:
https://ru.wikipedia.org/wiki/Ленин,_Владимир_Ильич, https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Lenin)

Posta sorto de la „svisaj leninistoj” (biografia enciklopedieto)

Kiel konate kaj menciite, la historio de Sovetunio estas historio de senĉesa kruela perforto kaj senekzempla brutaleco kontraŭ la propra popolo, de la grandstila kaj sistema lezado de la homaj rajtoj en historie unika dimensio, kvankam la komunistoj predikis justecon kaj egalecon kaj komprenis sin kiel apostolojn de la paco kaj humanismo. La tutmonda komunismo kaŭzis en la 20a jarcento minimume cent milionojn da mortviktimoj kaj ankoraŭ multoble pli da vunditoj kaj morale lezitaj homoj.

Ankaŭ inter la kunlaborantoj, kamaradoj kaj amikoj de Lenin en Svislando, ili estu nomataj „svisaj leninistoj”, troviĝis ne malmultaj homoj, kiuj post sia reveno al Ruslando travivis kuriozan karieron kaj amaran sorton, kiu surprizis ilin kaj kiun ili certe ne atendis en tiu maniero. Inter la plej ĝinteresaj kazoj

²¹¹ Mi ne scias, kiam unuafoje oni uzis la vorton „puĉo” por karakterizi la bolŝevisman renverson de la 7a de novembro 1917. La germana gazeto Spiegel dedecis en decembro 1967 longan artikolon al tiu temo, vd. sub <http://www.spiegel.de/spiegel/spiegelspecialgeschichte/d-54841245.html>. La historiisto Dietrich Geyer uzis la terminon „Coup d'état” (1968), Orlando Figes parolis en germanlingva traduko pri „militärischer Staatsstreich”. (Pri la terminologia diferencoj vd. <https://www.stern.de/politik/ausland/putsch--staatsstreich--umsturz---das-sind-die-unterschiede-6966436.html>).

de tiaj bizaraj biografioj estu menciitaj la sekvaj (ĉe tiuj koncizaj faktaj tekstoj nature povas temi nur pri ĝeneralaj skizoj, sen pli detala biografia enprofundiĝo.²¹²):

Georgij Pleĥanov (1856-1918)

Rememore, en la jaroj 1905-7 Pleĥanov vivis en la emigracio kaj do restis ekster la aktualaj revoluciaj eventoj. En 1905 li alvokis en la gazeto *Iskra* al armata ribelo kaj opiniis, ke tiu ribelo devus esti serioze preparata, kun la partopreno de la armeo. Li kunlaboris al la gazeto *Social-demokrat* kaj al la bolŝevisma periodaĵo *Zvezda* kaj en 1905-12 eldonis en Ĝenevo la publikaĵon *Dnevnik social-demokrata*. En la Unua mondmilito Pleĥanov apogis la Aliancojn kontraŭ la Germana Regno kaj alvokis al batalo kontraŭ la germana imperiismo. Post la Februara revolucio li decidis reveni al Ruslando post 37-jara vivado en la eksterlando. La 31an de marto li alvenis en la Finnlanda stacidomo de Petrogrado antaŭ Lenin, kie li estis akceptita de N.S. Ĉheidze, I.G. Cereteli kaj M.I. Skobelev. Sed li ne estis allasita al la Ekzekutiva Komitato de la Petrograda Soveto pro tio, ke li ne reprezentis klaran kontraŭ-militan pozicion en la senco de la bolŝevistoj. Fortranĉita de la gvida rolo, Pleĥanov estis devigita limigi sin al la verkado kaj redaktado de sia gazeto *Edinstvo* (unueco), en kiu li publikigis artikolojn pri la ĉefaj politikaj okazaĵoj, kverelante kun homoj, kiuj havis aliajn opiniojn. Li apogis la Provizoran Registaron kaj estis kontraŭ la „aprila tezar“ de Lenin, kiun li nomis „aventureca febra fantaziaĵo”. Pri la Oktobra revolucio li havis malbonan opinion, ĉar li opiniis, ke Ruslando ne estas matura por socialisma revolucio. Laŭ li, la uzurpo de la politika povo fare de unusola klaso aŭ partio povas havi tragikajn sekvojn. Li antaŭvidis la Enlandan militon (kiu ja efektive eksplodis nelonge post la oktobra renverso), kiu laŭ li repuŝos la proletaron multe antaŭ la atingojn de la Februara revolucio. Pleĥanov, kiu estis certa, ke la bolŝevistoj akaparos la potencon por longa tempo, ne vidis alian forton, kiu povus konkurenci kaj kontraŭstari la diktaturon, kiun ili starigos. Pleĥanov, kiu malsanis je la tuberkulozo de 30 jaroj, en 1917 fartis jam malbone. La 2an de novembro 1917 li estis transportita al la Franca hospitalo de Petrogrado „Sankta Maria Magdalena“ sur la Vasilia insulo. Laŭ la volo de lia edzino li estis veturigita, la 28an de januaro 1918, al kuracejo de iu fama fakulo pri tuberkulozo en Jalkala/Terijoki (nuntempe Zelenogorsk, parto de SPB), kiu tiam apartenis al Finnlando, kie li estis ankaŭ pli sekura antaŭ eventuala persekuto flanke de la bolŝevistoj.²¹³ En la kliniko li daŭrigis verkadi pri la historio de la rusa socia pensado. Post kiam lia sano iom stabiligis, la 18an de marto li suferis sangofluon, kiu ne povis esti haltigita dum pluraj tagoj. La 15an de majo sekvis agonio kaj la 20an lia sanstato rapide malbonigis. La 30an Pleĥanov mortis en sia 62a vivojaro pro korinfarkto kaŭzita de la tuberkulozo. Lia korpo estis kremaciita kaj la 5an de junio lia ĉerko estis liverita al Petrogrado, ke ĝi estis enterigita en la Volkovo-tombejo proksime de la tomboj de la famaj verkistoj Visarion Belinskij kaj Nikolaj Dobroljubov. Malgraŭ sia rigora opozicio kontraŭ la bolŝevisma partio en 1917, Pleĥanov restis formale ikono de la sovetia komunismo,²¹⁴ sed Lenin konsentis publikigi nur (la fruan) parton de la verkaro de la majstro de la rusa marksismo. Potresov opiniis, ke Pleĥanov estis perfidita de siaj iamaj adeptoj.²¹⁵

Pavel Aksel'rod (1850-1928)

Kiel Georgij Pleĥanov, ankaŭ Pavel Aksel'rod estis unu el la fruaj rusaj marksismaj teoriistoj. Li akceptis Leninon kaj diskutis kun li pri la situacio de la partio, kiam li vizitis Zurikon, sed poste distanciĝis de li. Li partoprenis en ambaŭ konferencoj de Zimmerwald (1915) kaj Kiental (1916), kie kun Julius Martov li oficiale reprezentis la partion RSDLP. Lia devojiĝo kiel menŝevisto kaŭzis, ke li estis kritikata de Lenin kiel „oportunisto“ kaj „gvidanto de la rusaj Kautsky-anoj“. La Februaran revolucion, kiun li observis en Zuriko, li ne konsideris pure proleta, sed parte burĝa, pro kio li pledis por komuna batalo de la proletaro kaj burĝaro kaj vasta subteno de la Provizora Registaro flanke de ĉiuj reprezentantoj de la proletaro, por ke ĉiuj kampoj de la nacia vivo povu esti demokratiigitaj. La aliĝon de la socialistoj al la Provizora Registaro li konsideris „en principo nedezirinda“. Al Ruslando li revenis la 9an de majo 1917

²¹² Kompilante tiujn koncizajn biografiojn, kiuj celu resumi la esencon kaj parolu pri la posta sorto de tiuj homoj, mi dependis grandparte de la biografioj publikigitaj en diversaj lingvoj en Vikipedio kaj esperas, ke la indikoj kaj datoj estas fidindaj.

²¹³ Vd. <http://terijoki.spb.ru/history/templ.php?page=usys5&lang=ru>.

²¹⁴ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Georgi_Plekhanov.

²¹⁵ Volkogonov, Lenin, p. 83-84.

kune kun grupo de elmigrintoj laŭ la samaj vojo kaj maniero kiel Lenin en „plombizita“ vagono tra la Germana Regno. Diference de Pleĥanov, Aksel'rod fariĝis membro de la Ekzekutiva komitato de la Petrograda Soveto. La maja Tutruslanda konferenco de RSDLP(o) elektis lin membro kaj prezidanto de la Organiza Komitato. En la konferenco de la 18a de junio 1917 li fiaskis ricevi la apogon por fari senprokrastan pacon kun la Centraj Potencoj. En la aŭgusta konferenco de RSDLP li estis elektita kiel prezidanto de la CK kaj kiel estro de la eksterlanda partia reprezenteco. Lige kun personaj kaj politikaj kaŭzoj (malsaniĝo, baldaŭa morto de la filino) Aksel'rod denove forlasis Ruslandon kaj ne plu revenis al la patrujo. La uzurpon de la potenco fare de la bolŝevistoj en oktobro 1917, kiujn li komparis kun la faroj de la francaj jakobenoj (kiuj evidente servis al Lenin kiel modelo), li malaprobis, konsiderante la „bolŝevisman renverson“ „giganta krimo sen precedenco en la monda historio“ kaj estis certa, ke la perforta interrompo de la revolucia evoluo repuŝos la landon. En eksterlando Aksel'rod funkciis kiel kunordiganto de la menŝevismaj grupoj, restante membro de RSDLP kaj kontraŭulo de la bolŝevisma potenco; li eĉ ne hezitis alvoki al „internacia socialisma“ armata interveno kontraŭ ĝi por restarigi la atingojn de la Februara revolucio. Aksel'rod, kiu estis svisa civitano, forpasis 77-jara la 16an de aprilo 1928 en Berlino.²¹⁶

Aleksandr Potresov (1869-1934)

Potresov bonvenigis la Februaran revolucion. En majo 1917 li reveturis al Petrogrado, kie li daŭrigis sian karieron, farante propran skisman politikon en la vicjoj de la „menŝevistoj-defendantoj“ kiel redaktoro de la gazeto *Den'* (tago), apogante la Provizoran Registaron kaj pledante por la ideo de la reunuiĝo de la proletaro kaj la burĝaro. En la elektoj al la Konstitucianta Asembleo li partoprenis per propra listo aparte de RSDLP. La oktobran renverson, kiun li kvalifikis kiel „murdon de la demokratio“, Potresov strikte malaprobis. Sekve li ankaŭ ne konsentis pri la evoluo en la partio RSDLP(o),²¹⁷ kiun li forlasis en septembro 1918, aliĝante al la malpermesata kontraŭ-bolŝevisma, do opozicia „Unio de la renaskiĝo de Ruslando“, kiu kunigis ankaŭ la iamajn kadetojn, popol-socialistojn kaj dekstrajn socialismajn revoluciulojn. Pro sia partopreno en tiu organizaĵo li estis arestita en septembro 1919 de la bolŝevistoj en Petrogrado. Ankaŭ liaj edzino kaj filino estis arestitaj. Unu monaton li pasigis en la prizono. Dank' al la interveno de Buĥarin, Krasin kaj Lunaĉarskij kaj la transpreno de garantio fare de J. Martov kaj F. Dan li estis liberigita en novembro. Potresov malsaniĝis je la tuberkulozo kaj fariĝis invalido. Laŭ la opinio de Lenin, Potresov devis esti ekzilita en eksterlandon, sed lia elpelo tamen ne okazis. Malgraŭ konstanta observado fare de la aŭtoritatoj, li konservis la eblecon instrui kaj science labori. Komence de 1925 la Politburoo de la CK de RKP(b)²¹⁸ permesis al Potresov veturi eksterlanden por kuraci sin. Unue Potresov vivis en Berlino, poste en Parizo, kie lia malsano akriĝis. En aŭtuno 1927 en Parizo aperis lia libro, en kiu li donis kritikan pritakson de la postoktobra politiko de la gvidantaro de RSDLP. La Oktobran revolucion li nomis „reakcia renverso“, kaj la bolŝevisman potencon li kondamnis kiel „despotecon de oligarkia kliko“, kiel novan ekspluatantan klason. Li alvokis ĉiujn demokratiajn fortojn, ke ili unuiĝu por kontraŭstari la bolŝevisman registaron kaj prognozis, ke la laborista klaso povus seniluziiĝi rilate la realigon de la ideoj de la socialismo. En la emigracio Potresov kunlaboris al la gazeto *Den'*, kiu estis eldonita de A.F. Kerenskij, la iama ĉefministro de la Provizora Registaro. Krom tio, li fondis la literaturan-klerigan entreprenon „Biblioteko de la demokratia socialismo“. En 1931 li eldonis propran ĵurnalon kun la titolo *Zapiski social-demokrata*, de kiu aperis 23 numeroj. En tiu ĉi eldonaĵo li okupiĝis pri demandoj de la socialisma moralo kaj de la moralo de la politiko entute. La estontecon de Ruslando li pentris per nigra koloro, kaj la kolapson de la bolŝevisma reĝimo li konsideris neevitebla. Potresov forpasis la 11an de julio 1934 en sia 65a vivojaro post malfacila operacio. Lia korpo estis kremaciita kaj enterigita en la tombejo Père Lachaise.²¹⁹

²¹⁶ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Pavel_Axelrod.

²¹⁷ Ob'edinjonnyj signifas unuigita aŭ unuiĝinta. La unuiĝo de RSDLP okazis en aŭgusto 1917.

²¹⁸ RKP(b) estis la nomo de la Komunisma Partio (de la bolŝevistoj) inter 1918 kaj 1925.

²¹⁹ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Potresov.

Julius (Julij) Martov (-Cederbaum) (1873-1923)

Vivante de 1907 en la eksterlando, Martov ekaktivis en la vicoj de RSDLP. Dum la Unua mondmilito li reprezentis la „internaciismon“ kaj troviĝis je la maldekstra flanko de la menŝevismo (menŝevistoj-internaciistoj), pledante kontraŭ la milito. Martov partoprenis la konferencojn de Zimmerwald (1915) kaj Kiental (1916), kie li reprezentis kun Pavel Aksel'rod la partion RSDLP. Kiel Lenin, ankaŭ Martov opiniis, ke post la „internaciisma milito“ neeviteble sekvos periodo de interna milito kaj la likvido de la kapitalismo. Post la Februara revolucio Martov reiris al Ruslando, veturinte, kiel Lenin, kun kiu li estis en Zuriko, per trajno tra la Germana Regno. Martov severe kritikis tiajn menŝevistojn kiel Cereteli kaj Dan, kiuj, estante membroj de la Provizora Registaro, apogis la daŭrigon de la milito. En konferenco de la 18a de junio 1917 li fiaskis, kiel Aksel'rod, kun la ideo fari senprokrastan pactraktaton kun la Centraj Potencoj. Aliflanke, mankis al li la kapablo formi komunan koalicion kun Lenin. Lia sinteno rilate al la Oktobra renverso, post kiu li perdis sian signifon kaj la menŝevistoj izoliĝis, estis do neeviteble negativa. Martov kritikis la limigon de diversaj juraj, politikaj kaj civitanaj rajtoj sub la bolŝevista potenco kaj protestis kontraŭ la arestado de signifaj aktivuloj de ĉiuj partioj, kiuj estis persekutataj de la bolŝevistoj. Li ankaŭ kritikis la disbaton de la Konstitucianta Asembleo kaj la mortigon de la cara familio. En marto 1918 li translokiĝis al Moskvo, kie troviĝis la CK de RSDLP, kaj gvidis la gazeton *Vperjod* kun la espero restarigi la rezultojn de la revolucio en demokratia direkto. Martov estis unu el la fruaj kritikistoj de Stalin lige kun la „ekspropriigoj“ de la jaroj 1906-7 kaj liaj problemoj kun la partio. Stalin venĝis sin per tio, ke li plendis antaŭ la tribunalo pro kalumnio, kio finiĝis per „publika mallaŭdo“ de Martov; kaj kiam Martov estis malsana en Germanujo, Stalin rifuzis sendi monon al li por medicina kuracado, kvankam Lenin petis tion. Martov gvidis la menŝevisman opozicion en la Konstitucianta Asembleo (januaro 1918) kaj en majo 1918 li estis deputito de la Tutruslanda konferenco de la menŝevistoj kaj. En junio li estis eksigita el la VCIK de RSFSR (Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato, kiu estis la supera leĝdona kaj kontrolanta organo de la ŝtata potenco de la Ruslanda Soveta Respubliko en 1917-8) kun aliaj menŝevistoj pro akuzo de la organizado de kontraŭrevolucio kaj partopreno en kontraŭsovetaj agadoj. Dum la Enlanda milito Martov apogis la Ruĝan Armeon kontraŭ la blankuloj, sed li rifuzis kaj kondamnis la ruĝan teroron, kiun li dununcis kiel „sangan hommortigan maŝinon“. Malgraŭ ĉio, fine de 1918 Martov venis al la konkludo, ke la „soveta konstruaĵo estas fakto de la realeco“, sed ĝi tamen devas esti demokratiigita. Krom tio, li estis kontraŭ la ŝtatigo de konsiderinda parto de la industrio kaj kontraŭ la ŝanĝo de la politiko rilate al la agrikulturo kaj nutraĵoj. Samtempe li supozis, ke la amasoj apogos la bolŝevisman diktaturon kaj konsilis eviti skismon ene de la laborista klaso. Tiel naskiĝis lia taktiko de la pragmatisma kunvivado kun la bolŝevisma potenco kadre de la soveta konstitucio, situacio, kiu devus finfine ankaŭ esti akceptita de la menŝevistoj. De 1919 li estis denove membro de la VCIK, ĝis 1920 ankaŭ deputito de la Moskva Soveto. En somero 1919 li estis elektita kiel reala membro de la Socialisma Akademio, kaj en 1920 li redaktis la almanakon *Oborona revoljucii i social-demokratija* (defendo de la revolucio kaj la socialdemokratio). Martov forlasis Ruslandon en septembro 1920 en la direkto de Germanio, kie li daŭrigis, kun F.I. Dan, kiu estis forpelita de Ruslando, la laboron kadre de la Eksterlanda Buroo de la CK de la menŝevistoj, redaktante la gazeton *Socialisteĉeskij vestnik*, kiu fariĝis la ĉefa organo de la partio. Tie komenciĝis kverelo kun Pavel Aksel'rod, kiu riproĉis al Martov malkongruon inter lia principa pritakso de la historia signifo de la bolŝevismo kaj la opozicio, kiu kontraŭstaris la bolŝevisman diktaturon, kiun Martov kvalifikis kiel „diktaturon de la minoritato“. En oktobro 1920 li konfirmis sian kritikon de la politiko de la bolŝevistoj precipe sur la kampoj de la eko-nomio, kiu estis en ege malbona stato, kaj rilate al la mankantaj juraj garantioj kaj civitanaj liberecoj kaj postulis la solidarecon inter la anoj de la monda laborista movado. En 1921 elkristaliĝis du centroj de la menŝevisma movado: la CK kaj la Eksterlanda delegitaro. En la Tutruslanda konferenco de RSDLP de aŭgusto 1921 Martov ankoraŭ atingis malgrandan sukceson, kiu konsistis en tio, ke la delegitoj aprobis la tezon de Martov pri la neceso de interkonsento inter la proletaro kaj la kamparanoj. Martov, kiu malsanis je la tuberkulozo, forpasis nur 49-jara la 4an de aprilo 1923 en iu sanatorio en Schömberg-Calw en la Nigra Arbaro en Germanio. Li estis kremaciita kaj enterigita kun la ĉeesto de Maksim Gor'kij en la kolombario ĉe Gerichtstrasse en la Wedding-distrikto de Berlino.²²⁰

²²⁰ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Julius_Martov.

Vera Zasulič (1849-1919)

partoprenis en revoluciaj agadoj de la Narodnikoj de la 1860aj aroj kaj fariĝis konata, ĉar en 1877 ŝi atencis kontraŭ la peterburga urbestro Trepov. Kiel simpatiantino de la anarkiismaj ideoj de Bakunin kaj posta kunlaborantino de Pleĥanov, Potresov, Lenin, Aksel'rod kaj Martov en la redakcio de *Iskra*, ŝi alproksimiĝis al la marksismo kaj reveturis en 1905 al Ruslando, kie ŝi subtenis la ĉesigon de sovaĝaj kontraŭleĝaj aktivecoj en RSDLP (kiel la „ekspropriigoj“ kaj similaj krimaj agadoj)²²¹ kaj la kreadon de normalaj laŭleĝaj politikaj strukturoj. En marto 1917 ŝi aliĝis al la grupo de la „menŝevistoj-defandantoj“ („Edinstvo“), pledis kun ili por la daŭrigo de la milito ĝis la fina venko, kaj en aprilo ŝi alvokis la publikon subteni la Provizoran Registaron. En julio ŝi estis elektita al la Petrograda Provizora Urba Dumao. Ankoraŭ antaŭ la oktobra renverso ŝi estis promociita kiel kandidato por la membreco en la Konstitu-cianta Asembleo. Sed ŝi malakceptis la Oktobran revolucion de la bolŝevistoj, nomante ĝin kontraŭrevo-lucia renverso, kiu interrompis la normalan politikan evoluon de la burĝa-demokratia revolucio, kaj konsiderante la starigon de la bolŝevisma potenco respegulaĵo de la carisma reĝimo. Laŭ Zasulič, la minoritato uzurpis la plimulton, kaj la bolŝevistoj certe detruos la kapitalon kaj la industrion. Kvankam Lenin ne konsentis kun ŝiaj vidpunktoj kaj konkludoj, li almenaŭ agnoskis ŝin „signifa revoluciulino“. Pli kaj pli Zasulič seniluziiĝis kaj sentis malkontenton pri sia vivo. Malgraŭ serioza malsaniĝo, ŝi skribadis ĝis la fino memuarojn, kiuj estis publikigitaj post ŝia morto. Zasulič forpasis 69-jara la 8an de majo 1919 okaze de incendio en sia loĝejo, suferante pneŭmonion. Ŝia tombo troviĝas en la Volkovotombejo de SPB, kie multaj aliaj signifaj personecoj trovis sian eternan pacon.²²²

Nadeĵda Krupskaja (1869-1939)

estis instruistino, fariĝis la fama edzino, poste vidvino de Lenin, kun kiu ŝi konatiĝis en 1894 en Sankt-Peterburgo, kie tiu laboris kiel juristo. Kiam la caristoj ekzilis ŝin al Uralo, ŝi petis kiel „fianĉino“ de Lenin translokiĝi al Ŝuŝenskoe en Siberio, kie Lenin troviĝis en la ekzilo (1897-1900). En majo 1898, la jaro de ŝia membriĝo en RSDLP, en la vilaĝon alvenis Krupskaja kaj ŝia patrino; tie Krupskaja edziniĝis al Lenin, eĉ kun eklezia beno. Post la fino de la ekzilo la triopo forveturis al Germanujo (Munkeno), kie estis eldonita la gazeto *Iskra*. Tiel, Krupskaja, kiu konis plurajn okcidentajn lingvojn, fariĝis dumviva fidela helpantino de Lenin, organizante la oficejajn kaj korespondajn laborojn, kaj do akompanis la gvidanton de la bolŝevismo ankaŭ dum lia tuta ekzila tempo en Okcidento. En 1905 ŝi revenis kun Lenin al Ruslando, kie ŝi funkciis kiel sekretariino de la CK de RSDLP. Poste la paro devis denove forveturi al eksterlando. En aprilo 1917 ŝi reveturis kun Lenin en la „plombizita“ vagono tra la Germana Regno al Sankt-Peterburgo. Post la Oktobra revolucio de 1917 Krupskaja okupiĝis pri infana kaj junulara laboro, pedagogio, instruado, edukado, klerigo kaj lernejoj aferoj, okupante kelkajn gravajn partiajn aŭ ŝtatajn funkciojn en la kleriga sektoro de soveta Ruslando kaj Sovetunio. Krom tio, ŝi aktivis sur la kampoj de la soveta cenzuro kaj kontraŭreligia propagando. De 1921 ŝi instruis en la Akademio por politika klerigo, kaj post la morto de Lenin (1924) ŝi anstataŭis lin kiel partoprenanton en diversaj kongresoj, akceptante honorigojn por ŝia forpasinta edzo. Stalinon, de kiu Krupskaja sentis sin naŭzita kaj ofendita, ŝi tute malŝatis kaj abomenis kiel krudan kaj neŭrozan personon, sed ŝiaj klopodoj eviti lian potenciĝon malsukcesis kaj kondukis ŝin en la politikan izoligon. En 1925 ŝi apogis la „Novan opozicion“ ĉirkaŭ Zinov'ev kaj Kamenev en la lukto kontraŭ Stalin, kiu konsideris ŝin „skismulino“ (letero de Stalin al Molotov de la 16a de septembro 1925). Poste ŝi tamen forlasis tiun kurson por finfine pledi por la juĝado de Buĥarin antaŭ la tribunalo kaj por la eksigo de Trockij, Zinov'ev kaj Kamenev el la partio. En 1927 ŝi fariĝis membro de la CK de KPSU, en 1929 ŝi ricevis la postenon de anstataŭanto de la popolkomisaro por klerigo kaj estis mem honorigita per la Lenin-ordeno kaj la ordeno de la ruĝa standardo de la laboro. Krom tio, ŝi fariĝis honora membro de la Akademio de Sciencoj de USSR kaj posedis la titolon „doktoro de pedagogiaj sciencoj“. Krupskaja, kiu estis ankaŭ membro de la prezidio de la Supera Soveto de USSR, aŭtoris sennombrajn verkaĵojn pri Lenin kaj komunisma edukado, pedagogio kaj pri la historio de la bolŝevisma partio. Precipe ŝiaj „Memoroj pri Lenin“, kiuj estis publikigitaj en Okcidento, entenas interesajn detalojn pri ŝia vivado kun Lenin en la emigracio. En la 30aj jaroj Krupskaja klopodis kontraŭstari la stalinisman diktaturon kaj provis helpi al viktimoj de la stalinaj persekutoj, precipe infanoj, kun atingoj en unuopaj kazoj, sed tamen grandparte sen sukceso. Ŝi

²²¹ Vd. <https://ru.wikipedia.org/wiki/Ликвидаторство>.

²²² Laŭ vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Vera_Zasulich.

estis fortranĉita de la laboro en la popolkomisarejo, tiel ke ŝi okupiĝis ĉefe pri bibliotekaj aferoj. Ŝi estis kontrolata de sekretaj policistoj kaj timis esti mortigita. Stalin probable timis, ke ŝi povus publike babili embarasajn aferojn pri Lenin, kies memoro devis resti senmakula, pri la bolŝevistoj kaj li mem. Krupskaja, kiu forpasis la 27an de februaro 1939 en la aĝo de 70 jaroj meze dum la stalinisma furoro, estis enterigita en urno apud la Kremla muro. En Sovetunio cirkulis la onidiro, ke ŝi estis venenita de Stalin. Unu tagon post ŝia enterigo, la gvidanto de la ŝtata eldonejo en la ministerio de la edukado, kie Krupskaja laboris, ordonis ĉesigi presi ion ajn pri ŝi; tiel ŝia verkaro estis enfermita kaj forgesita. Post la morto de Stalin iuj rememoroj de Krupskaja tamen estis represataj, kaj en 1956 kaj 1964 eĉ aperis sovetiaj poŝtmarkoj dediĉitaj al ŝi, kio povis esti interpretita kiel plena rehabilitado de la iama vivkunulino de Lenin, kiu malgraŭ ĉia subpremo restis ikono de la bolŝevismo.²²³

Inessa Armand (1874-1920)

Ĉi tiu ĉarma kaj talentata filino de kulturemaj francaj gepatroj, kiu origine nomiĝis Elisabeth Pécheux d'Herbenville kaj kiu fariĝis konata kiel (sekreta) amatino de Lenin, pasigis sian junaĝon en Moskvo, kie ŝia onklino laboris kiel instruistino ĉe la riĉa komercista familio Armand. Tie Inessa Fjodorovna, kiel ŝi estis nomata en Ruslando, edziniĝis al la filo Aleksandro Armand, kun kiu ŝi havis kvar infanojn en periodo de naŭ jaroj, dum ŝia fratino edziniĝis al alia filo de Armand. Ĉirkaŭ 1894 la familio vivis en bieno en El'digino apud Moskvo, kie oni fondis lernejon por kamparanaj infanoj, kiuj estis instruataj de Inessa, kiu aliĝis al la „Asocio por la plibonigo de la sorto de la virino“, kies prezidantino ŝi mem fariĝis en 1900. Personan krizon Inessa travivis, kiam ŝi enamiĝis al ŝia bofrato Vladimir Armand, kun kiu ŝi vivis iun tempon en Napolo kaj sub kies influo ŝi alproksimiĝis al la partio de la moskvaj socialismaj revoluciuloj, poste fariĝante bolŝevistino kaj aliĝante al RSDLP en 1904. Ilia filo estis naskita en 1903 en Baugy-sur-Clarens ĉe Montreux (Svislando). Dum la unua rusa revolucio ŝi translokiĝis kun Vladimir al Moskvo, kie ŝi estis arestita la 6an de februaro 1905 de la carismaj aŭtoritatoj kaj kondamnita al dujara ekzilo en la norda gubernio de Arĥangel'sk, kien Vladimir libervole akompanis ŝin. Inessa pergajnis sian vivon per la instruado de la franca lingvo. Kiam Vladimir malsaniĝis je la tuberkulozo, li forlasis Inessan kaj veturis al Svislando. En tiu tempo estis arestita ankaŭ ŝia edzo Aleksandro, post kiam okazis striko en la fabrikoj de Armand; post sia liberiĝo li translokiĝis kun siaj filoj al Francio. Kiam la ekzilo de kelkaj polaj revoluciuloj en Mesen', kie Inessa vivis, finiĝis, ŝi sekrete aliĝis al ili kaj fuĝis en oktobro 1908. Sub falsa nomo ŝi vivis en Moskvo, poste en Sankt-Peterburgo, kie en 1908 okazis la unua tutruslanda virina kongreso. Kiam Inessa eksciis, ke Vladimir baldaŭ mortos, ŝi veturis en januaro 1909 tra Finnlando al Svislando, kie li forpasis en ŝia ĉeesto. Inessa dume restis en okcidenta Eŭropo kaj ekstudis en la Brusela universitato, kie ŝi akiris la diplomon de licencio pri ekonomiaj sciencoj. En aŭtuno 1910 ŝi ekloĝis en Parizo por fari esplorojn en la Sorbono, kaj ŝi pli kaj pli laboris por la socialdemokratia partio. Kun Lenin Inessa, kiu utiligis la pseŭdonomon Elena Blonina, konatiĝis probable en aŭtuno 1909 aŭ en Bruselo aŭ en Parizo, kie oni funkciigis iun partian lernejon en Longjumeau, 15 kilometrojn for de Parizo, kie Lenin, Krupskaja kaj ties patrino plus Inessa kun ties filo Andrej kune vivis. En tiu periodo Lenin kaj Inessa, kiu estis pli bela virino ol Krupskaja, ankaŭ persone pli intimiĝis, kio probable estis la komenco de dumviva romantika amrilato, kiu estis neata de certaj historiistoj ĉefe sovetiaj. Inessa povis veturi al la internacia socialista kongreso en Kopenhago, kie ŝi konatiĝis kun Karl Kautsky, Victor Adler, Jean Jaurès, Clara Zetkin, Rosa Luxemburg, Julius Martov kaj aliaj. De somero 1912 Inessa denove estis en Petrogrado, kien ŝi estis sendita de Lenin por doni instrukciojn al la lokaj kunlaborantoj. Lenin kaj Krupskaja dume translokiĝis al Krakovo, kie instaligis la nova centro de la bolŝevistoj. Baldaŭ Inessa estis malkovrita kaj arestita de la rusa polico kaj sendita al la prizono. Dank'al sia edzo Aleksandro, kiu intertempe fariĝis membro de la Dumao, ŝi sukcesis liberiĝi per kaŭcio. Post kiam ŝi mem kuraciĝis de la tuberkulozo, Inessa fuĝis al Krakovo. Sed Lenin ŝajne ne plu estis interesata pri triopa vivado kaj anstataŭ tio sendis sian edzinon, kiu estis malsana, al Berno (Svislando) por kuracado. Tien Lenin mem translokiĝis post la eksplodo de la Unua mondmilito (1914). Aliflanke, Lenin deziris, ke Inessa plu agadu por la socialisma Internacio kaj restu lia kunlaborantino, do ŝi estis vokita al Berno, kie ŝi povis esti utila al Lenin, ĉar ŝi scipovis plurajn lingvojn, tradukante tekstojn al la franca kaj angla lingvoj kaj

²²³ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Nadezhda_Krupskaya kaj Kahlweit, C.: Agentin in eigener Sache: Nadeshda Krupskaja (1869-1937). En: Kahlweit, C. (Hrsg.): Jahrhundertfrauen. Ikone, Idole, Mythen. Beck'sche Reihe. C.H. Beck, München 1999. p. 274-280.

korespondante kun Clara Zetkin, Angelica Balabanova kaj Aleksandra Kollontaj. Ŝajnas, ke Krupskaja, kiu kondukis kiel lojala edzino de de partia gvidanto, ne estis ĵaluza pri Inessa, kvankam ŝia edzo diskutis kun alia virino pri la „seksa demando”, „interseksaj rilatoj“ kaj la „libera amo”, en kio evidentiĝis la pruda sinteno de Lenin, kiu poste esence influis la seksan moralon de la sovetia socio. Kiam Lenin en 1916 translokiĝis al Zuriko, Inessa loĝis en Baugy-sur-Clarens. Sed Inessa fartis malbone, montriĝis laca kaj jam malemis labori por la partio. Post la Februara revolucio de 1917 Inessa reveturis per la sama trajno kun Lenin al Ruslando. En la sekvo Inessa, kiu partoprenis en la revoluciaj bataloj, kiuj okazis en Petrogrado, alprenis diversajn partiajn taskojn, funkciojn kaj oficojn, inter alie tiun de la prezidantino de la Moskva gubernia ekonomia konsilio. Laŭ komisiono de la Ruĝa Kruco ŝi devis iri kun Manuil ŝkij al Francio (Dunkerque) por revenigi kelkml internigitajn sovetiajn soldatojn. Sed ili estis arestitaj de la francoj pro kontaktoj kun komunistoj kaj liberigitaj nur post forta minaco flanke de Lenin. En 1920 Inessa Armand atingis la kulminon de sia politika kariero, gvidante la virinan sekcion en la CK RKP(b) kaj organizante la Ian Internacian komunisman virinan konferencon de 1920. Post fizika elĉerpiĝo ŝi estis sendita al Kaŭkazo por ripozo. Sed tie atingis ŝin la Enlanda milito, pro kio ŝi estis evakuita al Nalĉik. En la stacidomo de Beslan Inessa infektiĝis je kolero. La 11an de oktobro Inessa subite forpasis en la aĝo de 46 jaroj. En Moskvo ŝi estis transportita per ĉaro, kiu estis tiritita de du blankaj ĉevaloj de la Kazana stacidomo ĝis la urbocentro, kie ŝi estis entombigita en la nekropolo apud la Kremlo muro.²²⁴ Dum jardekoj la sovetia cenzuro prisilentis la ekzistadon de Inessa Armand kaj malpermesis publike trakti ŝian supozatan amrilaton al Lenin en oficialaj Lenin-biografioj. Nur en 1965 en Moskvo aperis unuafoje iu libro, kiu menciis ŝin kiel proksiman kunlaborantinon de Lenin. En la filmo „Lenin en Parizo“ (1988) de Sergej Jutkeviĉ Inessa rolis kiel amatino de la fikcia heroo Trofimov.²²⁵ Sed en la filmo „La trajno“ de reĝisoro Damiano Damiani (1988) Inessa Armand estas videbla kiel reala figuro de la grupo ĉirkaŭ Lenin-Krupskaja, kiu reveturis de Svislando al Ruslando.

Apollinarija Jakubova (1869-1917)

Ĉi tiu filino de ortodoksa pastro, kiu devenis el la gubernio de Vologda, estis instruistino, tradukistino kaj verkistino, plikleriĝis en la fizik-matematika sekcio en porvirina lernejo. En la lernejoj jaroj ŝi konatiĝis kun Ol'ga Ul'janova, fratino de Lenin, kaj tra ŝi ankaŭ kun Lenin mem. Ŝi ekinteresiĝis pri la revoluciaj ideoj, fariĝis membro de la peterburga „Unio de la batalo por la liberigo de la laborista klaso“ kaj de RSDLP. En 1894-96 ŝi amikis kun Nadeĵda Krupskaja, kiun ŝi enkondukis en la socialisman medion. Laŭ iuj historiistoj, Jakubova plaĉis al Lenin, sed ŝi ne estis interesita pri Lenin kaj preferis rilati kun la sociologo K.M. Taĥtarjov, kun kiu ŝi pluvivtenis la „Union de la batalo por la liberigo de la laborista klaso“ post ĝia likvido, dum aliaj membroj estis arestitaj kaj deportitaj en la ekzilon. En 1897-1902 ŝi redaktis kun Taĥtarjov la gazeton *Raboĉaja mysl* (laborista penso). En 1898 ŝi tamen estis arestita kaj sendita en la ekzilon dum kvar jaroj al la Jeniseja gubernio. La postan jaron ŝi sukcesis fuĝi al eksterlando kun la helpo de Taĥtarjov, al kiu ŝi edziniĝis en la emigracio. En 1899-1905 ŝi vivis en Londono, en 1900 partoprenis iun konferencon de eksterlandaj socialdemokratoj en Ĝenevo. Inter 1902 kaj 1922 Jakobova daŭrigis resti kun Lenin en kontakto kaj korespondis kun li, sed kiel apogantino de la „larĝa demokratio“ en la partio. Jakubova kritikis la rigoran centrismon de Lenin, krom tio rilate diversajn demandojn ŝi reprezentis opiniojn, kiuj estis pli proksimaj al tiuj de la menŝevistoj. Post 1905 ŝi forlasis la aktivan politikan agadon kaj revenis al Ruslando post amnestio kaj daŭrigis instruadi en lernejo por laboristoj. En 1909-10 ŝi loĝis en Finnlando en la feridomo de profesoro N.M. Knipoviĉ (kie Lenin kaj Krupskaja restadis en junio 1907). Tie ŝi malsaniĝis je la tuberkulozo kaj forpasis en 1917 en Stirsudden en la gubernio de Vyborg.²²⁶

Nikolaj Valentinov (-Vol'skij) (1879-1964)

Ĉi tiu interesa rusa revoluciulo, ekonomiisto, ĵurnalisto kaj filozofo, kiu fariĝis bolŝevisto en 1903 kaj konatiĝis kun Lenin en Ĝenevo, de kiu li tamen baldaŭ distanciĝis pro filozofiaj diferencoj (ĉar li estis adepto de la „empirio-kritikismo“, kiun Lenin malaprobis), postulante reviziadon de la marksismo por

²²⁴ Laŭ https://eo.wikipedia.org/wiki/Inessa_Armand.

²²⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Lenin_in_Paris kaj <https://www.youtube.com/watch?v=TKfupQSyQqk>.

²²⁶ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Apollinariya_Yakubova.

kompletigi ĝin per la „empirio-kritikismaj“ ideoj de Ernst Mach kaj Richard Avenarius. En 1904 li transiris al la tendaro de la menŝevistoj kaj poste laboris por la ukraina menŝevisma partio. Kvankam en principo li bonvenigis la Februaran revolucion de 1917, li tamen seniluziigis pri la registaro de Kerenskij kaj pri la menŝevismaj kaj socialismaj revoluciulaj gvidantoj de la sovetoj. Poste li vivis en Pskov kaj Ĥarkov, ĝis 1908 en Moskvo, kie li gvidis armean organizaĵon de menŝevistoj de la Moskva grupo de RSDLP. Ĝis 1911 li laboris por kieva gazeto, ĝis 1913 por *Russkoe slovo* kaj poste ĝis 1928 vivis kaj laboris en Moskvo. En 1916 li pledis por speciala pactraktato kun la Germana Regno, pro kio okazis rompo kun la menŝevistoj kaj lia transiro al la gazetaro de la socialismaj revoluciuloj. La oktobran renverson kaj la militan komunisman li rifuzis. En la 20aj jaroj li laboris en la Supera Konsilio de la popolekono-mio, kiu estis la ĉefa administra organo de la popolekonomio de Sovetunio, kiu troviĝis sur la sama nivelo kiel ministerio, kaj estis unu el la arkitektoj de la NEPo (Nova Ekonomia Politiko), kadre de kiu li intime kunlaboris kun Nikolaj Buĥarin. La kreskantan politikan influon de Stalin Valentinov observis kun zorgo. Ĉar li kontraŭstaris la paŝojn por forlasi la NEPon favore al pli rapida industriigo kaj kolektivigo de la agrikulturo, Valentinov sentis, ke lia vivo estos en danĝero, se Stalin decidus definitive rezigni pri la NEPo. En 1928 li translokiĝis al Parizo, kie li redaktis sovetian ekonomian gazeton. Valentinov restis en la emigracio en Francio ĝis la morto la 26an de aŭgusto 1964. En Okcidento li verkis kaj publikigis artikolojn por diversaj emigraciaj gazetoj, proksimaj al Kerenskij, Miĵukov k.a. kaj kunlaboris kun diversaj organizaĵoj, kiuj okupiĝis, en la spirito de la Malvarma Milito, pri „la liberigo de la popoloj de Ruslando“. Valentinov, kiu estis ofte konsultata fakulo pri la historio de la rusa revolucio kaj de la frua Soveta Unio, en la 50aj kaj 60aj jaroj verkis kaj eldonis ankaŭ plurajn librojn pri Lenin, NEPo kaj partiaj aferoj. Liaj verkoj, kiu estis prislentataj kaj subpremataj dum la sovetia tempo, povis aperi en Ruslando nur en 1991.²²⁷

Sergej Gusev (-Drabkin) (1874-1933)

estis unu el tiuj tipaj bolŝevismaj revoluciuloj, kiuj fidele kaj lojale servis al Lenin sen kvereli pri teoriaj kaj filozofiaj demandoj (kion Lenin ege malŝatis, se tiuj ideoj ne kongruis kun liaj propraj) kaj plenumis altrangajn funkciojn en la aparatoj de la partio kaj ŝtato, kiujn oni konfidis al li, por fari rapidan profesian karieron. En la tempo de la Oktobra revolucio Gusev estris la sekretariojn de la Petrograda milit-revolucia komitato, en februaro 1918 li fariĝis sekretario de la Komitato de la revolucia defendo de Petrogrado kaj poste li ricevis aliajn gravajn funkciojn. En tio li estis proksima kunlaboranto de G.E. Zinov'ev. En 1919 li jam estis komandisto de la Moskva sektoro de la defendo kaj poste servis en gravaj funkcioj de la defendo ĉe diversaj frontoj, inter alie en Kaŭkazo kaj Turkeŝtano. Poste li estris iun armean komisionon pri la studado de la monda kaj Enlanda militoj, kaj iun gazetaran fakon. De 1928 li funkciis kiel gvidanto de la Sekretariejo por Centra Eŭropo de Komintern, kies membro-kandidato de la Ekzekutiva Komitato kaj poste ano de ĝia prezidio li fariĝis. Li forpasis la 10an de junio 1933 kaj estis enterigita en la tombejo apud la Kremla Muro, kio signifis grandegan honoron por li.²²⁸

Vladimir Bonĉ-Brujeviĉ (1873-1955)

Ĉi tiu poldevena rusa revoluciulo kaj posta fama sovetia funkciulo, kiu devenis de familio de oficistoj kaj lernis termezuradon (geodezion), elmigris en 1896 al Svislando, kie li organizis la ekspedadon de la revolucia literaturo kaj poligrafia materialo al Ruslando kaj fondis la partian arkivon. Post sia konatiĝo kun Lenin li fariĝis aktiva kunlaboranto de la gazeto *Iskra*. Krom tio, li studis en la naturscienca fakultato de la Zurika universitato. En 1905 li reiris al Ruslando, kie li laboris ĉe la gazeto *Novaja žizn'* (nova vivo) kaj partoprenis en la preparado de armata ribelo en Sankt-Peterburgo. Inter 1908 kaj 1918 li gvidis la bolŝevisman eldonejon „Žizn' i znanie“ (vivo kaj scio). De 1912 li estis membro de la redakcio de la gazeto *Pravda*. En 1917 li fariĝis membro de la Ekzekutiva Komitato de la Petrograda Soveto, estris la komandojn de la distrikto Smol'nyj-Taŭrida Palaco, membris en la Komitato por la revolucia defendo de Petrogrado kaj administris la laboron de la Soveto de Popolkomisaroj (ĝis oktobro 1920). Li aktive

²²⁷ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Valentinov.

²²⁸ Laŭ [https://ru.wikipedia.org/wiki/Гусев,_Сергей_Иванович_\(партийный_деятель\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Гусев,_Сергей_Иванович_(партийный_деятель)). En la Kaliningrada regiono ekzistas urbo kun la nomo Gusev (iama Gumbinnen), sed ĝi ricevis tiun nomon laŭ alia Sergej Ivanoviĉ Gusev, kiu vivis inter 1918 kaj 1945 (vd. [https://ru.wikipedia.org/wiki/Гусев,_Сергей_Иванович_\(Герой_Советского_Союза\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Гусев,_Сергей_Иванович_(Герой_Советского_Союза))).

partoprenis en la ŝtatigo de la bankoj, en la preparado de la translokiĝo de la soveta registaro al Moskvo en marto 1918 kaj kunsubskribis la dekreton de la 5a de septembro 1918 pri la „Ruĝa teroro“, kiun la bolŝevistoj konsideris necesa por la batalo kontraŭ kontraŭrevoluciuloj, spekulistoj, sabotuloj kaj aliaj krimuloj, kiujn oni celis izoladi en koncentrejoj aŭ eĉ pafmortigi.²²⁹ Inter aliaj gravaj oficoj li okupis la postenon de la gvidanto de la eldonejo de la CK de RKP(b)²³⁰ „Kommunist“ kaj estis elektita kiel membro de la Komunisma Akademio. Post la morto de Lenin (1924), kies funebran ceremonion li organizis, Bonĉ-Brueviĉ okupiĝis pri scienca laboro. Li verkis diversajn librojn pri la revolucia movado en Ruslando, la historio de la religio, ateismo kaj sektismo, pri etnografio kaj literaturo. En la 20aj jaroj li estis organizanto de la sovjhozo „Lesnye poljany“ apud Moskvo, kiu produktis varojn por partiaj kaj registaraj gvidantoj. Li estis la iniciatinto kaj unua direktoro (1933-45) de la Ŝtata literatura muzeo en Moskvo, kaj inter 1945 kaj 1955 direktoro de la Muzeo pri historio de la religio kaj ateismo de la Akademio de la Sciencoj de USSR en Leningrado. Bonĉ-Brujeviĉ, kiu posedis la Lenin-ordenon, forpasis 82-jara la 14an de julio 1955 kaj estis kremaciita kaj enterigita en la Novodeviĉi-tombejo en Moskvo.²³¹

Aleksandr Bogdanov (-Malinovskij) (1873-1928)

Aleksandr Malinovskij, kiu studis fizikon, matematikon kaj medicinon en la universitatoj de Moskvo kaj Ĥarkovo, kaj kiu elpaŝis, sub la pseŭdonomo Aleksandr Bogdanov, kiel sciencisto, kuracisto-psikiatro, pensulo, revoluciulo, verkisto kaj socialisma ideologo, estis unu el la plej kuriozaj kaj sensaciaj figuroj de la rusa marksisma-socialisma-bolŝevisma movado. Membro de RSDLP de 1896, en 1905 li fariĝis membro de ĝia CK, kie li respondecis pri financoj kaj literaturo. En 1904-6 li publikigis tri eldonojn pri „empiriomonismo“, per kiu li klopodis ligi la marksismon kun la filozofioj de Ernst Mach kaj Richard Avenarius. Ĉi tiu agado influis multajn signifajn marksismajn teoriulojn kiel ankaŭ N.I. Buĥarin. En 1904 Bogdanov veturis al Svislando, kie li konatiĝis kun Lenin, kies politikan sintenon li subtenis, kvankam Lenin jam tiam suspektis liajn filozofiajn ideojn. Post kiam Bogdanov estis elektita en novembro 1904 en Ĝenevo kiel grava funkciulo de la bolŝevisma frakcio, li reiris al Peterburgo, kie li agadis kaj baldaŭ estis arestita, tiel ke fine de 1907 li retroviĝis en la emigracio. Post la revolucio de 1905 lia konflikto kun Lenin akriĝis. La gvidanto de la bolŝevistoj perdis la paciencon kun la filozofia devojiĝo de Bogdanov, kies „empiriomonismo“ estis atakita kaj kondamnita de Lenin en sia verko „materiismo kaj empiriokritikismo“ kiel hereza ideologio, kiun li konsideris nekongrua kun la bolŝevisma marksismo, tiel ke en junio 1909 Bogdanov estis eksigita de la Bolŝevisma centro²³² kaj en januaro 1910 el la CK de la partio. Sed Bogdanov havis kelkajn influajn apogantojn kiel G.A. Aleksinskij, A.V. Lunaĉarskij, V.A. Bazarov kaj M.N. Pokrovskij, kiuj helpis al li formadi la grupon „Vperjod“ (kiu eldonis samnoman gazeton), per kiu oni instigis la membrojn de RSDLP prepari sin por nova aliro al la revolucio kun la celo krei novan socialismajn kulturon, sciencon, arton. Kun la tolero de Lenin la grupo komencis konkretigi tiujn ideojn kaj starigis lernejojn por laboristoj sur la insulo Kapri (Italujo), kie vivis Maksim Gorĉkij, poste en Bolonjo, Italio. En printempo 1911 Bogdanov tamen forlasis la grupon kaj la politikon kaj daŭrigis sian agadon kiel verkanto de artikoloj en la gazeto *Pravda* kaj aliaj periodaĵoj. En 1913 Bogdanov reiris al Ruslando post proklamo de amnestio kaj en la Unua mondmilito estis mobilizita kiel kuracisto. Post la Oktobra revolucio li fondis kun Lunaĉarskij, Pokrovskij, Bazarov kaj Skvorcov la „Socialisman akademion por socisciencoj“, fariĝis membro de la komisiono por la tradukado kaj eldonado de la Marks-Engels-verkaro. Eĉ pli fama li fariĝis kiel ĉefa ideologo de la Proleta Kulturo („Proletkul“²³³), kiu devis servi kiel memstara kultura kaj kleriga movado por la laboristoj. Krome li laboris kiel profesoro pri politika ekonomio en la unua Moskva universitato kaj aktivis kiel membro de la prezidio de la „Komunisma Akademio“. Krom tio, li verkis futurismajn rakontojn kaj publikigis la romanon „La ruĝa planedo“, kiu reprezentis la modernan socialisman utopion, en kiu estis traktitaj ankaŭ feminismaj temoj. En septembro 1923 Bogdanov estis arestita de GPU, kiu suspektis lin pro la aparteno al la grupo „Raboĉaja pravda“ (laborista vero), sed post persona interparolo kun ĝia ĉefo Dzerĵinskij li estis liberigita. En 1926 aperis la unua volumo pri „tektologio“. kiu devis servi kiel

²²⁹ Vd. https://ru.wikisource.org/wiki/Постановление_о_красном_терроре.

²³⁰ RKP(b) estis la nomo de la Komunisma Partio (de la bolŝevistoj) inter 1918 kaj 1925.

²³¹ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Bonch-Bruyevich.

²³² Vd. denove https://ru.wikipedia.org/wiki/Большевистский_центр.

²³³ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Proletkult>.

teorio de la „monda organiza dinamiko“ kaj kiel universala kulturteorio. En 1926-28 Bogdanov funkciis kiel direktoro de la nova „Ŝtata scienca Instituto por sango-transfuzo“, kiu estis apogata de Stalin. Kadre de tiu instituto, kiu celis konservi la homojn eterne junaj, Bogdanov faris diversajn dubindajn kaj vivoriskajn sangotransfuzajn eksperimentojn. Ankaŭ la fratino de Lenin, Marija Ul'janova, troviĝis inter la pacientoj. Kiam Bogdanov faris eksperimenton kun si mem, transfuzante al si la santon de iu studento, kiu malsanis je malaro kaj tuberkulozo, Bogdanov subite mortis, la 7an aprilo 1928 en Moskvo, en sia 55a vivojaro, dum la studento, kiu estis injektita per la sango de Bogdanov, postvivis la operacion. Lian funebran ceremonion partoprenis nome de la partio N.I. Buĥarin. Dum lia korpo estis kremaciita, lia cerbo estis transdonita al la „Cerbera instituto“ por esplorado.²³⁴

Anatolij Lunaĉarskij (1875-1933)

estis frua rusa marksisto, inter kies gimnaziaj kamaradoj troviĝis la fama filozofo Nikolaj Berdjaev. En 1895 Lunaĉarskij veturis al Zuriko (Svislando), kie li eniris la lokan universitaton kaj frekventis prelegaron pri Rikardo Avenarius („empiriomonismo“) kaj studis la verkaron de Marks kaj Engels kaj de la francaj materiismaj filozofoj. En Svislando Lunaĉarskij alproksimiĝis al la socialisma grupo de Pleĥanov, „Liberiĝo de la laboro“. En 1897 li fariĝis membro de RSDLP. Baldaŭ Lunaĉarskij fariĝis proksima kunlaboranto de Lenin kaj Bogdanov, kun kiuj li kontraŭbatalis la menŝevistojn de Martov kaj Dan. Tamen, jam ĉirkaŭ la jaro 1900 elkristaliĝis filozofia malinterkonsento kun Lenin, kiu toleris neniujn aliajn vidpunktojn krom la propraj. Post vojaĝado en okcidenta Eŭropo en 1905 Lunaĉarskij retroviĝis en Peterburgo, kie li estis arestita kaj de kie li fuĝis al Stokholmo. Poste li agadis en Italujo kaj Parizo kiel ĵurnalisto. Pro sia longa restado en eksterlando, Lunaĉarskij posedis profundajn konojn pri la okcidenteŭropa artsceno, pri kiu li multe interesiĝis, persone konis signifajn maldekstrajn intelektulojn kiel Romain Rolland, Henri Barbusse, Bernard Shaw, Bertold Brecht k.a., kaj estis konata pro sia „liberala“ sinteno rilate al la arto, kontraste al Lenin, kies sinteno ĉi-rilate estis tre konservativa. Kadre de la NEPo (Nova ekonomia politiko) Lunaĉarskij klopodis, por ke la arta avangardo ricevu sian firman lokon en la sovetia vivo. Li estis unu el la fondintoj de la proleta literaturo kaj aktive apogis la ideojn kaj laboron de la proleta kulturo (Proletkul't) de A. Bogdanov. Malgraŭ propraj vidpunktoj, pri kiuj li ne rezignis, Lunaĉarskij estis sufiĉe lerta taktikisto, kies opinioj ankaŭ povis kontraŭdiri unu la aliajn. Malgraŭ sia nekutima intelektuleco, Lunaĉarskij restis revoluciulo, kiu interesiĝis pri la bezonoj de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Sed la pereon de la avangardismo, kiu estis forpuŝita favore al la „socialisma realismo“, kiam Stalin regis la ŝtaton, li tamen ne povis eviti. Malgraŭ opiniaj diferencoj kun Lenin, Lunaĉarskij karieris post la Oktobra revolucio kiel grava kaj signifa politikisto unuavice kiel unua komisaro por klerigo de RSFSR. Kiel tia li inter alie proponis (en 1929), ke la rusa lingvo adoptu la latinan alfabeton, sed tiu ideo ne realiĝis. En la partiinterna batalo kontraŭ malamikoj de la bolŝevistoj li firme restis sur ilia flanko kaj eĉ elpaŝis kiel ŝtata akuzanto en la proceso kontraŭ la socialismaj revoluciuloj en 1922. En aŭtuno 1929 li estis forigita de la posteno de la komisaro por klerigo kaj instalita kiel prezidanto de la Scienca komitato ĉe la Centra Ekzekutiva Komitato de USSR. En 1930 li fariĝis ano de la Akademio de USSR kaj direktoro de la Instituto pri literaturo kaj lingvo de la „Komunisma Akademio“ kaj funkciulo en aliaj instancoj. Krom tio, li estis anstataŭanta gvidanto de la sovetia delegacio en la Ligo de Nacioj en la tempo de la konferencoj pri malarmado. Lunaĉarskij forpasis pro brustangoro survoje al Hispanio la 28an de decembro 1933 en la franca kuracloko Menton en la aĝo de 58 jaroj. Lia urno estis enterigita en la nekropolo apud la Kremla Muro en Moskvo.²³⁵

Miĥail Ol'minskij(-Aleksandrov) (1863-1933)

Kiel supre menciite, la familioj de A.A. Bogdanov kaj M.S. Ol'minskij vivis mallonge en Puidoux apud la Lago de Bret en la vaŭda kantono. En Genevo, kien Ol'minskij veturis en 1904, li kunlaboris kun Lenin en la redakcio de la gazetoj *Vperjod* kaj *Proletarij*. Post la Februara revolucio de 1917 Ol'minskij estis unu el la redaktoroj de la moskva bolŝevisma gazeto *Social-demokrat*, poste li kunlaboris kun la redakcio de la gazeto *Pravda* kaj la Buroo de la CK de RSDLP(b) en Petrogrado. Sekve li aktive agadis por la stabiligo de la sovetia potenco en Moskvo, estis elektita kiel deputito al la Konstitucia Asembleo

²³⁴ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_Bogdanov.

²³⁵ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Anatoli_Wassiljewitsch_Lunatscharski.

kaj okupis diversajn aliajn ne malgravajn partiajn funkciojn. En 1928 li aliĝis al la „Lenin-Instituto“, kies direkcia membro li fariĝis. Li funkciis kiel eldonisto de la verkaroj de Lenin kaj Pleĥanov, de dokumentoj pri la partia historio, de memuaroj de partoprenantoj en la revolucio. Krom tio, li aŭtoris diversajn literaturajn studojn kaj elpaŝis kiel literaturkritikisto. Ol’minskij forpasis la 8an de majo 1933 kaj estis enterigita en la tombejo apud la Kremla Muro. Laŭ lia nomo estis nomitaj stratoj en diversaj urboj de Sovetunio, kaj la ŝtata pedagogia universitato de Belgorod portis lian nomon. De Trockij li estis denunciata kiel „stalinisma falsanto“ de la ruslanda historio.²³⁶

Georgij Kuklin (1880-1907)

Ĉi tiu rusa elmigrinto malfermis en 1902 en Ĝenevo la „Rusan bibliotekon-legejon“ kaj organizis sian eldonejon, kiu eldonis rusan proletan literaturon, de kiu aperis kvindeko da broŝuroj. Post la 3a kongreso de RSDLP (aprilo-majo 1905) li alproksimiĝis al la bolŝevistoj de Lenin kaj disponigis al ili sian tipografejon. Nur 27-jara, li forpasis en Ĝenevo en majo 1907.²³⁷

Vjaĉeslav Karpinskij (1880-1965)

Doktoro de la ekonomiaj sciencoj, li agadis, en kunlaboro kun Lenin, en Ĝenevo kiel redakciano de la gazetoj *Vperjod* kaj *Proletarij*. Dum la Unua mondmilito li organizis la eldonadon de la gazeto *Social-demokrat*. Post sia reveno al Ruslando en 1917 li kunlaboris kun la gazeto *Derevenskaja pravda* (kampanara vero) kaj dum la Enlanda milito li redaktis la gazeton *Krasnaja zvezda* (ruĝa stelo). En 1918-27 li estis ano de la redakcio de la gazeto *Pravda* kaj de vico de aliaj gazetoj kaj revuoj. De 1937 li okupiĝis pri scienca kaj literatura laboro kaj estis deputito de tri kongresoj de la Komunisma partio. Karpinskij verkis aron da artikoloj pri Lenin, de kiu li mem ricevis sennombrajn leterojn, pri la historio de la Komunisma partio kaj de la soveta ŝtato. Trifoje li estis honorita per la Lenin-ordeno, kaj en 1952 li fariĝis „Heroo de la socialisma laboro“. Karpinskij forpasis la 20an de marto 1965 en Moskvo kaj estis enterigita en la Novodeviĉi-tombejo.²³⁸

Fjodor Samojlov (1882-1952)

Estis membro de RSDLP de 1903, bolŝevisto kaj en 1912 elektita kiel deputito al la 4a Ŝtata Dumao, al kies bolŝevisma frakcio li apartenis. Pro kontraŭmilita aktiveco li estis arestita en novembro 1914 kaj ekzilita al la regiono de Turuĥansk. Post la Februara revolucio de 1917 li fariĝis prezidanto de la Soveto en Ivanovo-Voznesensk. Kiam Lenin alvenis en Petrogrado en aprilo 1917, li troviĝis inter tiuj, kiuj akceptis lin en la Finnlanda stacidomo kaj kiuj en la venonta tago aŭskultis dum la Tutruslanda kunveno de la Sovetoj de laboristaj kaj soldataj deputitoj la proklamon de la „aprilaj tezoj“ de Lenin. En 1919 li plenumis gravajn postenojn en Ukrainio kaj Baŝkirio. En 1922-23 li estis kandidato por la membreco de la CK kaj/aŭ kandidato por la membreco de la Centra kontrolkomisiono de RKP(b) kaj membriĝis en la Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato (VCIK). Post plenumo de aliaj mezgravaj postenoj en la partio dum la 20aj kaj 30aj jaroj, en 1937-41 li funkciis kiel direktoro de la Ŝtata muzeo de la revolucio. Iu teksaĵ-fabriko kaj iu strato en Ivanovo ricevis lian nomon.²³⁹

Nikolaj Semaŝko (1874-1949)

studis en la medicina fakultato de la Kazana universtato, estis kuracisto en la gubernioj de Orjol kaj Samara kaj revolucia aktivulo en Niĵnij-Novgorod, elmigris al Svislando en 1906, kie en Ĝenevo li konatiĝis kun Lenin. Lige kun la „ekspropriigo“ en Tifliso (junio 1907) li estis arestita de la svisa polico kaj en 1908 translokiĝis al Parizo, kie li funkciis kiel sekretario de la Eksterlanda Buroo de la CK de RSDLP. Post diversaj agadoj por la revolucia movado en diversaj landoj, Semaŝko revenis en septembro

²³⁶ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Olminsky.

²³⁷ Laŭ <http://redkayakniga.ru/knigovedenie/item/f00/s01/e0001060/index.shtml>.

²³⁸ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Вячеслав_Алексеевич_Карпинский kaj http://www.warheroes.ru/hero/hero.asp?Hero_id=16022.

²³⁹ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Фёдор_Никитич_Самойлов.

1917 al Moskvo, kie li estis elektita de la bolŝevisma frakcio kiel prezidanto de iu administra organo kaj fariĝis deputito de la 6a kongreso de RSDLP(b). Dum la Oktobra revolucio li aktivis en Moskvo kaj organizis la medicinan helpon por ĝiaj partoprenantoj. Post la Oktobra revolucio li laboris kiel gvidanto de la medicin-sanitara sekcio de la Moskva Soveto kaj gvidis la aŭtopsion de la kadavro de Lenin. En 1918 li fondis la Centran medicinan bibliotekon. En 1918-30 li estis popolkomisaro por la sanprotekto de RSFSR. En 1921-49 li laboris kiel profesoro kaj gvidanto de la katedro pri socia(la) higieno de la medicina fakultato de la Moskva universitato, partoprenis signifajn iniciatojn lige kun la problemoj de la nutrado en Sovetunio kaj okupis gravajn politikajn funkciojn. Krom tio, li estis ĉefredaktoro de la Granda medicina enciklopedio. Post la milito li funkciis kiel direktoro de instituto por lerneja higieno kaj kiel direktoro de instituto por la organizado de la sanprotekto kaj historio de la medicino. Li posedis la Lenin-ordenon kaj la ordenon de la ruĝa standardo de la laboro.²⁴⁰ En 1921 Semaŝko, nevo de Pleĥanov, proponis al la politburoo de la partio starigi monumenton honore al la grandmajstro de la rusa marksismo, kio estis akceptita.²⁴¹

Afanasij Matjuŝenko (1879-1907)

Temas pri la fama revolucia matroso de la Nigramara Floto, kiu estis unu el la gvidantoj de la ribelo sur la militŝipo „Princo Potjomkin-Taŭriano“ dum la rusa revolucio en la 13a de junio 1905; li estis transdonita al la rumanaj aŭtoritatoj, tiel ke li fariĝis politika elmigrinto. En julio 1905 li forveturis kun aliaj al Svislando, sed revenis en aŭtuno 1905 al Rumanio, kie en marto 1906 li estis arestita kaj akuzita pro propagando inter matrosoj. La rumanoj forpelis lin el la lando, tiel ke li elmigris al Svislando, poste al Usono kaj Francio, de kie li baldaŭ devis fuĝi al Svislando, ĉar la polico persekutis lin. En Ĝenevo Matjuŝenko havis kontakton kun Lenin kaj aliaj bolŝevistoj, sed ankaŭ kun menŝevistoj, socialismaj revoluciuloj kaj kun la popo Georgij Gapon por diskuti kun ili pri la lukto kontraŭ la carismo. La 28an de junio 1907 Matjuŝenko alvenis per pramŝipo en Odeso kun falsita pasporto kaj kelkaj bomboj en la pakaĵo, sed la koncerna konspira loĝejo en Odeso estis trovita kaj fermita. La 3an de julio li estis arestita en Nikolaev kaj sendita al prizono en Odeso. Post mallonga proceso en Sevastopolo li estis kondamnita al morto. Malgraŭ iu amnestio de la 17a de oktobro, kiu devis aboli la mortpunon kaj koncernis inter alie ankaŭ la partoprenintojn en la „Potjomkina“ ribelo, la verdikto estis efektiva la 20an de oktobro 1907, tiel ke liaj advokatoj riproĉis al la aŭtoritatoj, ke ili lezis la validan leĝon.²⁴²

Georgij Gapon (1870-1906)

estis rusortodoksa pastro kun jud-ukraina kamparana deveno, kiu frue konvertiĝis al la kristanismo. Li helpis al la laborista movado de Ruslando kaj estis observata de la sekreta servo Oĥrana. La movado de Gapon pli kaj pli politike radikaliĝis, dum li mem kredis je la alianco inter la caro kaj popolo. En la „Sanga Dimanĉo“ de la 9a (22a) de januaro 1905 en Peterburgo Gapon marŝadis kun sia anaro tra la urbo malgraŭ avertoj de la polico prefere rezigni pri tio. Kvankam la marŝo evoluis pace, la gvardianoj de la Vintra Palaco pafadis kontraŭ la amaso, kiu eĉ portis bildojn de la caro. Dum kelkcent marŝantoj estis mortpafitaj, Gapon povis eskapi el la buĉado kaj forfuĝis de la lando, kontaktante revoluciajn ĉelojn, inter alie en Ĝenevo, kie li renkontiĝis kun Lenin. Post la proklamo de la Oktobra manifesto de 1905 li revenis al Ruslando. Post kiam li konfesis al sia amiko Pinchas (Pjotr) Ruthenberg, ke li estas agento de la Oĥrana, li estis pendigita la 28an de marto (10an de aprilo) en iu kabano apud Ozerki en la Sankt-Peterburga gubernio laŭ la mendo de la partio de la socialismaj revoluciuloj. Li estis enterigita en la Uspenskij- (nuntempe norda) tombejo de Sankt-Peterburgo.²⁴³

Iosif Dubrovinskij (1877-1913),

kiu kunlaboris en Ĝenevo kun A. Bogdanov kaj G. Aleksinskij al la gazeto *Proletarij*, gvidis iom nervozan vivon inter revolucia agado, arestado kaj ekzilo. Post kiam en la 1890aj jaroj li fariĝis

²⁴⁰ Laŭ [https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Semashko_\(medicine\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Semashko_(medicine)).

²⁴¹ Volkogonov, Lenin, p. 83.

²⁴² Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Afanasi_Matushenko.

²⁴³ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Georgi_Apollonowitsch_Gapon.

marksisto kaj aliĝis al la revolucia movado, li estis arestita unuafoje en 1897 kaj la postan jaron sendita al kvarjara ekzilo. Kiam li malsaniĝis je la tuberkulozo li estis sendita al Astraĥano. Li ekrlatis kun la eldonistoj de la gazeto *Iskra* kaj fariĝis ĝia korespondanto. Post la 2a kongreso de RSDLP en 1903, dum kiu okazis skismo inter la bolŝevistoj kaj menŝevistoj, Dubrovinskij aliĝis al la bolŝevisma frakcio kaj estis kooptita de la CK de RSDLP. Post sia liberiĝo li daŭrigis la partian laboron en Moskvo kaj klopodis reunuigi bolŝevistojn kaj menŝevistojn. En 1905 li veturis al Peterburgo, kie li partoprenis en la revolucia ribelo de la Kronŝtadtaj-matrosoj²⁴⁴ kaj revenis al Moskvo kiel unu el la gvidantoj de la armata decembra ribelo.²⁴⁵ En septembro 1906 li estis arestita en Peterburgo. Post sia liberiĝo el la prizono li preparis en februaro 1907 la 5an kongreson de RSDLP. En marto de la sama jaro li estis denove arestita, sed lia ekzilo estis anstataŭigita per la ebleco forveturi al eksterlando. Dum la 5a kongreso de RSDLP en Londono (1907) li estis elektita kiel membro de la CK kaj de la Bolŝevisma Centro. Post sia kaŝa reveno al Peterburgo li estis arestita en novembro 1908 kaj ekzilita unue al Vologda, poste al Sol'vyčegodsk, de kie li povis fuĝi al Parizo. Sed malgraŭ grandaj riskoj li reveturis al Ruslando por daŭrigi sian laboron en la Moskvaj partiaj organizaĵoj. En junio 1910 li estis perfidita de la agento Malinovskij. La juĝejo sendis lin por kvar jaroj al Turuĥansk, kie li tragike pereis la 20an de majo 1913, dronante en la rivero Jenisejo. Lia kadavro estis trovita nur unu monaton poste kaj entombigita de politikaj ekzilitoj en la vilaĝo Mirojedihino. La partio kolektis monon por starigi monumenton en Krasnojarsk, kie li estis duan fojon enterigita en la urba tombejo en junio 1916 laŭ la decido de la Krasnojarska partia organizaĵo.²⁴⁶

Grigorij Aleksinskij (1879-1967)

studis en la histori-filologia fakultato de la Moskva universitato, de kiu li estis dufoje eksigita kaj forigita de Moskvo. Post sia liberiĝo el la prizono li vivis en Jaroslavlo. Kiel membro de RSDLP li fariĝis bolŝevisto kaj en 1905 post sia konatiĝo kun Lenin en Peterburgo laboris en la bolŝevismaj organizaĵoj kaj fariĝis kunlaboranto de diversaj partiaj eldonaĵoj. En aŭgusto 1906 li estis denove arestita, sed liberigita pro malsaniĝo. En 1907 li estis elektita kiel deputito de la Dua Ŝtata Dumao. Post la likvido de tiu ĉi parlamento en junio 1907 fare de A. Stolypin okazis reprezalioj kontraŭ 55 social-demokratoj, de kiuj 16 estis transdonitaj al la tribunalo. Ankaŭ Aleksinskij, kiu komence de majo ankoraŭ partoprenis en la 5a kongreso de RSDLP, kiu okazis en Londono, troviĝis inter ili. Serĉata de la polico, li restis en eksterlando ĝis la Februara revolucio de 1917, kie li partoprenis en la kongresoj de la Socialisma Internacio en Stutgarto (1907) kaj Bazelo (1912). Post sia distanciĝo de Lenin en Ĝenevo, Aleksinskij aliĝis al la ultramaldekstra grupo „Vperjod“, kiu estis fondita en decembro 1909 de A. Bogdanov kaj reprezentita de Aleksinskij dum la Viena konferenco de RSDLP en 1912 kaj en la Brusela „Unuiga“ konferenco de la ruslanda social-demokratio. Dum la Unua mondmilito Aleksinskij estis en Parizo, kie li daŭrigis sian revolucionan agadon kiel ĵurnalisto. Post la Februara revolucio de 1917 li returniĝis al Ruslando, kie li aliĝis al la grupo de Pleĥanov, elpaŝis dum manifestacioj kaj kontraŭbatalis la bolŝevistojn; li kunmetis dokumentojn, kiuj devis pruvi, ke Lenin estis germana agento. Malgraŭ tio, en junio 1917 Aleksinskij estis praktike unuanime elektita al la Petrograda Soveto en la nomo de la „Administracio de la servoj de la Nordokcidentaj fervojoj“. Sed lia elekto estis kontestata: Dum la ĉirilata respondeca komisiono de la Narva distrikto de Peterburgo konfirmis la mandaton de Aleksinskij, la analoga komisiono de la Ekzekutiva Komitato de la ĉefurba soveto ne faris tion. En 1918 Aleksinskij, kiu fariĝis viktimo de la kruda politika klimato, kiu senkompate rilatis al partiaj deviantoj kaj kritikantoj, estis arestita de la sekreta servo Ĉeka, sed liberigita laŭ kaŭcio, kaj komencis labori en la sovetaj servoj. En 1919 li tamen preferis la emigracion en Estonio. En 1920 li estis juĝita de iu soveta tribunalo pro „kontraŭrevolucia konspirado“ kaj ricevis la malpermeson por reveni al Soveta Ruslando. Post tio li fariĝis prezidento de la Rusa Konsilio (aŭ Soveto) en Parizo kaj kunlaboris kun la gazetoj *Obŝee delo* (komuna afero) kaj *Russkaja gazeta*. En la tridekaj jaroj Aleksinskij, kiu laŭ Trockij estis „pasia intriganto“, klopodis diskrediti la mortintan Leninon pro laŭdira amrilato kun iu damo en Francio. Aleksinskij forpasis la 4an de oktobro 1967 en Parizo kaj estis enterigita en la rusortodoksa tombejo Sainte-Geneviève-des-Bois, kiu troviĝas en la departemento Essonne.²⁴⁷

²⁴⁴ Vd. <https://www.booksite.ru/fulltext/1/001/008/066/574.htm>.

²⁴⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Moscow_uprising_of_1905.

²⁴⁶ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Иосиф_Фёдорович_Дубровинский.

²⁴⁷ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Григорий_Алексеевич_Алексинский.

Mihail Ĉakaja (1865-1950)

Frua kartvela revoluciulo, kiu estis atestanto de la geedziĝo de Stalin kaj E. Svanidze en Tifliso. Inter 1907 kaj 1917 li vivis en Ĝenevo, kie li aliĝis al la grupo „Vperjod“ ĉirkaŭ Bogdanov kaj Aleksinskij, kiu kritike rilatis al Lenin. En aprilo 1917 li reiris al Ruslando kun Lenin en la „plombizita“ trajnvagono kaj en sia kaŭkaza patrujo faris rapidan karieron kiel membro de la Tiflisa komitato de RSDLP(b) (1917-20), poste de la CK de RKP(b). En 1921-22 li estis prezidanto de la Kartvela SSR kadre de RSFSR, en 1923-30 estro de la prezidio de la Centra Ekzekutiva Komitato de la Kartvela SSR kaj unu el la prezidantoj de la Centra Ekzekutiva Komitato de la Transkaŭkaza SFSR. En 1922 li subskribis la traktaton pri la fondo de USSR kiel reprezentanto de la Transkaŭkaza SFSR. Inter 1922 kaj 1937 li estis membro de la prezidio de la Centra Ekzekutiva Komitato de USSR. De 1920 li apartenis ankaŭ al la Ekzekutiva Komitato de Komintern kaj okupis aliajn gravajn funkciojn. En 1944 li ricevis la Lenin-ordenon. Li forpasis la 19an de marto 1950 kaj estis enterigita en Tbilisi.²⁴⁸

Aleksandr Martynov (-Pikker) (1865-1935)

Ĉi tiu malnova juda revoluciulo, kiu ankoraŭ apartenis al la grupo „Narodnaja volja“ en la 1880aj jaroj, pasigis multajn jarojn en carismaj malliberejoj de orienta Siberio kaj revenis al la libereco en 1899, aliĝante al la RSDLP-komitato en Ekaterinoslav. Post nova restado en prizono li elmigris kaj aliĝis al la „Unio de rusaj socialdemokratoj“. Post la 2a kongreso de RSDLP en 1903 li transiris al la menŝevistoj kaj fariĝis gvidanto de ilia frakcio. Post nova arestado en 1906 li denove elmigris kaj fariĝis deputito de la 4a (reunuiĝita) Kongreso de RSDLP. En la 5a kongreso de RSDLP en Londono (1907) li estis elektita kiel membro de la CK. En la jaroj 1908-10 li partoprenis en iu historiografia projekto kaj dum la Unua mondmilito li estis membro de la Eksterlanda sekretariejo de la menŝevista CK ĉirkaŭ la grupo de Julij Martov, kun kiu post la Februara revolucio de 1917 Martynov revenis al Ruslando, kie li partoprenis la laboron de la Tutruslanda konferenco de la menŝevistoj kaj reunuiĝintaj organizaĵoj. En oktobro 1917 li eniris la Provizoran Soveton de la Ruslanda Respubliko (Antaŭparlamento) kaj en la Buroon de la frakcio de la menŝevistoj-internaciistoj. Post la Oktobra revolucio li distanciĝis de la menŝevismo, kiun li komplete forlasis dum la Enlanda milito. Li veturis kun sia familio al Ukrainio por labori kiel instruisto kaj forlasis la partian laboron. En 1923 li neis, ke li malkonsentas kun la partio kaj estis reakceptita de RKP(b). En la sekva tempo li laboris en la Marks-kaj-Engels-Instituto, prelegis en la „Komunisma Akademio“ kaj en la Sverdlovska komunisma universitato, De 1924 ĝis la vivofino li laboris en Komintern kiel membro de la redakcio de la ĵurnalo *Komunisma Internacio*. La 5an junio 1935 Martynov forpasis en Moskvo.²⁴⁹

Lev Trockij (-Bronŝtejn) (1879-1940)

Malgraŭ ĉiuj senkompataj kontestoj kaj ardaĵoj pri li kaj lia historia rolo, ĉe Lev (Leo) Trockij temas, apud Lenin kaj Stalin, sendube pri la plej fama kaj elstara figuro inter la protagonistoj de la rusa revolucio de 1917 kaj de la ruslanda kaj sovetia komunisma movado, kun sorto, kiu estis eksterordinara, unika, sensacia, kiu internace ĉiam kaŭzis grandajn miradon kaj diskutadon, pro kio lia biografio fariĝis vaste atentata kaj estu konsiderata ankaŭ ĉi tie. Kiel 17-jara knabo Trockij, judo el suda Ruslando/Ukrainio, aliĝis al la marksismaj revoluciuloj kaj en 1897 partoprenis la fondon de RSDLP, kiun li reprezentis kiel propagandisto en la urboj Nikolaev kaj Odeso, kie la carisma polico malliberigis lin, antaŭ ol li estis sendita al la siberia mallibereco, kie lia marksisma fundamento maturiĝis. En 1902 li eskapis el la siberia ekzilo kaj adoptis la nomon Trockij, kiu posedis la talenton de oratoro. En aŭtuno de ĉi tiu jaro Trockij veturis al Londono, kie li konatiĝis kun Lenin, kun kiu li redaktos la gazeton *Iskra*. En la tempo de la skismo Trockij klopodis esti peranto inter bolŝevistoj kaj menŝevistoj, kiujn li preferis; li komencis kritiki la konduton de Lenin, en kiu li malkovris trajtojn de diktatoro. En aŭgusto 1903 Trockij vizitis kiel korespondanto de *Iskra* la Vlan Cionistan kongreson en Bazelo (Svislando). En 1904 li distanciĝis de la menŝevistoj kaj alproksimiĝis al A.L. Parvus-Helphand, alia juda marksisma

²⁴⁸ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Tshhakaya.

²⁴⁹ Laŭ [https://en.wikipedia.org/wiki/Aleksandr_Martynov_\(Russian_politician\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Aleksandr_Martynov_(Russian_politician)).

revoluciulo el Odeso, kiu rompis kun Lenin kaj kies „teorio pri la permanenta revolucio”²⁵⁰ impresos kaj influos lin. Post restadoj en Parizo kaj Munkeno, dum la revolucio de 1905 Trockij reiris al Ruslando, kie li kunfondis la Peterburgan Soveton, kiu estis praktike gvidata de Parvus kaj li mem. Sed li estis denove arestita kaj kondamnita al dumviva ekzilo, de kie li tamen povis fuĝi al Vieno. Dum la Va partia kongreso de 1907 en Londono Trockij ne aliĝis al la frakcio de la bolŝevistoj, nek al tiu de la menŝevistoj, sed formis propran centrisman frakcion. Post la eksplodo de la Unua mondmilito (1914) Trockij fuĝis al Svislando kaj de 1915 eldonis en Parizo la gazeton *Naŝe slovo* (nia vorto). En la sama jaro li ankaŭ partoprenis la konferencon de Zimmerwald en Svislando, kie li reprezentis sin mem. Pro sia kontraŭmilita sinteno en septembro 1916 li estis transdonita de la francaj aŭtoritatoj al Hispanio. Anstataŭ al Kubo, kien la hispanoj volis sendi lin, li povis veturi al Usono, kie en marto 1917 li eksciis pri la Februara revolucio. Survoje al Ruslando, la 3an de aprilo, Trockij estis arestita en Halifakso (Kanado) de la britaj aŭtoritatoj, kiuj portis lin al tendaro por retenitaj germanaj militkaptitoj. Dank’ al la premo de la Petrograda Soveto kontraŭ la Provizora Registaro, Trockij liberiĝis en majo kaj veturis, tra Svedio kaj Finnlando, al la ruslanda ĉefurbo, kie li aliĝis al la „Transregiona organizaĵo de unuiĝintaj socialdemokratoj”, kiu celis pacigi la bolŝevistojn kun la menŝevistoj.²⁵¹ Baldaŭ tiu organizaĵo tamen aliĝis al la bolŝevismo. Dum Lenin kaŝiĝis en Finnlando, Trockij praktike gvidis la bolŝevistojn ĝis lia reveno, ankaŭ en la t.n. Antaŭparlamento (Provizora Soveto de la Ruslanda Respubliko). Dum la VIa partia konferenco de la bolŝevistoj Trockij, kiu estis arestita post la julia ribelo, estis akceptita de la partio kaj ricevis lokon en ĝia CK. En septembro li estis nomumita prezidanto de la Petrograda Soveto kaj komencis organizi la batal-taĉmentojn de la Ruĝa Gvardio. Kiam la 10an de oktobro la CK de la bolŝevisma partio decidis pri armata ribelo kontraŭ la Provizora Registaro, Trockij voĉdonis por tiu opcio, dum Zinov’ev kaj Kamenev estis kontraŭ. La 16an de oktobro estis fondita sub lia gvido la Arme-Revolucia Komitato (VRK) de la Petrograda Soveto, kiu nuligis la armeajn ordonojn de la Provizora Registaro. Post la sturmado de la Vintra Palaco en la 25/26aj de oktobro (7/8aj de novembro) kaj la arestado de la anoj de la Provizora Registaro, kiu estis ordonita de tiu Komitato, formiĝis la Soveto de la popolkomisaroj, kiu praktike estis la bolŝevisma sovetregistaro, en kiu Trockij fariĝis popolkomisaro por eksteraj rilatoj. Lia ĉefa tasko estis atingi packonvencion kun la Germana Regno kaj kun ĝia aŭstra-hungara aliancano. Krom tio li iniciatis la interparolojn en Brest-Litovsk. La ĉi-koncerna traktato estis subskribita de Ruslando je ĝia granda malavantaĝo, ĉar ĝi perdis Ukrainion, kiu siaflanke proklamis la sendependecon. Post tio Trockij demisiis de sia posteno kiel popolkomisaro por eksteraj rilatoj kaj komencis engaĝiĝi, por ke la bolŝevistoj venku en la Enlanda milito en Ruslando kontraŭ la „Blankuloj”. La 14an de marto 1918 Trockij estis nomumita popolkomisaro por militaj aferoj kaj komencis la konstruadon de la Ruĝa Armeo, per kio li decide kontribuis al la celita venko, kiu estis atingita per rigoraj rimedoj, inkluzive la enkondukon de la gazetara cenzuro kaj mortpuno en la armeon kaj la abolon de demokratiaj strukturoj. La 6an de aprilo li transprenis ankaŭ la respondecon por la ŝiparo. En sia legendeca „fortikigita trajno” li vojaĝis ĝis 1920 tra la lando de unu fronto de la Enlanda milito al la alia. La bolŝevistoj estis devigitaj agnoski la decidan rolon de Trockij, kiu praktike estis la dua plej signifa homo en la partio kaj ŝtato, kiel savanto de la partio. En 1920 Trockij komencis militon kontraŭ Pollando kaj ĝiaj ukrainaj aliancanoj, kiu finiĝis per fiasko por la rusoj, kiuj tamen povis reakapari Ukrainion kaj Blankrusion. La ribelo de la Kronŝtadtaĵ matrosoj (1921), kiuj postulis demokratiajn liberecojn (en la senco de la anarkiismo), estis subpremita de Trockij, kiu respondecis ankaŭ por la sufokado de kamparanaj ribeloj kun miloj da mortintoj. Ĝis 1922 la ruĝaj trupoj konkeris Krimeon, Azerbajĝanon, Armenion kaj Kartvelion. Pro sia kruela, senkompata perforto kontraŭ malamikoj Trockij estis forte kritikata dum la 30aj jaroj de alilandaj komunistoj. Dum Trockij ŝajne interpaciĝis kun Lenin, kiu laŭdis lin kiel ege kapablan partianon, li komencis kvereli kun aliaj partiaj kamaradoj, ĉar Trockij ekkritikis la burokratian, totalisman regadon de la bolŝevistoj kaj la kreskantan rusan naciismon. Tuj post la unua cerbinfarkto de Lenin (1922) estis kreita la triopo (aŭ triumviraro) Zinov’ev-Kamenev-Stalin por redukti la influon kaj potencon de Trockij, kiun ili timis, ĉar ili volis eviti, ke li fariĝu la oficiala posteulo de Lenin, mem havante tiajn ambiciojn. Stalin fariĝis ĝenerala sekretario de la partio, kiu estis nove kreita posteno. Kiam Trockij atakis la CKn en oktobro 1923, li rikoltis kontraŭan reagon. En 1924 la kritiko de Trockij trafis unuavice kamaradon Stalin mem, kiu reagis laŭ sia maniero, unue en kompliceco kun Zinov’ev kaj Kamenev, poste sen ili. En tiu momento la trockiistoj utiligis la

²⁵⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Konstanta_revolucio.

²⁵¹ Alveno de Trockij en Ruslando: <https://www.wsws.org/en/articles/2017/05/15/twrr-m15.html>.

„testamenton” de Lenin, en kiu li rekomendis la forigon de Stalin kiel ĝenerala sekretario de la partio,²⁵² dum la stalinistoj rigore prisilentis ĝin. En la januara XIIIa partia konferenco oni riproĉis al Trockij frakcian organizadon. La funebran ceremonion de Lenin Trockij maltrafis en Suĥumi, verŝajne ĉar la stalinistoj ruze trompis lin laŭ la dato. Kiel nova estro de la Soveto de popolkomisaroj fariĝis A.R. Rykov, kiu mem lasis misuzi sin por agi kontraŭ Trockij. Post la morto de Lenin en januaro 1924 eksplodis malferma kverelo inter Trockij kaj Stalin pri la estonteco de Sovetunio kaj la teoria fundamento de la komunismo. En tio Stalin povis apliki la potencajn rimedojn, kiujn havigis al li lia oficiala funkcio, kaj proklami la politikon de la „socialismo en unu lando”, dum Trockij palavis pri „monda revolucio” kaj „laborista demokratio” laŭ la modelo de la Komunisma Manifesto. Sed liaj klopodoj defendi sin kontraŭ Stalin, kiu fariĝis pli kaj pli potenca, evidentiĝis malsukcesaj. En 1925 Trockij perdis sian postenon kiel popolkomisaro por militaj aferoj kaj ŝiparo kaj estis devigata akcepti pli malaltrangajn funkciojn en la ŝtata aparato. Li estis denunciata kaj diskreditita kiel „juda perfidulo” kaj „lakeo de la faŝismo”. La nocio „trockiismo” fariĝis sinonimo por herezo kaj fraŭdo. La nomo kaj bildoj de Trockij estis elsarkitaj kaj malaperis el ĉiuj oficialaj dokumentoj. Stalin eĉ neis la signifon de Trockij dum la Oktobra revolucio kaj en 1926 zorgis pri tio, ke li estu eliminata el la Politburoo kaj en novembro 1927 ankaŭ el la partio mem. En januaro 1928 li estis ekzilita al Kazahio, de kie li estis forpelita al Turkio, kiu donis al li azilon en 1929 kaj kie li vivis en izoliteco sur la insulo Büyükada en la Marmora Maro ĝis 1933. Por perlabori monon li estis devigata verkadi. Iu usona eldonejo pretis financi lian aŭtobiografion, kiu aperis en 1929. Tio kuraĝigis la aŭtoron verki propran historion de la rusa revolucio, kiu aperis en 1932 dank’ al la pagado de alia usona eldonejo. En tiu periodo Trockij komencis ankaŭ okupiĝi pri la germana faŝismo kaj engaĝiĝi kontraŭ la hitlera partio, dum Stalin reviziis la „Novan Ekonomian Politikon” kaj akcelis la industriigon kaj kolektivigon de la agrikulturo en sia subevoluinta lando. Ankaŭ tiuj faroj estis forte kritikataj de Trockij kaj liaj adeptoj de la „Maldekstra opozicio”, kiu agadis subtere. En eksterlando Trockij publikigis polemikajn artikolojn kontraŭ Stalin, kiuj aperis en *New York Times* kaj aliaj gazetoj. En februaro 1932 Trockij perdis la sovetian ŝtatanecon kaj estis persekutata de la sekreta servo GPU. La franca registaro havigis al li azilon, tiel ke Trockij dume loĝis unue en Royan, poste en Barbizon, ĉar en Parizo li ne rajtis esti. Sed en 1935 oni signalis al li, ke lia restado en Francio ne plu estas dezirinda. Li akceptis la proponon iri al Norvegio, kie li vivis en la domo de la pentristo, deputito kaj ĵurnalisto Konrad Knudsen en Norderhov/Hønefoss apud Oslo. En sia vigla publica agado Trockij atakis la stalinismon kaj la Moskvajn procesojn, kiuj estis lanĉitaj kontraŭ aliaj famaj sovetiaj bolŝevistoj, kaj en kiuj li mem estis akuzita in absentia kiel granda ĉefo de la konspirado kontraŭ Stalin kaj ties sistemo. Sed la norvegaj aŭtoritatoj limigis lian movliberecon kaj ordonis al li hejman areston. Post kiam li estis atakita de norvegaj faŝistoj, la norvega registaro intervenis kaj Trockij devis malaperi el la lando laŭ la ordono de la justicministro Trygve Lie (posta ĝenerala sekretario de UN). Trockij al Meksiko (1937), kies prezidento konsentis doni al li azilon kondiĉe, ke Trockij rezignos pri politika aktiveco. Sed Trockij ne ĉesis agitadi kontraŭ Stalin, komencis malkaŝi la krimojn de la sovetia sekreta servo kaj de la gulago kaj publikigis diversajn verkaĵojn, ekzemple „La perfidita revolucio”, en kiu li nomis Sovetunion „burokratia, degenerita laborista ŝtato”, negative karakterizis la sovetian gvidanton en sia Stalin-biografio kaj alvokis la sovetian laboristan klason ribeli kontraŭ la stalinisma diktaturo, dum en Sovetunio mem Trockij estis nomata „lupo de la faŝismo”. En Meksiko Trockij vivis kun sia edzino Natal’ja Sedova (1882-1962) en la domo de la meksika pentristino Frida Kahlo en Coyoacán (parto de Meksik-urbo). La 24an de majo 1940 Trockij postvivis unuan atencon en sia domo, kiu estis efektivigita de sovetiaj agentoj, kiujn Stalin sendis kiel kaŝitajn meksikajn policistojn. Pro timo li konstruis la domon pli sekure, preskaŭ kiel kontrolatan fortikaĵon. Tri monatojn poste, la 20a de aŭgusto, okazis nova atenco kontraŭ lia vivo: La sovetia agento Ramón Mercader (1913-78), hispana komunisto, kiu nomis sin Frank Jackson kaj aperis kun la masko de usona ĵurnalisto, ricevis aliron al la domo de Trockij. Post la 17a horo Trockij estis atakita de Mercader en sia laborĉambro per glacia hakilo, pro kio la ruso estis grave vundita ĉe la kapo. Liaj gvardianoj trovis lin en sangolago ankoraŭ konscia. La postan tagon Trockij tamen forpasis kaŭze de la lezoj, kiujn li suferis. 300 mil homoj akompanis la funebran procesion por Trockij, kies kadavro estis kremaciita kaj enterigita en la ĝardeno de la domo, kie la atenco okazis. La sovetia registaro publike neis ĉian respondecon por la murdo. Mercader estis kaptita, akuzita antaŭ meksika tribunalo kaj kondamnita al 20-jara arestado en malliberejo. En 1960 li estis liberigita kaj povis translokiĝi al Sovetunio, kie li li ricevis la Lenin-ordenon kaj la honoron „heroo de Sovetunio”.

²⁵² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Lenin's_Testament.

Trockij neniam estis oficiale rehabilitita en Sovetunio, eĉ dum la periodo de perestrojko kaj glasnosto tio ne okazis. Nur en 1992 li estis rehabilitita laŭ peto de la organizaĵo „Memorial“, eĉ dufoje fare de la Prokuroraro de la Ruslanda Federacio.

La domo de la atenco en Meksiko estis transformita al muzeo, al kio partoprenis lia nepo Esteban Volkov. La hakilo, per kiu Trockij estis mortigita, estis trovita en 2005. Trockiismaj organizaĵoj ekzistas ĝis hodiaŭ en pluraj landoj de la mondo.

La unua edzino de Trockij, **Aleksandra Sokolovska**, nask. en 1872, estis mortigita en 1938. Ankaŭ iuj aliaj familianoj estis persekutitaj kaj mortpafitaj dum la stalinisma tempo. Lia fratino Ol'ga, kiu same partoprenis en la revolucia movado de Ruslando, edziniĝis al Lev Kamenev, poste aliĝis al la opozicio de Zinov'ev kaj estis same likvidita de la stalinistoj.²⁵³

Grigorij Zinov'ev (-Radomysl'skij-Apfelbaum) (1883-1936)

Ĉi tiu eminenta funkciulo de la bolŝevisma movado, kiu estis de juda deveno, estis prilamentita kiel povra kaj senkulpa viktimo de la stalinisma teroro, sed oni forgesis, ke li estis unu el la 'spiritaj patroj' aŭ 'antaŭpensantoj' de tiu (ruĝa) teroro, kiam en septembro 1918 li diris antaŭ komunistoj en Petrogrado en sia funkcio kiel prezidanto de la Petrograda Soveto, ke „ni devas gajni 90 de 100 milionoj de Ruslando por nia afero, al la ceteraj ni havas nenion por diri, ili devas esti neniigitaj“. En la sama tempo, Zinov'ev ordonis la mortigon de 512 ostaĝoj ankoraŭ antaŭ la proklamo de la ruĝa teroro, kiel la gazeto *Izvestija* raportis. Malgraŭ la kontraŭdiraj opinioj, kiujn Zinov'ev formulis kune kun sia politika 'ĝemelo' Lev Kamenev pri kelkaj vidpunktoj de Lenin, inkluzive la supozatan perfidon de ribelaj planoj kadre de la Oktobra revolucio, li restis lia lojalulo kaj proksima kunlaboranto kun sufiĉe granda influo, tiel ke li estis konsiderata kiel dua homo post Lenin en la bolŝevisma frakcio. Zinov'ev partoprenis la revolucion agadon ekde 1901, kiam li fariĝis membro de RSDLP. Suferante persekutojn fare de la carisma polico, li elmigris en 1903 al Berlino, Parizo kaj Berno, kie li konatiĝis kun Lenin. Post kiam li aliĝis al la bolŝevismo, li revenis al Ruslando, kie li faris partian propagandon en Ukrainio. Pro malsaniĝo li denove forlasis Ruslandon kaj komencis studojn pri kemio en la Berna universitato, kiujn li interrompis por partopreni en la revolucio de la jaroj 1905-7 en Ruslando, kie li estis elektita kiel membro de la Peterburga urba komitato de RSDLP. Poste li revenis Bernon, en kies universitato li nun komencis studi juron. En marto 1906 li denove estis en Ruslando. Dum la Va kongreso de la partio en Londono li estis elektita kiel ano de la CK kaj fariĝis redakciano de *Social-demokrat* kaj *Vperjod*. En 1908 li estis arestita, sed post tri monatoj liberigita pro malsano, post kio li denove elmigris eksterlanden. Kun Lenin li veturis sur la teritorion de Aŭstrujo en la regionon de Krakovo. Okaze de la eksplodo de la Unua mondmilito (1914) Lenin kaj lia anaro devis forlasi Aŭstrujon kaj veturi al Svislando, kie oni pasigis la militajn jarojn. La 3an de aprilo 1917 Zinov'ev forlasis Svislandon kun siaj edzino Zlata Lilina kaj filo Stefano kaj kun sia unua edzino Sarra Raviĉ, de kiu li estis divorcita, por veturi kune kun Lenin kaj lia grupo en la fama „plombizita“ vagono tra Germanujo kaj Svedujo al Ruslando. Post la juniaj okazaĵoj en Ruslando (vd. supre) Zinov'ev kaŝiĝis kun Lenin ĉe la lago de Razliv. Kelkajn tagojn antaŭ la oktobra renverso okazis surprizo: En fermita kunsido de la bolŝevisma CK de la 10a (23a) de oktobro Zinov'ev kaj Kamenev pledis kontraŭ la lenina rezolucio pri la armata ribelo kaj voĉdonis kontraŭ la eksigo de la Provizora Registaro. Per tio, Zinov'ev kaj Kamenev klare demonstris sian opozician sintenon kontraŭ la plimulto de la membroj de la CK kaj ne hezitis elpaŝi kun ĝi en la organo de la menŝevistoj. Lenin estis altgrade ĉagrenita kaj konsideris ilian agon perfida, pro kio la gvidantaro levis la demandon pri la eksigo de la du kamaradoj el la partio, sed limiĝis sin al la malpermeso paroli en la nomo de la CK. Post novaj perturboj kun la bolŝevistoj, la 4an de novembro Zinov'ev kaj Kamenev deklaris sian ekŝigon el la CK, kio estis kvalifikita de Lenin kiel „dizerto“. Malgraŭ tio, Zinov'ev povis baldaŭ daŭrigi sian politikan karieron. De decembro 1917 ĝis marto 1918 li estis prezidanto de la Petrograda (poste Leningrada) Soveto kaj krom tio okupis aliajn gravajn funkciojn. Kiam la petrogradaj laboristoj alvokis al la „ruĝa teroro“ post la atenco kontraŭ Lenin (aŭgusto 1918), Zinov'ev rifuzis subteni tiun pozicion, pro kio li estis forte kritikita de Lenin. Sed en septembro li prezentis vervan

²⁵³ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Leon_Trotsky.

paroladon en la Petrograda Soveto, en kiu li gloris la meritojn de Lenin por la bolŝevisma revolucio.²⁵⁴ Krom tio, Zinov'ev kontraŭstaris la decidon de Lenin transloki la ĉefurbon de Sovetruslando de Peterburgo al Moskvo. La granda fido, kiun Zinov'ev ĝuis en la partio, helpis al li okupi eĉ pli altgradajn funkciojn: Li fariĝis membro de la nove kreita Politburoo kaj en marto 1919 estis elektita kiel prezidanto de la Ekzekutiva Komitato de la Komunisma Internacio (Komintern), kie li estis nomata „Gvidanto“ (vožd'). En tiu ĉi funkcio li enkondukis la terminon „social-faŝismo“ por denunci la social-demokratajn partiojn en okcidenta Eŭropo. Revenante al sia pli frua pozicio, kiel „revolucia diktatoro“ de Petrogrado kun nelimititaj kompetencoj, Zinov'ev gvidis dum la Enlanda milito ne nur la defendon de sia urbo kontraŭ la atako de la „blankaj“ trupoj de Judeniĉ, sed ankaŭ aplikis politikon de la „ruĝa teroro“ kontraŭ la petrograda intelektularo kaj iama nobelaro ĝis ilia kompleta fizika likvido. Kadre de tiu teroro en 1921 estis mortpafitaj la partoprenintoj en la t.n. Tagancev-konspiro,²⁵⁵ inter kiuj troviĝis la poeto Nikolaj Gumil'jov, kvankam la akuzo estis inventita kaj falsita. En la Politburoo de la CK de la partio RKP(b), en kiu li membris en 1921-6, Zinov'ev profiliĝis kiel unu el la ĉefaj figuroj, precipe dum kongresoj, kie li prezentis fanfaronajn raportajn paroladojn. Por propagandadi la heredaĵon de Lenin li presigis gigantan kvanton da libroj kun liaj artikoloj kaj paroladoj kaj komencis eldoni lian „plenan verkaron“. Samtempe li ludis gravan rolon en la promociado de Stalin kiel ĝenerala sekretario de la CK de RKP(b), kiu estis lia ideo, proponita de Kamenev, tiel ke Zinov'ev-Kamenev-Stalin fariĝis la nova triopo (trojko) unu jaron antaŭ la morto de la malsana Lenin, por redukti la unfluon de la partia rivalo Trockij, kiu estis la tiama armea gvidanto de la partio kaj popolkomisaro por armeo kaj ŝiparo. Samtempe Zinov'ev, kiu estis maltrankviligita pro la kreskanta potenco de Stalin, kiun li nomis „hunda kadavro en la politburoo“, komencis sekrete prepari lian faligon. En 1923 la intrigulo diskutis la planon kun aliaj gvidaj funkciuloj en sekreta kunsido en Kaŭkazo por solvi la sorton de Stalin kaj Trockij. Sed la plano fiaskis pro la rezisto de kelkaj adeptoj de Stalin, kiu eksciis pri la konspiro. En decembro 1925 dum la XIVa kongreso de VKP(b)²⁵⁶ Zinov'ev kaj Kamenev elpaŝis en la nomo de la „nova opozicio“ kontraŭ Stalin kaj ties grupo (Molotov, Rykov, Buĥarin), kiu formis la plimulton en la partio. Sed Stalin kaj liaj apogantoj publike distanciĝis de tiu „nova opozicio“ kaj reagis konsekvence kaj senkompate kontraŭ siaj rivaloj: En 1926 Zinov'ev estis eksigita kiel gvidanto de la Leningrada Soveto kaj de la Ekzekutiva Komitato de Komintern kaj laŭ decido de la CK ankaŭ eliminata el la Politburoo. Lia oportunisma alianceco kun Trockij kondukis al tio, ke en 1927 Zinov'ev estis forpelita ankaŭ de la CK kaj perdis la membrecon en la partio. En 1928 li estis rehabilitita kaj reenkadrigita en la partion, nomumita rektoro de la universitato en Kazano (aŭ Sverdlovsko). Sed en oktobro 1932 post iu nova incidento li estis denove eksigita, arestita kaj kondamnita al kvarjara ekzilpuno. En la nova loĝloko en Kazaĥio li komencis traduki la libron „Mia batalo“ de Adolf Hitler. En 1933 li estis rehabilitita por reveni al la laboro en „Centrosojuz“. Li estis invitita partopreni en la XVIIa partia kongreso, kie li prezentis sian pentan paroladon, glorante Stalinon kaj liajn amikojn. Sed tio jam ne plu helpis savi lin. En decembro 1934 Zinov'ev estis arestita, eliminata el la partio kaj baldaŭ kondamnita al dekjara restado en malliberejo pro subteno de la „Moskva centro“. En la sekvo li estis retenita en la fifama „politizolejo“ de Verĥneural'sk (regiono de Ĉeljabinsk). Kvankam li skribis leterojn al Stalin, en kiuj li klarigis al li, ke li ne estas lia malamiko, en aŭgusto 1936 li estis kondamnita, kadre de la unua moskva farsproceso,²⁵⁷ al morto pro subteno de la „Terorisma centro de Trockij kaj Zinov'ev“. En la nokto de la 26a de aŭgusto li estis mortpafita en la konstruaĵo de la „Armea Kolegio de la Supera Tribunalo de Sovetunio“ (Nikol'skaja-strato 23), kiu estis gvidata de la stalinisto Vasilij Ul'riĥ. En 1988 Zinov'ev estis rehabilitita.

Sarra Naumovna Raviĉ (1879-1957), Zlata Ionovna Lilina (1882-1929)

La venĝo de Stalin estis kruela, senkompata kaj konis neniujn limojn: Ankaŭ la familianoj de Zinov'ev estis rigore persekutataj kaj punitaj. Lia unua edzino Sarra Naumovna Raviĉ (1879-1957), judino el Vitebsk, membro de RSDLP de 1903, kiu vivis en 1907 en Svislando kaj en 1908 estis arestita en Munkeno lige kun la rabatako kontraŭ la banko en Tifliso de junio 1907, en kiu Stalin partoprenis. De 1914 ŝi kunlaboris kun Lenin kaj plenumis gravajn funkciojn en la bolŝevisma frakcio. Sed kiam ŝi aliĝis

²⁵⁴ La germanlingvan tekston vidu sub

https://ia802701.us.archive.org/5/items/N.Lenin.SeinLebenUndSeineTaetigkeit/zinovev-n_lenin.pdf.

²⁵⁵ Pri kio temis vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Tagantsev_conspiracy.

²⁵⁶ En 1925 la nomo de RKP(b) estis ŝanĝita al VKP(b), kio signifis Vsesojusnaja Kommunističeskaja Partija(b), Tutunia KP.

²⁵⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Moscow_Trials.

al la „leningrada“ opozicio, ŝi estis eliminata el la partio en 1927 kaj rehabilitita en 1928. Ŝi estis arestita en la jaroj 1934, 1937, 1946 kaj 1951, retenata en la stalinisma gulago, kie ŝi pasigis sian vivon dum praktike dum du jardekoj kaj liberigita nur en 1954.²⁵⁸ Lia dua edzino, Zlata Ionovna Lilina (1882-1929), judino naskita kiel Bernŝtejn, membro de RSDLP de 1902 kaj kunlaborinto de la gazetoj *Pravda* kaj *Zvezda* kaj de la Petrograda Soveto, partoprenis en 1925 la „leningradan“ kaj poste la „maldekstran“ opozicion en VKP(b), tiel ke en 1927 ŝi estis eliminata el la partio, sed en 1928 rehabilitita. Ŝi laboris en la Popolkomisario de la klerigo (Narkompros) en Moskvo kaj okupis gvidan funkcion en la Ŝtata eldonejo, verkante unuajn infanajn librojn pri Lenin. Post la mortigo de ŝia edzo, ŝiaj verkoj estis forigitaj el la bibliotekoj. Lilina mortis pro kancero kaj estis enterigita en Leningrado. En la aĝo de 24 jaroj estis arestita ankaŭ ŝia filo Stefan Ovseeviĉ Radomysl'skij (aŭ Stepan Grigor'eviĉ Zinov'ev), kiu estis mortpafita la 27an de februaro 1937 en la Lubjanka. En aprilo 1917 la familio reveturis kune kun Lenin al Ruslando. Ankaŭ lia edzino Berta Samojlovna Dĵafarova (Levina) estis dufoje arestita kaj sendita al la sovetia ekzilo.²⁵⁹ Ankaŭ la tria edzino de Zinov'ev, Evgenija Jakovlevna (1894-1985), pasigis la jarojn 1936-54 en sovetiaj malliberejoj kaj estis rehabilitita nur en 2006.²⁶⁰

Lev Kamenev (-Rozenfel'd) (1883-1936)

Kvankam Lev Kamenev parte havas paralelan politikan biografion kiel Grigorij Zinov'ev (vd. supre), tamen ekzistas kelkaj gravaj diferencoj. Kamenev, kies patro estis baptita judo, studis juron en Moskvo kaj aliĝis en 1901 al RSDLP, por kiu li komencis agadi kiel „profesia revoluciulo“. En Tbilisi (Kartvelio), kie li vizitis la gimnazion, li konatiĝis kun Stalin, en 1902 kun Lenin en Parizo kaj edziĝis al Ol'ga Bronŝtejn, la filino de Leo Trockij, de kiu li divorcis en 1927. Post la revolucio de 1905 li reveturis (el Kartvelio) al Ruslando, kie li faris partian propagandon en Moskvo. En 1907 li estis arestita kaj resendita al Tbilisi. La Va kongreso de RSDLP alektis lin al la CK kaj al la „Bolŝevisma Centro“, kreita de la bolŝevisma frakcio. En 1908 li fuĝis en la subteron kaj fariĝis en Ĝenevo proksima kunlaboranto de Lenin. Kune kun li kaj Zinov'ev, Kamenev kontraŭbatalis la grupon „Vperĵod“ ĉirkaŭ Bogdanov kaj Lunaĉarskij. En 1914 Kamenev estris la gazeton *Pravda* kaj gvidis la bolŝevisman frakcion en la Dumao. Post la eksplodo de la Unua mondmilito (1914) li estis arestita kaj sendita en la siberian ekzilon (Turuĥansk), kie li denove renkontiĝis kun Stalin. En Aĉinsk (Krasnojarska regiono) li eksciis pri la Februara revolucio de 1917, do la 12an de marto li revenis kun Stalin al Petrogrado. En la jaroj de la Unua mondmilito Kamenev kritikis diversajn poziciojn de Lenin, kio kaŭzis lian ĉagrenon, kvankam Lenin konsideris la diskuton kun Kamenev utila. Dum Lenin riproĉis al Kamenev, ke li aŭdacis subteni la Provizoran Registaron, Kamenev rifuzis lian „aprilan tezon“, do la konflikto kun Lenin (kaj Stalin) estis antaŭprogramita. Malgraŭ sia kontraŭlenina sinteno, Kamenev estis akceptita en la sinon de la CK de la partio kaj daŭre ĝuis la fidon kaj apogon de Lenin. Kiel lia politika 'ĝemelo' Zinov'ev, ankaŭ Kamenev esprimis sin kontraŭ la decido fari armitan ribelon kaj opiniis, ke oni devus atendi la kunvokon de la Konstitucia Asembleo. Kompare kun Zinov'ev, Kamenev estis senprokraste eliminata el la CK, kiam li esprimis sin kontraŭ la ribela plano de la bolŝevistoj. Post la sukcesa oktobra renverso Kamenev pledis por koalicia registaro kun la partopreno de socialistaj partioj, kiuj estis kontraŭ la formado de la unua soveta registaro, do kun la menŝevistoj kaj socialismaj revoluciuloj. De septembro 1918 Kamenev estis membro de la prezidio de la Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato (VĈIK), de oktobro prezidanto de la Moskva Soveto, kaj en novembro li elektiĝis kiel unua prezidanto de la VĈIK kaj per tio praktike fariĝis la unua ŝtatestro de Soveta Ruslando. Li estris la ruslandan delegacion dum la intertraktoj en Brest-Litovsk por trovi pacan interkonsenton kun Germanujo, kaj en Londono li petis la britojn, ke ili apogu Ruslandon en la milito kontraŭ Pollando. Kamenev devis fariĝi la unua sovetambasadoro en Francio, sed la franca registaro rifuzis lian akreditiĝon. Li estis arestita de la finnaj aŭtoritatoj, sed liberigita interŝanĝe kun finnoj, kiuj estis malliberigitaj en Petrogrado. En marto 1919 li fariĝis membro de la Politburoo de la CK de RKP(b). La 3an de aprilo 1922 Kamenev proponis Stalinon ĝenerala sekretario de la partio. Post la akriĝo de la malsano de Lenin Kamenev prezidis la kunsidojn de la Politburoo. Post la oficiala fondo de USSR en la fino de decembro 1922 Kamenev fariĝis membro de la prezidio de la Centra Ekzekutiva Komitato de USSR. Inter la 6a de julio 1923 kaj 16a de januaro

²⁵⁸ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Sarra_Naumowna_Rawitsch.

²⁵⁹ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Злата_Ионовна_Лилина kaj <http://funeral-spb.ru/necropols/kommunistlavra/lilina>.

²⁶⁰ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Grigori_Jewsejewitsch_Sinowjew.

1926 li funkciis kiel anstataŭanta prezidanto de la Soveto de popolkomisaroj. Kiel menciite en la biografio pri Zinov'ev, en 1922 Kamenev formis kun li kaj Stalin la triopon (aŭ triumviraron) kun la celo repuŝi la influon de Trockij. Okaze de la entombigo de Lenin (januaro 1924), Kamenev estis unu el la parolantoj. En la lukto por la ĝusta interpretado de la volo de Lenin okazis en la sekva tempo akraj disputoj inter Kamenev, Zinov'ev, Trockij kaj Stalin, kiuj estis akompanataj de tiklaj reciprokaj personaj riproĉoj, kritikoj kaj akuzoj, kiuj ĉi tie ne povas esti detale traktitaj, sed kiuj havis fatalajn konsekvencojn por la partianoj kaj la partio mem. En tiu komplika konstelacio Kamenev fariĝis unu el la gvidantoj de la „nova“ aŭ „maldekstra“ opozicio. Sed li estis pli kaj pli entirita en teoriajn kverelojn pri la konstruado de la socialismo en Sovetunio. Dum la 14a partia kongreso de 1925 Kamenev aŭdacis esprimi sin kontraŭ la rolo de Stalin kiel „Gvidanto“, prezentante sian konkludon, ke Stalin ne taŭgas por tiu rolo. Stalin, kiu estis tamen subtenata de la plimulto de la deputitoj, komencis decide reagi kontraŭ la opozicio. En unua paŝo, Kamenev perdis la oficon de la anstataŭanta prezidanto de la Konsilio de popolkomisaroj. Kvankam li dume restis membro de la Politburoo, oni reduktis lian statuson al kandidateco, kiun li perdis en oktobro 1926, kio signifis, ke li eksiĝis el tiu ĉi gremio. Anstataŭ tio li estis nomumita popolkomisaro de USSR por ekstera kaj interna komerco kaj sovetambasadoro en Italujo (kion ŝajne aranĝis Mussolini kaj kio eble estis kaptilo por denunci Kamenev-on kiel laŭdiran simpatianton de la faŝistoj). En aprilo 1927 Kamenev estis eliminata el la prezidio de la Centra Ekzekutiva Komitato de USSR kaj en oktobro 1927 ankaŭ el la CK de VKP(b). Okaze de la 15a partia kongreso de decembro 1927 Kamenev estis eksigita ankaŭ el la Komunisma partio mem pro opozicia agado, post kiam li estis kondamnita de Stalin. Komenciĝis bizara ludo inter kato kaj muso, kiu tiam estis kutima: Kiam la postan tagon Kamenev konfesis siajn erarajn vidpunktojn, la kongreso ne akceptis lian decidon kaj transdonis la aferon al la Ĝenerala Sekretariato. En 1928 Kamenev estis reakceptita de la partio kaj fariĝis direktoro de iu scienc-teknika institucio. En 1932 li estis ree eliminata el la partio pro laŭdira malhelpo en iu jura afero koncerne la „Unuiĝon de marksistoj-leninistoj“ kaj sendita en la siberian ekzilon (Minusinsk). Post denova konfeso de siaj eraroj, en majo 1933 li povis forlasi sian ekzilejon – ĉi-foje Maksim Gor'kij klopodis ĉe Stalin por lia liberiĝo –, estis reakceptita de la partio kaj povis labori kiel direktoro de iu scienca eldonejo. Dum la 17a partia kongreso de 1934 Kamenev faris pentan paroladon kaj gloris la „stalinan epokon“, sed li ne estis elektita al la kongreso de la verkistoj de USSR (kvankam li verkis biografion pri Gercen/Herzen kaj Ĉernyševskij). Post la mortiga atenco kontraŭ Sergej Kirov, la stalinisma partiestro en Leningrado, en decembro 1934, Kamenev estis kulpigita kun Zinov'ev, ke ili iniciatis la murdon. Baldaŭ Kamenev estis arestita kaj submetita al sekreta proceso. Kadre de la unua moskva farsproceso li estis kondamnita (kune kun Zinov'ev), la 24an de aŭgusto, al morto kaj mortpafita la venontan tagon. Lia rehabilitado okazis en 1988.

Dum la unua edzino Ol'ga, kiu post la Oktobra revolucio laboris en la Popolkomisario de la kulturo kaj teatro, kie ŝi aplikis radikalan bolŝevisman kurson, estis ekzilita al Taŝkento kaj ekzekutita en septembro 1941 en arbaro apud Orjol, ankaŭ iliaj du filoj, Aleksandro (1906-37) kaj Jurij (1921-38), pereis en la tempo de la granda stalinisma teroro okaze de mortpafado de malliberuloj. Eĉ la nepo Vitalij Aleksandroviĉ (1931-66) estis arestita en 1951 kaj kondamnita al 25-jara mallibereco. La plej juna filo de Kamenev, Igor', kiun li havis kun la dua edzino (de 1928) Tat'jana Glebova (nask. en 1899), kiu mem estis mortpafita en 1937, estis arestita en 1935, sed postvivis la stalinisman gulagon kaj forpasis en 1994. Ankaŭ la frato de Kamenev, Nikolaj, liaj edzino kaj filo estis mortpafitaj de la stalinistoj.²⁶¹

Nikolaj Buĥarin (1888-1938)

Ankaŭ Nikolaj Buĥarin, eminenta marksisma ekonomia teoriisto kaj filozofo, havas, kiel Lenin, Zinov'ev, Kamenev kaj Lev Trockij, longan kaj interesan biografion (se oni konsideras ankaŭ la tutan verkaron), el kiu povas esti ĉerpitaj ĉi tie nur la plej esencaj momentoj. Buĥarin, kiu studis ekonomian sciencon en Moskvo kaj en 1906 aliĝis al RSDLP kaj al la bolŝevisma frakcio, fariĝis objekto de observado kaj persekutado de la carisma polico pro sia aktiveco en la komunisma junulara movado, tiel ke en 1911 li estis deportita al norda Ruslando (Onega). De tie li sukcesis fuĝi al Germanujo, Aŭstrujo kaj Svislando, Skandinavio kaj Usono. En 1912 li konatiĝis kun Lenin en Krakovo kaj kun Stalin en Vieno. En tiu periodo li okupiĝis pri la „empiriokritikismo“ de A. Malinovskij-Bogdanov kaj evoluigis proprajn teoriojn pri la imperiismo, pri kiu li verkis libron, kiu aperis post la Oktobra revolucio de 1917

²⁶¹ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Lew_Borissowitsch_Kamenev kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Olga_Kameneva.

kun antaŭparolo de Lenin. Li estis arestita en Svedujo, ĉar li faris malpermesitan revolucian agadon, estis malliberigita kaj poste sendita al Norvegio. En oktobro 1916 li vojaĝis al Usono, kie li konatiĝis kun Trockij, kun kiu li redaktis la gazeton *Novyj mir* (nova mondo). En tiu tempo li esprimis opiniojn kontraŭajn al tiuj de Lenin, Zinov'ev, Stalin k.a. Post la Februara revolucio li reiris al Ruslando nur en majo, ĉar li dume estis arestita en Japanio kaj Ĉeljabinsk. Kiel agnoskita marksisma teoriisto li estis baldaŭ elektita al la CK de RSDLP(b), laboris en Moskvo kiel ĵurnalisto kaj gvidis la „ultramaldekstrajn“ komunistojn. Inter 1917 kaj 1929 li estis la eldonisto de la partia gazeto *Pravda*. En 1919 li fariĝis viktimo de atenco, en kiu pereis aŭ estis vunditaj multaj homoj. En la 20aj jaroj li estis membro de la Politburoo, fariĝis la ĉefa protagonisto de la „Nova ekonomia politiko“ (NEP), batalis kontraŭ Trockij, Zinov'ev kaj Kamenev kaj fariĝis proksima amiko de Stalin. En 1926 li fariĝis prezidanto de Komintern post la forigo de Zinov'ev, subtenis Stalinon kaj atingis, ke la „maldekstraj opoziciuloj“ Kamenev, Zinov'ev kaj Trockij estis eliminataj el la Politburoo. Sed en 1928 li komencis opoziciiankaŭ kontraŭ Stalin, kies politikon de la deviga kolektivigo de la agrikulturo li ne aprobis. Sekve, Buĥarin estis eksigita el la Politburoo kaj kiel prezidanto de Komintern. Kvankam li gvidis kun la usonano Jay Lovestone la „Internacian Unuiĝon de la komunisma opozicio“ (IVKO), li povis resti en la partio, kompare kun Trockij, kiu estis eliminata el ĝi, kaj fariĝis direktoro de la Instituto por industri-ekonomiaj esploroj. En 1934 li konfesis siajn ideojn eraraj kaj estis rehabilitita de Stalin. Ĝis januaro 1937 li estis la eldonisto de la sovetia gazeto *Izvestija*. Krom tio, li kunlaboris al la ellaborado de nova sovetia konstitucio. Sed la sorto baldaŭ turniĝis kontraŭ li. En marto 1937 li estis arestita pro la riproĉo de spionado, pro kontaktoj kun la aŭstra kaj sveda policoj kaj pro konspira agado kontraŭ Stalin. En la tria moskva farsproceso kontraŭ la „Bloko de la dekstruloj kaj trockiistoj“ (do kontraŭ Buĥarin, Rykov, Tomskij k.a.)²⁶² li estis mortkondamnita la 13an de marto 1938 kaj pafita du tagojn poste en Kommunarka apud Moskvo,²⁶³ cetere kune kun la iama ĉefo de la sekreta servo Jagoda kaj aliaj pintaj funkciuloj de NKVD. La ekzekutado estis observata de la nova NKVD-ĉefo Ješov. Buĥarin devis rigardi, kiel la aliaj estis mortpafitaj antaŭ li. En aprilo 1956 li estis rehabilitita.

Lia unua edzino, **Nadeĵda Lukina**, nask. en 1887,, estis arestita en 1938 kaj mortpafita en marto 1940.²⁶⁴

Karl (Berngardoviĉ) Radek (-Sobelsohn) (1889-1939)

estis aŭstra civitano de juda deveno el Galicio, membro de la pola SP kaj de RSDLP (de 1904). Ĉar li partoprenis en la rusa revolucio de 1905, la caristoj malliberigis lin por unu jaro. En 1907 li elmigris al Germanujo, kie li fariĝis membro de la germana SP kaj profiliĝis kiel brila kaj originala ĵurnalisto. Dum la Unua mondmilito Radek vivis kiel aliancano de Lenin en Svislando, kie li studis en la universitato kaj publikigis siajn artikolojn en la berna socialdemokratia gazeto *Tagwacht*. En 1915 li partoprenis kiel reprezentanto de iu grupo de polaj socialdemokratoj en la konferenco de Zimmerwald kaj aliĝis al la radikala bloko de Lenin. En la tempo de la Februara revolucio de 1917 en Ruslando Radek fariĝis reprezentanto de RSDLP en eksterlando kaj redaktis en Stokholmo iun gazeton. En aprilo li veturis (kiel „Nikolai Boitzow“) kun Lenin en la „plombizita“ trajnvagono de Svislando tra Germanujo kaj Svedujo al Ruslando. Post la Oktobra revolucio de 1917 li redaktis iujn gazetojn en Petrogrado kaj Moskvo. En 1918 li partoprenis en la nomo de la Popolkomisario de la eksteraj aferoj de RSFSR kiel delegacia membro en la pacintertraktoj kun Germanujo en Brest-Litovsk. Fine de 1918 li veturis al Germanujo, kie li estis arestita kaj enprizonigita. Post sia liberiĝo en januaro 1920 li reveturis al Moskvo, kie li transprenis funkcion en Komintern kaj apogis la ribelon de germanaj komunistoj. Kiam en aŭgusto 1923 Radek proponis en la Politburoo de la CK de RKP(b) organizi armatan ribelon en Germanujo, Stalin reagis kun skeptiko. En 1925 Radek fariĝis rektoro de universitato por ĉinaj studentoj en Moskvo. Pro sia aparteno al la opozicio de Trockij, en 1927 li estis eksigita el la partio kaj ekzilita por kvar jaroj al Siberio (Krasnojarsk). Post siaj liberiĝo, memkritiko kaj submetiĝo al la oficiala partia linio, li fariĝis redaktoro de *Izvestija* (1930-37) kaj kunlaboranto de *Pravda*, en kiu li gloris Stalinon. Ĝis sia definitiva elpelo el la partio en 1936 li loĝis en la Kremlo. En 1937 li estis akuzita en la dua Moskva proceso pro

²⁶² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Moscow_Trials.

²⁶³ En Kommunarka troviĝis la somera rezidejo de Jagoda kaj estis instalita mortigejo de NKVD, kie estis mortpafitaj kaj enterigitaj kelkmlil viktimoj de la Granda stalinisma teroro (Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Kommunarka> kaj [https://ru.wikipedia.org/wiki/Коммунарка_\(расстрельный_полигон\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Коммунарка_(расстрельный_полигон))).

²⁶⁴ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Nikolai_Iwanowitsch_Bucharin.

aparteno al la trockiismo, sed li evitis mortkondamnon kaj anstataŭ tio ricevis dekjaran arestadon en la gulago, kie li sidis en la fifama „politizolejo“ de Verhneural'sk (regiono de Ĉeljabinsk).²⁶⁵ En 1938 ankaŭ liaj edzino Roza kaj filino Sofio estis ekzilitaj al Astraĥano, kie Roza mortis, kaj al Kazahio. Laŭ oficiala sciigo, Radek estis mortigita la 19an de majo 1939 en la menciita politizolejo fare de aliaj prizonanoj. Laŭ esploro de CK KPSU kaj KGB en la jaroj 1956-61 la murdo estis aranĝita de la NKVD-ano P.N. Kubatkin, kiu plenumis la instrukciojn de Berija kaj Kobulov, kiuj venis rekte de Stalin. La mortigon de Radek finfine efektivigis iu ekskomandisto de NKVD el la sovetia Ĉeĉen-Inguŝa respubliko. En 1988 Radek estis rehabilitita kaj postmorte remembrigita en KPSU. Kiel modelo de tragika viktimo de la stalinisma teroro Radek aperis kiel fikcia heroo en diversaj beletraj romanoj, ekzemple en tiuj de Arthur Koestler (1940), Stefan Heym (1995) kaj Thomas Persdorf (2013).²⁶⁶

Grigorij Sokol'nikov (Hirsch Brilliant) (1888-1939)

Judo el la gubernio de Poltavo, kiu scipovis ses lingvojn kaj en 1905 aliĝis al RSDLP, partoprenante en la ribelo de Moskvo en decembro 1905 kaj okupante gravajn partiajn funkciojn en Moskvo. En 1907 li estis arestita kaj du jarojn poste kondamnita al dumviva ekzilo en Siberio, kiun li pasigis en iu vilaĝo de la Jeniseja gubernio. Ses semajnojn post la alveno li tamen povis fuĝi kaj baldaŭ migris al eksterlando (Francio), kie li aktivis en la laborista medio kaj finis siajn jurajn studojn en la Sorbono kun doktora titolo (1914). Dum la Unua mondmilito li vivis en Svislando, kie li organizis la Buroon de la eksterlandaj grupoj de la bolŝevistoj kaj laboris en la Svisa Socialdemokratia Partio. Li apogis la „internaciisman“ pozicion de Lenin, kun kiu li reveturis en aprilo 1917 en la „plombizita“ vagono al Ruslando. En Moskvo li transprenis gravajn funkciojn en la loka partia komitato kaj akre polemikis kontraŭ la Provizora Registaro, la menŝevistoj kaj socialismaj revoluciuloj. Okaze de la VIa kongreso de RSDLP(b) en aŭgusto 1917 li estis elektita al la CK de la partio, membrante ankaŭ en la politika buroo de la CK de RSDLP(b). Post la Oktobra revolucio li fariĝis membro de la Centra Ekzekutiva Komitato, gvidis la ŝtatigon de la bankoj en Ruslando kiel helpanto de la komisaro pri la Ŝtata Banko kaj fariĝis ano de la Kolegio de la Popolkomisario pri financoj (Narkomfin). Anstataŭ Trockij, kiu estis elŝanĝita, la 3an de marto 1918 Sokol'nikov subskribis la Brestan Pactraktaton en la nomo de Sovetruslando. Poste li fariĝis membro de la Supera soveto de la popolekonomio. De 1918 li troviĝis ĉe la frontoj de la Enlanda milito, kie li komandis la 8an armeon ĉe la Suda fronto. Kvankam li ne havis sperton en la Ruĝa Armeo, li montriĝis bona organizanto, kiu povis prezenti kelkajn militajn sukcesojn. En 1920 li komandis la Turkestanan fronton kaj prezidis la Turkestanan komisionon de la Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato kaj la Turkestanan buroon de la CK RKP(b), esence kontribuante al la stabiligo de la bolŝevisma potenco en tiu respubliko. Poste Sokol'nikov estis unu el la ĉefaj protagonistoj de la NEPo. Post kuraciĝo de grava malsano en Germanujo li revenis al la laboro en aŭtuno 1921 kaj estis nomumita membro de la Kolegio de Narkominfam. En 1922 li fariĝis anstataŭanto de la popolkomisaro pri financoj (Nikolaj Krestinskij), sed estis Sokol'nikov, kiu praktike gvidis tiun instancon. Samtempe li estis ambasadoro de RSFSR en Germanujo kaj daŭre restadis en Berlino. En 1922 Sokol'nikov oficiale fariĝis popolkomisaro pri financoj de RSFSR, kaj post la fondo de Sovetunio li gvidis la Popolkomisionon de la financoj de USSR, de julio 1923 ĝis januaro 1926. De Lenin Sokol'nikov estis laŭdita kiel „talenta kaj valorega“ kamarado. En junio-julio 1922 Sokol'nikov partoprenis en la financ-ekonomia konferenco en Hago kaj en 1922-23 gvidis bankajn reformojn kaj la monreformaĵon en Sovetunio, enkondukante la malmolan valuton Ĉervonec, kiu estis komercebla en la borsoj de diversaj okcidentaj landoj. Tiel, Sovetunio ricevis „normalan financon sistemon“, ĉar Sokol'nikov konsideris la sovetian ekonomion parto de la monda ekonomio. En junio 1924 ĝis decembro 1925 li estis membro-kandidato de la Politburoo de RKP(b). En 1925-26 li partoprenis en la aktiveco de la „Nova opozicio“, kies gvidantoj estis Lev Kamenev kaj Grigorij Zinov'ev, pledante por kolektiva gvidado de la partio kaj esprimante dubon pri la neceso konservi la postenon de la ĝenerala sekretario, kiun okupis Iosif Stalin. Ĉi tiun sintenon li amare pagos kiel ĉiuj aliaj samideanoj. Post la malvenko de tiu opozicio Sokol'nikov tamen distanciĝis de ĝi kaj perdis la postenon de la popolkomisaro pri financoj kaj per tio ankaŭ sian politikan influon, kvankam li povis konservi kelkajn gravajn oficojn ĉe Gosplan kaj en la Naftosindikato. En 1929-32 li estis ambasadoro de USSR en Grandbritio kaj de 1932 anstataŭanta popolkomisaro pri

²⁶⁵ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Верхнеуральский_политизолятор.

²⁶⁶ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Radek.

eksteraj aferoj. En 1930 lia membreco en la partia CK estis reduktita al la statuso de membro-kandidato. En januaro 1934 li devis elteni akran kritikon dum la Moskva partia konferenco pro „eraroj sur la kampo de la industriigo“. Malgraŭ tio, en 1935 li ricevis la postenon de la unua anstataŭanto de la popolkomisaro pri malpeza industrio, kio tamen signifis por li grandan malaltiĝon kompare kun la funkcioj, kiujn li havis pli frue. La 26an de julio 1936 Sokol'nikov estis arestita kaj akuzita pro aparteno al la „paralela kontraŭsoveta trockiisma centro“, kio signifis lian eksigon el la CK kaj la partio mem. Dum la koncerna tribunala farsproceso li estis devigita konfesi siajn erarojn, kaj la 30an de januaro 1937 li estis kondamnita al dekjara arestado en prizono. Laŭ la oficiala versio li estis mortigita la 21an de majo 1939 de aliaj prizonanoj aŭ en la „politizolejo“ de Verĥneural'sk (regiono de Ĉeljabinsk) aŭ en la prizono de Tobol'sk. Sed, kiel en la kazo de Karl Radek, kiu estis mortigita laŭ la sama maniero du tagojn antaŭ Sokol'nikov, esploroj de la CK KPSU kaj KGB en la jaroj 1956-61 evidentigis ankaŭ en la kazo de Sokol'nikov, ke li estis mortigita de agento(j) de NKVD laŭ ordono de Berija kaj Stalin. La 12an de junio 1988 Sokol'nikov, kies nomo estis rigore prisilentata dum la sovetia tempo, estis postmorte rehabilitita de la pleno de la Supera Tribunalo de USSR, kaj la 16an de decembro de la sama jaro li estis postmorte reakceptita de KPSU. Post la arestado de Sokol'nikov, ankaŭ lia tria edzino, Galina Iosifovna Byk-Bek, verkistino, filino de bolŝevistoj, eksedzino de la fama partifunkciulo Leonid Serebrjakov, estis arestita kaj devis pasigi dekok jarojn en la prizonoj kaj lagroj de la sovetia gulago. Ŝia filino Geliana Sokol'nikova akompanis sian patrinon en la ekzilon.²⁶⁷

Georgij Pjatakov (1890-1937)

unue emis al la anarkiismo kaj apartenis en 1907 al la grupo, kiu atencis kontraŭ la ĉefguberniestro de Kievo. En Peterburgo li ekhavis kontakton kun la marksisma kaj bolŝevisma ideologioj. Li estis malkovrita de la polico kaj resendita al Kievo, kie li partoprenis en la starigo de la loka grupo de RSDLP. En junio 1912 li estis denove arestita kaj ekzilita en la Irkutskan gubernion. De tie li sukcesis fuĝi, kun Evgenija Boŝ (vd. sube), tra Japanio kaj Usono al Svislando, kie li partoprenis en la Berna konferenco de rusaj socialdemokratoj kaj bolŝevistoj en 1915. Kun Lenin li redaktis la gazeton *Kommunist*, sed pro malkonsentiĝo kun li forlasis la redakcion kaj migris al Svedio, de kie en 1916 li estis forigita de la aŭtoritatoj al Norvegio. Post sia reveno al Ruslando dum la Februara revolucio de 1917 li fariĝis gvidanto de la Kieva soveto de laboristaj kaj soldataj deputitoj kaj de la Milit-revolucia komitato kaj estis membro de la Ekzekutiva komitato de la bolŝevisma urba soveto de Kievo. Poste li estis vokita al Petrogrado, kie li partoprenis, kiel komisaro, en la perforta akaparo de la Ŝtata Banko de Sovetruslando, kie li klopodis reordigi la financojn de la lando. Ĉar Pjatakov ne konsentis kun la lenina politiko rilate la pactraktaton kun Germanujo (Brest-Litovsk), li demisiis de sia posteno kaj reiris al Ukrainio, kie li aliĝis al la partizanoj (ruĝaj kozakoj), kiuj batalis kontraŭ la germanaj trupoj. En julio 1918 li estis elektita kiel sekretario de la ukraina KP kaj partoprenis en la ribelo de la maldekstraj socialismaj revoluciuloj. En novembro li apartenis al la Ukraina revolucia milita konsilio (kun Stalin, Zatoniskij kaj Antonov-Ovseenko), kiu havis la taskon ellabori planon por starti ofensivon de la Ruĝa Armeo en Ukrainio. De novembro 1918 ĝis januaro 1919 Pjatakov estis ĉefministro de la Provizora laborista kaj kamparana registaro de Ukrainio. En tiu funkcio li akcelis la kolektivigon de la agrikulturo kaj la „socialisman produktadon“. Poste li transprenis gravajn propagandajn, partiajn kaj armeajn funkciojn kaj organizis la „ruĝan teroron“ de la bolŝevistoj en Krimeo kontraŭ diversaj „popolmalamikoj“. En la 20aj jaroj li gvidis la industrion en Donbaso, estis membro-kandidato de la CK RKP(b), vicprezidanto de la Supera konsilio de Gosplan, poste vicprezidanto de la Supera konsilio de la popolekonomio. En 1923 li aliĝis al la maldekstra opozicio flanke de Trockij, subskribis la „Deklaron de la 45“,²⁶⁸ kiu kritikis la gvidstilon de Stalin, kaj esprimis sin kontraŭ la NEPo. Post la likvido de la maldekstra opozicio kaj la senpotencigo de Trockij, Pjatakov estis eliminata el la partio, sed post la konfeso de siaj eraroj li estis rehabilitita de la partio kaj sendita al Francio kiel gvidanto de la komerca reprezentejo de USSR. En 1928 li estis nomumita vic-, poste prezidanto de la Ŝtata Banko de Sovetunio, sed post jaro liberigita de tiu funkcio pro malsukcesa efektiviĝo de la kredita reformo. En la 30aj jaroj Pjatakov estis membro de la prezidio kaj vicprezidanto de la Supera konsilio de la popolekonomio kaj prezidanto de Vseĥimprom kaj unua anstataŭanto de la popolkomisaro pri pezindustrio (G. Ordjonikidze). Krome, en 1923 kaj 1927

²⁶⁷ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Grigori_Sokolnikov.

²⁶⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/The_Declaration_of_46.

kaj 1930-36 Pjatakov estis membro de la CK de VKP(b). En septembro 1936 li estis eksigita de la ofico en la CK kaj eliminata el la partio mem, arestita kiel laŭdira membro de trockiisma organizaĵo kaj dum farsproceso en januaro 1937 pro aparteno al la „paralela kontraŭsoveta trockiisma centro“ kondamnita de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR, la 30an de tiu monato, al morto laŭ paragrafo 58. La 2an de februaro 1937 li estis mortpafita. Pjatakov, kiu posedis la „Ordenon de la ruĝa standardo“ kaj la Lenin-ordenon, estis rehabilitita kaj reakceptita de la sovia KP nur en 1988.

Lia unua edzino estis la konata revoluciulino **Evgenija Boŝ** (vd. sube). Lia dua edzino, **Ljudmila Fjodorovna Ditjateva**, naskita en 1899, estis membro de VKP(b), estrino de entrepreno en Moskvo. En julio 1936 ŝi estis arestita kaj akuzita pro partopreno en kontraŭrevolucia organizaĵo, kondamnita en junio 1937 al morto kaj mortpafita la 20an de junio. Rehabilitita en 1991. Ankaŭ iliaj du infanoj estis persekutitaj de NKVD.²⁶⁹

Evgenija Boŝ (1879-1925)

Filino de germandevena koloniisto (Maisch aŭ Meisch), kiu posedis vastan teron en la Ĥersona gubernio. Evgenija edziniĝis al iu Pjotr Boŝ (Bosch), kies nomon ŝi evidente konservis malgraŭ posta divorco en 1907, kiam ŝi iris kun siaj du infanoj al Kievo, kie ŝi laboris en la revolucia subtero, konatiĝis kun Grigorij Pjatakov (vd. supre) kaj en 1911 gvidis kun li la Kievan komitaton de RSDLP. En aprilo 1912 ŝi estis arestita kaj malliberigita en la prizono de Ekaterinoslav. Malgraŭ malsaniĝo je la tuberkulozo, oni kondamnis ŝin al dumviva ekzilo en Siberio (Irkutska gubernio) kun perdo de la civitanaj rajtoj. Sed tie ŝi ne restis longe, ĉar ŝi sukcesis, kun Grigorij Pjatakov, kiu estis kondamnita en la sama proceso, fuĝi tra Japanio kaj Usono al Svislando, kie ŝi partoprenis kun li en la konferenco de rusaj socialdemokratoj kaj bolŝevistoj en Berno (1915), kie estis formita la t.n. „Baugy“-opozicio kontraŭ Lenin, al kiu apartenis ankaŭ Nikolaj Buĥarin kaj aliaj. Poste Boŝ translokiĝis kun Pjatakov al Svedio kaj Norvegio. Post la Februara revolucio de 1917 la paro revojaĝis al Ruslando por organizi la opozicion kontraŭ Lenin en Petrogrado kaj Kievo. Sed post la aprila konferenco de RSDLP(b) Boŝ tamen preferis la flankon de Lenin, kio disigis ŝin de la edzo. En la sekvo Boŝ karieris kiel politikistino en Ukrainio, estis elektita dum la 1a Tutukraina Sovetkongreso, kiu proklamis la Sovetukrainan Popolrespublikon, al la Centra ekzekutiva komitato de la Sovetoj de Ukrainio, la supera organo de la soveta potenco en Ukrainio, en kiu ŝi plenumis, krom la ofico de la ministro pri internaj aferoj, praktike la funkcion de la ĉefo (unua ĉefministro) de tiu provizora registaro (kiu rezidis en Ĥarkovo, poste en Kievo kaj Poltavo). Ŝiaj kritikistoj nomis la fanatikan komunistinon „diktatorino“ kaj klopodis izoli ŝin, kio igis ŝin rezigni pri siaj funkcioj, kiujn ŝi transdonis al N. Skrypnik. Sed ŝi rifuzis evakui la gvidajn instancojn de la soveta potenco al Ekaterinoslav kaj aliĝis al la grupo de la trupoj de V. Primakov, kiu komandis la „ruĝajn kozakojn“ kontraŭ la „blanka“ armeo de Denikin.²⁷⁰ Poste Lenin kaj Sverdlov sendis ŝin al la gvida partia laboro en la gubernio de Penza, kie ŝi devis kolekti la grenon de la kamparanoj, kio ne okazis sen perforto, ĉar Lenin persone skribis al la gvidantoj de la gubernio, ke ili devas pendigi centon da kulakoj. En tiu regiono, kie sekve eksplodis kamparanaj ribeloj, la homoj ankoraŭ longe memoris kun hororo la eksterordinaran brutalecon de la bolŝevistoj, kiujn Boŝ reprezentis. Post kiam la situacio ĉe la suda fronto malboniĝis, Boŝ estis sendita al la Kaspi-kaŭkaza fronto ĉe Astraĥano. Poste ŝi laboris en la Soveto por la defendo de la Litov-Belorusa SSR, en la Soveto de popolkomisarioj de Ukrainio, en la CK de la Tutruslanda sindikato por tero kaj arbaro kaj en aliaj popolkomisarioj. De 1923 Boŝ apogis la trockiisman opozicion, subskribis, kun Pjatakov, la „Deklaron de la 45“, kiu kritikis la konduton de Stalin, pro kio la sekreta polico observis ŝin. Por esti kuracita de sia akriĝinta malsano, Boŝ vojaĝis al Kartvelio, Germanujo kaj Italujo, kie ŝi komencis verki aŭtobiografion kaj libron pri la lukto por la potenco en Ukrainio. Kiam la suferoj de la malsano fariĝis neelteneblaj, Boŝ, apenaŭ 46-jara, finis sian vivon per suicido en Moskvo la 5an de januaro 1925. Multaj lokoj kaj objektoj en Ukrainio kaj Sovetunio ricevis la nomon de Evgenija Boŝ, sed post 1991 la nomoj plimulte estis tamen ŝanĝitaj.²⁷¹

²⁶⁹ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Georgi_Leonidowitsch_Pjatakow.

²⁷⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Witali_Markowitsch_Primakov.

²⁷¹ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Jewgenija_Bogdanowna_Bosch.

Feliks Kon (1864-1941)

estis pola revoluciulo de juda deveno, kiu dum siaj studoj en la Varsovia universitato aliĝis al la Pola socialdemokratia partio (PSP) kaj kontaktis la homojn de „Narodnaja volja“. En 1884 li estis arestita de la carisma polico kaj kondamnita al dekjara malliberigo en carismaj prizonoj ĉe la Kara-rivero en la Amura regiono kun aldona ekzilo en Jakutio, poste li vivis du jarojn en Irkutsk, Valagansk kaj Minusinsk. En la siberia ekzilo Kon komencis fari utilajn etnografiajn kaj antropologiajn studojn kaj partoprenis ekspedicion por esplori la loĝantaron de Jakutio, studi la ĥakasajn, tuviajn kaj sojotajn indiĝenojn, kaj en Tuvio li kolektis etnografiajn objektojn por la Rusa Muzeo en Sankt-Peterburgo. Post la fino de la ekzilo Kon reiris al Varsovio kaj okupiĝis pri politika laboro, aliĝante al la opozicio ene de la Pola socialdemokratio. Li faris redaktan laboron, en 1906 fariĝis membro de la CK de PSP kaj partoprenis en la laboro de la Peterburga Soveto de laboristaj deputitoj dum la revolucio de 1905. En 1906 li estis arestita de la polico, sed liberigita per pago de kaŭcio kaj fuĝis al Galicio sur aŭstrian teritorion. Inter 1907 kaj 1917 li troviĝis en la emigracio. Kon laboris kiel direktoro de la laborista malsanuleja kaso en Drohobyĉ kaj Borislav kaj estis elektita al la loka kaj regiona komitatoj de la PSP de Galicio kaj Silezio-Czeszyn. Post la komenco de la Unua mondmilito (1914) Kon translokiĝis al Svislando, kie li aliĝis al la „grupo de Zimmerwald“ de Lenin. En Zuriko Kon gvidis la oficejon de la kaso por helpi finance rusaj elmigrintoj. Post la Februara revolucio de 1917 li reveturis en majo en la „plombizita“ trajnvagono tra la Germana Regno al Ruslando, kie en 1918 li aliĝis al RKP(b), transprenante iujn funkciojn en la Ĥarkova gubernio kaj okupiĝante flanke de la komunistoj pri polaj aferoj en Ukrainio. Post la konkero de Ukrainio fare de la blanka armeo de Denikin Kon translokiĝis al Moskvo, kie li estis en la kolegio de la Popolkomisario de la klerigo kaj fariĝis en 1920 membro de la Provizora revolucia komitato de Pollando. En 1921 li fariĝis sekretario de la CK de la komunisma parto de Ukrainio kaj laboris en la politika administracio de la ukraina Ruĝa Armeo. En 1922-23 li estis sekretario de la Ekzekutiva Komitato de Komintern, en 1925-8 redaktoro de la gazeto *Krasnaja zvezda* (ruĝa stelo). En la 30aj jaroj li plenumis diversajn funkciojn ene de la partia kaj ŝtata aparatoj kaj en la menciita popolkomisario kaj aŭtoris diversajn historiajn kaj memuarajn verkaĵojn. Kon forpasis la 28an de julio 1941 en la tempo de la militevakuo en Moskvo.²⁷²

Elena Usieviĉ-Kon (1893-1968)

estis la filino de Feliks Kon (vd. supre), de 1909 partoprenis en la revolucia agado en Ruslando, en 1915 aliĝis al RKP(b) kaj post la restado en Svislando (Zuriko) reveturis al Ruslando kun la grupo de Lenin en la „plombizita“ vagono, en kiu kunveturis ankaŭ Grigorij Usieviĉ (vd. sube), al kiu ŝi poste edziniĝis. En 1932 ŝi finis siajn studojn en la „Instituto de la ruĝaj profesoroj“²⁷³ kaj laboris kiel anstataŭanta direktoro de la „Instituto de literaturo kaj arto de la Komunisma Akademio“. En Sovetunio Usieviĉ fariĝis konata precipe kiel literatura kritikistino, kiu komencis publikigi en 1928 esence en la ĵurnaloj *Literaturnyj kritik* kaj *Literaturnoe obozrenie*. Ŝiaj kontribuoj, kiuj havis rigoran ideologian kaj polemikan karakteron, estis eldonitaj en la kolekto „Verkistoj kaj la realeco“ (1936). La fanatika leninistino akre kritikis la sintenon de la grupo ĉirkaŭ la „Ruslanda asocio de proletaj verkistoj“ (RAPP),²⁷⁴ al kiu ŝi riproĉis „perversigitan partian linion en la literaturo“ kaj anstataŭ tio defendis senkompromisan „socialisman realismon“. En 1963 ŝi estis honorita per la „Ordeno de la ruĝa standardo de la laboro“. Usieviĉ forpasis la 15an de januaro 1968 en Moskvo.²⁷⁵

Grigorij Usieviĉ (1890-1918)

Sian aliĝon al RSDLP en 1907 li pagis per ekzilado en la Jenisejan gubernion. En 1914 li fuĝis al Aŭstrujo, kie li estis arestita kaj sendita al iu koncentrejo. Fine de 1915 li ekloĝis en Svislando, de kie li reveturis en aprilo 1917 kun sia amatino aŭ fianĉino Elena Kon (vd. supre) en la sama „plombizita“ vagono de Lenin al Ruslando, kie li evidente edziĝis al ŝi. En aprilo 1917 li fariĝis membro de la Ekzekutiva komitato de la Moskva Soveto, de la Moskva soveto de RSDLP(b), de la bolŝevisma frakcio de

²⁷² Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Feliks_Kon.

²⁷³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Institut_der_Roten_Professur.

²⁷⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Russische_Assoziation_proletarischer_Schriftsteller.

²⁷⁵ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Елена_Феликсовна_Усиевич.

la Urba Dumao kaj deputito de la VIa kongreso de RSDLP(b). En oktobro 1917 li estis unu el la gvidantoj de la armata ribelo en Moskvo kaj membro de la Moskva Milit-Revolutia Komitato. En marto 1918 li estis sendita al okcidenta Siberio por organizi nutraĵojn por Moskvo. En majo 1918 li aliĝis al la Milit-revolutia komandejo en Omsk kaj en junio li gvidis la saman komandemon en Tjumen'. Usieviĉ pereis la 3an de aŭgusto 1918 dum iu batalo en iu vilaĝo de la Perma gubernio. Je la honoro de Usieviĉ iuj stratoj estis baptitaj laŭ lia nomo en Moskvo, Niĵnyj-Novgorod, Saratov kaj Tjumen'.²⁷⁶

Aleksandr Bekzadjan (1879-1938)

estis armendevana membro de RSDLP de 1903 kaj bolŝevisto, en 1906-14 li vivis en Svislando, finis jurajn studojn en la Zurika universitato; lia disertacio traktis la temon „agentoj-provokistoj en la kazo de Ruslando“, por kio li ricevis la doktoran titolon (1913). Partopreninto en la kongreso de la „Dua Internacio“ en Bazelo (1912). Kiel estro de la zurika bolŝevista grupo de RSDLP li organizis la prelegon de Lenin de la 9a de julio 1913 en Zuriko pri la nacia demando. En 1914 li revenis al Ruslando kaj faris politikan agadon en Kaŭkazio. Post la Februara revolucio de 1917 li laboris en Bakuo, poste en norda Kaŭkazo. En 1919-20 li estis membro de la sudkaŭkaza regiona partia organo de RKP(b) kaj laboris en gvida funkcio en la Popolkomisario de la eksteraj aferoj de Sovetarmenio. En la unua duono de la 30aj jaroj li estis sovetia ambasadoro en Norvegio kaj Hungario. En novembro 1937 li estis arestita pro ri-proĉo de kontraŭrevolucia agado kaj kondamnita de la Milita Kolegio de la Supera Soveto de USSR al morto. La 1an de aŭgusto 1938 li estis mortpafita en la „poligono“ de Kommunarka. En 1956 li estis rehabilitita.

Sergej Justinoviĉ Bagockij (1879-1953)

Etna polo, kiu aliĝis al RSDLP en 1902, apogis la bolŝevistojn de Lenin kontraŭ A. Bogdanov en la jaroj 1908-9. Bagockij estis kun Lenin en Krakovo, poste en Svislando, kie li helpis al li administri la financajn aferojn, konservante konspirajn rilatojn kun la germanoj tra perantoj. Post la rusa revolucio de 1917 li restis en Svislando kiel estro de la Rusa Ruĝa Kruco en Ĝenevo (ĝis 1936), kie li flegis kontaktojn kun la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Kiam la diplomataj rilatoj estis starigitaj kun Svislando, li agis kiel neoficiala sovetambasadoro en Svislando por teni la plej necesajn rilatojn inter ambaŭ ŝtatoj.²⁷⁷

Georgij Safarov (1891-1942)

devenis de armen-pola familio de arkitekto, kiu en 1908 aliĝis al RSDLP kaj en 1910 elmigris al Svislando, kie li transprenis la sekretariadon de la Zurika sekcio de la bolŝevisma partio (aŭ centro). En majo 1912 li revenis al Peterburgo, kie li estis arestita, sed li sukcesis fuĝi al Francio, de kie en januaro 1916 li estis forpelita. En aprilo 1917 li veturis kun Lenin, Zinov'ev kaj sia edzino en la „plombizita“ trajno tra Germanujo kaj Svedujo al Ruslando, kie li fariĝis kunlaboranto de la gazeto *Pravda* kaj membro de la Peterburga komitato de RSDRF(b). En 1918 li fariĝis ano de la prezidio de la Urala komitato de RKP(b), en kiu li prenis la decidon pri la mortigo de la cara familio. Poste Safarov iris al Turkestano, kie li fariĝis ano de la loka CK de RKP(b). En marto 1921 li elpaŝis kun Stalin pri la nacia demando dum la Xa kongreso de RKP(b). Inter 1922 kaj 1924 li estis membro de la Ekzekutiva Komitato de Komintern, kie li gvidis la Orientan sekcion kaj estis sekretario de la Ekzekutiva Komitato. Poste li aktivis en la Leningrada regiona komitato de la partio kaj estis redaktoro de *Leningradskaja pravda*, krome ĝis 1925 membro-kandidato de la partia CK. En la partia skismo li apogis la grupon de Zinov'ev, apartenis al la „Nova opozicio“. Oni sendis lin kiel sekretarion de la sovetia ambasado al Ĉinio, kion Safarov perceptis kiel ekzilon. Poste oni volis sendi lin al la komerca reprezentejo de USSR en Turkio, sed li rifuzis veturi tien. Ĉar li estis apogita de Trockij kaj Zinov'ev, en decembro 1927 Safarov estis eliminata el la partio, arestita kaj kondamnita de NKVD al kvarjara ekzilo en Aĉinsk en la Krasnojarska regiono. Kiam li rezignis pri sia opoziciemo, en novembro 1928 lia partia membreco estis restarigita, kio signifis, ke li povis daŭrigi sian antaŭan laboron en Komintern. Post la murdo de Kirov en decembro

²⁷⁶ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Grigori_Alexandrowitsch_Ussijewitsch.

²⁷⁷ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Sergey_Yustinovich_Bagotsky.

1934 Safarov estis denove arestita kaj kondamnita al dujara ekzilo, kiun li devis pasigi denove en Siberio (Aĉinsk). Tion sekvis en 1936 aldona kondamno de NKVD pro „kontraŭrevolucia trockiisma aktiveco“ al kvinjara malliberigo en Vorkuta, kie li kunlaboris kun „la organoj“ por denunci aliajn personojn. Sed tio ne plu helpis al li. La 16an de julio 1942 li estis kondamnita de NKVD al la mortpuno pro „kontraŭsoveta trockiisma terorisma aktiveco“ kaj mortpafita la 27an de julio 1942. Kiam lia kazo estis reaktita en 1957, 1958 kaj 1962, la koncerna komisiono venis al la konkludo, ke rehabiliti lin ne indas. Pro tio li ankaŭ ne estis reakceptita postmorte de la komunisma partio, kvankam en 1991 li estis finfine rehabilitita.²⁷⁸

Moisej Ĥaritonov (1887-1948)

Judo el suda Ruslando (Ukrainio), kiu aliĝis en 1905 al RSDLP kaj aktivis ĉefe en Nikolaev kaj Odeso. En 1906 li estis arestita kaj sendita al la gubernio de Oloneck. En 1912 li elmigris al Svislando, kie li konatiĝis kun Lenin. Li fariĝis sekretario de la bolŝevisma organizaĵo en Zuriko, kie li finis la Politeknikan universitaton, kaj partoprenis en la konferenco de la Eksterlanda bolŝevisma sekcio en Berno en 1915. En aprilo 1917 li reveturis al Ruslando per la „plombizita“ trajnvagono de Lenin kaj estis elektita kiel membro de la Petrograda komitato de RSDLP(b) kaj aktivis kaj elpaŝis en diversaj okazoj. Li fariĝis sekretario de la Perma gubernia komitato de RSDLP(b) kaj eniris la Uralan regionan buroon de la CK de RKP(b). Poste li ludis rolon en la Ruĝa Armeo, estis sekretario de la Petrograda gubernia komitato de RKP(b) kaj havis aliajn funkciojn. En 1921 li fariĝis komisararo de la Sudokcidentaj Fervojoj, poste (unua) sekretario de la Urala buroo de la CK RKP(b). Ene de la partio li aliĝis al la flanko de la kontraŭstalina opozicio. Post tio li akceptis gravan partian funkcion en Saratov, sed pro kritiko kontraŭ la partia regularo li estis liberigita de sia funkcio. Ĉar li apartenis al la „Maldekstra opozicio“, en 1927 li estis eliminata el la partio, sed unu jaron poste reakceptita de ĝi post deklaro, ke li forlasis la opozicion. Li ricevis novajn funkciojn kaj laboris en la komerca reprezentejo de USSR en Grandbritio. Kvankam li okupis sufiĉe altajn partiajn funkciojn, li estis arestita en decembro 1934 kaj akuzita kadre de la „Leningrada kontraŭrevolucia zinov'eva grupo“. NKVD kondamnis lin al dujara ekzilo en Siberio (Tobol'sk). En la sama jaro li estis ree eliminata el la partio. Dum sia restado en la prizono en marto 1937 li ricevis novan decidon de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR, kiu kondamnis lin al la mortpuno, kiu tamen estis transformita al dekjara malliberigo. En 1947 li estis denove arestita kaj en februaro 1948 denove kondamita al dekjara arestpuno. Ĥaritonov forpasis en la malliberejo en 1948. Li estis rehabilitita en 1958 kaj enterigita en la Novodeviĉi-tombejo en Moskvo.²⁷⁹

Grigorij Ŝklovskij (1875-1937)

Kemikisto kun doktora titolo, kiu studis en la Berna universitato kaj havis malgrandan kemian laboratorion en Berno, kie li estis la ĉefa kontaktpersono de Lenin. En somero 1917 li reveturis per la tria trajno de rusaj elmigrintoj al Ruslando kaj en 1918 revenis al Berno kiel anstataŭanta estro de la sovetia ambasado en Svislando. Laŭ Victor Serge, *Mémoires d'un révolutionnaire de 1901 à 1941* (Paris 1951, p. 82), Ŝklovskij finiĝis per suicido.²⁸⁰

Ljubov' (Ester-Ljuba) Aksel'rod (1868-1946)

Filino de rabeno el nuntempa Belorusio, kiu revolucie agadis en suda Ruslando (Ukrainio) flanke de la „narodnikoj“ kaj elmigris al Francio kaj Svislando post malsukcesinta atenco kontraŭ caro Aleksandro IIIa. En 1892 ŝi transiris al la marksismo, aliĝis al la grupo „Liberiĝo de la laboro“ kaj dum multaj jaroj estis adepto de Pleĥanov kaj membriĝis en RSDLP. En 1900 ŝi finis siajn studojn en la Berna universitato kaj akiris la doktoran titolon en filozofio kun disertacio pri la mondkoncepto de L.N. Tolstoj (Stuttgart 1902²⁸¹). En 1902-3 ŝi organizis prelegojn de Pleĥanov kaj Lenin por rusaj elmigrintoj en Berno kaj tiuokaze renkontiĝis kun Lenin en sia berna loĝejo. Aksel'rod publikigis artikolojn pri filozofiaj temoj

²⁷⁸ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Georgi_Iwanowitsch_Safarow.

²⁷⁹ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Moissei_Markowitsch_Charitonow.

²⁸⁰ Laŭ Gautschi, Lenin en Svislando, p. 308.

²⁸¹ Vd. <https://www.swissbib.ch/Record/110551516>.

en la gazetoj *Iskra* kaj *Zarja*, reprezentante la menŝevismajn vidpunktojn. Post amnestio en 1906 ŝi reiris al Ruslando kiel fakulino pri marksisma filozofio kaj polemikis kontraŭ la teorioj de N.A. Berdjaev, P.B. Struve kaj A.A. Bogdanov, tiel ke ŝi akiris inter la ruslandaj socialdemokratoj, eĉ bolŝevistoj, la reputacion de defendantino de la „pura marksisma filozofio“, pro kio ŝi ricevis la pseŭdonomon „ortodoksulino“. Dum la revolucio de 1917 ŝi unue estis membro de la menŝevisma CK, poste de la CK de la grupo „Edinstvo“ de Pleĥanov. En la 20aj jaroj Aksel'rod instruis en la „Instituto de la ruĝaj profesoroj“, poste laboris en la Instituto de la scienca filozofio de la Ruslanda Asocio de scienc-esploraj institutoj (RANION) de la Akademio de Sciencoj de USSR, en la Ŝtata Akademio de artaj sciencoj kaj en la katedro pri filozofio de la fakultato de la socisciencoj de la Moskva ŝtata universitato (MGU) kaj profesoris en aliaj institutoj. En la 30aj jaroj Aksel'rod apartenis al la t.n. „mekanistoj“ kaj „cionistoj“, kiuj estis kritikataj pro reviziado de la marksisma filozofio, pro kio ŝi estis forpuŝita de la instruado; ŝia plej lasta libro aperis en 1934 kaj ŝia nomo forgesiĝis. Malgraŭ tio, ŝi ne fariĝis viktimo de la stalinisma teroro. Aksel'rod forpasis la 5an de februaro 1946 en Moskvo kaj estis enterigita en la Nova Donskoj-tombejo.²⁸²

Elena Rozmiroviĉ (1886-1953)

Ĉi tiu verva revoluciulino, kiu devenis de besarabiaj nobeloj, frue migris al eksterlando por daŭrigi sian kleriĝon, finante la juran fakultaton de la Pariza universitato. Al RSDLP ŝi aliĝis en 1904. Reveninte al Kievo en 1906 ŝi faris revolucionan propagandon inter kamparanoj kaj fervojistoj. En 1907-9 ŝi estis ripete arestita kaj kondamnita al arestpuno en la prizona fortikaĵo de Narym (Tomska regiono) en Siberio por tri jaroj. Poste ŝi loĝis en Parizo kaj Vieno, kie ŝi plenumis diversajn funkciojn en la buroo de la CK kaj estis delegita kiel reprezentanto de RSDLP al la kongreso de la „Dua Internacio“ en Bazelo (1912). Post tio ŝi estis resendita al Ruslando por labori kiel sekretario de la bolŝevisma frakcio de la IVa Dumao. Samtempe ŝi aktive kunlaboris kun la bolŝevisma gazetaro *Pravda*, *Prosveŝĉenie*, *Rabotnica* k.a. En februaro 1914 ŝi estis denove arestita kaj devis forlasi Petrogradon por du jaroj kaj troviĝis sub polica observado. Translokiĝinte al Ĥarkovo, ŝi tamen estis devigita migri al eksterlando por eviti novan arestadon. En 1915 ŝi partoprenis en la konferenco de RSDLP en Berno kaj ĉeestis la tie kunvokitan internacian socialisman virinan konferencon. Malgraŭ grandaj riskoj, ŝi denove reiris al Ruslando, kie ŝi estis denove arestita kaj sendita al la Butyrka-prizono en Moskvo por ses monatoj kaj poste ekspedita al Ĥarkovo. Sekve, ŝi estis ekzilita al la Irkutska gubernio, kie ŝi restadis ĝis la Februara revolucio de 1917, dum kiu ŝi fariĝis membro de la Irkutska urba komitato de la bolŝevistoj. En marto ŝi revenis al Petrogrado, kie ŝi laboris por la Buroo de militaj organizaĵoj ĉe la CK kaj redaktis la gazeton *Soldatskaja pravda*. Dum la Oktobra revolucio ŝi estis komandita al la fronto por defendi sin kontraŭ la kontraŭrevoluciaj trupoj de Krasnov kaj Kerenskij kaj akceptis politikan mandaton. Post aktiveco ĉe la unua Revolucia tribunalo, kiu respondecis pri kontraŭrevoluciaj sabotuloj kaj krimuloj,²⁸³ ŝi estis nomumita prezidanto de la Ĉefa administracio de la Popolkomisario de la transporto de RSFSR (ĝis 1922) kaj sendita al laboro kadre de la Popolkomisario de la laborista-kamparana inspektado, kies juran sekcion ŝi gvidis. Krom tio, ŝi gvidis la „Scienc-eksperimentan instituton por administracia tekniko“. En 1924-30 ŝi estis membro de la Centra kontrolkomisiono (CKK) de VKP(b) kaj en 1927-30 membro-kandidato de la prezidio de CKK VKP(b). En 1931-33 ŝi kunlaboris kun la Popolkomisario de la transporto de USSR, en 1935 ŝi fariĝis direktoro de la Ŝtata Lenin-biblioteko (ĝis 1939) kaj poste kunlaboris kun la A.M. Gor'kij-Instituto de la monda literaturo. Ŝi posedis du ordenojn de la „ruĝa standardo de la laboro“ (1945). Elena Rozmiroviĉ, kiu estis la duonfratino de Evgenija Boŝ (vd. supre), forpasis la 30an de aŭgusto 1953 kaj estis enterigita en la Novodeviĉi-tombejo en Moskvo.²⁸⁴

Aleksandr Abramoviĉ (Ĉetuev, 1888-1971)

Abramoviĉ aliĝis al RSDLP en 1908, estis kondamnita al arestpuno en malliberejo kaj restado en orienta Siberio. En 1911 li estis devigita forveturi en la emigracion. En Svislando li estis la sekretario de la bolŝevisma sekcio en Ĝenevo, kie li studis medicinon en la loka universitato, kion li finis en 1916. En la

²⁸² Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Ljubow_Issaakowna_Axelrod.

²⁸³ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Revolutionary_tribunal_\(Russia\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Revolutionary_tribunal_(Russia))

²⁸⁴ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Jelena_Fjodorowna_Rosmirowitsch.

romanda urbo La Chaux-de-Fonds, kiun Lenin vizitis la 18an de marto 1917, mallonge antaŭ sia forveturo de Svislando, li estis la ĉefa bolŝevisto. Post la Februara revolucio de 1917 li reveturis kun Lenin en la „plombizita“ vagono. Li fariĝis membro de la Odesa soveto, agitis ĉe la Rumana fronto, poste li estis membro de la komitatoj de RSDLP(b) en Odeso kaj Sevastopolo, kie li partoprenis flanke de la Ruĝa Armeo en la bataloj kontraŭ la germanaj trupoj kaj la trupoj de Denikin. Inter majo 1918 kaj februaro 1919 li troviĝis ĉe la fronto kiel militkomisaro de iu Moskva milita distrikto. Poste li fariĝis respondeculo de Komintern en la romanaj landoj kaj restadis kontraŭleĝe kiel agento en Francio, Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio por instrui al la reprezentantoj de la eksterlandaj komunismaj partioj kontraŭleĝajn metodojn de la batalo. Li estis arestita de la franca polico, sidis en la malliberejo, sed estis liberigita kaj poste arestita en Italujo kaj resendita al Ruslando, kie li kariervis kaj kolektis multajn meritojn. En 1921 li fariĝis sekretario de la ambasado de USSR en Estonio, poste en Vieno. En 1924-25 li laboris kiel partia instrukciisto en Ekaterinoslav. En 1925-27 li agadis por la sekcio de la internaciaj rilatoj de la Ekzekutiva Komitato de Komintern kiel spiono sub la nomo Albreĥt Arno, de 1927-31 kiel referanto en la Ekzekutiva Komitato de Komintern kaj kiel ĝia estro en Ĉinio. Post sia reveno al USSR li estis akceptita de la Biologi-teoria sekcio de la „Instituto de la ruĝaj profesoroj“, kie li plikleriĝis ĝis septembro 1932. Post tio li estis sendita al okcidenta Siberio, kie li gvidis partiajn komitatojn en iu fabriko en Novosibirsk kaj la Stalin-minejojn en Prokop'evsk. Li estis elektita kiel membro de la Novosibirska urba komitato kaj membro de la buroo de la Prokop'evska urba komitato de VKP(b). Post tio li translokiĝis al Tomsk, kie li instruis kiel docento aŭ profesoro biologion, poste marksismon-leninisman, dialektikan kaj historian materiisman kaj darvinisman en la Tomska ŝtata universitato kaj en aliaj sciencaj institutoj de tiu urbo. En 1947 li ricevis la Lenin-ordenon kaj posedis ankaŭ la „Ordenon de la ruĝa standardo de la laboro“. Abramoviĉ, kiu scipovis la francan, germanan kaj anglan lingvojn, havis privatan bibliotekon de ĉ. 5 mil libroj, kiujn li transdonis al la Tomska universitato. En 1952 li forveturis el Tomsk kaj forpasis la 21an de januaro 1972 en Liepāja, Latva SSR, kie li vivis de 1956 aŭ 1961.²⁸⁵

Mieczysław Broński (1882-1938)

Ĉi tiu poldevena aktivulo, kiu studis ekonomiajn sciencojn en la Munkena universitato, agitadis post februaro 1905 en Varsovio por la Pola Socialdemokratia Partio kaj estis plurfoje arestita. En 1907 li migris al Svislando, kie li vivis en Zuriko kaj fariĝis membro de la Svisa Socialdemokratia Partio. Dume li doktoriĝis sur la kampo de ekonomiaj sciencoj. Dum la Unua mondmilito li aliĝis al la grupo de la „Zimmerwald-maldekstro“ ĉirkaŭ Lenin kaj partoprenis kiel reprezentanto de la socialdemokratio de Pollando kaj Litovujo en la konferenco de Kiental en aprilo 1916. En somero 1917 li veturis al Ruslando, kie li partoprenis la laboron de la Petrograda soveto de RSDLP(b). Post la Oktobra revolucio li kunlaboris kun la gazeto *Pravda*, estis membro de la konsilio de la Ŝtata Banko, anstataŭanto de la popolkomisaro pri komerco kaj industrio ĝis 1919; krome li membris en la Supera konsilio por popolekonomio kaj en la Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato VCIK. En 1920-22 li estis ambasadoro en Aŭstrio, poste prezidanto de la ekonomia sekcio de la fakultato pri socisciencoj, membro de la kolegioj de la Popolkomisario de la financoj, poste de la ekstera komerco. En 1928 li estis eksigita de siaj postenoj kaj akuzita pro apogo de „burĝaj ekonomiistoj“ kaj „utiligo de iliaj rekomendoj“. Malgraŭ tio, li daŭrigis sian laboron kiel membro de la Komunisma Akademio, profesoro de la 1a Moskva Ŝtata Universitato, redaktoro de la gazeto *Socialisma ekonomio* kaj supera scienca kunlaboranto de la Instituto por ekonomio de la Akademio de sciencoj de USSR en Moskvo. La 9an de septembro 1937 li estis arestita kaj kondamnita, la 1an de septembro 1938, pro partopreno en la agado de kontraŭrevoluciaj terorismaj organizaĵoj, al morto kaj samtage mortpafita kaj enterigita en Kommunarka. En julio 1956 li estis rehabilitita de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR.²⁸⁶

Kiam li estis sovetambasadoro en Vieno, Broński edziĝis en 1920 laŭ soveta juro al la germana komunistino Susanne Leonhard-Köhler, kies filo Wolfgang (Wladimir) Leonhard (1921-2014), iama

²⁸⁵ Laŭ https://ru.wikipedia.org/wiki/Абрамович,_Александр_Емельянович kaj [http://wiki.tsu.ru/wiki/index.php/Абрамович_\(Четув\),_Александр_Емельянович](http://wiki.tsu.ru/wiki/index.php/Абрамович_(Четув),_Александр_Емельянович).

²⁸⁶ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Mieczysław_Bronski.

membro de la „grupo Ulbricht“, fariĝis konata fakulo pri la historio de Sovetunio, GDR kaj la komunismo kaj renoma verkisto.²⁸⁷

Adolf Warski (-Warszawski) (1868-1937)

estis pola revoluciulo, kelkfoje arestita kaj ekzilita, membro de la Unio de polaj laboristoj, de la Socialdemokratia Partio de Pollando kaj Litovujo kaj de la Komunisma partio de Pollando, redaktoro de polaj socialdemokrataj gazetoj, delegito de SDKPiL en la dua kaj kvara kongresoj de RSDLP, en 1906 membro de la CK RSDLP, partoprenis en la 3-6aj kongresoj de Komintern. En 1915/16 li ĉeestis la konferencojn de Zimmerwald kaj Kiental kiel reprezentanto de la pola socialdemokratia partio. En 1919-26 li estis membro de la CK de la Komunisma Partio de Pollando, de 1923 membro de ĝia politburoo. En 1926 li estis elektita al la Sejmo nome de KPP. En 1929 li estis devigita elmigri al Sovetunio, kie li laboris en la Marks-Engels-Lenin-Instituto kaj prilaboris la historion de la pola laborista movado. En 1937 li suferis stalinismajn reprezaliojn, estis mortpafita kaj postmorte rehabilitita.²⁸⁸

Pawel Lewinson (Stanislaw Łapiński, Andrzej Wolski) (1879-1937)

De 1904 Lewinson estis aktivulo de la Pola Socialisma Partio, en 1905-6 membro de ĝia CK, en 1906 li transiris al la maldekstra alo de PSP. En 1906 li organizis la fuĝon de politikaj prizonuloj el la malliberejo Pawiak. Post sia arestado en 1906 li iris en 1907 al Usono, kie li agadis en la pola medio kiel teoriisto. En 1906-18 li estis membro de la Centra Laborista Komitato. La jarojn de la Unua mondmilito li pasigis apud Arĥangel'sk, en Francio kaj Svislando kaj ligiĝis kun la menŝevistoj de Martov. En 1915/16 li ĉeestis la konferencojn de Zimmerwald kaj Kiental kiel reprezentanto de PSP. De 1917 li troviĝis en Ruslando, kie li fariĝis membro de RKP(b) kaj laboris por la sovetia diplomatio, en 1920-27 gvidante la berlinan sekcion por diplomatia informado. Reveninte al Sovetunio, en 1927-32 li funkciis kiel redaktoro de la gazeto *Izvestija*. Post sia arestado dum la stalinismaj purigoj li finiĝis per suicido la 10an de septembro 1937 en la Butyrka-prizono en Moskvo.²⁸⁹

Władysław Stein-Krajewski (W. Dombrowsky, 1886-1937)

Pola komunisma aktivulo de juda deveno, kiu en 1904 aliĝis al la Socialdemokratia Partio de Pollando kaj Litovujo kaj en 1910-14 pasigis la jarojn en la malliberejo. Poste li kunlaboris kun Lenin kaj de 1916 estis membro de la estraro de SDKPiL, kies landan estraron li reprezentis kiel „W. Dombrowsky“ dum la konferenco en Kiental (1916). En 1920 li estis denove arestita kaj malliberigita en la varsovia citadelo. En 1920-21 kaj 1927-29 li apartenis al la CK de KPP, estis delegito en la tria kongreso de Komintern en 1921. En la kvina Komintern-kongreso de 1924 li estis elektita kiel membro de la prezidio. En 1930 li ekloĝis en Sovetunio, kie li daŭrigis labori en Komintern kiel membro de la internacia kontrolkomisiono kaj gvidanto de la gazetara sekcio. Dum la stalinismaj purigoj li estis arestita de NKVD en majo 1937 kaj la 20an de septembro kondamnita de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR al morto pro „aktivado en terorisma organizaĵo“ kaj mortpafita en la sama tago. Lia kadavro estis bruligita en la Donskoj-tombejo, kie li estis anonime enterigita. Rehabilitita en majo 1955 de la sama milita kolegio. Lia edzino Zofia Warska (1885-1937) estis la filino de Adolf Warski.²⁹⁰

Pesaĥ Liebmann Herŝ (Lemansky, 1882-1955)

devenis de juda familio el Litovujo, kiam ĝi ankoraŭ apartenis al la Ruslando Imperio. En Varsovio, kie li komencis studi matematikon, li agadis por la cionismo. En 1905 li aliĝis al la Juda Socialisma Partio de Litovujo, Pollando kaj Ruslando, konata kiel „Bund“, kiu estis fondita en 1897. Pro siaj kontraŭcarismaj aktivecoj Herŝ estis devigita aŭ preferis translokiĝi al Svislando, kie en la Ĝeneva universitato

²⁸⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Wolfgang_Leonhard.

²⁸⁸ Laŭ <https://encyklopedia.pwn.pl/haslo/Lewinson-Pawel:3932060.html>.

²⁸⁹ Laŭ <http://www.sztetl.org.pl/pl/person/764.pawel-lewinson>.

²⁹⁰ Laŭ https://pl.wikipedia.org/wiki/Władysław_Stein-Krajewski.

li daŭrigis sian profesian karieron. En 1909 li dungigis kiel instrukciisto en la departemento pri statistiko kaj demografio kaj doktoriĝis per disertacio en la franca lingvo, kiu estis dediĉita al „la migranta judo“. Lige kun siaj aktivecoj por „Bund“ li publikigis artikolojn pri politikaj kaj sociaj temoj (elmigrado kaj juda naciismo) en la juda, pola kaj rusa gazetaro. En la tempo de la Unua mondmilito, kiam li estis universitata profesoro, li okupiĝis ĉefe pri la situacio de la judoj en Eŭropo. En 1915 li reprezentis, kiel Lemansky, la eksterlandan sekretariojn de „Bund“ en la konferenco de Zimmerwald, kiun ankaŭ Lenin kaj Trockij partoprenis. En la 20aj kaj 30aj jaroj li daŭrigis sian scian laboron pri la problemoj de la judoj. Dum la Dua mondmilito Herŝ aktivis en la nomo de judoj, kiuj vivis en landoj, kiuj estis okupataj de la germanaj nazioj kaj reprezentis tiujn judojn, kiuj fuĝis al Svislando. Krom tio, li estis reprezentanto de la Amerika Juda Laborista Komitato kaj membris en aliaj organizaĵoj. En 1947 Herŝ vizitis unuafoje Palestinon por partopreni en la Monda Kongreso por Judaj Studoj en Jerusalemo. En 1954 li estis elektita kiel estro de la Monda Populacia Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazis en Romo, kaj prezidis la Internacian Union de la Scienca Studado de la Popolacio.²⁹¹

Mark Natanson (1850-1919)

devenis, kiel Liebmann Herŝ, de juda familio el Litovujo, kiu estis parto de la Ruslanda Imperio, en kiu li estis malliberigita en prizono kaj deportita por multaj jaroj al la nordo de la lando kaj al orienta Siberio pro sia proksimeco al la revoluciuloj-teroristoj. Natanson apartenis al organizaĵoj kiel la „Cirklo de Ĉajkovskij“, „Lando kaj Libereco“, „Partio de Popolaj Rajtoj“, k.a. En 1904 li migris al Svislando, kie li aliĝis al la „Partio de la socialismaj revoluciuloj“ (PSR). Dum la revolucio de la jaroj 1905-7 li reiris al Ruslando, kie li servis al la CK de PSR. Post la sufokado de tiu revolucio li revenis al Svislando, kie li renkontis Leninon. En la skismo de la socialismaj partioj inter „defendistoj“ kaj „internaciistoj“ Natanson elektis la duajn kaj ĉeestis (kiel Bobroff) la konferencojn de Zimmerwald kaj Kiental en 1915 kaj 1916 kiel reprezentanto de la CK de PSR de Ruslando, kies manifestojn li subskribis kiel reprezentanto de la PSR-internaciistoj. Post la Februara revolucio de 1917 Natanson reveturis per la „plombizita“ trajnvagono tra Germanujo al Ruslando, kie li fariĝis grava figuro de la maldekstra alo de PSR, kiu formiĝis kiel aparta partio, kiu apogis la bolŝevistojn en la Oktobra revolucio, pledante por la plena transdono de la tero al la kamparanoj kaj de la potenco al la sovetoj. Sed baldaŭ la maldekstraj socialismaj revoluciuloj forlasis la sovetregistaron kun protesto; kelkaj anoj eĉ kontraŭstaris la bolŝevistojn per armiloj. Sed Natanson ne apogis tiun kurson, ĉar li timis la malvenkon de la soveta registaro, la finon de la revolucio kaj la komencon de kontraŭrevolucio. Li fondis la „Partion de la revolucia komunismo“, kiu apogis la bolŝevistojn kaj fine kunfandiĝis kun la Komunisma Partio de USSR. Natanson estis membro de la prezidio de la Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato (VCIK). Tamen, li ne plene konsentis pri la politiko de la bolŝevistoj. Li precipe kritikis la decidon malpermesi ĉiujn aliajn politikajn partiojn en Sovetunio. Ĉar li perdis sian fidon je Lenin kaj timis esti arestita, en 1919 Natanson returniĝis al Svislando, kie li mortis la 29an de julio en Berno en la aĝo de 68 jaroj.²⁹²

Viktor Ĉernov (1873-1952)

Ne malpli grava figuro de la socialisma revolucia movado en Ruslando estis ankaŭ Viktor Miĥajloviĉ Ĉernov, kiu en Saratov konatiĝis kun la idearo de N.A. Dobroljubov, N.G. Ĉernyševskij kaj N.K. Miĥajlovskij kaj renkontis la supre menciitan Mark Natanson; en Peterburgo li konatiĝis kun Martov kaj Struve, en Moskvo kun Lenin. En 1902 Ĉernov aliĝis al la Partio de la socialismaj revoluciuloj, en kiu li estis elektita kiel membro de la CK kaj fariĝis la ĉefa teoriisto. En aprilo 1905 li partoprenis en la nomo de la socialismaj revoluciuloj en Ĝenevo interpartian konferencon, kiu estis prezidata de la ekleziulo Gapon, rilate al kiu Ĉernov apartenis al tiuj, kiuj decidis lian mortigon. Post la publikigo de la Oktobra manifesto en 1905 Ĉernov revenis al Ruslando, sed post la sufokado de la revolucio en 1907, kiam sennombraj socialismaj revoluciuloj estis ekzilitaj kaj multaj mortpafitaj, li iris al Londono kaj restis en eksterlando ĝis 1917. En 1915 li partoprenis la konferencon de Zimmerwald, kie li reprezentis sin mem per la gazeto *Žizn* (vivo). Al Ruslando li returniĝis post la Februara revolucio de 1917, akceptante la postenon de la ministro pri agrikulturo en la du unuaj koalicioj de la Provizora Registaro (majo-

²⁹¹ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Liebmann_Hersch.

²⁹² Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Mark_Natanson.

julio) kiel reprezentanto de la socialismaj revoluciuloj. Li adoptis mezan sintenon en la kverelo inter dekstraj kaj maldekstraj socialismaj revoluciuloj. En la balotoj al la Tutruslanda Konstitucia Asembleo li ricevis la plimulton de la voĉoj en la partio de la socialismaj revoluciuloj kaj estis elektita kiel prezidanto de tiu organo. Post la likvido de tiu asembleo Ĉernov komencis kontraŭstari la bolŝevisman potencon. En aŭgusto 1920 li forlasis Ruslandon kaj vivis en Estonio kaj Germanio, poste en Ĉeĥoslovakio kaj Francio, okupiĝante pri socipolitika, scienca kaj literatur-publica laboro. Ankoraŭ antaŭ la apero de nazigermanaj trupoj en Parizo li translokiĝis al la insulo Oléron (Francio) en la Biskaja Golfo kaj poste veturis al Lisbono, de kie en junio 1941 li elmigris kun sia tria edzino Ida al Usono, kie li ekloĝis en Novjorko. Tie li aktive partoprenis la agadon de la socialismaj revoluciuloj kaj redaktis la gazeton *Za svobodu* (por la libereco), verkis science kaj skribis memuarojn ĝis sia morto la 15an de aprilo 1952.

Ankaŭ liaj unua kaj dua edzinoj, **Anastasija Sļjotova** (1873-1938) kaj **Ol'ga Kolbasina** (1886-1964) kaj ties frato Vasilij Suĥomlin (1885-1963) estis socialismaj revoluciuloj kaj membri en la Tutruslanda Konstitucia Asembleo.²⁹³

Interese scii kio dum kaj post la rusa revolucio de la jaro 1917 okazis ankaŭ kun kelkaj aliaj maldekstruloj, socialdemokratoj, socialistoj kaj komunistoj, kiuj ankoraŭ estas menciitaj en ĉi tiu studo.

Fritz Platten (1883-1942)

Kiam Platten, kiu akompanis Leninon en la „plombizita“ vagono tra Germanujo kaj Svedujo, volis transiri la finn-rusan limon ĉe Haparanda-Tornio, li estis haltigita de la oficistoj de la Provizora Registaro kaj devis reveturi al Svislando. La 14an de januaro 1918 Platten sidis en la aŭtomobilo, en kiu sidis ankaŭ Lenin, kontraŭ kiu oni pafis en atenco. Dum Platten povis protekti la bolŝevisman gvidanton kaj savis lian vivon, li mem estis vundita ĉe la mano. Por atingi la mondan revolucion, Platten ne hezitis pravigi perforton. Dum la partia kongreso de la svisa SP li vokis: „Kion signifas 100'000 mortintoj en la nomo de la proletaro, se per tio povas esti kreita jarcentojn longa feliĉo de la proletaro.“ En 1923 Platten migris (kun 21 personoj, inkluzive ses infanojn kaj liajn gepatrojn) kiel „koloniisto“ al Sovetunio, kie li fondis kun svisaj laboristaj elmigrintoj agrikulturan kooperativon ĉe la vilaĝo Novaja Lava apud Syzran' en la hodiaŭa Uljanova regiono, kiu ricevis la nomon „Solidareco“. En 1924 al tiu kooperativo aldoniĝis 70 pliaj elmigrintoj. De 1926 Platten vivis en Moskvo. En 1931-37 li laboris kiel sciencisto en la „Internacia agrikultura instituto“ kaj kiel instruisto en la Moskva fremdlingva instituto. Kadre de la stalinismaj purigoj de la jaroj 1937-38 Fritz Platten estis forigita de siaj laborpostenoj en Komintern kaj arestita en 1937. La 12an de marto 1938 li estis kondamnita de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR al okjara restado en punlagro (ITL). La 29an de oktobro 1939 la Milita Tribunalo de USSR kondamnis lin al kvarjara arestado kun senigo de liaj liberecoj pro „kontraŭleĝa konservado de armiloj“ (ĉar laŭdire li posedis revolveron „memore pri la revolucio“). Li estis sendita al la koncentrejo en Lipova ĉe Njándoma²⁹⁴ (regiono de Arĥangel'sk, norda eŭropa Ruslando), kie li suferis pro malsato kaj malsano; lia espero, ke li baldaŭ liberiĝos, estis vana, kaj liaj iamaj kontaktoj kun Lenin, kiujn li utiligis por pravigi sian senkulpecon, tute ne helpis al li. Kiam la 12an de marto 1942 la tempo de lia ekzilo finiĝis, li tute ne estis liberigita. Platten forpasis la 22an de aprilo 1942 (okaze de la naskiĝtago de Lenin) oficiale pro malsaniĝo de la koro, sed tiu versio estas dubinda, ĉar verŝajne li estis mortpafita. Li estis enterigita en komuna tombo, tiel ke la ekzakta loko de lia entombigo ne estas konata. En majo 1956 li estis postmorte plene rehabilitita.

Platten havis tri virinojn (edzinojn). La unua (ne estas klare, ĉu ŝi fariĝis lia edzino) estis la judino **Lina Ĥait**, kiu partoprenis en revolucia rondo kaj helpis liberigi lin, kiam Platten troviĝis en la prizono en Riga (en 1906). Poste ŝi iris kun li al Zuriko kaj havis kun li la filon Georg (nask. en 1909), kiu en 1924 elmigris kun sia patro al Sovetunio. La dua virino (edzino) de Platten estis iu **Ol'ga Nikolaevna**, filino de (la sovetia esperantisto) Nikolaj Korzlnskij,²⁹⁵ kiu finis sian vivon per suicido (en decembro 1918),

²⁹³ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Viktor_Chemov.

²⁹⁴ Vd. <https://ru.wikipedia.org/wiki/Няндома>.

²⁹⁵ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Никола́й_Васи́льевич_Корзлинский.

post kiam ŝi eksciis (false), ke Platten estis kondamnita de la rumanaj aŭtoritatoj al pendigo. Lia tria virino (edzino, nask. en 1902) estis la zurika komunistino **Berta Zimmermann**, kiu migris kun sia edzo al Sovetunio, kie ŝi laboris en la Ekzekutiva Komitato de Komintern. En 1937 ŝi estis arestita de NKVD kaj akuzita laŭ la stalinaj listoj kiel agento de du eksterlandaj spionaj servoj (angla kaj germana). La 2an de decembro 1937 ŝi estis kondamnita de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR pro partopreno en trockiisma organizaĵo kaj mortpafita. En junio 1956 ŝi estis rehabilitita de la sama instanco. En aŭtuno 1988 la filo de Platten elpaŝis en Moskvo okaze de memorkunveno dediĉita al la 105a datreveno de la naskiĝo de Fritz Platten. Laŭ la rusa versio de Vikipedio, en la urbo Njandoma ekzistas strato laŭ la nomo de Fritz Platten plus memortabulo, kaj ĉe la konstruaĵo de la Moskva ŝtata lingvista universitato (strato Ostojenka) troviĝas tabulo memore pri Fritz Platten.²⁹⁶

Robert Grimm (1881-1958),

kiu estis la dua ĉefredaktoro de la svisa socialdemokratia gazeto *Berner Tagwacht* en 1909-18 kaj kiu organizis la famajn konferencojn de Zimmerwald (1915) kaj Kiental (1916), en kiuj Lenin partoprenis kiel reprezentanto de la bolŝevistoj, fariĝis gvida figuro de la svisa kaj eŭropa laborista movado, tamen sen konsenti kun iuj flankoj de la radikala programo de Lenin, pro kio Grimm estis kritikita de li kiel „burĝa oportunisto” k.s. Tamen, Grimm volis helpi al la rusaj elmigrintoj en Svislando kaj okcidenta Eŭropo, ke post la Februara revolucio de 1917 ili povu reveturi al Ruslando, kaj apogis la opcion de la venko de la socialisma revolucio en Ruslando. Tiucele, Grimm veturis, kiel reprezentanto de la „Maldekstro de Zimmerwald“, en majo kun grupo de elmigrintoj al Petrogrado tra Stokholmo, kie li devis longe atendi la permeson por eniri Ruslandon, por sondi kun kelkaj rusaj ministroj kaj politikistoj, kiuj estis proksimaj al la Provizora Registaro, la opcion de aparta pactraktato kun la Germana Regno, t.e. Grimm proponis al ili la „bonajn servojn“ de (neŭtrala) Svislando. Tiu iniciato estis sekrete apogita de la tiam svisa ministro pri eksteraj aferoj, Arthur Hoffmann (FDP), kio estis rimarkita de la internacia spionado, t.e. ĝi trafis la ministron pri armado de Francio (la socialiston Albert Thomas, kiu tiam restadis en Petrogrado), kiam ĉi-koncernaj telegramoj estis interŝanĝitaj tra la svisa ambasado en Petrogrado kun Hoffmann en Berno. La telegramoj estis publikigitaj en la sveda gazeto *Socialdemokraten*. Ĉi tiu diplomacia agado malantaŭ la kulisoj kaŭzis internacian politikan skandalon, ĉar la Aliancoj (ĉefe britaj) riproĉis al la svisa registaro, ke ĝi lezis sian neŭtralecon. Grimm, kiu evidente fariĝis viktimo de sia socialisma fervoro, bonintenca pacifismo kaj de la neantaŭvideblaj intrigoj de la ruslanda kaj internacia politiko, estis deklarita kiel germana agento kaj baldaŭ petita de la Provizora Registaro forlasi Ruslandon, kie Grimm elpaŝis kun paroladoj kaj partoprenis en kunveno de la „Internacia socialisma komisiono”. Dum Grimm perdis post tiu incidento sian kredindecon en la svisa socialdemokratia partio, precipe en la „Maldekstro de Zimmerwald“, Hoffmann estis devigita demisii kiel membro de la svisa registaro, post kiam precipe en la romanda parto de Svislando li estis forte kritikata, kvankam li evidente celis defendi la interesojn de Svislando, kies ekonomio mem suferis pro la sekvoj de la milito en Eŭropo.²⁹⁷

Malgraŭ tiu memorinda incidento, kiu malbone finiĝis por Grimm, li daŭrigis sian agadon kiel gvidanto de la socialisma movado kaj kiel politikisto, kiu en tiu tempo membris en la berna urba parlamento. En novembro 1918 li lanĉis la faman ĝeneralan strikon, kiu kaŭzis la plej gravan krizon en la historio de la svisa konfederacio, pro kio Grimm estis kondamnita al sesmonata arestpuno en prizono. Sub la influo de Grimm, kiu estis kontraŭ la „diktaturo de la proletaro“ kaj la radikala politiko de Lenin, kiu estis puŝita en Sovetunio, la Socialdemokratia Partio de Svislando rifuzis en 1920 aliĝi al la „Tria Internacio“ de la bolŝevistoj, kio kaŭzis skismon en la svisa socialdemokratia kaj kondukis al la fondo de la Komunisma Partio de Svislando. Per tiu sinteno kaj la agnosko de la landa defendo, kiu estis taŭga ankaŭ por burĝaj partioj, li kontribuis, ke la socialdemokratia fariĝis akceptebla por esti reprezentata en svisaj registaroj (kiuj ĝis nun estis regataj ĉefe de burĝaj partioj). Sian pintan karieron Grimm daŭrigis kiel membro de la berna kantona parlamento, de la berna urba registaro kaj kiel unua socialdemokratia membro de la berna kantona registaro (1938-46). Estinte nacia konsilisto (membro de la svisa parlamen-

²⁹⁶ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Fritz_Platten.

²⁹⁷ Laŭ <https://de.wikipedia.org/wiki/Grimm-Hoffmann-Affäre>. En la biografio skizo de P. Ehinger, aperinta en la libro de Urs Altermatt pri la svisaj konfederaciaj konsilistoj (1991), estis emfazitaj antaŭ ĉio liaj intencoj kiel pac-idealisto kaj sento por la justeco kaj ke li celis ludi iun memstaran rolon en la eŭropa pacpolitiko, sen konsulti siajn registarajn kolegojn.

to) por la zurika kantono (1911-19), en 1920-55 li politikumis kiel nacia konsilisto de la berna kantono. En 1936-45 li prezidis la socialdemokratian frakcion en la svisa parlamento kaj en 1946 estis elektita kiel prezidanto de la svisa parlamento. Grimm forpasis la 8an de marto 1958 en Berno.²⁹⁸

Aleksandr L'voviĉ Parvus (Israil Lazareviĉ Helphand, 1867-1924)

Ĉi tiu kurioza revolucia aktivulo, kiu devenis el la Ruslanda Regno, doktoriĝis pri ekonomio en Svislando kaj kunlaboris kun Lenin, ĝis kiam Parvus transiris al la flanko de la menŝevistoj kaj de Trockij. Li organizis kun la germanaj politikaj instancoj la trajnveturon de Lenin kaj de la rusaj elmi-grintoj, kiuj estis blokita en Svislando, en la „plombizita” vagono tra la Germana Regno al Ruslando, ĉar Britio kaj Francio rifuzis doni al ili vizon. Kiel germana civitano Parvus ne povis iri al Ruslando, por kio li longe restadis en Stokholmo, kie li iel provis partopreni en la rusa revolucio. Lige kun la aktivecoj Parvus aperis la demando kaj diskuto pri la financado de la rusa revolucio, ĉu la germanoj donis monon al la partio de Lenin, tra la kanalo de Fürstenberg-Hanecki (vd. sube), sed Parvus kontestis, ke tio okazis.²⁹⁹ Post la Oktobra revolucio Parvus esperis, ke Lenin invitos lin gvidi la financojn de la bolŝevisma ŝtato, sed tio ne okazis, ĉar Lenin malfidis lin kaj konsideris lin tro kompromitita. Ĉar Parvus ne ricevis la permeson por reveturi al Ruslando, li ankoraŭ provis en Svedujo kontribui al la rusa revolucio per eldonado de iu ruslingva gazeto kaj verkis iun libron („En la lukto por la vero”, 1918) por klarigi kelkajn „miskomprenojn” lige kun siaj aktivecoj, ekzemple ke private li ne riĉiĝis per mono, kiu laŭdire estis ricevata de li por helpi la rusan revolucion. Estante riĉulo kiel komercisto kaj posedante milionan monsumon, kiun li investis en diversajn socialdemokratajn gazetojn, li forlasis la politikon, vivis en iu vilao en Berlino kaj forpasis en decembro 1924 pro in-farkto. Post lia morto malaperis ĉiuj paperaj dokumentoj kaj lia posedaĵo laŭ enigma maniero, tiel ke fariĝis malfacile rekonstrui lian agadon favore al la rusa revolucio. La filo, kiun Parvus havis kun la unua edzino, kiu same estis aktivulino de la socialdemokratia movado, Evgenij Helfand (1898-1983), kiu adoptis la nomon Gnedin, fariĝis sovetia diplomato kaj viktimo de la stalinisma teroro, kiu estis kondamnita en 1939-41 al dekjara arestado en la gulago, sed rehabilitita post la morto de Stalin.³⁰⁰ Poste li aktivis kiel disidentulo kaj verkisto, estante en amikaj rilatoj kun A.A. Saĥarov. Lia filo de la dua edzino laboris ĉe la ambasado en Italujo kaj kurioze malaperis sen postlasi spurojn.³⁰¹

Jakub Fürstenberg-Hanecki (1879-1937)

originis el pola industria familio kun judaj radikoj kaj studis en la universitatoj de Berlino, Heidelberg kaj Zuriko. Kiel amiko de Feliks Dzerĵinskij, Fürstenberg-Hanecki kunfondis la Polan Socialdemokratian Partion, en kiu li membris de 1896. En la 1910-aj jaroj Fürstenberg-Hanecki estis ankaŭ grava kunlaboranto de Lenin, kiu engaĝis lin kiel peranton en Pollando kaj Germanujo. En 1912 Fürstenberg-Hanecki organizis lian translokiĝon de Francio al Aŭstrujo-Hungarujo kaj en 1914, vivante kun Lenin en Poronin, atingis lian liberiĝon el la prizono en Novy Targ, kie Lenin estis arestita post la militeksplodo, kaj aranĝis lian veturon al Svislando. Dum la Unua mondmilito Fürstenberg-Hanecki kunlaboris kun Aleksandr Helphand-Parvus en ties komercaj aktivecoj en Skandinavio, kie li rilatis ankaŭ kun Karl Radek, kaj probable ludis gravan rolon en la rusa revolucio, kium li subtenis per mono ricevita el Germanujo, kiu estis interesata pri la sukceso de tiu revolucio. Post la Oktobra revolucio de 1917 Lenin vokis Fürstenberg-Hanecki al Ruslando kaj nomumis lin ĉefo de la Centra Banko de RSFSR kaj anstataŭanta financministro. Krome, li apartenis al la delegacio, kiu reprezentis Ruslandon en la konferenco de Brest-Litovsk en 1918. En la 20aj jaroj Fürstenberg-Hanecki laboris en la popolkomisarioj de USSR de la financoj, ekstera komerco kaj eksteraj rilatoj kaj estis sendita kiel komerca reprezentanto al Latvio. En 1930-35 li estis membro de la prezidio de la Supera Soveto de RSFSR por la popolekonomio. En 1935-36 li estris la administracion de la cirkoj kaj kultur- kaj ripozparkoj en Moskvo. Krome, li helpis al Maksim Gorĉkij reveni al Sovetunio. En 1937 ankaŭ lin atingis la stalinismaj purigoj: Li estis suspektita

²⁹⁸ Laŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Robert_Grimm kaj <http://www.hls-dhs-dss.ch/textes/d/D17333.php>

²⁹⁹ Dum la sovetia historiografio prisilentis tiujn tiklajn demandojn, Gautschi dediĉis al ili tutan legindan ĉapitron.

³⁰⁰ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Jewgeni_Alexandrowitsch_Gnedin

³⁰¹ Laŭ https://eo.wikipedia.org/wiki/Alexander_Parvus.

pro spionado favore al Pollando kaj Germanujo, arestita kaj kondamnita al morto. Jam en novembro de la sama jaro li estis mortpafita.

La tuta familio de Hanecki-Fürstenberg fariĝis viktimo de la stalinismaj reprezalioj. Ankaŭ lia edzino Giza estis arestita du tagojn post Hanecki kaj mortpafita en decembro, du semajnojn post la mortigo de la edzo. Ilia filo Stanislav estis same arestita, akuzita pro aparteno al „kontraŭrevolucia, faŝisma-terorisma organizaĵo de alpagaj grimpisto kaj turistoj” kaj mortpafita en junio 1938 en la „poligono” de Komunarka, post kio li estis rehabilitita en 1954. Ankaŭ ilia filino Ĥana estis persekutita, kondamnita al dekjara restado en prizono, tiel ke ŝi pasigis entute 18 jarojn en la gulago, kie ŝi vivis sub ege malfacilaj kondiĉoj; sed ŝi sukcesis postvivi kaj estis rehabilitita en 1956, revenis al Moskvo, kie ŝi forpasis en 1976.³⁰²

Willi Münzenberg (1889-1940)

apartenis kiel eldonisto al la plej influaj reprezentantoj de la Germana Komunisma Partio de la Vejmara Respubliko. Dum la Unua mondmilito li gvidis la Internacian junularan sekretariejon en Berno (Svislando) kaj konatiĝis kun Lenin, kun kiu li partoprenis en la dua Zimmerwald-konferenco de Kiental. De Lenin li ricevis la taskon organizi la internacian laboristan helpon por Sovetunio. Inter 1924 kaj 1933 Münzenberg apartenis al la CK de KPD kaj estis deputito de la Reĥstago. Münzenberg aktive pledis kontraŭ koloniismo kaj „imperismo”. Li estis enmiksita en la intrigajn kaj venĝajn farojn de Stalin, kiun li persone renkontis kelkfoje, lige kun la purigo de Komintern kaj la fizika likvido de malnovaj bolŝevistoj. En 1936 Münzenberg kritikis la moskvan farsproceson kontraŭ Zinov’ev kaj Kamenev, sed li evitis vojaĝi al Sovetunio kaj ricevis problemojn kun Ulbriĥt, kiu konsideris lin trocki-isto, Merker, Pieck kaj Dimitrov, kiuj volis forpuŝi lin kaj minacis lin per la eksigo el KPD. En marto 1939 Münzenberg mem ekŝiĝis el KPD kaj fondis propran partion. Post la okupado de la beneluksaj ŝtatoj fare de la germana armeo en majo 1940, Münzenberg internigis sin en koncentrejoj de Francio (Parizo kaj Chambaran), kie li volis eskapi al Marsejlo por kaŝi sin aŭ pluveturi al Nordafriko. Povas ankaŭ esti, ke li celis reiri al Svislando, kie li havis amikojn kaj monon. Lia kadavro kun ŝnuro ĉirkaŭ la kolo estis trovita en oktobro 1940 en arbaro apud la vilaĝo Montagne ĉe Saint-Marcellin (Isère) inter Valence kaj Grenoble, kie li mistere pereis aŭ per suicido aŭ estis mortigita verŝajne en junio.³⁰³

Angelica Balabanova (Balabanoff, 1878-1965)

Ĉi tiu fama itala socialistino, kiu devenis de juda familio el Kievo kaj estis la edzino de ukraina menŝevisto, dum mallonga tempo membris en la ukraina parlamento, sed forlasis Ruslandon en 1897 kaj translokiĝis al Bruselo, kies universitaton ŝi finis per doktora titolo en filozofio kaj literaturo. Ŝi daŭrigis siajn studojn en Germanujo kaj Italujo, kie ŝi konatiĝis kun rusaj elmigrintoj kaj aliĝis al la Unuiĝo de la rusaj socialdemokratoj en eksterlando kaj al la Itala Socialisma Partio, kiu taskis ŝin fari propagandon kaj instruan agadon inter italaj laboristoj-elmigrintoj en Svislando kaj aliaj landoj. Krom kun gvidaj italaj socialistoj – i.a. Benito Mussolini – en la jaroj de la Unua mondmilito ŝi kunlaboris kun Martov kaj Trockij. En 1915 kaj 1916 ŝi partoprenis en ambaŭ Zimmerwald-konferencoj en Svislando kiel reprezentanto de Italujo kaj de la Internacia Socialisma Komisiono. En Kiental ŝi forlasis la „centron” kaj alproksimiĝis al la bolŝevistoj de Lenin. Post la Februara revolucio de 1917 ŝi veturis al Ruslando kaj aliĝis al RSDLP(b), ĝuante la fidon kaj bonvolon de ĝia gvidanto. Ŝi daŭrigis labori en Stokholmo en la sekretariejo de la Zimmerwald-movado kaj rilatis kun svedaj socialistoj. En 1918 ŝi okupis poste-non kiel helpanto de la prezidanto de la Popolkomisario de la eksteraj aferoj de Sovetukrainio (Ĥristian Rakovskij), estis membro de la Ekzekutiva Komitato kaj sekretario de Komintern kaj prezidis ĝian sudan buroon. En januaro 1920 ŝi revenis al Moskvo. Kiam en 1922 ŝi havis alian opinion ol Zinov’ev, kiun ŝi cetere tre malŝatis, ŝi forlasis la laboron en Komintern kaj reveturis al Italujo, kie ŝi aliĝis al la grupo de Giacinto Serrati, kiu same partoprenis ambaŭ konferencojn de Zimmerwald. En 1924 Balabanova estis eksigita de la sovetia KP pro kontraŭsovetia sinteno kaj en rezolucio de Buĥarin listigita kiel persono subtenanta trockiismon. Post la venko de la faŝismo en Italujo, Bala-

³⁰² Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Jakub_Ganezki.

³⁰³ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Willi_Münzenberg.

banova estis devigita forlasi tiun landon kaj iris al Svislando, Aŭstrio, Francio kaj Usono, kie ŝi estis aktivulino de la t.n. „2¹/₂a Internacio“, reprezentante „centrajn“ vidpunktojn inter socialdemokratio kaj komunismo. Post la fino de la Dua mondmilito ŝi reiris al Italio, kie ŝi pledis kontraŭ la unuigo de la italaj socialistoj kun la komunistoj. En 1947 ŝi aliĝis al la grupo de Giuseppe Saragata, kies „Socialisma partio de italaj laboristoj“ transfor-miĝis en 1951 al la Itala Socialdemokratia Partio. Balabanova forpasis la 25an de novembro 1965 en Romo. Ŝi postlasis plurajn verkaĵojn, inter kiuj ŝiaj legindaj memuaroj kun travivaĵoj kaj spertoj en la socialisma movado estis tradukitaj al pluraj lingvoj.³⁰⁴

Fino

Bibliografio

Ĉefe uzitaj fontoj:

Gautschi, W.: Lenin als Emigrant in der Schweiz. Ex Libris, Zürich 1975.

(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Gautschi+Lenin+als+Emigrant+in+der+Schweiz&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

Pianzola, M.: Lenin in der Schweiz. Dietz, Berlin 1956.

(<https://www.swissbib.ch/Record/26263872X>)

Kudrjavcev, A.S., Murav'jova, L.L., Sivolap-Kaftanova, I.I.: Lenin v Ŝeneve. Izdatel'stvo političeskoj literatury, Moskva 1985.

(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Lenin+v+Zheneve&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

Kudrjavcev, A.S., Murav'jova, L.L., Sivolap-Kaftanova, I.I.: Lenin v Berne i Cjuriche. Izdatel'stvo političeskoj literatury, Moskva 1987. (Izd. 2-e dopolnennoe, 1990)

(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Lenin+v+Berne&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

Krupskaja, N.K.: Erinnerungen an Lenin. 1a volumo (jaroj 1893-1905). Literatur und Politik, Wien 1929.

(<https://www.swissbib.ch/Record/282082239>; Teksto alirebla en la reto sub <http://leninism.su/memory/1380-vospominaniya-o-lenine-chast-i.html>)

Krupskaja, N.K.: Erinnerungen an Lenin. 2a volumo (jaroj 1908-1917). Ring-eld., Zürich 1933.

(<https://www.swissbib.ch/Record/151048487>; Teksto alirebla en la reto sub <https://leninism.su/memory/1399-vospominaniya-o-lenine-chast-ii.html>)

Vd. ankaŭ:

<https://sites.google.com/site/sozialistischeklassiker2punkt0/nadeschda-krupskaja/n-k-krupskaja-erinnerungen-an-lenin-1929>

Kahlweit, C.: Agentin in eigener Sache: Nadeshda Krupskaja (1869-1937). En: Kahlweit, C. (eld.): Jahrhundertfrauen. Ikone, Idole, Mythen. Beck'sche Reihe. C. H. Beck, München 1999. p. 274-280.

Balabanoff, A.: Erinnerungen und Erlebnisse. Laub'sche Verlagsbuchh., Berlin 1927.

(<https://www.swissbib.ch/Record/282089160>).

Nova eldono:

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/angelica-balabanoff/lenin-oder-der-zweck-heiligt-die-mittel/id/9783320022884>.

Solženicyn, A. I.: Lenin in Zürich. Scherz, Bern 1977.

(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Solschenizin+Lenin+in+Z%C3%BCrich&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

³⁰⁴ Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Angelica_Balabanova.

McCarthy, A.: Robert Grimm. Der schweizerische Revolutionär. Francke, Bern 1989.

(<https://www.swissbib.ch/Record/269382879>)

Pri la trajnvojaĝo de Lenin en aprilo 1917:

Platten, F.: Die Reise Lenins durch Deutschland im plombierten Wagen. Neuer Deutscher Vlg., Berlin 1924.

(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Platten+Reise+Lenin&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

Hahlweg, W.: Lenins Reise durch Deutschland im April 1917. En: Vierteljahreshefte für Zeitgeschichte (München), 4/1957, p. 307-29.

(Teksto alirebla en la reto sub http://www.ifz-muenchen.de/heftarchiv/1957_4.pdf)

Merridale, C.: Lenins Zug. Die Reise in die Revolution. S. Fischer, Frankfurt a.M. 2017.

(<https://www.swissbib.ch/Record/482634537>,

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/catherine-merridale/lenins-zug/id/9783100022745>)

Pri la konferencoj de Zimmerwald kaj Kiental:

Degen, B., Richers, J. (eld.): Zimmerwald und Kiental. Weltgeschichte auf dem Dorfe. Chronos, Zürich 2015.

(<https://www.swissbib.ch/Record/338726039>,

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/zimmerwald-und-kiental/id/9783034012980>)

Grimm, R.: Zimmerwald und Kiental. Robert Grimm-Gesellschaft, Bern 2014. [1917].

Humbert-Droz, J.: Der Krieg und die Internationale. Die Konferenzen von Zimmerwald und Kienthal. Europa Verlag, Wien-Köln-Stuttgart-Zürich 1964.

(https://de.wikipedia.org/wiki/Jules_Humbert-Droz)

Balabanoff, A.: Die Zimmerwalder Bewegung 1914-1919. Archiv Sozialistische Literatur. Bd. 16. Neue Kritik, Frankfurt am Main 1969. [1928].

Pri la rusa revolucio, Lenin kaj Stalin:

Aust, M.: Die Russische Revolution. Vom Zarenreich zum Sowjetimperium. C.H. Beck, München 2017.

(<https://www.swissbib.ch/Record/484121294>)

Reed, J.: Zehn Tage, die die Welt erschütterten. 1922, 2011.

(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Zehn+Tage%2C+die+die+Welt+ersch%C3%BCttert.+&type=AllFields>,

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/john-reed/zehn-tage-die-die-welt-erschuetterten/id/9783886340927>)

Hildermeier, M.: Russische Revolution. Fischer, Frankfurt a.M. 2013. 2a eld.

(<https://www.swissbib.ch/Record/31123772X>, <https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/manfred-hildermeier/russische-revolution/id/9783596153527>)

Bonwetsch, B.: Die russische Revolution 1917. Wiss. Buchgesellschaft, Darmstadt 1991.

(<https://www.swissbib.ch/Record/269644695>)

Geyer, D.: Die Russische Revolution. Vandenhoeck, Göttingen. 3/1980. [1968]

(<https://www.swissbib.ch/Record/26964461X>)

Altrichter, H., Baberowski, J., Dolderer, W.: 1917 – Revolutionäres Russland. K. Theiss, 2016.

(<https://www.swissbib.ch/Record/403507782>)

Pipes, R.: Die russische Revolution. 3 vol. Rowohlt, Berlin 1992-93.
(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Pipes%2C+russische+revolution&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

Pipes, R.: Drei Fragen der russischen Revolution. Passagen-eld., Wien 1999.
(<https://www.swissbib.ch/Record/115142827>, <https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/richard-pipes/drei-fragen-der-russischen-revolution/id/9783851651850>, <http://www.zeit.de/1992/20/grenzenloser-machthunger/komplettansicht>.)

Trotsky, L.: Geschichte der russischen Revolution. Berlin 1932-32.
(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Trotsky%2C+L.%3A+Geschichte+der+russischen+Revolution.+&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>)

Trotsky, L.: Der junge Lenin. Molden, Wien-München-Zürich 1969
(<https://www.swissbib.ch/Record/261188909>)

Trotsky, L.: Stalin. An appraisal of the man and his influence. Harper & Brothers, New York 1941.
(<https://www.swissbib.ch/Record/271403950>)

Trotsky, L.: Stalin. Eine Biographie. Arbeiterpresse Verlag, Essen 2001.
(<https://www.swissbib.ch/Record/27140423X>)

Volkogonov, D.: Lenin. Utopie und Terror. 1994, 2017.
(<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Wolkogonov+Lenin&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>,
<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/dimitri-wolkogonow/lenin/id/9783958410701>)

Zinov'ev pri Lenin: <https://archive.org/details/N.Lenin.SeinLebenUndSeineTaetigkeit>
https://ia802701.us.archive.org/5/items/N.Lenin.SeinLebenUndSeineTaetigkeit/zinovev-n_lenin.pdf

Hedeler, W. (eld.): Die russische Linke zwischen März und November 1917. Dietz, Berlin 2017.
(<https://www.swissbib.ch/Record/483329363>, <https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/die-russische-linke-zwischen-maerz-und-november-1917/id/9783320023294>)

Hoffmann, V.: Nadeshda Konstantinowna Krupskaja: „Ich war Zeugin der grössten Revolution der Welt“. Mediengruppe Neuer Weg, 2013. (el marksisma vidpunkto)
(<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/volker-hoffmann/nadeshda-konstantinowna-krupskaja-ich-war-zeugin-der-groessten-r/id/9783880213937>)

Die Kerenski-Memoiren. Russland und der Wendepunkt der Geschichte. Rowohlt, Reinbek 1989.
(Interview mit Kerenskij: <https://www.youtube.com/watch?v=5pIX7FSu45c>)

Nabokov, V.D.: Petrograd 1917. Der kurze Sommer der Revolution. El la rusa lingvo tradukita de Norbert Randow. Kun postparolo de von Günter Rosenfeld. Rowohlt, Berlin 1992.

Suchanow, N.N.: 1917: Tagebuch der Russischen Revolution. R. Piper, München 1967.
(<https://www.swissbib.ch/Record/281074593>)

Bunin, I.: Verfluchte Tage. Dürlemann, Zürich 2005.
(<https://www.swissbib.ch/Record/274168545>)

Heym, S.: Radek. Romano. C. Bertelsmann, München 1995.

Gazetartikoloj

Lenin en Svislando:

<http://www.faz.net/aktuell/feuilleton/kunst/russland-und-die-schweiz-lenin-im-paradies-der-buechereien-14976953.html>

<http://www.srf.ch/play/tv/tagesschau-am-mittag/video/russland-und-die-schweiz-1917?id=a1aa708a-5c09-40e5-81a6-1b8c9ef9280e>

<http://www.luzernerzeitung.ch/nachrichten/zentralschweiz/luzern/Als-Lenin-nackt-in-der-Waldemme-badete:art9647,969086>

De Carli, L.: Der nette Herr Uljanow. En: *Der Bund* (Bern), 18a de februario 1917, p. 35.

Lenin en Berno:

<http://www.bernerzeitung.ch/region/bern/Wie-Lenin-im-Berner-Exil-den-gewaltsamen-Umsturz-plante/story/31773874>

Lenin en Zuriko:

<https://www.nzz.ch/zuerich/wo-lenin-den-umsturz-plante-1.18645662>

<https://www.nzz.ch/zuerich/wo-lenin-in-zuerich-spuren-hinterlassen-hat-lenin-und-die-friedlichen-spiesser-ld.146969>

<https://www.nzz.ch/zuerich/aktuell/eine-besondere-zuercher-familiengeschichte-lenins-schreibtisch-und-seine-geheimnisse-ld.154568>

Zimmerwald kaj Kiental:

<http://www.zimmerwald1915.ch/Sites/medien.html>

<http://www.derbund.ch/bern/region/Das-LeninDorf-blickt-zurueck/story/26184459>

<http://www.bernerzeitung.ch/region/bern/Wie-das-Dorf-des-Treffens-der-Revolutionaere-gedenken-will/story/29440391>

<http://www.srf.ch/news/regional/bern-freiburg-wallis/zimmerwalder-konferenz-ein-stueck-sozialistische-weltgeschichte>

http://www.bernerlandbote.ch/aktuell/politikgesellschaft/artikelseite-politikgesellschaft/?tx_ttnews%5Btt_news%5D=76134&cHash=a787f0110f6e5092989871646fbb533b

<https://www.bernerzeitung.ch/schweiz/standard/Wie-die-Berner-Polizei-in-Zimmerwald-die-Revolutionaere-uebersah/story/13019561>

<https://www.srf.ch/news/regional/bern-freiburg-wallis/zimmerwalds-kampf-ums-vergessen>

<https://www.nzz.ch/schweiz/proletarier-aller-laender-vereinigt-euch-1.18607865>

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/zimmerwald-und-kiental/id/9783034012980>

<http://d-nb.info/1071427725/04>

<http://www.derbund.ch/bern/region/lenins-schatten-ist-gewichen/story/11713640>

Tschudiwiese:

<http://opusdei.org/de-ch/article/die-tschudiwiese-im-neuen-kleid>

<https://plus.google.com/+OstschweizCh/posts/YaYpN5kpxK8>

Pri eventuala restado de Lenin en Bex/VD:

http://www.ville-geneve.ch/themes/culture/offre-culturelle/bibliotheques/interroge/archives-interroge-question-reponse/?id_detail=4452

Forveturo de Lenin en aprilo 1917:

<http://www.derbund.ch/schweiz/standard/als-lenin-unbemerkt-die-schweiz-verliess/story/18391122>

<http://bazonline.ch/schweiz/standard/lenins-heimreise/story/24956091>

<http://www.blick.ch/news/schweiz/russische-revolution-lenins-zug-faehrt-nach-hundert-jahren-noch-einmal-id6504270.html>

<http://www.sueddeutsche.de/politik/ein-bild-und-seine-geschichte-wie-lenin-zur-weltrevolution-reiste-1.3453924>

<https://www.bzbasel.ch/schweiz/gescheiterte-weltrevolutionaer-wie-der-robert-grimm-ueber-geheimdiplomatie-stolperte-131174107>

<http://www.heute.de/vor-hundert-jahren-reiste-lenin-mit-dem-zug-nach-st.-petersburg-historiker-bezeichnen-ihn-als-boesartigen-schreibtischtaeter-46930130.html>

<https://www.welt.de/geschichte/article163456627/Die-gefaehrlichste-Waffe-des-Weltkriegs-kam-im-Zug.html#cs-DWO-KU-Lenin-Reise-jb-jpg.jpg>

Pri Fritz Platten:

<http://www.pszeitung.ch/ein-schweizer-revolutionaer-der-mit-seinem-leben-bezahlte>

Filmoj, fotokolektoj, teatraĵoj:

Der rote Fritz – Auf Spurensuche in revolutionärer Zeit. Filmo pri Firtz Platten.

<https://www.srf.ch/sendungen/dok/der-rote-fritz-auf-spurensuche-in-revolutionaerer-zeit>

Lenin en Svislando (1965)

<https://www.youtube.com/watch?v=hfErcRyhLDY>

Lenin en Parizo (1980)

<https://www.youtube.com/watch?v=TKfupQSyQqk>

Lenin en Pollando (1980)

<https://www.youtube.com/watch?v=S2rFop1N2YE>

„La trajno“ de la reĝisoro Damiano Damiani (1988)

[https://de.wikipedia.org/wiki/Der_Zug_\(1988\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Der_Zug_(1988)), <https://www.youtube.com/watch?v=qBndgWOdYqQ> (parto I)

kaj <https://www.youtube.com/watch?v=BJYOHGEQLfc> (parto II).

<https://www.youtube.com/watch?v=Gqk5wCsb9YI> (ruslingva sinkronizado).

Trockij (rusa televida filmo, 2017)

<https://www.youtube.com/watch?v=VbGR-aOgEGc>

[https://ru.wikipedia.org/wiki/Троцкий_\(телесериал\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Троцкий_(телесериал))

Dokumenta filmo de ZDF

<https://www.zdf.de/dokumentation/zdf-history/oktoberrevolution---der-umsturz-der-die-welt-veraenderte-100.html>

Diversaj fotoj pri Lenin

<http://photochronograph.ru/2013/04/22/vladimir-ilich-lenin>

„Lenin“ – teatraĵo de la svisa reĝisoro Milo Rau

<http://www.faz.net/aktuell/feuilleton/buehne-und-konzert/milo-raus-lenin-stirbt-vor-langeweile-15256070.html>

<https://www.nzz.ch/feuilleton/lenin-will-ja-nur-spielen-ld.1323989>

https://www.schaubuehne.de/de/produktionen/lenin-2.html/ID_Vorstellung=2614

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/milo-rau/lenin/id/9783957322708>

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/deutschsprachige-buecher/milo-rau/die-zuercher-prozesse-die-moskauer-prozesse/id/9783943167801>

Komento pri la (taŭga) uzado de la resursoj de Vikipedio:

Malgraŭ la senlimaj mankoj, kiujn karakterizas la Vikipedio, tiu enciklopedio estas eksterordinara kaj unika fonto de informoj, kiuj povas esti parte tre utilaj, se oni adekvate konsideras kaj utiligas ilin. La ĉefaj meritoj de Vikipedio estas, ke ĝi disponigas utilajn bazajn informojn pri raraj temoj kaj diversaj personoj, kiujn oni povas rapide trovi per la komputilo en la interreto sen longe serĉadi. Se en tiu studo aperis ligoj al Vikipedio, kiujn multaj sciencistoj evitas, ili tamen povas esti utiligataj kiel resursoj, kiuj servas por rapida baza informiĝo pri homaj biografioj aŭ havigas bibliografiajn indikojn. La kvalito kaj kvanto de la klarigoj en la artikoloj mem estas alia temo. Ĉar la Esperanta Vikipedio ankoraŭ estas tre magra kaj pli servas al propagandaj ol sciencaj celoj, mi konsilas utiligi la lingvan version, kiu estas plej kompleta pri la koncerna temo aŭ biografio. Pere de la gugla aŭ alia tradukilo oni povas kompreni preskaŭ ĉiujn lingvojn kaj tekstojn publikigitajn de Vikipedio.

Koncerne la solvon de la -ata/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjektiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskompenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, novembro 2017 (reviziita en marto 2018)

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

This is a non-commercial projet for educational purposes, such as teaching, scholarship and research. In case of problems with copyright, please contact the author.

Pri la reuzado de bildoj el Vikipedio vd.:

<https://de.wikipedia.org/wiki/Wikipedia:Weiternutzung>

<https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Weiterverwendung>